

**DIVERSAJ AŬTOROJ**  
**DIVERSAJ VERKETOJ**



DIVERSAJ AŬTOROJ

# DIVERSAJ VERKETOJ



**GEO 2022**

# FABELO PRI POPO KAJ LIA DUNGITO BALDA

**Aleksandr Puŝkin** (*Александр Сергеевич Пушкин*)

elrusigis Ivan Lubjanovskij

*Vivis pop',  
Frunto – ŝtipa glob'.*

*Iras la pop' tra bazaro  
Kaj scivolas pri specoj de varoj.*

*Kaj jen Balda marŝas,  
Rekte al la pop' paŝas.*

*"Kial, pop', vi frue vin levis?  
Kion trovi vi revis?"*

*Respondas la pop': "Mi serĉas serviston:  
Kuiriston, hakiston, plugiston.  
Sed kie trovi la similan  
Dungiton malkaran, humilan?"*

*Diras Balda: "Mi servos al vi modele,  
Fervore kaj tute fidele.  
Ne estu tro alta salajro –  
Tri fingrofrapojn surfrunten al vi dum jaro".*

*Enpensiĝis la pop',  
Jam antaŭe jukas la frunto-glob';  
Ja ies tri frapoj – bombardo,  
Sed li konfidis al la rusa "hazardo".*

*Diras la pop': "Konsentite,  
Por ni ambaŭ estos profite.  
Do vivu en mia korto,  
Laboru kun fervoro kaj forto".*

*Loĝas Balda ĉe l' popo en stalo,  
Dormas sur pajlo,  
Manĝas kiel kvaropo,  
Laboras kiel sepopo, –  
Jam frumatene li mil farojn faras,  
Plugas, sterkas, hakas, riparas,  
Hejtas fornnon, ĉion pretigas,  
Kuiras ovon kaj mem senŝeligas.*

*La popedzino pri Balda kontentas,  
La popfilino pri Balda sentimentas,  
La popido lin "onklo" titolas,  
Balda post laboro kun li petolas.*

*Nur la popo Balda'n malŝatas,  
Malafable al li rilatas.*

*Pri la pago li pensas kun timo,  
Pasas la jar' – de l' kontrakt' venas limo.*

*Li nek manĝas, nek trinkas, nokte angoras,  
Jam antaŭe la frunto doloras.*

*Al la edzino li ĉion konfesas:  
"Tiel kaj tiel – kion fari necesas?"*

*La virina cerbo ja estas lerta,  
Pri ĉiuj artifikoĵ sperta.*

*"Mi vin povas, – ŝi diras, – instrui,  
Kiel la kontrakton detruu:  
Donu al Balda ian taskon nur skize,  
Tamen la plenumon postulu precize.*

*Tiel la frunton vi savos de l' klako  
Kaj Balda'n lasos sen pago".*

*Sin eksentis la pop' pli facile  
Kaj rigardas Balda'n pli trankvile.*

*Jen li vokas lin per tono sinjora:  
"He, Balda, mia dungito fervora,  
Devas diabloj ĉiumonate  
Pagi tributon al mi akurate,  
Do miaj aferoj estus agrablaj,  
Sed jam tri jarojn ne pagas diabloj.  
Post manĝo vi vin al ili direktu  
Kaj la tributon kolektu".*

*Balda al la popo nenion rediris  
Kaj tuj al la marbordo foriris.*

*Tie li kablon komencis tordi  
Kaj ĝian randon en maron debordi.*

*Jen aperas el mar' ĉefdiablo:  
"Diru, Balda, por kio la kablo?"*

*– Mi volas per ĝi la maron eksciti  
Kaj kun via gento malpura kviti. –*

*La majunan diablon kaptis angoro:  
"Diru, pro kio la malfavoro?"*

*– Pro kio? Vi ja la tributon pagi ĉesis,  
Vi pagotempon tute forgesis.*

*Tuj mi faros por mi amuzon  
Kaj por vi, hunda gento, konfuzon. –*

*"Balda, kara, atendu minuton,  
Ni pagos plene al vi la tributon.*

*Atendu, mi la nepon invitos".*

*Balda pensas: "Nu, ĉi tiun mi superspritos!"*

*Jen aperas la diablido,  
Miaŭas, kiel malsata katido.*

*"Nu, kampulo-Balda, saluton!  
Kian vi postulas tributon?  
Pri tributo ne aŭdis diabloj.  
De kie do tiuj ĉi malagrabloj?  
Tamen ni pagos post la deca trakto,  
Laŭ reciproka kontrakto, –  
Por ke poste ne estu eraro,  
Ni vetkuru, Balda, ĉirkaŭ la maro.  
Kiu ĉi tien la unua revenos,  
Tiu la tributon prenos".*

*Balda ekridis: "Diablo amuza!  
Kion vi elpensis, ruza!  
Ĉu vi intencas kun mi vetkuri,  
Kun mi, kun Balda mem konkuri?  
Konkuranto vi estas kuraĝa,  
Sed vi vetu kun mia frato malpliĝa".*

*Iras Balda en apudan arbaron,  
Kaptas tie da leporoj paron,  
Unun ŝovas en sakon kaj returne rapidas.*

*La diablido sur la bordo sidas.*

*Je l' oreloj Balda la leporon balancas:*

*"Jen vi sub mia fajfilo dancos:  
Por kun mi vetkuri, diablo,  
Al vi mankas ankoraŭ kapablo –  
Tio estus nur perdi tempon sense,*

*Prefere vetkuru kun mia frato komence.  
Foj-du-tri! Galopu for!"*

*Ekkuris la diablido kaj la lepor' –*

*La unua ĉirkaŭ la maro,  
La dua al la hejma arbaro.*

*Fine kun elŝovita lango,  
Ĉirkaŭinte la maron, kun enfalintaj vangoj,  
La diablido sufoke "finiŝas,  
Sur la frunto ŝviton per la mano viŝas,  
Kredante, ke li venki sukcesas,  
Sed Balda jam la fraton karesas  
Kaj diras: "Ho, mia frato,  
Vi laciĝis, ripozu, amato".*

*La diablido ekstremis,  
Perdis kuraĝon, la voston subpremis,  
Strabe gapas al la leporo.*

*"Atendu, mi baldaŭ revenos kun oro".*

*Al la avo li venis, raportas: "Afero domaĝa!  
Min superkuris Balda malpliĝa!"*

*Streĉe la maljuna diablo pensis,  
Sed Balda tiel brui komencis,  
Ke la tutan maron agitis  
Kaj sur ĝi ondegon ekscitis*

*La diablido revenis: "Kial vi koleras?  
Ni plene la tributon liveros.  
Tamen... ni ankoraŭ unufoje vetos:  
Kiu bastonon pli foren ĵetos,  
Tiu portu hejmen la tributon.  
Ĉu vi timas elartikigi la kubuton?  
Kion vi atendas? Ĉu vi havas dubon?"*

– Ne, mi atendas jen tiun nubon –  
Mi ĵetos tien vian bastonon  
Kaj poste ankaŭ vin, friponon. –

La diablidon timigis ĉi tiu sorto,  
Li kuris al la av' kun raporto.

Kaj Balda krias terure al diabloj  
Kaj ree minacas per kablo.

La diablido elsaltis: "Kial vi bruas? Sufiĉe!  
La tributon ni pagos, tamen kondiĉe..."

– Ne, – diras Balda kun malico, –  
Nun estas mia vico,  
Nun la taskon mi donu,  
Kaj la kondiĉon mi proponu;  
Ni vidu, kiel statas via spino:  
Jen tie paŝtas sin ĉevalino,  
Se vi ŝin levi fortos  
Kaj ŝin duonverston portos,  
Estu la tributo via,  
Se ne, ĝi estu mia. –

La diablido ŝovis sin  
Sub la ventron de l' ĉevalin',  
Sin streĉis risorte,  
Penis tutforte,  
Iom ŝin levis, du paŝojn iris,  
Je la tria falis, apenaŭ spiris.

Balda al li: "Stulta satano,  
La veto kun mi estas vano.  
Vi ne povis ŝin porti per manoj eĉ,  
Kaj mi per piedoj portos sen streĉ' ".

Sur la ĉevalinon Balda saltis,  
Rajdis verston, nur tiam haltis.



*La diablido kuris en tim' kaj teruro  
Al la av' kun raport' pri fiask' je konkuro.*

*La diabloj diskuton aranĝis:  
"Kion fari?" Obstini plu ili ne kuraĝis,  
Sakon kun oro sur Balda'n ŝarĝis.*

*Balda hejmen peze paŝas.*

*Lin ekvidinte, la popo sin kaŝas  
Post la dorson de la edzino,  
Detenas spiradon en sino.*

*Balda trovis la malfeliĉan  
Kaj postulis la pagon laŭkondiĉan.*

*Kun dentoskrapo  
Metas la pop' la frunton al frapo:  
De l' unua frap'  
Saltis la pop' super la kap';  
Kaj de l' dua, akuta,  
Fariĝis la popo muta.*

*Kaj de l' frapo tria  
Fariĝis stulta popo nia.*

*Kaj, frapante, diras Balda inside:  
"Ke ne estu vi, popo, avida".*

# LA SAGACA KNABINO

Julio Baĝy

Hungara popola fabelo

## I

*Vivis iam aŭ neniam  
– diras la fabelo –  
brava, paca sed sagaca  
reĝo en kastelo.*

*Sur si kronon,  
sub si tronon  
li ja reĝe havis,  
ĝis limrando de la lando  
lia leĝo gravis.*

*La eskorto en la korto  
salvon pafis tondre,  
korteganoj, ĉambelanoj  
klinis sin demonstre.*

*Ĉiu gajne zorgoŝajne  
lian gracon serĉis,  
senripoze verse, proze  
komplimentojn verŝis.*

*Li ne kredis. Lin tre tedis  
blufo, ŝerco, klaĉo,  
kaj scivole pensis sole  
pri sagaco, saĝo.*

*Spriton provi, saĝon trovi,  
ne nur la humilon,  
el la oro de l' trezoro  
faris li plugilon.*

*En sunbrilo la plugilo  
por admiro staris:  
Ĝis nun, sciu, ja neni  
tian ilon faris!*

*Tiel pompe kaj sentrompe  
reĝo ne projektis!  
Senmakule, eĉ spegule  
sunon ĝi reflektis.*

*Iom ruze sinamuze  
fine li parolas:  
"Ĉesu psalmi! Diru al mi,  
kiom ĝi valoras?"*

*La demando tra la lando  
tien-reen krozis,  
ĉies menso pro la penso  
viglis, ne ripozis.*

*Tuj tre multe, eĉ tumulte  
grafoj, princoj venis,  
sed neni estis, kiu  
trafis kaj divenis.*

*Ili gapis, kapon skrapis,  
palpis ĝin, balbutis,  
fine honte, forironte  
ruĝiĝante mutis.*

*Sur tronseĝo el la reĝo  
sakris la parolo:*

*„Kia sperto pri mallerto,  
pri la cerba molo!*

*Korteganoj, eskorianoj  
dekorita bando,  
eĉ la princoj el provincoj  
stultas en la lando!”*

*Li do tiam vokis sian  
avo-aĝan sklavon.  
"Diru, homo, via kono  
ĝian valorhavon!”*

*Ŝin klinante, ĝin palpante  
montris li humilon:  
"Kamparanoj en la manoj  
havas ferplugilon.*

*Plugi teron uzas feron  
ĉiu kamparano;  
la valoro de l' laboro:  
ĉiutaga pano.*

*Mi, simplulo, servutulo,  
penson kiel havus  
pri la pezo, pri orprezo?  
Certe mi mistrafus.”*

*"Mia vorto – via sorto  
sciu, servutulo!  
Sen respondo por vi mondo  
dronos en nebulo.*

*Do ekpenu kaj divenu  
la plugilvaloron;  
se ne, voktoj post tri noktoj  
tranĉos vian kolon.”*

## II

*Sur la vojo kun malĝojo  
kamparano migris;  
pro la timo pri la fino  
liaj pensoj nigris.*

*Ĉe vojfino al filino,  
kiam ŝin renkontis,  
tuj raporte simplavorte  
ĉion li rakontis.*

*"Ne cerbumu, pipon fumu,  
poste iru dormi!  
Mi ja trovos, kio povos  
ĝustan solvon formi,  
Ne lamentu, ne plu plendu  
estos - bona fino"  
Tiel ĉarme kaj korvarme  
traktis lin filino.*

*Li cerbumis.... ŝi mastrumis  
kaj babilis, agis,  
ĉion orde, filinzorge  
por remigro pakis,  
kaj matene flustris jene  
antaŭ ol li iris:  
"Al mi kredu, nur ripetu  
kion mi jam diris!"*

## III

*Do matene iom treme  
migris al la reĝo.*

*Foje-foje li survoje  
turnis sin al preĝo,*

*sed ĉe trono paroltono  
kaŝis lian dubon,  
ke neniu tion sciuj,  
nun li ĵetas - kubon.*

*"Reĝa brilo de l' plugilo  
ora, senlabora,  
por la pladoj de l' regatoj  
estas - senvalora.*

*Pluvo, suno por la humo  
multe pli valoras,  
ĉar sen tio ja nenio  
ĝermas, kreskas, floras."*

*Tiel saĝa kaj kuraĝa  
estis la respondo,  
ĝin primiris, eĉ admiris  
la kortega rondo.*

*Sur tronseĝo mem la reĝo  
kriis surprizita:  
"Jen tre trafe: Ci plenprave  
estas vere sprita."*

*"Reĝo nia, peko mia  
pezus sur animo....  
Vi eraris.... Ne mi faris  
solvon, sed filino.*

*Do mi petas, por mi pledas,  
regu vin kortuŝo;  
por mesaĝo de la saĝo  
estis mi nur – buŝo."*

*La honesto kaj modesto  
reĝan plaĉon trafis,*

*kaj mieno suverena  
jam indulgon havis.*

*Li ridetis, flustre petis  
grafon sur tronŝtupo;  
tiu kure kaj rekure  
venis kun – linstupo.*

*"Mia vorto – ŝia sorto,  
vidu, kamparano,  
jen el stupo por okupo  
ne pli ol plenmano.*

*Ŝi ŝpinteksu kaj ampleksu  
ŝia preta tolo  
tian grandon, ke ĝi landon  
kaŝu kun popolo!"*

## **IV**

*Hejmeniris, ĉion diris  
patro al filino....  
Li lamentis, antaŭsentis  
timon pri la fino:*

*"Mi respektas, sed suspektas,  
reĝo havis febron  
stupdonante, ordonante  
fari la – maleblon."*

*"Ne cerbumu, pipon fumu,  
poste iru dormi!  
Solvon ruzan, eĉ amuzan  
provos mi ekformi.  
El maleblo fari eblon  
vanus cerbostreĉo;*

*ne teksaĵon, sed spritaĵon  
volas nia reĝo."*

*Li cerbumis.... ŝi mastrumis  
kaj babilis, agis,  
ĉion orde, filinzorge  
por remigro pakis,  
kaj matene ilustris jene  
antaŭ ol li iris:*

*"Al mi kredu, nur, ripetu  
kion mi jam diris!"*

## V

*Supre reĝo ĉe tronseĝo,  
sube princoj staris;  
kamparano kun elano  
riverencojn faris....*

*Liajn ĝenon, hezitemon  
reĝo vorte tondris:  
"Nu, pri ŝpino la filino  
kion nun respondis?"*

*"Reĝa Moŝto, mi, la poŝto,  
peras, interpretas:  
la filino por la ŝpino  
tage-nokte pretas;  
tolon teksos, ĝi ampleksos  
grandon – landon kovri,  
sub ĉi tendo regimentoj  
povos eĉ manovri,  
sed ŝi petas – mi ripetas –  
ilojn vi preparu:  
bobenilon, radŝpinilon,  
eĉ teksilon faru!*



*Celon trafi volu havi  
vian reĝan dignon,  
ĉion fari, finprepari  
uzu tiun – lignon!"*

*Per la mano kamparano  
montras lignan latan,  
kies grando, mezurrando  
estis nur manplata.*

*Reĝo prenis kaj komprenis,  
tuj eksplode ridis:  
"Solvo ĝusta, miagusta!  
Jen ŝi ree spritis!"*

*"Kiu spritas, ja meritas,  
ke honoru oni;  
mi deziras, eĉ sopiras  
ŝin persone koni.  
Tial, homo, al la trono  
la filinon gvidu;  
miajn gracon kaj donacon  
la kortego vidu!"*

## **VI**

*Man-en-mano kamparano  
kaj filino venis....*

*Nia reĝo sur tronŝego  
pozis, gravmienis,  
sed tuj poste, eĉ ne moŝte  
digno lin forlasis,  
kiam paro el kamparo  
al la trono paŝis.*

*Ŝiaj ondaj haroj blondaj  
brilis kiel oro,  
en sereno de l' mieno  
montris sin pudoro  
sur la vango pentris sango  
rozon al lilio,  
ŝia ĉarmo – estas varmo,  
suna harmonio.*

*Suverene, sed serene  
reĝo sin algestis;  
je la signo ŝi kun digno  
paŝis.... Patro restis....*

*Dum ŝi iris, ĉiu miris;  
"Belo kaj staturro  
estas rekte kaj perfekte  
arto el eburo!"*

*Kvazaŭ helo el ĉielo  
al mi nun rigardus  
kaj sur lipoj du tulipoj  
rubenruĝe arduŝis" –  
tiel reĝo sur tronseĝo  
penis, miris mute  
kaj pro ravo iĝis sklavo,  
amblindulo tute.*

*Ŝin ekvidi kaj decidi  
estas do momento;  
lin katenis, al ŝi ĉenis  
fajre brula sento.*

*Ŝin li svatis, ame flatis,  
tuj dekretis feston,  
donis ringon, krondistingon  
kaj reĝinan veston.*

*"Ju pli frue, des pli brue  
sonu la fanfaroj;  
al ĝojfesto de l' landestro  
venu la najbaroj;  
ĉiu homo ĝis mentono  
manĝu, trinku, dancu,  
eĉ hundvostoj pro la ostoj  
gaje sin balancu!"*

*Reĝa Moŝto je la kosto  
de la propra kaso  
brandon, vinojn, cent bovinojn  
donis al amaso.*

*Tiutage kaj senpage  
ĉiu drinkis, festis,  
eĉ eskorto en la korto  
dormis nur, digestis.*

*"Vin, reĝino, junedzino,  
ame mi salutas;  
korfidelon, orjuvelon  
antaŭ vin mi ŝutas;  
tamen sciu, al neniuj  
rajtos vi konsili,  
ĉar la leĝo de la reĝo  
devos vin ekzili."*

*Homo faras kaj eraras,  
mia edzo, reĝo;  
eble iam pekos mi jam  
spite al la leĝo.*

*Por okazo, se ukazo  
pelos min sen pledo,  
rajton solan kaj konsolan  
havu mi sen peto.*

*Por feliĉo en malriĉo,  
vidu, jam mi planas:  
lasu preni, kun mi teni,  
kion mi plejamas."*

*"Mi promesas kaj permesas,  
portu el palaco,  
por vi kio estas io  
kara laŭ la plaĉo!"*

## VII

*Foje estis, ke forestis  
reĝo kun eskorto,  
du najbaroj, etaj caroj,  
venis al la korto.*

*Pro diskuto, eĉ disputo  
eĥis la palaco;  
ili tedis, solvon petis  
pri milito, paco.*

*Sed al ili ja konsili  
nur la reĝo rajtis,  
kiu fore ĉaslabore  
ie pafis, rajdis.*

*Pro zorgpleno pri problemo  
caroj petis, tedis;  
al invado, al persvado  
la reĝino cedis.*

*Forgesante, nepensante  
pri la sekva puno  
ŝi proponis, konsildonis  
al la cara kuno:*

*"Ne nur toste, vortokoste  
traktu pri la paco,  
ĉiutage, ĉiuage  
vivu sen minaco,  
kaj feliĉaj, eĉ tre riĉaj  
iĝos viaj landoj,  
se obeas, pacon kreas  
manoj kaj la – langoj."*

*Dum la caroj per la ĉaroj  
iris for tre frate,  
– kia sorto! – reĝo, korto  
hejmenvenis – fate....*

*Edzon trompi, leĝon rompi  
ŝi ja ne intencis,  
jen ŝi honte lin renkonte  
ĵus pri peko pensis.*

*„Dum mi ĉasis, kion faris  
sola vi, tre kara?"  
Ŝi kelkvorte diris orde:  
"Mi konsilis, kara."*

*Pro la vero la kolero  
en la reĝo bolis,  
tuj regpoze, furioze  
tiel li parolis:*

*"Via vorto – via sorto!  
Mankas nun pardono  
Lasu tronon, vian kronon,  
iru for el domo!"*

*Sian kronon sur la tronon  
metis ŝi sen vorto,  
sen lamento post momento  
iris for tra l' pordo,*

*sed al reĝo tiu leĝo  
ŝajnis nun maljusto,  
ĉar tre tordis, koron mordis  
io en la brusto.*

*Pensis reĝo: "Stulta leĝo,  
kiu min mem punas....  
Kion fari? Ja erari  
reĝo ne rajtumas."*

*Dum lin regis kaj premegis  
la ĉagreno pike,  
ĉe aranĝo por la manĝo  
helpis ŝi – mistike....*

## VIII

*Reĝo sola, senkonsola  
sidis ĉe la tablo;  
mankis sprito, mankis rido,  
ĉarmo kaj afablo  
La regalo kiel galo  
gustis tro amara,  
ĉar forestis, ne ĉeestis  
la edzino kara.*

*Li nescie trinkis tie  
dolĉan dormigilon,  
poste vidis, vane spitis,  
grizan lampobrilon....*

*Pro la vino de l' reĝino  
li inertis dorme  
kaj ebrie, senkonscie  
ronkis forte, ŝtorme...*

## IX

*Ŝi sekrete, tre diskrete  
veturilon petis,  
reĝon sian senkonscian  
sur ĝin zorge metis;  
el la korto tra l' eskorto  
lin ŝi lerte ŝtelis,  
la ĉevalojn inter valojn  
ŝi senhalte' pelis....*

*Al kabano de kampano  
kiam ŝi alvenis,  
la dormantan reĝon vantan  
enen ŝi tirtrenis  
kaj sur maton la amaton  
metis, kovris, vartis  
kaj ameme, korotreme  
ĝis vekiĝo gardis.*

*Ĉe vekiĝo per streĉiĝo  
brakoj tuŝis trabon  
kaj je salto plafonalto  
batis lian kapon....*

*Lito pajla, sfero ajla,  
senpargeta planko,  
argilmuro, polva puro,  
ĉie manko.... manko....*

*"Kio estas? Kie estas  
mi, ho, Dio sankta?"*

*"Ĉe la sino de l' edzino  
sole vin amanta.  
Vi promesis, kaj permesis  
rajton la konsolan,  
ke mi prenu, ĉe mi tenu  
por mi plej valoran."*

*"Por mi oro de l' trezoro  
senvalora estas,  
ĉar en koro vi, sinjoro,  
mia edzo, nestas;  
geedzeco en reĝeco  
gravas, mi imagas,  
se komune ili kune  
por regatoj agas."*

*"Edzineto, kolombeto,  
orjuvelo rara,  
nur vi estas, ĉiam restos  
por mi la plej kara!  
Manon prenu, kun mi tenu  
povon en palaco,  
sprite brilu kaj konsilu  
por popola paco!"*

.....  
.....

*Kaj de tiam ili ĉiam  
kune regis juste;  
mem parolo de l' popolo  
tion diras ĝuste.*

*Mi aldonas, ĉar mi konas,  
kio estas vero:  
ili nune vivas kune  
nur en la - fabelo.*



# FABELOJ AL HELENJO

**Dmitrij Mamin-Sibirjak**

**Tradukis N.Kabanov (1909)**

**Mamin-Sibirjak**

Li estis unu el la plej fame konataj rusaj verkistoj kaj naskiĝis en jaro 1852. Li skribis multajn rakontojn kaj romanojn, en kelkaj el ili estas bonege priskribita la vivo en mineja regiono de Uralaj montoj kun ĝiaj rabavidaj serĉantoj, kun ĝia severa militista regionestraro, ĝiaj ekspluatantoj, furioza malŝpareco kaj nelongedaŭra riĉeco. Ĉiuj liaj verkoj spiras vivecan veron kaj altan artecon; krom tio en ili estas multe da ago, malsimpla kaj interesa intrigo kaj malsameco de karakteroj kaj personoj. Alia amata temo de Mamin-Sibirjak estas la mondo de infanoj; li skribas ne nur pri infanoj, sed ankaŭ por infanoj, estante agema kunlaboranto de multaj infanaj ĵurnaloj. Liaj fame konataj kaj belegaj rakontoj kaj fabeloj prezentas per sia arteco, sincera bonkoreco kaj spriteco rimarkindan ĉefverkon de nuntempa literaturo. La plej grandan famon ĝuas liaj Fabeloj al Helenjo, kiuj estas jam multfoje reeldonitaj kaj estas plej ŝatata infana legaĵo.

Moskvo, Marto 1909.

N.Kabanov

## **Antaŭfabelo**

Baju, (*Rusa interjekcio; rekantaĵo por dormigi infanojn*) baju, baju!...

Unu okuleto de Helenjo dormas, alia rigardas; unu oreleto de Helenjo dormas, alia aŭskultas.

Dormu, Helenjo, dormu, belulino; kaj paĉjo rakontos fabelojn. Kredeble, ĉiuj estas tie ĉi: kato, kaj vilaĝa hundo, griza museto, kaj grileto sub la forno, makulkolora sturno en kaĝo, kaj malpacema koko.

Dormu, Helenjo, – tuj la fabelo komenciĝos. Jen la alta luno jam rigardas en la fenestron; jen straba leporo, kiu lame forkuras; jen lupaj okuloj, kiuj eklumiĝas per flavaj fajretoj. Alflugas maljuna pasero al la fenestro, frapas per la beko sur vitron kaj demandas: "Ĉu baldaŭ?" Ĉiuj estas ĉi tie, ĉiuj kolektiĝis; kaj ĉiuj atendas la fabelon al Helenjo.

Unu okuleto de Helenjo dormas, alia rigardas, unu oreleto de Helenjo dormas, alia aŭskultas.

Baju, baju, baju!...

Fabelo pri la kuraĝa leporo Long-orela – Strab-okula – Mallong-vosta

Naskiĝis la leporeto en arbaro kaj ĉiam ĝi timis. Kiam ekkrakis branĉo, kiam ekflugis birdo, kiam falis de l' arbo bulo da neĝo, – la spiro de la leporeto jam haltis pro timo.

Timis la leporeto dum unu tago, timis li dum du tagoj, timis dum semajno, timis dum jaro; fine li fariĝis granda, kaj subite tedis al li timi.

– Neniun mi timas! – li ekkriis tiel laŭte, ke oni aŭdis lin en la tuta arbaro. - Nu jen, neniun mi timas!

Kolektiĝis maljunaj leporoj, alkuris malgrandaj leporidoj, kunvenis maljunaj leporinoj, – ĉiuj aŭskultis, kiel fanfaronas la leporo Long-orela, Strab-okula, Mallong-vosta, – ili aŭskultis kaj eĉ al siaj propraj okuloj ne kredis. Ne okazis ankoraŭ, ke leporo neniun timas!

– Ho, vi, Strab-okula, ĉu vi eĉ lupon ne timas?

– Ne, lupon mi ne timas, nek vulpon, nek urson, – neniun mi timas!

Tio ĉi estis ja tute amuza. Ekridegis la junaj leporidoj, kovrante siajn buŝetojn per la antaŭaj piedojl ekridis la bonaj maljunulinoj; ekridetis eĉ la maljunaj leporoj, kiuj jam falis en manegojn de vulpo kaj elprovis lupajn dentojn. Jen tre ridinda leporo! Ho kia ridinda! Kaj ĉiuj subite fariĝis gajaj, komencis ruliĝi, salti, kuradi, nu kvazaŭ ĉiuj freneziĝis.

– Pro kio tie ĉi longe paroladi! – kriis fine la kuraĝiĝinta leporo. - Se mi renkontos lupon, mi mem formanĝos lin...

Ĉiuj vidas, ke li estas ridinda kaj malsaĝa, kaj ĉiuj ridas. Krias la leporoj pri lupoj, kaj jen... la lupoj jam estas tie ĉi.

Li paŝadis en arbaro por siaj lupaj aferoj, malsatiĝis kaj pensis: "Nu bone estus, manĝeti leporon!" Subite li aŭdas, ke tute proksime leporoj krias kaj pri la griza lupoj parolas. Tuj li haltas, ekflaras aeron kaj komencas ŝtele alproksimiĝi.

Tute proksime alvenas la lupoj al la gajiĝintaj leporoj, aŭdas, ke ili mokas lin, kaj precipe – la fanfara leporo Long-orela – Strab-okula – Mallong-vosta.

– He, fratulo, atendu, tuj mi vin formanĝos! – pensis la griza lupoj kaj komencis rigardadi, kiu leporoj fanfaronas pri sia kuraĝeco.

La leporoj nenion vidas kaj gajas eĉ pli multe ol antaŭe. Fine la fanfara leporoj sursaltis sur ŝtipeton, sidiĝis sur siaj postaj piedetoj kaj ekparolis:

– Aŭskultu vi, malkuraĝuloj! Aŭskultu kaj rigardu min! Jen mi montros al vi artifikon... Mi... mi... mi...

Tie ĉi la lango de la fanfaronulo kvazaŭ frostiĝis. La leporo ekvidis la lupon, kiu rigardas lin. Aliaj ne vidis la lupon, sed li mem vidis kaj ne kuraĝis eĉ spiri.

Tiam okazis io tute eksterordinara.

La fanfarona leporeto eksaltis supren, kvazaŭ pilko, kaj pro timego falis rekte sur la larĝan lupan frunton, rulis sur la lupa dorso, transturniĝis ankoraŭ unu fojon en aero kaj poste tiel ekkuregis, ke ŝajne li estis preta elsalti el sia propra haŭto.

Longan tempon kuris la malfeliĉa leporeto, ĝis kiam li perdis ĉiujn siajn fortojn.

Ĉiam ŝajnis al li, ke la lupo persekutas lin kaj jen-jen ekkaptos lin per siaj dentoj.

Fine la malfeliĉulo entute senfortiĝis, fermis la okulojn kaj kiel malviva kuŝiĝis sub arbeto.

La lupo tiutempe kuris alian flankon. Kiam la leporo falis sur lin, ŝajnis al la lupo, ke iu ekpafis lin.

Kaj la lupo forkuris. Ja estas eble trovi en arbaro multajn aliajn leporojn, sed tiu ĉi estis ja freneza...

Longan tempon la aliaj leporoj ne povis rekonsciiĝi. Unu forkuris en arbetojn, unu sin kaŝis post ŝtipeo, unu sin ĵetis en kaveton.

Fine tedis al ĉiuj kaŝiĝi, kaj ili komencis iom post iom elrigardadi, kiuj estis pli kuraĝaj.

– Nu lerte nia leporo timigis la lupon! – diris ĉiuj. - Sen li, ni ne estus foririntaj vivaj. Sed kie li estas, nia sentimema leporo?

Oni komencis lin serĉi.

Iradis, iradis; nenie estas la kuraĝa leporo. Eble manĝis lin alia lupo? Fine oni lin trovis: li kuŝas en kaveto sub arbeto kaj estas

apenaŭ viva pro timo.

– Bravulo vi estas, Strabulo! – ekkriis ĉiuj leporoj unuvoĉe. - Nu jen, Strabulo! Lerte vi timigis la maljunan lupon. Dankon al vi, fratulo! Ja ni opiniis, ke vi fanfaronas.

La kuraĝa leporo tuj prenis dignan mienon; eliris el sia kaveto, vigliĝis, fermetis okulojn kaj ekparolis:

– Kiel vi opinias! He vi, malkuraĝuloj!

De tiu ĉi tago la kuraĝa leporo komencis mem kredi, ke li efektive neniun timas.

## **Fabelo pri kulineto**

### **I.**

Kiel naskiĝis la kulineto – neniun vidis.

Tio ĉi okazis sunan printempan tagon. La kulineto ĉirkaŭrigardis kaj diris:

– Bone!...

Ordigis la kulineto siajnflugilojn, frotis la maldikajn piedetojn unu je alia, ankoraŭ ĉirkaŭrigardis kaj diris:

– Kiel bone! Kia varma suno, kia blua ĉielo, kia verda herbeto – bone, bone! Kaj ĉio estas mia!...

Ankoraŭ interfrotis la kulineto siajn piedetojn kaj ekflugis; ŝi flugadas, ĉion admiras kaj ĝojas. Kaj malsupre la herbeto verdas, kaj en la herbeto kaŝiĝas la purpura floreto.

– Kulineto, venu al mi! – ekkriis la floreto.

La kulineto malsupreniĝis teren, surrampis sur la floreton kaj komencis trinki la dolĉan floran sukon.

– Kia bona vi estas, floreto! – diras la kulineto, frotante sian buŝon per la piedetoj.

– Nu jes, bona, sed ho ve, mi ne scias iradi, – plendis la floreto.

– Kaj tamen estas bone, – certigis la kulineto. - Kaj ĉio estas mia...

Ankoraŭ ŝi ne finis paroli, kiam surflugis kun zumado vila burdo rekte al la floreto.

– Zzz... Kiu enrampis en mian floreton? Zzz... Kiu trinkas mian dolĉan sukon? Zzz... Ha vi, malbona kulino, foriru! Zzz... foriru tuj, se vi ne volas, ke mi mordetu vin!

– Permesu, kion ĉi tio signifas? – ekpepis la kulineto. - Ja ĉio estas mia...

– Zzz... ne, mia!

La kulineto malfacile sin savis de la kolera burdo. Ŝi sidiĝis sur herbeto, lekis siajn piedetojn malpurigitajn de la flora suko, kaj ekkoleris.

– Kia malĝentilulo estas ĉi tiu burdo... Eĉ mirige!... Ankoraŭ li volis piki... Tamen ĉio estas mia – suneto, kaj herbeto, kaj floretoj.

– Ne, ho pardonu – tio estas mia! – parolis vila vermeto, suprenrampanta laŭlonge sur ŝtipo de herbeto.

La kulineto konsideris, ke la vermeto ne scias flugi kaj ekparolis pli kuraĝe:

– Pardonu min, vermeto, vi eraras... Mi ne malhelpas vin rampi, do vi ne disputu kun mi!

– Bone, bone... Sed vi nur ne tuŝu mian herbeton. Mi ne ŝatas ĉi tion, mi devas konfesi. Tro multaj el vi flugadas ĉi tie. Vi estas popolo malserioza, sed mi estas serioza vermeto... Mi diras malkaŝe: ĉio apartenas al mi. Jen mi surrampos sur herbeton kaj ĝin formanĝos; enrampos mi en kian ajn floreton mi volos kaj ankaŭ formanĝos ĝin. Ĝis revido!...

## II.

Post kelkaj horoj la kulineto sciis ĉion, nome, ke krom suno, blua ĉielo kaj verda herbeto ekzistas ankoraŭ la koleraj burdoj, la seriozaj vermoj kaj la diversaj pikiloj sur la floroj. Unuvorte, ŝi eksentis grandan ĉagrenon. La kulineto eĉ ofendiĝis. Efektive, ŝi estis certiĝinta, ke ĉio apartenas al ŝi kaj estas kreita por ŝi, sed aliaj opinias tion saman. Ne, tio estas ne vera... ne povas esti!

Flugas la kulineto pluen kaj vidas... akvon.

– Nu, ĉi tio estas ankaŭ mia! – gaje ekpepis ŝi. - Mia akvo... Ha, kiel estas gaje! Tie ĉi estas la herbeto, la floretoj.

Dume al la kulineto flugas renkonte aliaj kulinetoj.

– Bonan tagon, fratino!

– Bonan tagon, bonulinoj! Ja mi jam ekenuis flugadi sola. Kion vi faras ĉi tie?

– Ni ludas, fratino! Venu do al ni. Ĉe ni estas gaje... Ĉu vi antaŭ nelonge naskiĝis?

– Nur hodiaŭ... La burdo preskaŭ pikis min; poste mi vidis vermon. Mi opiniis, ke ĉio estas mia, sed ili diras, ke ĉio estas ilia.

Aliaj kulinetoj trankviligis la gastinon kaj invitis ŝin ludi kune. Super la akvo la kulinoj ludis kolone: ili turnadas, flugadas, pepadas. Nia kulineto eĉ malfacile spiras pro ĝojo kaj hodiaŭ tute forgesas koleran burdon kaj seriozan vermon.

– Ha, kiel bone!... - murmuretas ŝi kun ravo. - Ĉio estas mia: kaj suneto, kaj herbeto, kaj akvo. Pro kio aliaj koleras, mi entute ne komprenas. Ĉio estas mia, sed mi neniun malhelpas vivi: ili ĉiuj flugadu, zumadu, gaju. Mi permesas...

Finis la kulineto ludi kaj gaji kaj sidiĝis por ripozi sur marĉa kariko (*Lat. carex*). Necesas ja ripozi, efektive. La kulineto rigardas, kiel gajas ŝiaj fratinetoj; subite alflugas pasero; de kie nur li ekaperis? Tiel ege li preterflugis, kvazaŭ ĵetita ŝtono.

– Ha! Ho! – ekkriis la kulinetoj kaj disflugis ĉiufanken.

Kiam la pasero forflugis, mankis tuta deko da kulinetoj.

– Ha, rabisto! – mallaŭdis la maljunaj kulinetoj. - Tutan dekon li mormanĝis...

Ĉi tiu estis pli malbona, ol la burdo. La kulineto komencis timi kaj kaŝiĝis kun aliaj junaj amikinoj ankoraŭ pli profunde en la marĉa herbo. Sed ĉi tie alia malbono; du kulinetojn formanĝis la fiŝo, du aliajn – la rano.

– Kion do signifas tio? – miris la kulineto. - Ĉi tio estas vere tute nebona... Ja neeble estas vivi. Ha, kiaj malbonuloj!

Bone, ke estis multe da kulinetoj kaj neniu rimarkis la malpliigon. Nu, alflugis ankoraŭ novaj kulinetoj, kiuj ĵus naskiĝis. Ili flugadis kaj pepadis:

– Ĉio estas nia... Ĉio estas nia...

– Ne, ne ĉio estas nia, – ekkriis al ili nia kulineto. - Ekzistas ankoraŭ la koleraj burdoj, la seriozaj vermoj, la malbonaj paseroj, la fiŝoj kaj la ranoj. Estu singardemaj, fratinoj!

Cetere, venis la nokto, kaj ĉiuj kulinetoj kaŝiĝis en la kanoj, kie estas tiel varme. Disŝutiĝis la steloj sur la ĉielo, supreniĝis la luno, kaj ĉio rebrilis en akvo.



Ha, kiel estis bone!

– Mia luno, miaj steloj, – pensis nia kulineto, sed ŝi diris tion al neniuj: oni ja povus eĉ tion ĉi forpreni...

### III.

Tiel pasigis la kulineto la tutan someron. Multe ŝi gajis, sed ankaŭ estis multe da malagrablajoj. Dufoje preskaŭ glutis ŝin la lerta hirundo; poste nerimarkeble alŝteliĝis la rano, – nu, ja multajn malamikojn havas la kulinetoj! Tamen, estis ankaŭ ĝojoj. La kulineto renkontis alian kuleton, kun viraj lipharetoj, kiu diris:

– Kiel bela vi estas, kulineto... Vivu kun mi...

Kaj ili ekvivis kune, tute bone ekvivis. Ĉiam kune: kien iris unu, tien iris la alia. Kaj eĉ ili ne rimarkis, kiel la somero pasas. Komenciĝis la pluvoj, la malagrablaj noktoj. Nia kulineto naskis ovetojn, kuŝigis ilin en densan herbon kaj diris:

– Ho, kiel mi estas laca!

Neniu vidis, kiel la kulineto mortis. Nu ja, ŝi ne mortis, sed nur ekdormis por la vintro; en printempo ŝi revekiĝos kaj denove vivos.

## Kiel vivis la lasta muŝo

### I.

Kiel estis gaje somere... Ha, kiel estis gaje! Eĉ malfacile estas, rakonti ĉion laŭorde... Kiom da muŝoj estis – miloj; ili flugadis, zumis, gajis... Kiam naskiĝis la malgranda muŝeto, ĝi ordigis siajn flugiletojn, – al ĝi ankaŭ fariĝis gaje. Tiel gaje, tiel gaje, ke eĉ neeble estas prirakonti. Plej interesa estis tio, ke de matene oni malfermadis ĉiujn fenestrojn kaj pordojn – en kiun fenestron vi volas flugi, en tiun flugu!

– Kia bona estaĵo estas homo! – rimarkis la malgranda muŝeto, flugante de fenestro al fenestro. - Ja por ni estas faritaj la fenestroj, kaj oni malfermas ilin ankaŭ por ni. Tre bone, sed precipe, gaje...

Ĝi milfoje elflugis en ĝardenon, sidis tie sur verda herbeto, kun plezuro rigardis florantan siringon, delikatajn folietojn de tilio, disvolvinta siajn burĝonojn, kaj florojn sur florbedoj. Ĝardenisto, ĝis nun nekonata de ĝi, jam antaŭe prizorgis ĉion. Ha, kiel bona li estas, tiu ĉi ĝardenisto! La muŝeto ankoraŭ ne estis naskiĝinta, kiam li jam ĉion preparis, ĉion, kio estas necesa por la malgranda muŝeto. Ĉi tio estis des pli miriga, ke li mem ne sciis flugi kaj iradis kun granda malfacileco, – li iom ŝanceliĝis kaj paroladis tute nekompreneble.

– Kaj de kie nur aperas ĉi tiuj malbenitaj muŝoj? – murmuretis la bona ĝardenisto.

Kredeble, li, malfeliĉulo, parolis tion ĉi simple pro envio, ĉar li sciis nur surfosi bedojn, displanti florojn kaj surverŝi ilin per akvo, sed li ne povis flugi. La juna muŝeto intence ronde flugadis super la ruĝa nazo de la ĝardenisto kaj treege tedis lin.

Homoj ĝenerale estas tiel bonaj, kaj ĉie ili faras diversajn plezurojn precipe al muŝoj. Ekzemple, Helenjo matene trinkis lakton, manĝis panon kaj poste petis de onklino Olga sukeron, – tion ĉi ŝi faris nur por lasi al muŝoj kelkajn gutojn da elverŝita lakto kaj ĉefe – pecetojn da pano kaj sukero. Nu diru, kio povas esti pli bongusta ol tiuj ĉi pecetoj, precipe kiam oni flugadis tutan matenon kaj malsatiĝis?... Sed la kuiristino Paŭlinjo estis ankoraŭ pli bona ol Helenjo. Ŝi ĉiumatene iris intence por muŝoj al magazeno kaj alportis de tie mirige bongustajn aĵojn: viandon, iafoje fiŝon, kremon, buteron, – unuvorte, la plej bona virino en la tuta domo. Ŝi perfekte sciis, kio estas necesa por muŝoj, kvankam ŝi ankaŭ ne sciis flugi, kiel la ĝardenisto. Tre bona virino, unuvorte!...

Kaj la onklino Olga? Ho, ĉi tiu virino, ŝajne, vivis speciale nur por muŝoj... Ŝi per siaj propraj manoj malfermis ĉiumatene ĉiujn fenestrojn, por ke estu al muŝoj pli oportune enflugi, kaj kiam pluvis aŭ estis malvarme – ŝi fermis la fenestrojn, por ke muŝoj

ne malsekigu siajn piedetojn kaj ne malvarmumu. Poste la onklino Olga rimarkis, ke muŝoj tre ŝatas sukeron kaj berojn, pro tio ŝi komencis ĉiutage kuiri berajn konfitaĵojn. La muŝoj certe tuj divenis, por kio ĉio estas farata, kaj pro dankemo rampis rekte en la pelveton kun bera konfitaĵo. Helenjo ankaŭ tre volonte manĝis konfitaĵon, sed la onklino donadis al ŝi nur unu aŭ du kulerojn da ĝi, por ne senigi la muŝojn. Ĉar muŝoj per unu fojo ne povas elmanĝi ĉion, la onklino Olga konservis la restaĵon de l' konfitaĵo en vitraj skatoloj (*tial ke ĝin ne elmanĝu muŝoj, al kiuj konfitaĵo tute ne konvenas*); kaj poste ŝi elmetis ĝin ĉiutage al la muŝoj, kiam ŝi trinkis teon.

– Ha, kiel bonaj ĉiuj estas! – ekkriis ravita la juna muŝeto, flugante de fenestro al fenestro. Eble, estas pli bone, ke homoj ne scias flugi. Tiam ili fariĝus muŝoj, grandaj kaj manĝemaj muŝegoj, kaj certe mem formanĝus ĉion... Ha, kiel bone estas, vivi en la mondo!

– Nu, homoj tute ne estas tiel bonaj, kiel vi opinias, – rimarkigis la majuna muŝo, kiu volonte murmuris. - Tio ĉi nur ŝajnas tiel... Ĉu vi rimarkis la homon, kiun ĉiuj nomas "paĉjo"?

– Ho jes. Ĉi tiu estas tre stranga sinjoro. Vi estas tre prava, bona maljuna muŝo... Por kio li fumas sian pipon, kiam li bonege scias, ke mi tute ne toleras la tabakan fumon? Ŝajnas al mi, ke li tion ĉi faras malbonintence kontraŭ mi... Kaj li nenion deziras fari por muŝoj. Mi unu fojon provis la inkon, per kiu li ĉiam ion skribas, kaj mi preskaŭ mortis... Tio ĉi, fine, povas indignigi. Mi vidis per miaj propraj okuloj, kiel en lia inkujo dronis du tre belaj, sed nespertaj muŝetoj. Estis terura vidaĵo, kiam li eltiris per plumo unu el ili kaj faris sur sia papero grandan inkan makulon... Imagu vi, li kulpigis pri tio ĉi ne sin mem, sed nin! Kie do estas la justeco?

– Mi opinias, ke tiu ĉi «paĉjo» entute malhavas justecon, kvankam li havas unu kvaliton, – respondis la maljuna sperta muŝo; – li trinkas post tagmanĝo bieron. Tio ĉi estas tute ne malbona kutimo! Mi devas konfesi, ke mi ankaŭ ŝatas bieron, kvankam poste mi havas kapturiniĝon... Kion fari? Malbona kutimo!

– Mi ankaŭ ŝatas bieron, – konfesis la juna muŝeto kaj eĉ iomete ruĝiĝis. - Al mi fariĝas poste tiel gaje, kvankam sekvantan tagon la kapo iomete doloras. Sed «paĉjo» eble nenion faras por muŝoj pro tio, ke li ne manĝas konfitaĵon, sed nur metas sukeron en glason da teo. Laŭ mia opinio, neeble estas, atendi ion bonan de homo, kiu ne manĝas konfitaĵon... Restas al li nur fumi sian pipon.

La muŝoj entute bonege konis ĉiujn homojn, kvankam taksis ilin laŭ sia maniero.

## II.

La somero estis varmega, kaj ĉiun tagon aperis ĉiam pli multaj muŝoj. Ili faladis en lakton, en supon, en inkujon, zumadis, flugadis kaj tedis ĉiujn. Nia malgranda muŝeto jam fariĝis granda muŝo kaj kelkajn fojojn riskis pere. Unuan fojon ĝi enigis siajn piedetojn en konfitaĵon, tiel ke ĝi apenaŭ sukcesis eliĝi, alian fojon pro duondormo ĝi surflugis sur brulantan lampon kaj preskaŭ ekbruligis siajn flugiletojn; trian fojon ĝi preskaŭ estis dispremita inter fenestraj kadroj, – unuvorte, okazintaĵoj estis sufiĉe multaj.

– Kio estas tio? Vivo fariĝas neebla pro tiuj ĉi muŝoj! – plendis la kuiristino; – Kvazaŭ frenezaj ili ĉien eniĝadas... Necesas ilin ekstermi.

Eĉ nia muŝo komencis opinii, ke aperis tro multaj muŝoj, precipe en kuirejo. Ĉiuvespere la plafono estis kovrita kvazaŭ per viva moviĝanta reto, kaj kiam oni alportis provizaĵon, muŝoj sin ĵetis sur ĝin, kiel viva amaso, puŝadis unuj la aliajn kaj treege intermalpaciĝis. La plej bonaj pecoj estis akirataj nur de la plej lertaj kaj fortaj, kaj al ceteraj restis nur manĝrestaĵoj. Paŭlinjo estis prava.

Sed poste okazis io terura. Iun fojon, matene, Paŭlinjo alportis kune kun provizaĵo tre bongustajn paperojn, t.e. ili fariĝis bongustaj, kiam oni dismetis ilin sur teleretoj, surŝutis pulvorigitan sukeron kaj surverŝis varman akvon.

– Jen bonega regalo por muŝoj! – parolis la kuiristino Paŭlinjo, dismetante teleretojn sur la plej videblaj lokoj.

La muŝoj mem divenis, ke tio ĉi estas farata por ili kaj gajamase surĵetis sin sur la novan manĝaĵon. Nia muŝo ankaŭ rapidis al unu telereto, sed oni forpuŝis ĝin maldelikate.

– Pro kio vi puŝas, sinjoroj? – demandis ĝi ofendita. - Cetere mi ja ne estas tiel avida, por forpreni ion de aliaj. Tio ĉi estas tro malĝentila.

Poste okazis io stranga. La plej avidaj muŝoj malsaniĝis unuaj... Ili komence iradis kiel ebriaj, poste ili tute faladis. Matene Paŭlinjo elbalais grandan teleron plenan da malvivaj muŝoj. Restis vivaj nur la prudentaj, inter ili – ankaŭ nia muŝo.

– Ni ne plu volas paperojn! – pepis ĉiuj. - Ni ne plu volas!

Sed tamen la sekvantan tagon ripetiĝis la sama afero. El la prudentaj muŝoj restis vivaj nur la plej prudentaj. Sed Paŭlinjo trovis, ke estas eĉ tro multe da tiaj plej prudentaj.

– Vivo estas neebbla pro ili... – plendis ŝi.

Tiam la sinjoro, kiun oni nomis paĉjo, alportis tri vitrajn tre belajn kloŝojn, enverŝis en ilin bieron kaj metis ilin sur telerojn. Tie ĉi kaptiĝis eĉ la plej prudentaj muŝoj. Montriĝis, ke ĉi tiuj kloŝoj estis simple muŝkaptiloj. Muŝojn allogadis la bieraodoro, ili eniĝadis sub la kloŝon kaj tie pereis, ĉar ili ne sciis trovi elirejon.

– Jen nun bonege! – aprobis Paŭlinjo.

Ŝi montriĝis entute senkora virino kaj gajiĝis pro la muŝa malfeliĉo.

Kio do en tio estas bonega? Nur pripensu! Se homoj havus samajn flugilojn, kiel havas muŝoj, kaj se oni metus muŝkaptilojn grandajn kiel domo, ili ankaŭ enflugus tien. Nia muŝo, instruita per

la maldolĉa sperto eĉ de la plej prudentaj muŝoj, entute ĉesis kredi al homoj. Ili nur ŝajnas bonaj, sed esence ne estas tiaj! Ili okupas sin dum sia tuta vivo nur per tio, ke ili trompas konfidemajn malfeliĉajn muŝojn. Ho, homo estas la plej ruza kaj malbona besto, vere!

Muŝoj tre malmultiĝis pro ĉiuj malagrablaĵoj, kaj poste okazis nova malfeliĉo. La somero pasis, komenciĝis pluvoj, ekblovis malvarma vento, kaj unuvorte fariĝis malagrabla vetero.

– Ĉu efektive pasis la somero? – miradis la restintaj vivaj muŝoj. - Kiel do ĝi jam sukcesis pasi? Tio estas nejusta.

Tio estis efektive pli fatala ol venenumitaj paperoj aŭ vitraj muŝkaptiloj. Oni povis serĉi rifuĝejon kontraŭ la malbona vetero nur ĉe sia plej granda malamiko, t.e. ĉe sinjoro homo. Ho ve! nun la fenestroj jam ne estis malfermitaj tutan tagon, sed nur iufoje – la fenestretoj. Eĉ la suno mem lumas kvazaŭ nur por trompi konfidemajn ĉambrajn muŝojn. Kiel plaĉas al vi ekzemple tia afero? Matene la suno tiel gaje enrigardas en ĉiujn fenestrojn, kvazaŭ ĝi invitus ĉiujn muŝojn en ĝardenon. Oni povus opinii, ke revenis la somero... Kaj jen konfidemaj muŝoj elfugas tra la fenestreto, sed la suno nur lumas, ne varmigas. Ili flugas reen, – la fenestreto estas fermita. Multe da muŝoj pereis tiel dum malvarmaj aŭtunaj noktoj, nur dank' al sia konfidemo.

– Ne, mi ne plu kredas, – parolis nia muŝo. - Nenion plu mi kredas... Se eĉ la suno trompas, al kiu oni povas konfidi?

Kompreneble kun alveno de l' aŭtuno ĉiuj muŝoj havis la plej malbonan humoron. La karaktero malboniĝis preskaŭ ĉe ĉiuj. Antaŭaj ĝojoj entute malestis. Ĉiuj havis tiel malgajajn vizaĝojn kaj fariĝis tiel malviglaj kaj malkontentaj! Iuj eĉ komencis mordi, kio antaŭe tute ne okazis.

La karaktero de nia muŝo tiel malboniĝis, ke ĝi tute ne rekonis sin mem. Antaŭe, ekzemple, ĝi kompatis aliajn muŝojn, kiam ili pereis, sed nun ĝi pensis nur pri si mem. Ĝi eĉ ne hontis diri laŭte, ke ĝi pensis sekrete:

– Nu, ili pereu – por mi pli multe restos!

Unue, la varmaj anguloj, en kiuj bonkondata muŝo povas travivi la vintron, estas tute ne tiel multaj; due, estis tedaj aliaj muŝoj, kiuj ĉie eniĝadis kaj ekkaptis el-sub la nazo plej bonajn pecojn kaj unuvorte kondukis sufiĉe senceremonie. Tempo estas nun por ripozi.

Tiuj ĉi aliaj muŝoj kvazaŭ komprenis tiujn malbonajn pensojn kaj mortadis pocente. Eĉ ne mortis ili, sed kvazaŭ ekdormis. Ĉiutage ili fariĝis ĉiam pli malmultaj, tiel ke jam superfluj estis venenumitaj paperoj kaj vitraj muŝkaptiloj. Sed por nia muŝo eĉ tio ĉi ne estis sufiĉa: ĝi volis resti tute sola. Vi pensu nur, kia agrablaĵo: kvin ĉambroj kaj nur unu sola muŝo!

### III.

Alvenis fine tia feliĉa tago. Unufoje matene nia muŝo vekigis sufiĉe malfrue. Ĝi de longe jam sentis ian nekompreneblan laciĝon kaj preferis sidi senmove en sia anguleto sub forno. Sed nun ĝi sentis, ke io neordinara okazis. Sufiĉe estis nur, alflugi al fenestro, kaj ĉio kompreniĝis per unu fojo. Falis unua neĝo... La tero estis kaŝita per hela blanka kovraĵo.

– Ha, jen kio estas vintro! – rimarkis ĝi. - Tio ja estas tute blanka, kvazaŭ peco da bona sukero...

Poste la muŝo konstatis, ke ĉiuj aliaj muŝoj absolute malaperis. La malfeliĉuloj ne eltenis la unuan malvarmon, kaj ili ekdormis, kie ili okaze sin trovis. La muŝo en alia tempo kompatus ilin, sed nun ĝi nur pensis:

– Nu jen estas bonege... Nun mi estas tute sola! Neniu manĝos mian konfitaĵon, mian sukeron, miajn pecetojn... Ha kiel bone!

Ĝi ĉirkaŭflugis tra ĉiuj ĉambroj kaj ankoraŭ unu fojon konvinkiĝis, ke ĝi estas tute sola. Nun estas eble, fari ĉion, kion ĝi volas. Kaj kiel agrable, ke en la ĉambroj estas tiel varme! La vintro estas nur sur la strato, sed en la ĉambroj estas varme, gaje kaj komforte, precipe

kiam vespere oni eklumigis lampojn kaj kandelojn. Per unu lampo cetere okazis malgranda malagrablaĵo. La muŝo surflugis rekte sur la flamon kaj preskaŭ brulis.

– Tio ĉi estas kredeble vintra muŝkaptilo, – konsideris ĝi, viŝante la ekbruligitajn piedetojn... – Ne, vi min ne trompos... Ho mi bonege komprenas ĉion! Vi volas bruligi la lastan muŝon? Sed mi tute ne volas... Ankaŭ jen kuireja forno – ĉu efektive mi ne komprenas, ke tio ĉi estas ankaŭ muŝkaptilo?

Nur kelkajn tagojn estis feliĉa la lasta muŝo, sed poste subite ĝi enuis, tiel enuis, tiel enuis, ke ŝajnas eĉ neeble prirakonti. Certe al ĝi estis varme, ĝi estis sata, sed poste – poste ĝi ekenuis. Flugadas ĝi, flugadas, ripozas, manĝas kaj denove flugadas – sed ho ve, ĝi rekomencas enui poste ankoraŭ pli ol antaŭe.

– Ha, kiel mi enuas! – pepis ĝi per la plej kompatinda, delikata voĉo, flugante de ĉambro al ĉambro. - Se nur restus ankoraŭ unu muŝeto, eĉ la plej malbona, sed tamen unu muŝeto...

Kiel ege suferis la kompatinda lasta muŝo pri sia soleco – neniu volis kompreni. Certe, ĉi tio kolerigis ĝin ankoraŭ pli, kaj ĝi sin altrudadis al homoj kvazaŭ freneza. Al unu ĝi sidiĝis sur la nazo, al alia – sur la orelo; alifoj ĝi komencis flugi antaŭ la okuloj. Unuvorte – ĝi agis vere freneze.

– Nu kiel vi ne volas kompreni, ke mi estas tute sola kaj ke mi tre enuas? – pepis ĝi al ĉiu. - Vi eĉ ne povas flugi, pro tio vi ja ne scias, kio estas la enuo. Se nur iu bonvolus ludi kun mi... Sed ne, por kio vi taŭgas? Kio povas esti pli mallerta kaj malgracia ol homo? La plej malbela kreitaĵo, kiun mi iam renkontis...

La lasta muŝo tedis la hundon, la katon – fine ĉiujn. Krome ĝi ofendiĝis, kiam la onklino Olga diris:

– Ha, lasta muŝo... Mi petas, ke oni ne tuŝu ĝin. Ĝi vivu la tutan vintron.



– Kio estas ĉi tio? Jen estas vera ofendo. Ŝajne, ŝi eĉ opinias, ke ŝi faris komplezon al mi dirante "Ĝi vivu". Sed se mi enuas! Se mi eble eĉ tute ne volas vivi? Nu jen, mi ne volas, ne volas...

La lasta muŝo tiel koleris kontraŭ ĉiuj, ke eĉ al ĝi mem fariĝis terure. Ĝi flugadis, zumis, pepis...

Araneo, sidanta en angulo, fine kompatis ĝin kaj diris:

– Kara muŝo, venu al mi... Kia bela estas mia araneaĵo!

– Mi tre dankas... Jen ankoraŭ aperis amiko! Nu, mi scias, kio estas via bela araneaĵo! Certe vi iam estis homo, kaj nun vi nur ŝajnigas vin araneo.

– Kiel vi volas, mi ja deziras bonon al vi.

– Ha, kia abomeno! Tio ĉi nomiĝas deziri bonon: formanĝi la lastan muŝon!

Ili tre malpaciĝis, kaj tamen la muŝo enuis, tiel enuis, ke eĉ neeble estas prirakonti. Ĝi koleris kontraŭ ĉiuj, laciĝis kaj laŭte diris:

– Se tiel estas, se vi ne volas kompreni, ke mi enuas, mi restos sidanta en angulo la tutan vintron... Jen! Jes, mi sidos kaj por nenio eliros...

Ĝi eĉ ploretis pro malĝojo, rememorante la pasintan someran ĝojon. Kiom da gajaj muŝoj estis; kaj ĝi deziris resti tute sola... Tio ĉi estis fatala eraro.

La vintro daŭris senfine, kaj la lasta muŝo komencis pensi, ke la somero tute ne revenos. Ĝi volis morti kaj ploradis mallaŭte. Certe, homoj elpensis vintron, ĉar ili elpensas entute ĉion, kio estas malutila al muŝoj. Sed eble la onklino Olga kaŝis ien la someron, kiel ŝi kaŝas sukeron kaj konfitaĵon.

La lasta muŝo estis tute preta, morti pro malespero, kiam okazis io eksterordinara. Ĝi kiel kutime estis sidanta en sia anguleto kaj

koleris, kiam subite ĝi aŭdis – zzzz... Komence ĝi ne kredis al siaj propraj oreloj kaj pensis, ke io ĝin trompas. Sed poste... Ho Dio, kio estis tio! Preter ĝi flugis vera viva muŝeto, ankoraŭ tute juna. Ĝi ĵus naskiĝis kaj ĝojis.

– La printempo komenciĝas... la printempo! – ĝi zumis.

Kiel ili ekĝojis unu pri alia! Ili ĉirkaŭprenadis sin reciproke, interkisis kaj eĉ ĉirkaŭlekis unu la alian per la rostroj. La maljuna muŝo dum kelkaj tagoj rakontadis, kiel malbone ĝi pasigis la tutan vintron, kiel ĝi enuadis sola. La juna muŝeto nur ridis per delikata voĉo kaj neniel povis kompreni, kio estas enui.

– Printempo, printempo! – ripetadis ĝi.

Kiam la onklino Olga igis forpreni ĉiujn fenestrajn kadrojn de l' vintro kaj Helenjo rigardis el la unua malfermita fenestro, la lasta muŝo ŝajne komprenis ĉion..

– Nun mi scias ĉion, – zumis ĝi, elflugante tra la fenestro: – Ni, muŝoj, faras la someron.

## **Lakteto, avena kaĉeto kaj griza kato Murko**

### **I.**

Kiel vi volas, sed tio ĉi estas miriga! Kaj plej mirige estas, ke tio ĉi ripetiĝas ĉiutage. Jes, kiam estas metitaj sur la fornon en kuirejo la poto kun lakteto kaj la argila kaserolo kun avena kaĉeto, tiam la afero komenciĝas. Unue ili staras kvazaŭ trankvile, sed poste komenciĝas interparolado.

– Mi estas lakteto...

– Mi estas avena kaĉeto...

Komence la interparolado iras tute mallaŭte, murmurete; sed poste kaĉeto kaj lakteto komencas laŭgrade varmiĝi pro kolero.

– Mi estas lakteto!

– Mi estas avena kaĉeto!

La kaĉeton oni surkovras per argila kovrilo, kaj ĝi murmuras en sia kaserolo kiel maljunulo. Sed kiam ĝi komencas koleri, suprenleviĝas en ĝi veziko, kreas kaj diras:

– Tamen mi estas avena kaĉeto... pum!

Al la lakteto tiu ĉi fanfaronado ŝajnis treege ofenda. Diru, mi petas, kia vidindaĵo – ia avena kaĉo! La lakto komencis varmegiĝi, ŝaŭmo suprenleviĝis kaj penadis eliĝi el sia poteto. Momenton la kuiristino malatentis, jen la lakteto elverŝiĝis sur la varmega forno.

– Nu jam tiu ĉi malbenita lakteto! – plendis ĉiufoje la kuiristino. - Se iomete oni malatentas, ĝi tuj eliĝas.

– Kion mi povas fari, se mi havas tian ekflameman karakteron? – diris la lakteto por sia pravigo. - Mi mem ja ne estas ĝoja, kiam mi ekflamiĝas. Sed tie ĉi ankoraŭ la kaĉeto ĉiam fanfaronas: "mi estas kaĉeto, mi... kaĉeto, mi... kaĉeto"... Sidas ĝi en la kaserolo, murmuras, nu jen mi ekflamiĝas.

La afero kelkfoje iradis ĝis tio, ke la kaĉeto elkuris el la kaserolo, malgraŭ ĝia kovrilo, – rampis sur la platformon, ĉiam ripetante:

– Mi estas kaĉeto! kaĉeto! kaĉeto!... ĉ-ĉ-ĉ-ĉ-ĉ!

Vere, tio ĉi ne okazis ofte, sed tamen okazis, kaj la kuiristino ripetis malespere ĉiufoje:

– Nu jam ĉi tiu malbenita kaĉeto! Pro kio do ĝi ne sidas trankvile en kaserolo? Estas vere mirige!

## II.

La kuiristino ĝenerale sufiĉe ofte koleris, kaj estis ja ne malmulte da kaŭzoj por tia kolero. Ekzemple la kato Murko! Jes, li estis tre bela kato, kaj la kuiristino tre amis lin. Ĉiun matenon Murko proksime sekvis la kuiristinon kaj miaŭis per tia plenda voĉo, ke ŝajne eĉ ŝtona koro devus kompati.

– Kia nesatigebla ventregio! – miris la kuiristino, forpelante la katon. - Kiom da hepato vi jam manĝis hieraŭ?

– Tio ĉi estis ja hieraŭ! – miris siavice Murko. - Sed hodiaŭ mi denove volas manĝi. Miaŭ!

– Vi kaptu musojn kaj manĝu ilin, maldiligentulo!

– Facile estas, diri tion, sed provu vi mem ekkapti nur unu muson, – respondis Murko. - Cetere ŝajnas, ke mi jam sufiĉe penas. Ekzemple, kiu lastan semajnon kaptis musidon? Kaj pro kio mi havis graton laŭlonge de la tuta nazo? Raton mi preskaŭ kaptis, sed ĝi mem tiel alkroĉiĝis al mia nazo... Tre facile estas, nur paroli: kaptu musojn!

Manĝinte hepaton, Murko sidiĝis apud la forno, kie estas pli varme, fermis la okulojn kaj dolĉe dormetadis.

– Jen, kiom li nutris sin, – rimarkis la kuiristino. - Eĉ okulojn li fermas, maldiligentulo... kaj li volas, ke ĉiam oni donu al li viandon!

– Mi do ne estas monahho por ne manĝi viandon, – sin pravigis Murko, malfermante nur unu okulon. - Krome mi ankaŭ ŝatas manĝeti fiŝojn. Mi ĝis nun ne povas diri, kio estas pli bongusta: hepato aŭ fiŝo. Pro ĝentileco mi manĝas unu kaj alian... Se mi estus homo, mi nepre estus aŭ fiŝkaptisto aŭ kolportisto, kiu alportas al mi hepaton. Mi nutrus ĝis plena satiĝo ĉiujn katojn en la mondo kaj mi mem ankaŭ estus ĉiam sata...

Post manĝo Murko volonte sin okupas diversmaniere por amuziĝo. Ekzemple, li sidas dum du horoj sur la fenestro, kie pendas kaĝo kun sturno. Estas tre agrable rigardi, kiel saltas la malsaĝa birdo.

– Mi konas vin, maljuna friponulo! – krias la sturno. - Nu pro kio vi rigardas min?

– Sed se mi deziras konatiĝi kun vi?

– Mi scias, kiel vi konatiĝas. Kiu antaŭ nelonge manĝis vivan paseron? Vi, abomenulo!

– Neniel mi estas abomenulo, kaj eĉ male. Ĉiuj min amas. Venu al mi, mi fabeleton rakontos al vi.

– Ha friponulo... bona fabelisto! Mi vidis, kiel vi rakontis fabeletojn al rostita kokido, kiun vi ŝtelis en la kuirejo... Bone!

– Kiel vi volas, mi ja parolas nur por via plezuro. La rostitan kokidon mi efektive manĝis, sed estis ja tute egale, ĝi jam taŭgis por nenio.

### III.

Interalie Murko ĉiumatene sidiĝis ĉe la hejtiĝanta kuireja forno kaj paciencie aŭskultis, kiel malpacas la lakteto kaj la kaĉeto. Li neniel volis kompreni, en kio kuŝas la kaŭzo kaj nur palpebrumis.

– Mi estas lakteto.

– Mi estas kaĉeto! Kaĉeto – kaĉeto – ĉ-ĉ-ĉ-ĉ...

– Ne, mi ne komprenas, tute ne komprenas, parolis Murko. - Pro kio vi malpacas? Ekzemple, se mi ripetos: Mi estas kato, mi estas kato, kato, kato... Ĉu estos ofenda por iu? Ne, mi ne komprenas... Cetere mi devas konfesi, ke mi preferas lakteton, precipe kiam ĝi ne koleras.

Unu fojon la lakteto kaj la kaĉeto pli ol kutime varmege malpaciis; ili tiel malpaciis, ke duone ili eliĝis sur la forno, de kio rezultis fortega haladzo. Alkuris la kuiristino kaj ekĝemis.

– Nu kion mi faros nun? – plendis ŝi, demetante de la forno la lakteton kaj la kaĉeton. - Neeble estas eĉ, momenton foriri.

Forpreninte lakteton kaj kaĉeton, la kuiristino foriris en magazenon por aĉeti provizaĵojn. Murko tuj ekuzis tiun okazon. Li sidiĝis ĉe la lakteto, blovis ĝin kaj parolis:

– Mi petas, ne koleru, lakteto...

La lakteto videble komencis trankviliĝi. Murko ĉirkaŭiris ĝin, ankoraŭ unu fojon blovis ĝin, ordigis siajn lipharojn kaj diris afable:

– Aŭskultu, sinjoroj!... Malpaci ĝenerale ne estas bone. Jes. Elektu min kiel juĝiston: mi tuj prijuĝos vian aferon.

La nigra blato, sidanta en fendo, eĉ ektusetis pro rido. Nu jen la juĝisto. Ha, ha! Nu, maljuna friponulo, jen kion vi elpensis. Sed la lakteto kaj la kaĉeto estis ĝojaj, ke ilia malpaco estos fine juĝita. Ili mem ne sciis rakonti, el kio konsistas la malkonsento, kaj pro kio ili malpacas.

– Bone, bone, mi ĉion esploros, – diris la kato Murko. - Mi ne trompos vin... Nu, komencu ni kun la lakteto.

Li ĉirkaŭiris kelkajn fojojn la poteton, provis ĝin per la piedeto, blovis sur la lakton kaj komencis trinki.

– Ho ve! Helpo, helpo! – ekkriis la blato. - Li la tutan lakton eltrinkos, kaj oni opinios, ke mi tion faris.

Kiam revenis de la magazeno la kuiristino kaj ekrigardis la poteton – jen ĝi estas malplena. La kato Murko dormis apud la forno en dolĉa dormo, kvazaŭ nenio okazis.

– Ha vi, sentaŭgulo! – mallaŭdis la kuiristino, ekkaptante lin ĉe la orelo. - Kiu trinkis la lakton? Diru!

Kiel ajn dolore estis, Murko ŝajnis, ke li nenion komprenas kaj ne scias paroli. Kiam oni elĵetis lin ekster la pordon, li skuis sin, lekis la malordigitan hararon, ordigis la voston kaj parolis:

– Se mi estus kuiristo, ĉiuj de mateno ĝis nokto nur trinkus lakton. Cetere, mi ne koleras kontraŭ mia kuiristino, ĉar ŝi ne komprenas ĉi tion...

## **Estas tempo por dormi**

### **I.**

Ekdormas alia okuleto de Helenjo, ekdormas alia oreleto de Helenjo...

– Paĉjo, ĉu vi estas tie ĉi?

– Tie ĉi mi estas, infaneto...

– Ĉu vi scias, paĉjo? Mi volas esti reĝino...

Ekdormas Helenjo kaj ridetas en sonĝo.

Ha, kiel multaj floroj! Kaj ĉiuj ili ankaŭ ridetas. Ĉirkaŭstaras ili runde apud Helenja liteto, intermurmuretas kaj ridas per delikataj mallaŭtaj voĉoj. Purpuraj floretoj, bluaj floretoj, flavaj floretoj, ĉielbluaj, rozaj, ruĝaj, blankaj, – kvazaŭ ĉielarko falis teren kaj disŝutiĝis en vivaj fajreroj, diverskoloraj fajretoj kaj gajaj infanaj okuletoj.

– Helenjo volas esti reĝino! – gaje sonis kampaj kampanoloj, balanciĝante sur graciaj verdaj trunketoj.

– Ha, kia ridinda ŝi estas! – murmuretis modestaj miozotoj.

– Sinjoroj, necesas serioze prikonsideri ĉi tiun aferon, – atakeme entrudiĝis flava leontodo. - Mi almenaŭ tute ne atendis tion...

– Kion signifas – esti reĝino? – demandis blua kampa cejano. - Mi elkreskis en kampo kaj ne komprenas viajn urbajn morojn.

– Tre simple... – enmiksiĝis roza kariofilo. - Tio ĉi estas tiel simpla, ke eĉ ne necesas klarigi. Reĝino – tio ĉi estas... tio ĉi... Ĉu vi do ne komprenas? Ha, kiaj strangaj vi estas... Reĝino, tio ĉi estas, kiam floro estas rozkolora, kiel mi. Alivorte: Helenjo volas esti kariofilo. Ĉu tio ne estas komprenebla?

Ĉiuj gaje ekridis. Silentis nur rozoj. Ili opiniis sin ofenditaj. Kiu ne scias, ke reĝino de ĉiuj floroj estas rozo, delikata, bonodora, miriga? Kaj subite kariofilo sin nomas reĝino... Kia malbonaĵo! Fine unu rozo koleris, fariĝis tute purpura kaj ekparolis.

– Ne, pardonu, Helenjo volas esti rozo... jes! Rozo estas reĝino pro tio, ke ĉiuj ĝin amas.

– Jen, bone! – diris kolere leontodo. - Kion vi opinias pri mi?

– Leontodo, ne koleru, ni petas! – admonis la arbaraj kampanoloj. - Tio malbonigas la karakteron kaj krome, tio estus nebela. Vidu, ni silentas pri tio, ke Helenjo volas esti arbara kampanolo, ĉar tio estas klara per si mem.

## II.

Estis multe da floroj, kaj ili tiel ridinde disputadis; la kampaj floretoj estis tute modestaj – konvaloj, violoj, miozotoj, kampanoloj, cejanoj, kampa kariofilo; sed la floroj kreskintaj en oranĝerioj iomete fanfaronis – rozoj, tulipoj, lilioj, narcisoj, levkojoj, kvazaŭ riĉaj infanoj feste vestitaj. Helenjo pli amis modestajn kampajn floretojn, el kiuj ŝi faradis bukedojn kaj plektadis florkronojn. Kiel ili ĉiuj estas bonaj!

– Helenjo tre amas nin, – murmuretis la violoj. - Ja ni aperas printempe unuaj. Apenaŭ neĝo fluidiĝis, ni jam estas ĉi tie.



– Kaj ni ankaŭ, – diris la konvaloj. - Ni estas ankaŭ printempaj floretoj... Ni ne estas kapricaj kaj kreskas simple en arbaro.

– Sed ĉu ni estas kulpaj, se estas tro malvarme al ni por kreski simple en kampo? – plendis bonodoraj krispaj levkoj kaj hiacintoj. - Ni estas tie ĉi nur gastoj, kaj nia patrujo estas malproksima, kie estas varme kaj neniam estas vintro. Ha, kiel agrable estas tie, kaj ni ĉiam sopiras pri nia kara patrujo... Ĉe vi norde estas tiel malvarme. Nin Helenjo ankaŭ amas, kaj eĉ tre...

– Ĉe ni estas ankaŭ agrable, – disputis la kampaj floroj. - Certe, okazas iufoje granda malvarmo, sed tio estas utila... Kaj krome malvarmo mortigas niajn plej grandajn malamikojn, kiel vermojn, kulojn. Se ne ekzistus malvarmo, estus tre malbone al ni.

– Ni ankaŭ ŝatas malvarmon, – aldiris la rozoj.

Tion saman diris azaleoj kaj kamelioj. Ĉiuj ili amas malvarmon, kiam ili preparas florajn burĝonojn.

– Jen kio, sinjoroj, ni ĉiuj rakontu ion pri niaj patrujoj, – proponis la blanka narciso. - Tio ĉi estas tre interesa... Helenjo nin aŭskultos. Ja, ŝi amas nin...

Nun ekparolis ĉiuj per unu fojo. La rozoj rememoris kun larmoj la benitajn valojn de Ŝirazo, la hiacintoj parolis pri Palestino, azaleoj pri Ameriko, lilioj pri Egipto. La floroj kolektiĝis ĉi tien el ĉiuj terpartoj de l' mondo. Plej multaj floroj alvenis de sudo, kie estas tiom da suno kaj malestas vintro. Kiel bone estas tie! Jes, eterna somero! Kiaj grandegaj arboj kreskas tie, kiaj mirigaj birdoj, kiom da belulinoj-papilioj, similaj al flugantaj floroj, kaj kiom da floroj, similaj al papilioj!

– Norde ni estas nur gastoj, norde estas malvarme al ni, – murmuretis ĉiuj sudaj floroj.

La enlandaj kampaj floretoj eĉ kompatis ilin. Efektive necesas havi grandan paciencon, kiam blovas malvarma norda vento, falas

malvarma pluvo kaj neĝo. Certe printempa neĝeto rapide degelas, sed tamen ĝi estas neĝo.

– Vi havas grandegan mankon, – klarigis cejano, aŭskultinte tiujn ĉi rakontojn. – Mi ne disputas, vi eble estas iufoje pli belaj ol ni, kampaj floretoj, mi volonte konsentas pri tio... jes. Unuvorte, vi estas niaj karaj gastoj, sed via ĉefa manko estas tio, ke vi kreskas nur por riĉuloj; ni kontraŭe kreskas por ĉiuj. Ni estas multe pli bonaj... Jen mi, ekzemple: vi vidas min en manoj de ĉiu vilaĝana infano. Kiom da ĝojo mi donas al ĉiuj malriĉaj infanoj! Ne necesas pagi monon por mi, sed sufiĉas nur eliri en kampon. Mi kreskas kune kun sekalo, tritiko, aveno...

### III.

Helenjo aŭskultis ĉion, pri kio rakontadis al ŝi la floretoj, kaj miris. Ŝi treege deziris mem vidi tiujn malproksimajn landojn, pri kiuj oni ĵus parolis.

– Se mi estus hirundo, mi tuj ekflugus, diris ŝi fine. Pro kio mi ne havas flugiletojn? Ha kiel ĉarme estus, fariĝi birdeto!

Ŝi ankoraŭ ne finis paroli, kiam alrampis al ŝi kokcinelo, vera kokcineleto, ruĝeta, kun nigraj makuletoj, kun nigra kapeto, kun tiaj maldikaj nigraj lipharetoj kaj nigraj maldikaj piedetoj.

– Helenjo, ni flugu! – murmuris la kokcinelo, movetante la lipharetojn.

– Mi ne havas flugilojn, kokcineleto!

– Sidiĝu sur mi...

– Kiel mi sidiĝos, kiam vi estas tiel malgranda?

– Nun jen, rigardu...

Helenjo komencis rigardi kaj miris ĉiam pli. La kokcineleto ordigis la suprajn malmolajnflugilojn kaj samtempe ĝi pligrandiĝis duoble; poste ĝi ordigis la delikatajn kiel araneaĵo malsuprajnflugiletojn kaj fariĝis ankoraŭ pli granda. Ĝi kreskis, kreskis, ĝis fine ĝi estis tiel granda, tiel grandega, ke Helenjo povis libere sidiĝi sur ĝia dorso, inter la ruĝajflugiletoj. Estis tre oportune.

– Ĉu vi sentas vin bone, Helenjo? – demandis la kokcineleto.

– Tre bone.

– Nu, tenu vin nun pli forte...

En unua momento, kiam ili ekflugis, Helenjo eĉ fermis la okulojn pro timo. Ekŝajnis al ŝi, ke flugas ne ŝi, sed ĉio sub ŝi – urboj, arbaroj, riveroj, montoj. Poste ŝajnis al ŝi, ke ŝi fariĝas tiel malgranda-malgrandeta, kiel pingla kapeto, kaj ĉe tio tiel malmultepeza kiel lanuga semero de leontodo. La kokcineleto flugis rapide-rapide, tiel ke vento vere fajfis inter ĝiajflugiloj.

– Rigardu, kio estas tie malsupre... – diris al ŝi la kokcineleto.

Helenjo rigardis malsupren kaj ekmiregis.

– Ha, kiom da rozoj – ruĝaj, flavaj, blankaj, rozaj!...

La tero estis kvazaŭ kovrita per viva tapiŝo de rozoj.

– Malsupreniĝu ni teren, kokcineleto! – petis ŝi.

Ili malsupreniĝis, kaj Helenjo fariĝis denove granda, kiel ŝi estis antaŭe; kaj la kokcineleto fariĝis malgranda.

Helenjo longe kuradis sur la roza kampo kaj kolektis grandan bukedon da floroj. Kiel belaj ili estis – tiuj ĉi rozoj: kaj eĉ la kapo turniĝas pro iliaodoro. Se oni povus transporti tiun ĉi rozan kampon al ni, norden, kie rozoj estas nur karajgastoj!

– Nu, nun ni flugu pluen, – diris la kokcinelo, ordigante siajn flugilojn.

Ĝi denove fariĝis granda-grandega, kaj Helenjo – malgranda, tute malgranda.

#### IV.

Ili ekflugis pluen.

Kiel estis bele ĉirkaŭe! La ĉielo estis tiel blua kaj malsupre ankoraŭ pli blua estis la maro. Ili flugis super kruta kaj ŝtonega bordo.

– Ĉu efektive ni flugos trans la maron? – demandis Helenjo.

– Jes... Nur sidu trankvile kaj tenu vin pli forte.

Komence Helenjo timis, poste – ne. Krom ĉielo kaj akvo nenio restis. Sur la maro naĝis ŝipoj kiel grandaj birdoj kun blankaj flugiloj... Malgrandaj ŝipoj estis similaj al muŝoj. Ha, kiel bele, kiel bone! Kaj malproksime jam vidiĝis la mara bordo, malalta, flava kaj sabla, – marenfluejo de iu grandega rivero, unu tute blanka urbo, kvazaŭ ĝi estus konstruita el sukero. Kaj poste vidiĝis malviva dezerto, kie staris solaj piramidoj. La kokcineleto malsupreniĝis sur la bordon de la rivero. Tie ĉi kreskis verdaj papirusoj kaj lilioj – mirigaj, delikataj lilioj.

– Kiel bone estas ĉe vi, tie ĉi, – ekparolis Helenjo kun ili. - Ĉu vintro ne ekzistas ĉe vi?

– Sed kio estas vintro? – miris lilioj.

– Vintro – ĝi estas, kiam neĝo falas...

– Sed kio estas neĝo?

La lilioj eĉ ekridis. Ili opiniis, ke la malgranda norda knabineto ŝercas. Vere, de nordo ĉiu-aŭtune alflugas ĉi tien grandegaj amasoj da birdoj, kiuj ankaŭ rakontas pri vintro; sed ili mem ne vidis ĝin kaj rakontas pri tio, kion ili nur aŭdis. Helenjo ankaŭ ne kredis, ke vintro povas ne esti kaj sekve pelteto kaj varmaj ŝuoj povas esti ne necesaj.

Ili ekflugis pluen. Sed Helenjo jam ne miris pri la blua maro, nek pri la montoj, nek pri la bruligita de suno dezerto, kie kreskas hiacintoj.

– Al mi estas varmege, – ĝi plendis. - Nu, kokcineleto, estas vere ne bone, kiam daŭras eterne somero.

– Ne al tiu, kiu kutimis, Helenjo.

Ili flugis al altaj montoj, sur kies suproj kuŝas eterna neĝo. Ĉi tie ne estas tiel varme. Post montoj komenciĝis netraireblaj arbaroj. Sub arkaĵo de arboj estis mallume, ĉar la suna lumo ne penetras tra la densaj supraĵoj de l' arboj. Sur branĉoj saltis simioj. Kaj kiom estis da birdoj – verdaj, ruĝaj, flavaj, bluaj... Sed plej mirigaj estis floroj kreskantaj rekte sur arbaraj trunkoj. Estis floroj kun tute fajra koloro, floroj similaj al tute malgrandaj birdetoj kaj al grandaj papilioj, – la tuta arbaro kvazaŭ brulis per diverskoloraj vivaj fajretoj.

– Tio ĉi estas orkideoj, – klarigis la kokcineleto.

Iradi estis neeble ĉi tie, ĉio interplektiĝis.

Ili ekflugis pluen. Jen grandega rivero inter verdaj bordoj. La kokcineleto malsupreniĝis rekte sur grandan blankan floron, kreskantan sur akvo. Tiajn grandajn florojn Helenjo ankoraŭ ne vidis.

– Tio ĉi estas la sankta floro, – klarigis la kokcineleto. - Ĝi nomiĝas Lotoso...

Helenjo vidis tiel multon, ke fine ŝi laciĝis. Ŝi volis reveni hejmen: ĉiuokaze hejme estas pli agrable.

– Mi amas neĝeton, – diris Helenjo. - Sen vintro estas nebone...

Ili denove ekflugis, kaj ju pli alten ili supreniĝis, des pli malvarme fariĝadis. Baldaŭ malsupre ekvidiĝis neĝaj kampoj. Verdis nur sola abia arbaro. Helenjo treege ĝojis, kiam ŝi ekvidis la unuan abieton.

– Abieto, abieto! – ŝi ekkriis.

– Bonan tagon, Helenjo! – ekkriis la verda abieto al ŝi de malsupre.

Tiu ĉi estis vera Kristnaska abieto. Helenjo tuj ekkonis ĝin. Ha, kia ĉarma abieto! Helenjo sin klinis, por diri al ĝi, kiel rava ĝi estas, sed subite ŝi ekfalis malsupren. Ho, kiel terure! Ŝi turniĝis kelkajn fojojn en aero kaj falis rekte en molan neĝon. Pro timo Helenjo fermis la okulojn kaj ne sciis, ĉu ŝi estas viva aŭ malviva.

– Kiel vi alvenis ĉi tien, etulino! – iu demandis ŝin.

Helenjo malfermis la okuletojn kaj ekvidis grizan-grizan ĝiban maljunulon. Ŝi ankaŭ rekonis lin tuj. Li estis tiu sama maljunulo, kiu alportas al saĝaj infanoj Kristnaskajn abietojn, orajn stelojn, skatoletojn kun bombonoj kaj plej mirigajn ludilojn. Ho, li estas tiel bona, tiu maljunulo! Li tuj prenis ŝin sur siajn manojn, kovris ŝin per sia pelto kaj denove demandis:

– Kiel vi alvenis ĉi tien, malgranda knabineto?

– Mi vojaĝis sur la kokcineleto... Ho, kiom mi vidis, aveto!

– Nu, nu!

– Mi konas vin, aveto! Vi alportas al infanoj abiojn...

– Nu, nu... Kaj nun mi ankaŭ aranĝas abion.

Li montris al ŝi longan stangon, kiu tute ne estis simila al abio.

– Ĉu tio estas abio, aveto? Tio estas ja simpla granda bastonego.

– Nu, jen vi vidos...

La maljunulo portis Helenjon en proksiman vilaĝeton, tute kovritan de neĝo. Elstaris el sub la neĝo nur tegmentoj kaj kamentuboj. La maljunulon jam atendis vilaĝaj infanoj. Ili saltis kaj kriis:

– Abio, abio!

Ili alvenis al la unua dometo. La maljunulo prenis nedraŝitan garbon de aveno, alligis ĝin al fino de la stango kaj starigis la stangon sur tegmenton. Tuj kunflugis de ĉiuj flankoj malgrandaj birdetoj, kiuj neniam forflugas dum vintro: paseretoj, hortulanoj, kaj ili bekpikis la grajnojn.

– Tio ĉi estas nia abio! – kriis ili.

Al Helenjo subite fariĝis tre gaje. Ŝi unuan fojon vidis, kiel oni aranĝas vintre abion por birdoj. Ha, kia bona maljunulo! Unu pasereto, kiu plej multe klopodis, per unu fojo rekonis Helenjon kaj ekkriis:

– Nu, jen estas Helenjo! Mi tre bone konas ŝin. Ŝi ne nur unu fojon nutris min per panpecetoj... Jes.

Kaj aliaj paseretoj ankaŭ rekonis ŝin kaj laŭte ekpepis pro ĝojo.

Alflugis ankoraŭ unu pasero, kiu montriĝis granda malpacemulo. Li komencis dispuŝadi ĉiujn kaj ekkaptadi la plej bonajn grajnojn.

Helenjo ekkonis lin.

– Bonan tagon, pasereto!

– Ha, jen estas vi, Helenjo? Bonan tagon!

La malpacema pasero eksaltis sur unu piedeto, malice faris signon per unu okulo kaj diris al la bona kristnaska maljunulo:

– Helenjo volas esti reĝino... Jes, mi mem antaŭ nelonge aŭdis, kiam ŝi tion diris.

– Ĉu vi volas esti reĝino, etulino? – demandis la maljunulo.

– Mi tre volus, aveto!

– Bonege. Nenio estas pli simpla: ĉiu reĝino estas virino kaj ĉiu virino estas reĝino... nun iru hejmen kaj diru tion al ĉiuj aliaj infanetoj.

La kokcinelo estis ĝoja, foriĝi de tiu loko, antaŭ ol iu malmodesta pasero manĝos ĝin. Ili ekflugis hejmen – rapide... Kaj tie jam ĉiuj floretoj atendas Helenjon. Ili la tutan tempon diskutadis pri tio, kio estas reĝino.

Baju, baju, baju...

Unu okuleto de Helenjo dormas, alia rigardas, unu oreto de Helenjo dormas, alia aŭskultas. Ĉiuj nun kolektiĝis apud Helenja liteto: la kuraĝa leporo, kaj la pasero, la lasta muŝo kaj la malgranda kulineto, eĉ la lakteto, la kaĉeto kaj kato Murko. Ĉiuj estas ĉi tie, ĉiuj estas apud Helenjo.

– Paĉjo, mi amas ĉiujn... – murmuretas Helenjo. - Mi amas, paĉjo, eĉ nigrajn blatojn...

Fermiĝis alia okuleto, ekdormis alia oreto. Kaj apud Helenja liteto verdas gaje la printempa herbo, ridas la floretoj, multaj floretoj: ĉielbluaj, rozaj, flavaj, blankaj, ruĝaj. Verda betulo kliniĝis super la liteto mem kaj murmuris ion dolĉe, dolĉe. Kaj la suno lumas, kaj la sablo flave brilas, kaj la blua mara ondo vokas al si Helenjon.

Dormu, Helenjo, dormu, belulino!

Baju, baju, baju...



# FABLOJ DE CENT PARABOLOJ

Nekonata aŭtoro

**Esperantigis: Miaohui el ĈBRE** (*Ĉina Budhana Retejo Esperantista*)

## 1. Manĝado de Salo

Iam antaŭe, malsaĝulo gastis ĉe sia amiko. La amiko regalis lin per manĝaĵo. Li sentis la manĝaĵon sengusta, do la amiko aldonis iom da salo. Li gustumis la manĝaĵon kaj trovis ĝin multe pli bongusta. Li pensis: "La manĝaĵo bongustas pro la salo. Nur iom da salo faris la manĝaĵon tiel bongusta, do pli da salo faros ĝin multe pli bongusta." Li do ekmanĝis nur salon. Tio difektis lian gustorganon kaj suferigis lin treege.

## 2. Lakto por Festeno

Iam malsaĝulo volis regali gastojn kaj ekpreparis bovinan lakton por la festeno. Li pensis: "Se mi melkos la bovinon ĉiutage, la lakto pli kaj pli multiĝos, sed mankos al mi la tenujoj por tio. Krome, la lakto facile ranciĝos. Estas pli bone, ke la bovino tenu la lakton en sia ventro ĝis la festeno." Do li apartigis la bovidon for de la bovino. Monaton poste, li elkondukis la bovinon je la festeno. Sed tamen, malgraŭ lia pena melkado, la bovino donis neniom da lakto. La gastoj aŭ mokridis lin aŭ koleris je li pro tio.

## 3. Vundiĝo pro Piroj

Iam estis kalva malsaĝulo. Iu senĉese batis la kapon al li per piroj kaj vundis lin, tamen li toleris la baton silente anstataŭ forkuri. Vidinte

tion, oni admonis lin: "Kial vi ne forkuru? Jen via kapo vundiĝis pro la bato." Sed la malsaĝulo respondis: "La batanto estas forta kaj sovaĝa, sed tre malsaĝa. Li prenis mian senharan kapon kiel ŝtonon, batis per piroj kaj vundis ĝin." Oni diris: "Kiel malsaĝa vi estas, kaj vi eĉ opinias lin tia! Se vi havus sufiĉan prudenton, vi forkurus kaj facile evitus tion. Kial vi lasas lin daŭre vundadi al vi la kapon!"

## 4. Malĉastulino kaj Ŝia Edzo

Iam estis malsaĝulo, kiu amegis sian edzinon. Lia edzino estis ĉarma, sed malĉasta. Dum ŝia kontakto kun aliaj viroj, ŝin regis arda pasio. Ŝi volis forlasi sian propran edzon kaj sin ĵeti en la sinon de alia viro. Ŝi do ŝtele diris al maljunulino: "Post mia foriro vi trovu virinan kadavron, metu ĝin en nian ĉambron, kaj diru al mia edzo, ke mi mortis." Dumforesto de la malsaĝulo, la maljunulino metis virinan kadavron en lian ĉambron, kaj poste diris al li: "Via edzino mortis." Rigardinte la kadavron, la edzo vere kredis tion. Li do ploregis korŝire. Per multaj lignoj kaj oleo li cindrigis la kadavron, ensakigis la cindron kaj tenis ĝin en sia sino tagnokte. Nelonge poste, la edzino tediĝis pri la kromedzo, kaj revenis al sia antaŭa hejmo. Ŝi diris al la edzo: "Mi estas via edzino." La edzo respondis: "Mia kara edzino jam forpasis. Kiu estas vi, ke vi eĉ aŭdacas pretendi vin kiel mian karulinon!" Malgraŭ la eksplikado de la edzino, la malsaĝulo neniel kredis, ke ŝi vere estas lia edzino.

## 5. Trinki Akvon el la Rivero

Iam estis viro, al kiu mankas saĝo. Foje, li suferis pro soifo kaj volegis trinki akvon. Kiam li vidis vaporon el la kamparo, li opiniis, ke tio estas akvo. Do li kuregis longan vojon eĉ ĝis Hindia Rivero. Atinginte la riverbordon, li nur gapis la akvon anstataŭ ektrinki. Iu demandis: "Vi serĉis akvon por trinki. Nun vi ja estas ĉe la rivero; pro kio vi ne trinkas?" La malsaĝulo respondis: "Mi trinkus, se mi povus fintrinki ĉion el la rivero; tamen estas tro multe da akvo por mi trinki, mi do trinku neniom." Aŭdinte tion, ĉiuj ekridis.

## 6. Malsaĝulo kaj Lia Mortinta Filo

Iam antaŭe, malsaĝulo havis sep filojn. Post morto de unu el la filoj, la patro intencis transloĝiĝi por restigi la mortinton en la domo. Informiĝinte pri lia decido, la najbaroj diris al li: "La vivantoj kaj mortintoj apartenas al malsamaj mondoj. Vi devas bele vesti lin kaj enterigi lin en malproksimo. Pro kio vi mem pretas transloĝiĝi por cedi al li la domon?" Aŭdinte tion, la malsaĝulo pensis: "Se mi ne restigos la mortinton en la hejmo, mi devos porti lian korpon eksteren por enterigi. Mi do mortigu alian por ligi al la alia pinto de mia vekto. Tio faciligos al mi la portadon." Li do mortigis alian filon, vekte portis ambaŭ kadavrojn eksteren kaj enterigis en malproksima arbaro. Oni ĉiuj mokis lin. Ili opiniis, ke ili neniam vidis tiel stultan homon en la mondo.

## 7. Fratiĝo nur por Mono

Iam estis viro bela, saĝa kaj riĉa. Ĉiuj en la regiono laŭdis lin. Vidinte tion, malsaĝulo titolis lin frato por peti lian monon laŭ bezono. Sed kiam la riĉulo povriĝis, kaj devis pagi siajn ŝuldojn al aliaj, la malsaĝulo ne plu tiel nomis lin. La najbaroj riproĉis la malsaĝulon: "Vi estas stulta. Kial vi nomis lin frato kiam vi bezonis monon, sed tuj deklaris lin ne via frato kiam li ŝuldis al aliaj?" La malsaĝulo respondis: "Mi nomis lin frato nur por peti lian monon. Fakte li ne estas mia frato. Do kiam li povriĝis, mi ne plu rigardu lin kiel mian fraton." Aŭdinte tion, oni ĉiuj mokridis lin.

## 8. Ŝtelisto kaj la priŝtelaĵo

Antaŭ longa tempo, iu ŝtelis vestaĵojn el la reĝa trezorejo kaj forkuris malproksimen. La reĝo sendis armeon kapti lin. Kiam oni eskortis lin al la reĝo, la reĝo demandis: "De kie vi havigis al vi la vestaĵojn?" La ŝtelisto respondis: "Tio estas la heredaĵo de mia avo." La reĝo ordonis lin surmeti la vestaĵojn. La vestaĵoj fakte ne apartenis al la ŝtelisto, do li tute ne sciis kiel konvene sin vesti per ili. Tion, kion oni devas meti sur la manojn, li metis sur la piedojn;

tion, kion oni devas meti sur la talion, li metis sur la kapon. La reĝo alvenigis ĉiujn siajn subulojn, kaj detale informis ilin pri la okazaĵo. Li diris al la ŝtelisto: "Se la vestaĵoj estus hereditaj de via avo, vi devus scii kiel surmeti ilin konvene. Sed pro kio vi ne povas vin vesti ĝuste? Tiel oni scias bone, ke la vestaĵoj estas ŝtelaĵoj, sed ne viaj propraj posedaĵoj."

## 9. Laŭdo al la Patro

Iam, iu laŭdis sian patron al aliuloj, dirante: "Mia patro estas bonkora. Li nek atencas nek ŝtelas; li estas honesta kaj justa; li estas malavara kaj emas doni almozon." Aŭdinte tion, malsaĝulo diris: "La virto de mia patro estas des pli supera." La aliaj demandis: "Kia estas via patro? Bonvolu diri al ni." La malsaĝulo respondis: "Li eĉ neniam spertis seksan vivon ekde la infaneco." La aliaj demandis: "Se li estus libera de volupto, kiel li povus generi vin?" Tio fariĝis onia ridindaĵo.

## 10. Konstruigi Trietaĝan Domon

Antaŭ longa tempo estis riĉa homo senscia kaj malsaĝa. Kiam li gastis ĉe alia riĉulo, li vidis trietaĝan domon altan, vastan kaj brilan. Li ekŝatis ĝin kaj diris al si mem: "Mi estas ne malpli riĉa ol li. Kial mi ne konstruigu tian etaĝdomon?" Li do senprokraste alvenigis metiistojn kaj demandis ilin: "Ĉu vi povas konstrui tian etaĝdomon?" Ili respondis: "Jes, ni povas. Tiu etaĝdomo estas konstruita de ni mem." Li ordonis: "Konstruu por mi tian etaĝdomon." La metiistoj konsentis kaj eklaboris. Ili mezuris la sidejon kaj ekmasonis brikojn por la konstruaĵo. Vidinte tion, la riĉa homo neniel komprenis, kion faras la metiistoj. Li demandis ilin: "Kian domon vi konstruas?" Ili respondis: "La trietaĝan." La riĉulo diris: "Mi ne volas la malsuprajn du etaĝojn. Konstruu por mi nur la plej supran." Ili respondis: "Tio ne eblas. Kiel oni povas konstrui la duan etaĝon sen la unua, kaj la trian etaĝon sen la dua?" La malsaĝulo ordonis obstine: "Mi ne volas la malsuprajn etaĝojn. Vi devas konstrui nur la supran por

mi!" Aŭdinte la respondon, ĉiuj metiistoj mokis lin kun rido:"Kiu en la mondo kapablas konstrui la suprajn etaĝojn sen la malsupraj!"

## **11. Antaŭvido de la Bramano**

Iam estis bramano. Li pretendis, ke li estas erudicia pri astrologio kaj aliaj diversaj scioj. Li volis pavi per sia kapablo, do li iris al alia lando, brakumis sian filon en la sino, kaj ploregis dolore. Vidinte tion, oni demandis: "Pro kio vi ploras?" La bramano respondis: "Tiu ĉi knabeto mortos en sep tagoj. Min doloras la mallongeco de lia vivo, do mi ploras." Oni konsolis lin: "La homa vivo estas ne facile sondebla. Eble vi eraris en la kalkulo, kaj li ne mortos je la supozita tempo. Kial vi ploras antaŭe pro tio?" La bramano respondis: "Eĉ mallumiĝus la suno kaj la luno, kaj eĉ falus la steloj, tamen neniam eraras mia aŭguro." Sorĉate de la prestiĝo kaj profito, li mortigis sian propran filon je la sepa tago por pravigi la aŭguron. Informiĝinte pri la morto de la knabo, oni admiris lian kapablon: "Vere ĉioscia homo! Li pravas en la aŭguro." Ili ekkredis kaj estimis lin.

## **12. Malvarmigi Bolantan Akvon**

Iam antaŭe, kiam malsaĝulo dekoktis nigran sukeron por solidigi ĝin, riĉulo venis en lian domon. La malsaĝulo pensis: "Mi devas regali lin per sukera akvo." Li tuj verŝis iom da akvo en la kaldronon kaj ekboligis ĝin. Dum la boligado li senĉese ventumis la akvon per ventumilo, por ke ĝi malvarmiĝu kiel eble plej rapide. Vidinte tion, oni diris al li: "Kiel la sukera akvo povas malvarmiĝi je via ventumado, se vi ne ĉesigas la bruladon de la fajro?"

## **13. Koleremulo**

Iam antaŭe, dum babilado kun aliaj en la ĉambro, iu laŭdis, ke iu alia estas bonulo krom nur du mankoj: koleremo kaj senpripensemo. Ĝuste tiam, la priparolato pasis preter la domo kaj hazarde kaptis la lastajn vortojn. Li do enĉambriĝis furioze, kaptis la parolinton kaj

ekbatis lin. La ĉeestantoj demandis: "Pro kio vi batas lin?" La koleremulo respondis: "Kiam mi estis kolerema kaj senpripensema? Tamen li tiel diraĉis, mi do lin batas." Oni diris: "Jen vi ja montras viajn koleremon kaj senpripensemon. Kial vi ankoraŭ neas pri tio?" La koleremulo furioziĝis kiamoni parolis pri liaj mankoj, kaj oni ĉiuj mokis lin pro tio.

## **14. Komercestoj kaj ilia Gvidisto**

Iam antaŭe, pluraj komercistoj volis vojaĝi al la maro, tamen neniu el ili konis la vojon. Ili decidis dungi gvidiston por gvidi ilin. Post serĉado, ili fine trovis unu kaj ekvojaĝis sub lia konduko. Ili renkontis templon de Dio en sovaĝa regiono. Tie oni devis mortigi homon kaj oferi lin al la Dio por preterpasi la templon. La komercistoj interkonsiliĝis, kaj diris: "Ni ĉiuj estas amikoj aŭ parencoj, do neniu el ni devus esti mortigita. Nur la gvidisto taŭgas por tio." Ili do mortigis la gvidiston, oferis lin al la Dio, kaj daŭrigis sian vojaĝon. Sed tamen ili perdis la vojon post nelonge. Neniu sciis, al kiu direkto ili devas iri. Pro tio ili ĉiuj mortis de malsato en la sovaĝejo.

## **15. Medicinaĵo Rapide Kreskiga**

Iam al reĝo naskiĝis filineto. La reĝo tuj alvenigis palacan kuraciston kaj ordonis lin: "Donu al mi bonan medicinaĵon, por ke mia filino elkreskiĝu senprokraste per ĝi." La kuracisto respondis: "Mi donos al vi bonan medicinaĵon, kiu povas elkreskigi ŝin rapide, sed nun mi devas iri aliloken por pretigi ĝin. Vi ne rajtas vidi vian filinon ĝis mia reveno. Post kiam mi estos preta, mi petu ŝin preni la medicinaĵon kaj montru ŝin al vi." La kuracisto do vojaĝis malproksimen por la medicinaĵo. Post dek du jaroj li revenis al la palaco. Tuj kiam la reĝidino prenis la medicinaĵon, li kondukis ŝin al la reĝo. Vidinte, ke lia filino estas multe pli alta ol antaŭe, la reĝo ĝojegis. Li pensis: "Vere bona kuracisto! Mia filino prenis lian medicinaĵon, kaj vere kreskis tiel multe." Li do premiis la kuraciston per multaj trezoroj. Tiam ĉiuj miris pri la malsaĝo de la reĝo. Li eĉ

ne scipovis kalkuli la tempon, sed atribuis la kreskadon de la filino nur al medicinaĵo!

## **16. Plidolĉigi Sukerkanon**

Iam antaŭe, du viroj kune plantis sukerkanon. Ili interkonsentis, ke ili premiu tiun, kiu plantas bone, kaj punu tiun, kiu plantas malbone. Tiam iu el ili pensis: "La sukerkano estas tre dolĉa. Se mi elpremos la sukron, kaj per ĝi akvumos la plantaĵon, multe pli dolĉiĝos mia sukerkano ol la lia." Li do elpremis la sukron de sukerkano, kaj per ĝi akvumis la plantaĵon. Sed la plantaĵo velkiĝis, kaj li ĉion perdis pro tio.

## **17. KvarcentMoneroj por la Kvindek**

Iam estis komercisto. Oni ŝuldis al li kvindek monerojn, kaj ne redonis la monon por longa tempo. Li do iris al la ŝuldanto por postuli la monon. Li renkontis riveron sur la vojo, kaj elspezis ducent monerojn por ĝin transpasi boate. Atinginte la celokon, li ne sukcesis trovi la ŝuldanton, kaj povis fari nenion alian ol reveni hejmen. Li denove elspezis ducent monerojn pro la rivero dum sia reveno. Krome, li suferis ankaŭ de lacego pro la longa vojaĝo. Li perdis tro multe por malmulte da ŝuldo. Oni ĉiuj mokis lin pri tio.

## **18. Proksimiĝo al la Akrilo**

Iam antaŭe, malriĉulo vivis en granda mizero. Li laboregis por la reĝo dum longa tempo, kaj malgrasiĝis tagon post tago de la peza laboro. Vidinte tion, la reĝo kompatis lin, kaj donacis al li mortan kamelon. La malriĉulo akceptis la donacon, kaj senprokraste eksenfeligis ĝin. Lia tranĉilo malakriĝis dum la laboro, li do ekserĉis akrigilon. Finfine li trovis la akrigilon en la supra etaĝo, kaj tie akriĝis la tranĉilon. Poste, li revenis malsupren por la senfeligado. Tiel li supreniradis multfoje por akriĝi la tranĉilon, kaj tediĝis de tio iom post iom. Por eviti pluan supreniradon, li ŝnure tiris la kamelon sur

la supran etaĝon por ĝin proksimigi al la malgranda akrigilo. Pro tio li estis mokita de aliaj.

## 19. Serĉadi la Perditan Bovlon

Iam antaŭe, dum iu veturis sur la maro, li senatente faligis sian arĝentan bovlon en akvon. Li pensis: "Mi faru signon sur la akvon kaj forlasu la bovlon tie. Poste mi revenu por ĝin trovi." Post du monatoj li venis en la regionon de Sri-Lankao kaj aliaj regnoj. Kiam li vidis riveron, li tuj enakviĝis por serĉi la perditan bovlon. Oni demandis: "Kion vi faras?" Li respondis: "Mi perdis arĝentan bovlon, kaj volas ĝin trovi." Oni demandis: "Kie vi ĝin perdis?" Li respondis: "En la loko de kie mi ĵus ekveturis." Oni demandis: "Kiam vi ĝin perdis?" Li respondis: "Antaŭ du monatoj." Oni diris: "Antaŭ du monatoj! Kiel vi povos trovi ĝin ĉi tie!" Li respondis: "Kiam mi faligis la bovlon, mi faris signon sur la akvon. Ĉi tie la akvo estas sama kiel tiu, kiun mi signis, do mi serĉas ĝin ĉi tie." Oni diris: "Kvankam la akvo estas sama, tamen vi perdis la bovlon en alia loko. Nun vi serĉas ĝin ĉi tie. Kiel vi povos ĝin trovi?" Do ili ĉiuj priridis lin.

## 20. La Reĝo kaj la Mispunito

Iam antaŭe, iu parolis pri la mankoj de la reĝo, kaj diris: "La reĝo estas despota kaj senkompetenta. Li tute ne scipovas regi la landon racie kaj konvene." Informiĝinte pri tio, la reĝo ege furioziĝis. Anstataŭ detale pridemandi, kiu vere estas la parolinto, li nur kredis al insidemulo kaj kaptis virtulon kiel krimulon. Li detranĉigis cent taelojn da karno el la korpo de la kaptito kiel puno. Poste, iu atestis, ke la virtulo fakte diris nenion pri la reĝo. La reĝo ekpentis, kaj pretigis mil taelojn da viando por replenigi la vundon de la mispunito. La mispunito suferis de granda doloro kaj li ĝemadis senĉese tagnokte. Aŭdinte tion, la reĝo demandis: "Kial vi ankoraŭ turmentiĝas? Mi detranĉis cent taelojn da karno el via korpo, sed dekoble kompensis vian perdon. Ĉu vi ankoraŭ ne kontentas pri tio? Pro kio vi ankoraŭ ĝemadas?" Iu apudestanto respondis: "Se Via



Moŝto detranĉus mian kapon, mi ne povus eviti morton eĉ se vi redonus al mi mil kapojn. Kvankam vi kompensis lin dekoble pro la detranĉita karno, li ne povas sin deteni de la dolorego."

## **21. Deziro por Pliaj Filoj**

Iam antaŭe estis virino. Ŝi jam havis filon, tamen ankoraŭ deziris pliajn. Ŝi do demandis aliajn virinojn: "Kiu havas metodon por ke mi nasku pliajn filojn?" Maljunulino respondis: "Mi havas metodon, tamen por tio vi devas fari oferon al Dio." La virino demandis: "Kion mi oferu?" La maljunulino respondis: "Mortigu vian filon, kaj oferu lian sangon. Tio ebligas al vi naski multajn filojn." La virino vere obeis ŝin kaj decidis mortigi sian filon. Saĝulino riproĉis ŝin kun rido: "Kiel malsaĝa kaj senscia vi estas! Estas ankoraŭ ne certe, ĉu vi vere povos naski la deziratajn filojn, tamen vi eĉ mortigos vian ununuran!"

## **22. Elvendi Kalambakon**

Iam antaŭe, iu el nobela familio serĉis kalambakon en la maro. Li kolektis nur ĉaron da kalambako dum pli ol unu jaro, kaj portis tion hejmen. Kiam li portis la kalambakon al la bazaro por vendi, neniu aĉetis pro la alta valoro. Do li elvendis neniom dum multaj tagoj. Tediĝinte pri tio, li dronis en granda malĝojo. Tiam li vidis, ke lignokarbo estas bone vendebla, li do pensis: "Se mi bruligos kalambakon en lignokarbon, eble tio vendiĝos multe pli rapide." Do li karbigis kaj elvendis la kalambakon en la bazaro, sed li enspezis malpli ol tiom de duonĉaro da lignokarbo.

## **23. Ŝtelisto kaj la Ŝtelitaj Silkaĵoj**

Iam ŝtelisto priŝtelis delikatajn kaj valorajn silkaĵojn de riĉulo, kaj per la ŝtelitaj silkaĵoj pakis siajn malnovajn teksaĵojn kaj aliajn objektojn. Saĝaj homoj mokis lin pri tio.

## **24. Semi Rostitan Sezamon**

Iam antaŭe, malsaĝulo manĝis la sezamon neprilaboritan, kaj opiniis tion ne bongusta. Rostinte la sezamon, li gustumis kaj trovis ĝin multe pli bongusta. Li do pensis: "Ĉu la sezamo ne estus pli bongusta, se mi rostu ĝin antaŭ la semado?" Li do rostis kaj semis la sezamon en la kampon. Sed tamen, la rostita sezamo neniamelkreskis.

## **25. Akvo kaj Fajro**

Iam antaŭe iu estis bezononta fajron kaj malvarman akvon por ion fari. Li do metis pelvon da akvo super fajro kaj lasis la fajron bruladi dum la nokto. Poste, kiam li volis fajron, la fajro jam estingiĝis, kaj kiam li volis malvarman akvon, la malvarma akvo jam varmiĝis. Li do perdis ambaŭ fajron kaj malvarman akvon.

## **26. Gajni Favoron de la Reĝo**

Iam antaŭe, iu volis gajni favoron de la reĝo, kaj demandis la aliulojn: "Kiamaniere mi povas gajni favoron de la reĝo?" Oni respondis: "Se vi volas gajni favoron de la reĝo, vi devas imiti liajn konduton kaj aspekton." Li do iris al la reĝo. Kiamli vidis, ke la reĝo palpebrumadis, li ankaŭ imite palpebrumadis. La reĝo demandis al li: "Pro kio vi palpebrumadis? Ĉu vi suferas de malvarmumo aŭ okuldoloro?" La viro respondis: "Mi suferas nek de malvarmumo nek de okuldoloro. Nur por gajni vian favoron mi tion faris imite." Aŭdinte lian respondon, la reĝo koleriĝis, ordonis puni lin kaj forpeli lin el la regno.

## **27. Metodo por Kuraci Vundon**

Iam antaŭe, iu estis skurĝita de la reĝo. Post tio, li ŝmiris sian vundon per ĉevala fekaĵo kun espero, ke la vundo cikatriĝu pli rapide. Tiam malsaĝulo vidis tion kaj ekĝojis, pensante: "Mi trovis

bonan metodon por kuraci vundon." Li do hastis hejmen, kaj ordonis al sia filo: "Skurĝu min je la dorso. Mi havas bonan metodon por kuraci vundon kaj volas ĝin provi." Skurĝite, li ŝmiris sian vundon per ĉevala fekaĵo, kaj prenis tion kiel bonan kuracarton.

## **28. Pliĉarmigi la Edzinon**

Iam antaŭe vivis malsaĝulo. Lia edzino estis ĉarma krom la malbela nazo. La malsaĝulo eliris, kaj hazarde vidis virinon ĉarman kun bela nazo. Li pensis: "Mi detranĉu ŝian nazon, kaj metu ĝin sur la vizaĝon de mia edzino. Ĉu mia edzino ne pli ĉarmiĝus je tio?" Li do detranĉis la nazon de la virino, kaj haste revenis hejmen kun la detranĉita nazo. Li senprokraste elvenigis sian edzinon: "Eliru rapide! Mi donu al vi belan nazon." Je la eliro de la edzino, li tuj detranĉis ŝian nazon, kaj metis la alian sur ŝian vizaĝon. Sed bedaŭrinde, la nazo neniel povis algluiĝi al la vizaĝo. Do li vane sennazigis kaj dolorigis ankaŭ sian edzinon.

## **29. Klopodo por Plej Valora Vestajo**

Iam antaŭe, malriĉulo vivis en mizero, kaj tenis sian vivon nur per laborado por la aliaj. Oni donis al li malnovan vestaĵon, kaj per ĝi li sin vestis. Kiam iu vidis tion, li diris al la malriĉulo: "Vi ja naskiĝis el nobela klaso kaj prestiĝa familio. Kiel vi povas surporti tiel malnovan vestaĵon? Mi instruu al vi, kiel vi havigu al vi la plej valoran. Vi devas agi laŭ mia instruo. Mi ne trompas vin." La malriĉulo ekĝojis, kaj promesis lin obei. La viro do bruligis fajron antaŭ ili, kaj ordonis: "Demetu vian vestaĵon, kaj ĵetu ĝin en la fajron. Vi trovos el cindro la plej valoran vestaĵon, donacitan de la reĝo." La malriĉulo vere tiel agis laŭ la propono. Poste li serĉadis la deziratan vestaĵon en la cindro, sed trovis nenion.

## **30. Edziĝo de la Paŝtisto**

Iam antaŭ longa tempo vivis ŝafisto. Li lertis en la paŝtado, kaj liaj ŝafoj plimultiĝis ĝis miloj. Tamen li estis tre avara, kaj neniam volis helpi al la aliaj. Tiam insidemulo intencis lin trompi per artifiko. Li do iris kun sia parenco al la ŝafisto, kaj diris al li: "Nun mi volas parenციĝi kun vi kiel en unu familio. Mi scias, ke tiu ĉi viro havas ĉarman filinon. Mi svatu ŝin al vi kiel vian edzinon." Aŭdinte tion, la ŝafisto tre ĝojis. Li donacis al tiu multajn ŝafojn kaj alian havaĵon. Post nelonge, la insidemulo revenis al la ŝafisto, kaj diris: "Hodiaŭ via edzino naskis filon al vi." La ŝafisto ankoraŭ ne vidis sian edzinon, tamen li ekzaltiĝis de la informo. Li denove donacis multe al la insidemulo. Poste, la insidemulo refoje revenis al la ŝafisto, kaj informis lin: "Via filo mortis post sia naskiĝo." Informiĝinte pri tio, la ŝafisto ekploregis dolore.

### **31. "Kapabla Azeno"**

Iam bramano volis okazigi religian ceremonion. Li ordonis sian lernanton: "Mi bezonas bakitajn urnojn por la ceremonio. Iru al la bazaro kaj dungu metiiston por mi." La lernanto obeis, kaj iris al la hejmo de metiisto. Tiam la metiisto portis per azeno bakitajn urnojn al la bazaro por vendi, sed survoje la azeno rompis ĉion dum momento. Li povis fari nenion alian ol reveni hejmen deprimita, kaj ploris ĉagrene pro la perdo. Vidinte lin, la lernanto demandis: "Pro kio vi tiel ĉagreniĝis?" La metiisto respondis: "Por min vivteni, mi laboregis pene dum longa jaro, kaj elfaris multajn bakitaĵojn, tamen kiam mi portis ilin al la bazaro por vendi, la damninda azeno rompis ĉion dum momento. Ĝuste pro tio mi ĉagreniĝis." Aŭdinte la respondon, la lernanto diris kun ĝojo: "Tiu azeno estas vere eksterordinara! Ĝi eĉ kapablas momente detrui ĉion, kion vi elfaris dum tiel longa tempo. Nun mi volas ĝin aĉeti." La metiisto ekĝojis, kaj tuj vendis la azenon al li. Kiam la lernanto revenis kun la azeno, la bramano demandis: "Pro kio vi alvenigis azenon anstataŭ la metiiston?" La lernanto respondis: "Tiu ĉi azeno estas multe pli kapabla ol la metiisto por bakitaĵoj. Ĝi povas detrui ĉiujn urnojn, kiujn elfaris la metiisto dum longa tempo." Informiĝinte pri tio, la bramano riproĉis lin: "Kiel senscia kaj malsaĝa vi estas! Tiu ĉi azeno povis

hazarde detruis la bakitaĵojn, tamen ĝi ne scipovas elfari tion eĉ dumcent jaroj."

## **32. Ŝtelita Oran Ingoton**

Iamantaŭe, du komercistoj faris sian propran negocon en la sama loko. Unu el ili vendis oron, dum la alia vendis kotonon. Klientoj kutime ardigis la orajn ingotojn de la orvendisto por taksi ilian verecon. La vendisto de kotonon hazarde ŝtelis ĵus ardigitan ingoton, kaj kaŝis ĝin en kotonon. La kotonon forbruliĝis pro la ardo de la oro. La priŝtelo estis malkaŝita, kaj anstataŭ havigi al si la oran ingoton, la ŝtelisto perdis ankaŭ sian kotonon.

## **33. Haki Arbon por Preni Fruktojn**

Iam, reĝo havis altan kaj dikan pomarbon, kiu abunde donas fruktojn dolĉajn kaj bongustajn. Foje kiam venis gasto, la reĝo demandis lin: "Tiu ĉi arbo donas bongustajn fruktojn. Ĉu vi volas manĝi?" La gasto respondis: "Tiu ĉi arbo estas dika kaj alta. Kiel mi povas preni la fruktojn eĉ se mi volas manĝi?" La reĝo do ordonis dehaki la arbon por preni la fruktojn pli facile estonte. Sed tamen, la arbo ne plu donis fruktojn. Poste, kiam oni denove provis restarigi la arbon, ĝi jam sekiĝis kaj neniam reviviĝis plue.

## **34. Mallongigi la Vojon**

Iam antaŭe, iu vilaĝo distancis al la ĉefurbo je kvin joŝanoj\*. En la vilaĝo troviĝis dolĉa fonto. La reĝo ordonis la vilaĝanojn porti dolĉan akvon ĉiutage al li. Lacigite de tio, ĉiuj vilaĝanoj volis fuĝi aliloken por sin teni malproksima de la vilaĝo. Tiam la vilaĝestro diris al ili: "Ne foriru. Mi petu la reĝon ŝanĝi la distancon de kvin joŝanoj al tri por mallongigi la vojon kaj senlacigi vin ĉiujn." Poste, li iris al la reĝo por peti la favoron. La reĝo konsentis, kaj vere ŝanĝis la kvin joŝanojn al tri. Informiĝinte pri tio, la vilaĝanoj ĝojegis. Iu alia diris al ili: "La vojo longas ankoraŭ kvin joŝanojn, kaj neniom malplilongiĝis." Sed

neniu el la vilaĝanoj volis forfuĝi plue pro kredo al la reĝo, malgraŭ la vero. \*joŝanoj: hinda longunuo, dudek, dudek kvin aŭ tridek kilometroj, laŭ diversaj onidiroj.

### **35. La Hazardaj Trezoroj**

Iam estis malriĉulo, kiu vivis en granda mizero. Li ŝuldis tre multe al aliaj, kaj havis neniom por redoni la ŝuldon. Li do povis fari nenion alian ol fuĝi malproksimen. Kiam li venis en dezerton, li hazarde trovis skatolon plenan de trezoroj. Sub ĝia kovrilo kuŝis spegulo sur la valoraĵoj. Vidinte la skatolon, li ĝojegis, kaj tuj malfermis la kovrilon. Sed kiam li vidis homfiguron en la spegulo, li ektimis. Alpremante la manojn surbruste, li diris humile: "Mi opiniis, ke ĝi estas malplena skatolo. Mi tute ne atendis, ke vi estas ene. Indulgu min pro tio."

### **36. Restigi la Feon**

Iam antaŭe iu sin kulturis en la montaro, kaj fine fariĝis feo kun kvin magiaj povoj. Per la magie travideblaj okuloj li povis vidi ĉiajn trezorojn kaj valoraĵojn kaŝitajn sub la tero. Kiam la reĝo informiĝis pri tio, li ĝojegis, kaj demandis al siaj subuloj: "Kion mi faru, ke li ĉiamrestadu en nia regno anstataŭ iri al alia loko? Tio povus havigi al mi pli multe da trezoroj." Malsaĝa subulo tuj iris al la feo, elprenis liajn okulojn kaj portis ilin al la reĝo. Li raportis: "Mi jam elprenis liajn okulojn, do li neniel povos iri al aliaj lokoj, sed porĉiam restos en nia regno." La reĝo riproĉis lin: "Mi volas restigi la feon en nia regno nur pro tio, ke li povas vidi ĉiajn trezorojn sub la tero. Nun vi jam difektis lian vidpovon, do per kio li estos ankoraŭ utila al mi?"

### **37. Mortigi la Restajn Bovojn**

Iam antaŭe, paŝtisto havis ducent kvindek bovojn. Li paŝtis ilin en diversaj herbejoj laŭ sezono, kaj ĉiam prizorgis ilin atenteme. Foje, tigro formanĝis unu el ili, do la paŝtisto pensis: "Mi jam perdis

unu bovon, kaj ne plu sufiĉas la antaŭa nombro. Por kio mi ankoraŭ paŝtu ilin?" Li do pelis la bovojn al alta krutaĵo, kaj puŝis ilin suben en profundaĵon. Ĉiuj liaj bovoj mortis de tio.

### **38. Trinki Akvon el la Ligna Tubo**

Iam antaŭe, malsaĝulo soifegis dum sia promenado. Kiam li vidis klaran akvon elfluantan el ligna tubo, li tuj ektrinkis. Trinkinte ĝiskontente, li levis la manojn kaj diris: "Mi jam trinkis sufiĉe. Ĉesigu vian fluadon." Sed la akvo daŭre fluis kiel antaŭe. Li do koleris, kaj kriis: "Mi jam fintrinkis, kaj ordonis vin ĉesigi vian fluadon. Sed kial vi ankoraŭ fluaĉas?" Vidinte tion, oni diris al la trinkinto: "Kiel malsaĝa kaj senscia vi estas! Kial vi ne foriru, sed volas ĉesigi la fluadon de la akvo?" Dirinte, li tiris la trinkinton al alia loko.

### **39. Ŝmiri la Domon**

Iam antaŭe, iu vizitis aliulon kaj vidis, ke liaj muroj estas bone ŝmiritaj, kaj la planko estas ankaŭ glata kaj pura. Li do demandis: "Per kio vi ŝmiris viajn murojn kaj plankon tiel okulplaĉaj?" La gastiganto respondis: "Unue, mi infuzis la rizbranon ĝisplene, kaj miksis ĝin en la ŝlimon. Poste mi ŝmiris la murojn per la ŝlimo. Do ili estas tiel okulplaĉaj." La vizitanto pensis: "Nur uzi la rizbranon estas malpli bone ol la rizgrajnon por pliglatigi kaj pliblanigi la murojn." Li do miksis rizgrajnon en la ŝlimon, kaj ŝmiris la muron. Sed tamen, la muroj des pli malglatiĝis kaj eĉ fendiĝis pro tio. Li do foruzis la rizgrajnon vane, kaj ankaŭ ne ricevis la deziratan efikon. Estus multe pli bone, se li donus rizgrajnon al malriĉuloj por havigi al si meriton.

### **40. Sufero de la Kalveco**

Iam, estis homo kalva. Li suferis ne nur de malvarmo vintre kaj varmo somere, sed ankaŭ de la pikado de moskitoj kaj tabanoj. Pro tio li turmentiĝis tagnokte, kaj suferis multe. Alvenis kuracisto lerta pri

diversaj kuracartoj. La kalvulo do vizitis lin, kaj diris al li: "Mi petas, ke vi kuracu min de la kalveco." La kuracisto estis ankaŭ kalva, li do demetis sian ĉapon kaj respondis: "Ankaŭ mi suferas dolore de la kalveco. Se mi povus kuraci tion, mi nepre kuracus al mi unue por forigi la suferon."

## **41. Kverelo inter Du Demonoj**

Iam antaŭe, du demonoj komune posedis skatolon, bastonon kaj paron da sandaloj. Ili konfliktis unu kun la alia por proprigi al si ĉion el ili. Do ili senĉese kvereladis tagnokte. Tiam iu vidis tion, kaj demandis: "Je kio raras la skatolo, bastono kaj sandaloj, ke vi eĉ kvereladis tiel furioze?" La demonoj respondis: "La skatolo povas eligi vestaĵojn, manĝaĵojn, matracojn, litaĵojn kaj ĉiujn aliajn bezonaĵojn; per la bastono oni povas subigi ĉian malamikon, ke ili neniam kontraŭstaru plue; kaj per la sandaloj oni povas flugi libere en la ĉielo." Informiĝinte pri tio, la viro diris al la demonoj: "Tenu vin malproksimaj por momento, ke mi dividu ilin konvene por vi." Je lia ordono, la demonoj iris malproksimen. La viro do prenis la skatolon kaj bastonon, kaj per la sandaloj li flugis en la ĉielon. La demonoj ektimis, sed povis fari nenion kontraŭ tio. La viro do diris al ili: "Nun mi ja posedas tion, pri kio vi kvereladis senĉese. Ne kverelu plue."

## **42. Protekti la Kamelan Felon**

Komercistoj vojaĝis por negoco, sed ĝuste sur la vojo unu el iliaj kameloj mortis. La kamelo iam portis multajn trezorojn, ornamaĵojn kaj valorajn teksaĵojn. Post la morto de la kamelo, oni tuj senfeligis ĝin. Je la foriro, la ĉefkomercisto restigis du el siaj lernantoj, kaj ordonis: "Bone gardu la kamelan felon, por ke ĝi ne putriĝu de malsekiĝo." Ekpluvegis post nelonge. La malsaĝaj lernantoj kovris la felon per valoraj teksaĵoj por protekti ĝin kontraŭ malsekiĝo sed damaĝis la teksaĵojn. La prezo de la teksaĵoj estis multe pli alta ol tiu de la felo. Pro sia malsaĝo ili protektis la malkaran felon per valoraj teksaĵoj.



### **43. Granda Ofero por Bagatelaĵo**

Iu frotadis ŝtonegon pene dum longaj jaroj, kaj finfine faris el tio malgrandan bovan modelon kiel ludilon. Li oferis tro multe por la bagatelaĵo.

### **44. Satiĝo pro la Duona Kuko**

Iam antaŭe, iu malsatiĝis, kaj elprenis sep kukojn por manĝi. Li satiĝis nur post kiam li manĝis ses kaj duonon. Li do ekpentis, kaj sin batis per ambaŭ manoj. Li sin riproĉis: "Mi satiĝis nur pro tiu ĉi duona kuko. Do la antaŭajn mi manĝis vane. Se mi scius, ke la duona kuko povus min satigi, mi ja devus ĝin manĝi unue."

### **45. Gardi Pardon**

Iam antaŭe, iu volis vojaĝi malproksimen, kaj ĉe la forlaso li ordonis la serviston: "Bone gardu la pardon, azenon kaj ŝnuron." Post la forlaso de la mastro, vaganta muzikisto ludis muzikon en la najbara domo. La servisto volestis aŭskulti, kaj neniel povis sin deteni de la deziro. Li do ligis la pardon sur la azenon per la ŝnuro, kaj kondukis la azenon al la ludejo por muziko. Post forlaso de la servisto, ŝtelisto priŝtelis la domon kaj forprenis trezoron. Kiam la mastro revenis, li demandis la serviston: "Kie estas la trezoro?" La servisto respondis: "Vi nur ordonis min gardi la pardon, azenon kaj ŝnuron. Mi scias nenion krom tio." La mastro do kulpigis lin: "Mi ordonis vin gardi la pardon nur por la trezoro. Nun la trezoro jam perdiĝis, do por kio mi ankoraŭ bezonas la pardon?"

### **46. Serĉi Gruntbovon**

Iam antaŭe, vilaĝanoj kune ŝtelis gruntbovon kaj ĝin formanĝis. La perdinto sekvis ilin al la vilaĝo laŭ la piedsignoj. Post kiam li priskribis la aspekton de la bovo, li demandis vilaĝanon: "Ĉu la bovo estis en via vilaĝo?" La vilaĝano respondis: "La bovo ne estis

en nia vilaĝo." Li demandis: "Ĉu troviĝas laĝeto en la vilaĝo kaj vi formanĝis la bovon ĉe la laĝeto?" La vilaĝano respondis: "Troviĝas neniu laĝeto en la vilaĝo." Li demandis: "Ĉu troviĝas arboj ĉe la laĝeto?" La vilaĝano respondis: "Troviĝas neniu arbo ĉe la laĝeto." Li demandis: "Ĉu vi ŝtelis la bovon en la oriento de la vilaĝo?" La vilaĝano respondis: "Ne troviĝas la oriento de la vilaĝo." Li demandis: "Ĉu vi ŝtelis la bovon je la tagmezo?" La vilaĝano respondis: "Ne troviĝas la tagmezo." La perdinto do diris: "Eĉ se vere troviĝus nek la laĝeto, nek la arboj, ĉu povus troviĝi nek la oriento, nek la tempo? De tio mi certas, ke vi mensogis nekredeble. Konfesu do, ĉu vi vere ŝtele formanĝis la bovon?" La vilaĝano do konfesis: "Jes, ni vere ĝin formanĝis."

## 47. Imiti Birdan Grakadon

Iam antaŭe, en iu regno ĉiuj virinoj sin ornamis per verdaj lotusfloroj dum la nacia festo. Tiam la edzino de malriĉulo diris al li: "Se vi trovos verdajn lotusflorojn por mi, mi daŭre estu via edzino, kaj se ne, mi eksedziniĝu de vi." Antaŭe, la malriĉulo lertis en imitado de birda grako. Do grakante kiel akvobirdo, li glitis en la reĝan laĝeton por ŝteli verdajn lotusflorojn. La gardisto de la laĝeto aŭdis sonon kaj demandis: "Kiu vi estas en la laĝeto?" La malriĉulo pretervole respondis: "Mi estas akvobirdo." La gardisto do kaptis lin por eskorti al la reĝo. Sur la vojo, la malriĉulo denove grakis imitante akvobirdon. La gardisto diris: "Al kio utilas via grakacho sur la tero?"

## 48. Besto kaj Arbo

Malgranda besto kuŝis sub la arbo. Subite arbobranĉo rompiĝis de vento kaj falis sur ĝian dorson. Ĝi do fermis la okulojn, kaj ne plu aŭdacis rigardi la arbon. Ĝi senprokraste forlasis la arbon, kaj kuris en senarban regionon. Jam mallumiĝis, sed mankis al ĝi kuraĝo reveni al la antaŭa kuŝejo. Kiam ĝi vidis, ke la arbobranĉoj svingiĝas je ventblovo en malproksimo, ĝi diris al si mem: "Ĝi vokas min." Ĝi do tuj revenis al la arbo.

## 49. Diskutado pri la Trovitaj Haroj

Iam antaŭe, du knaboj ludis en la rivero, kaj trovis tufon da haroj en la riverfundo. Unu diris: "Tio estas la barboj de feo." La alia diris: "Ne. Tio estas la haroj de bruna urso." Tiam ĉe la rivero loĝis feo. La infanoj disputadis senĉese, kaj finfine decidis viziti la feon por peti lian opinion. La feo senprokraste elprenis milion kaj sezamon, metis ilin en la buŝon kaj maĉis. Elkraĉinte la paston en la manon, li diris al la infanoj: "Tio, kio estas en mia mano, similas al la fekaĵo de pavoj." La feo respondis ne laŭ la demando, kaj baldaŭ ĉiuj informiĝis pri tio.

## 50. Kuraci la Ĝibon

Iam antaŭe, iu suferis de ĝibo, kaj petis kuraciston kuraci lin. La kuracisto ŝmiris oleon sur lian korpon, ligis lin inter du tabuloj per ŝnuro, kaj perforte premis la tabulojn. Tamen li tute ne atendis, ke la okuloj de la suferanto tuj eliĝis de tio.

## 51. Kuna Servistino

Kvin viroj kune aĉetis servistinon. Unu el ili ordonis ŝin: "Lavu por mi la vestaĵojn." Kaj ankaŭ ĉiu el la aliaj ordonis la samon al ŝi. La servistino respondis, ke ŝi faros tion laŭvice, kaj unue lavos por la unua. La dua viro koleris kaj kulpigis ŝin: "Mi aĉetis vin kun la aliaj, do kial vi lavos por li unue?" Li donis al la servistino 10 skurĝajn batojn. Ankaŭ ĉiu el la aliaj faris la samon.

## 52. Amuzisto kaj la Reĝo

Iam antaŭe, reĝo plezuriĝis de amuzisto, kaj promesis donaci al li mil monerojn. Poste, kiam la amuzisto postulis la monon, la reĝo ne plu volis plenumi sian promeson. La reĝo do diris al li: "Vi kutime plezurigas min senrekompence. Se mi donacus monon al vi, ankaŭ mi plezurigus vin."

## **53. Reciproka Venĝo**

Iam instruisto havis du lernantojn. Li suferis de piedmalsano, li do ordonis ambaŭ lernantojn ĉiam ajn masaĝi aparte po unu el la piedoj. La lernantoj malamikiĝis kaj ĵaluzis unu kontraŭ la alia. Ĉe la foresto de unu, la alia per ŝtono rompis la piedon masaĝitan de li. Kiam li revenis, li koleris de tio, kaj ankaŭ rompis la piedon masaĝitan de la alia por sin venĝi.

## **54. Kapo kaj Vosto**

Iam estis serpento. La vosto de la serpento diris al la kapo: "Mi devas rampi antaŭe." La kapo respondis: "Mi ĉiam rampas antaŭe. Pro kio vi subite volas anstataŭigi min?" Kiam la kapo rampis antaŭen, la vosto alkroĉiĝis al arbo kaj neniel moviĝis. La kapo povis fari nenion alian ol obei la voston kaj lasi ĝin rampi antaŭe. Sed pro tio, la serpento sin trudis en fajron kaj mortis de brulo.

## **55. Lojala Subulo**

Iam antaŭe, reĝo havis lojalan subulon. Dum milito la subulo sinforgese savis la reĝon el danĝero. Pro tio la reĝo ĝojis, kaj volis donaci al li ĉion deziratan. Li do demandis la savinton: "Kion vi deziras? Mi donacu al vi ion ajn laŭ via deziro." Sed la subulo respondis: "Kiam vi bezonas razigi vian barbon, bonvolu lasi min razi por vi." La reĝo respondis: "Se tio plaĉas al vi, mi do kontentigu vian deziron." Tiu malsaĝulo estis mokita de ĉiuj aliaj en la lando. La duonan teritorion kaj altrangon li povis akiri, sed li postulis nur la humilan profesion.

## **56. Postulado al "Nenio"**

Iam du viroj promenis kune. Sur la vojo ili vidis, ke iu puŝis ĉaron da sezamo, kaj neniel kapablis movi la ĉaron el danĝero. Tiam, la ĉaristo petis: "Helpu min movi la ĉaron el la danĝero." La viroj

demandis: "Per kio vi rekompencu nin?" La ĉaristo respondis: "Mi rekompencu vin per nenio." Apenaŭ la ĉaro atingis ebenan lokon, ili diris al la ĉaristo: "Donu al ni la rekompencon." La ĉaristo respondis: "Nenion." Unu el la viroj insistis: "Do donu al ni la nenion." La alia viro diris kun rido: "Li ja ne volas rekompenci nin. Do kial vi ankoraŭ obstinas?" La postulanto respondis: "Li ja promesis al ni la nenion, do li devas rekompenci nin per tio." La alia viro diris: "Nenio estas nur abstrakta vorto, sed ne konkreta objekto."

## **57. Flati la Prestiĝulon**

Iam estis riĉa prestiĝulo. Ĉiuj liaj subuloj estimis lin por gajni lian favoron. Kiam li elspulis kraĉaĵon, ili konkure forviŝis la malpuraĵon per piedoj. Malsaĝa subulo ankaŭ volis flati la prestiĝulon, tamen li trovis nenan ŝancon por tio. Li do diris al si mem: "Se la prestiĝulo kraĉis sur la teron, ĉiuj piede forviŝis la kraĉaĵon. Do mi devas fari tion la unua tuj kiamli ĝin elbuŝigos." Kiam la prestiĝulo estis kraĉonta, la malsaĝulo levis sian piedon kaj tretis lian buŝon. Pro tio li vundis la lipojn kaj dentojn al la prestiĝulo. La prestiĝulo demandis la malsaĝulon: "Pro kio vi intence piedbatis min je la buŝo?" La malsaĝulo respondis: "Se via kraĉaĵo falus sur la teron, la flatemuloj piede forviŝus ĝin. Kvankam ankaŭ mi volis tiel agi, tamen mi neniam trovis ŝancon por tio. Do por gajni vian favoron mi volis piede forviŝi la kraĉaĵon apenaŭ vi pretis elkraĉi."

## **58. Dividi la Heredaĵon**

Iam en iu regno vivis nobelo. Li suferis de grava malsano, kaj estis mortonta. Li do ordonis la du filojn: "Post mia forpaso vi dividu la heredaĵon laŭdece." La filoj obeis lin, kaj dividis la heredaĵon tuj post lia morto. Sed la pliaĝa frato plendis, ke la malpliaĝa faris tion ne egale. Stulta maljunulo alvenis kaj proponis al ili: "Mi havas bonan metodon por ke vi dividu la havaĵon tute egale. Duigu ĉion el la heredaĵo. Kiel vi faru tion? Vi duigu ĉiun el la vestaĵoj, duigu ĉiun el la teleroj kaj boteloj, duigu ĉiun el la pelvoj kaj urnoj, kaj

ankaŭ duigu ĉiun el la moneroj. Tiel vi duigos la heredaĵon tute egale."

## **59. Rigardi la Botelfaradon**

Iam antaŭe, du viroj vizitis metiiston de argilaĵo, kaj tie rigardis lin fari botelon per turnilo. Unu el ili foriris al festeno post nelonge, kaj akiris bongustan manĝaĵon kaj ankaŭ monon. La alia restis por daŭre rigardi. Li diris al si mem: "Mi iru post kontentiĝo de la rigardo." La tempo forpasis iompost iom, kaj la suno jam subiĝis, tamen li ankoraŭ ne kontentiĝis de la rigardo. Pro tio li perdis la bonŝancon por la manĝaĵo kaj mono.

## **60. Ombro de Oro**

Iam antaŭe, malsaĝulo iris al granda cisterno, kaj hazarde vidis ombron de oro en la akvofundo. Li do kriis, ke troviĝas oro en la akvo. Li tuj enakviĝis kaj ekfosis en la ŝlimo por trovi la oron. Sed anstataŭ ĝin trovi, li laciĝis de tio kaj devis eliri por ripozi. Sed kiam la akvo reklariĝis, la ora ombro denove aperis en la akvo. Li do denove enakviĝis por daŭrigi la serĉadon, kaj ĉifoje ankoraŭ trovis nenion. Tiam lia patro venis al li. Vidinte tion, li demandis la filon: "Kion vi faras, ke vi estas tiel laca?" La filo respondis: "Estas oro en la akvofundo! Mi enakviĝis kaj serĉis ĝin en la ŝlimo, sed trovis nenion ĝis mia elĉerpiĝo!" Pririgardinte la ombron en la akvofundo, la patro eksciis, ke la oro estas sur arbo, kaj nur ĝia ombro respeguliĝis en la akvo. Li do diris al la filo: "Kompreneble birdo portis ĝin sur la arbon." La filo do grimpis sur la arbon laŭ lia propono kaj vere trovis la oron.

## **61. La Kreaĵo de Brama Disĉiplo**

Ĉiuj bramanoj kredas, ke Bramo estas la patro de la mondo. Li kreis ĉion en la universo, kaj estas la nura reganto de la mondo. Iu el liaj disĉiploj diris: "Ankaŭ mi povas krei ĉion." Li estis sufiĉe

malsaĝa, tamen li pretendis, ke li estas plena de saĝo. Li diris al Bramo: "Ankaŭ mi volas ĉion krei." Bramo respondis al li: "Ne tiel pensu. Vi ne kapablas tion fari." La disĉiplo do ekagis sen konsento de Bramo. Vidinte la kreaĵon de la disĉiplo, Bramo diris: "Vi modelis la homan kapon tro granda, dumla kolon tro maldika; la manojn tro grandaj dum la brakojn tro mallongaj; la piedojn tro malgrandaj dum la kalkanojn tro grandaj, simile al tiuj de demono."

## **62. Manĝi Fazanaĵo por Resaniĝo**

Iam antaŭe, iu suferis de grava malsano. Kuracisto ekzamenis lin kaj diris, ke li manĝu fazanaĵon por resaniĝi. La malsanulo do aĉetis fazanon en la bazaro, sed finmanĝinte ĝian viandon, li ne plu manĝis aliajn fazanojn. Poste, kiam la kuracisto vidis la malsanulon, li demandis: "Ĉu vi jam resaniĝis?" La malsanulo respondis: "Vi ordonis, ke mi manĝu fazanaĵon. Do mi finmanĝis unu fazanon, sed ne aŭdacis manĝi pliajn." La kuracisto riproĉis lin: "Se vi jam manĝis unu, pro kio vi ne manĝu pliajn? Ĉu vi povas resaniĝi je nur unu fazano?"

## **63. Teruriĝo pro la Kostumo de Démono**

Iam vivis pluraj aktoroj. Ili kune vojaĝis al alia loko por sin savi de la serioza malsatego. Kiam ili preteriris montaron, en kiu onidire loĝas demonoj ferocaj kaj sangavidaj, ili devis halti por tranokti. La aktoroj bruligis fajron, kaj kuŝiĝis ĉe ĝi por forpeli froston. Tiam iu el ili sentis malvarmon, li do sin vestis per teatra kostumo, per kiu oni rolas hommanĝan demonon, kaj sidiĝis ĉe la fajro por sin varmigi. Iu alia vekiĝis, kaj tuj teruriĝis kiam li vidis iun en demona kostumo. Anstataŭ atente pririgardi la vidaĵon, li forkuris senprokraste pro timo. Tio vekis la aliajn, kaj ili ĉiuj forkuregis, lin sekvante. La aktoro en la teatra kostumo ankaŭ teruriĝis de tio, kaj ekkuris post siaj kamaradoj. Vidante lin, la aliaj opiniis, ke la demono postkuras por kapti ilin, do ili des pli teruriĝis. Ili kuregis senĉese preter montoj, tra riveroj, kaj trans kanaloj. Ilia korpo vundiĝis, kaj ili

elĉerpiĝis morte. Nur je la tagiĝo ili komprenis, ke postkuris ilin ne la hommanĝa demono, sed vivanta homo.

## 64. Luktado kun la Imagita Diablo

Iam estis forlasita domo. Laŭdire en ĝi estis kruela demono, do neniu aŭdacis eniri. Tiam, viro pretendis esti kuraĝa, kaj diris: "Mi volas tranokti en la domo." Dirinte, li tuj endomiĝis sin kuraĝiginte. Poste, alia viro pretendis esti multe pli kuraĝa ol la antaŭa, li ankaŭ volis iri en la domon. Apenaŭ li provis malfermi la pordon, la unua viro opiniis, ke alvenas la demono. Li do forte puŝis la pordon, por ke ĝi ne malfermiĝu. La dua viro ankaŭ opiniis, ke en la domo estas la demono. Li do volis malfermi la pordon perforte. Tiel ili luktadis pri la pordo ĝis tagiĝo. Nur kiam ili intervidiĝis unu al la alia, ili eksciis, ke neniu estas la demono, sed vivanta homo.

## 65. Kvincent Kneloj

Iam estis virino diboĉema kaj volupta. Ŝi malŝatis sian edzon, kaj volis mortigi lin laŭeble. Ŝi provis multajn metodojn por tio, tamen neniamsukcesis. Kiam ŝia edzo estis vojaĝonta al la najbara lando kiel sendito, malica ideo subite venis en la kapon de la virino. Ŝi miksis venenon en knelojn por mortigi lin. Ŝi mensogis al li: "Nun vi iros malproksimen. Timante, ke mankus al vi manĝaĵo, mi speciale faris kvincent knelojn por vi manĝi. Sed tamen, ne manĝu ilin antaŭ ol vi havos nenion alian por manĝi en la alia lando." La edzo obeis ŝin, kaj manĝis neniom el la kneloj ĝis li atingis la alian landon. Kiam li tranoktis en arbaro, li sin kaŝis sur arbo por eviti sovaĝajn bestojn, sed forgesis pri la kneloj, kaj lasis ilin sub la arbo. Tiu nokte hazarde okazis priŝtelado. Kvincent ŝtelistoj ankaŭ venis en la arbaron priŝtelinte trezorojn kaj kvincent ĉevalojn de la reĝo. Ili ĉiuj estis kaj malsataj kaj soifaj pro la kurego. Vidinte la knelojn sub la arbo, ili manĝis po unu, kaj pro tio ĉiuj mortis de veneniĝo. La viro ascendis de la arbo ĉe la tagiĝo kaj vidis, ke ĉiuj ŝtelistoj kuŝas mortaj sub la arbo. Li do afekte vundis la kadavrojn per tranĉilo kaj sagoj. Poste, li kolektis la trezorojn, kaj pelis la ĉevalojn al sia celloko. La reĝo



de la lando postkuris la ŝtelistojn kun multaj homoj laŭ la piedsignoj, kaj renkontis lin sur la vojo. La reĝo demandis lin: "Kiu vi estas? Kaj de kie vi havigis al vi la ĉevalojn?" Li respondis: "Mi venis de alia lando, kaj renkontis la ŝtelistojn sur la vojo. Mi luktis kun ili kaj mortigis ilin ĉiujn. Tiel mi prenis la ĉevalojn, kaj trezorojn por iri al vi. Se vi ne kredas pri tio, bonvolu iri kaj kontroli iliajn vundojn, kaj ankaŭ la luktejon, kie ili mortis." La reĝo tuj sendis fidelulojn por pririgardi, kaj trovis tion vera. La reĝo do admiris lin pri tio. Kiam la reĝo revenis al sia lando, li donacis al li per alta rango, multaj trezoroj kaj larĝa kampo. Tiam la malnovaj korteganoj ĵaluzis lin pri tio. Ili diris al la reĝo: "Li ja estas alilandano nefidinda. Kiel vi povis donaci al li tiel altan rangon, multe pli altan ol tio de la malnovaj korteganoj?" Informiĝinte pri tio, la sendito diris: "Kiu estas sufiĉe brava por dueli kun mi? Bonvolu iri al la ebena loko por montri nian propran kapablon." Ĉiuj korteganoj timis, kaj neniu el ili aŭdacis dueli kun li. Poste, en la landon venis feroĉa leono. Ĝi manĝadis homojn sur la vojo al la ĉefurbo, kaj pro tio neniu aŭdacis iri pretere. Tiam la korteganoj kune interkonsiliĝis: "La alilandano diris, ke li estas senkompare brava kaj neniu povas lin venki. Se li povos mortigi la leonon por sekurigi la popolanojn, do tio estos vera miraklo." Poste, ili faris proponon al la reĝo. La reĝo donacis tranĉilon kaj bastonon al la sendito, kaj ordonis lin mortigi la leonon. Akceptinte la ordonon, la sendito iris al la leono sin kuraĝiginte. Kiam la leono vidis lin, ĝi hurlegis feroĉe kaj sin ĵetis sage al li. Li ektimis, kaj senprokraste grimpis sur arbon. La leono do levis la kapon al la arbo kun malfermita faŭko. Li estis tiel timigita, ke li perdis la tranĉilon el la mano. Sed la tranĉilo falis ĝuste en la faŭkon de la leono, kaj ĝin mortigis. Li ekzaltiĝis de tio, kaj tuj revenis al la reĝo. La reĝo do despli ŝatis lin. Tiam, ĉiuj en la lando laŭdis kaj respektis la senditon.

## **66. Reciti Stirmetodon**

Iam estis filo de prestiĝa riĉulo. Li iris al la maro kun multaj komercistoj por serĉi trezorojn. Li scipovis parkere reciti la stirmetodon de la ŝipo kaj sciis bone, kiel oni stiru, direktu aŭ haltigu la ŝipon en la kirlaĵoj aŭ ondegoj sur la maro. Do li

fanfaronis al la aliaj: "Mi bone scias surmaran stirmetodon." Aŭdinte tion, ĉiuj lin kredis. Ne longe post kiam ili ekveturis sur la maro, la stiristo mortis de malsano, do la filo de la prestiĝulo fariĝis nova stiristo por lin anstataŭigi. Kiam la ŝipo venis en la kirlaĵon, la nova stiristo recitis laŭte: "Oni devas tiel stiri, kaj tiel direkti la ŝipon." Sed la ŝipo nur turniĝis en la kirlaĵo, kaj neniom povis moviĝi. Do antaŭ ol la komercistoj atingis la trezorejon, ili ĉiuj dronis kune kun la ŝipo.

## **67. La Lasta kuko**

Iam antaŭe, paro da geedzoj havis tri kukojn. Post kiam ili ambaux manĝis po unu, restis nur la lasta kuko. Do ili interkonsentis: "Kiu parolos unue, tiu ne rajtos manĝi la kukon." Pro tio, neniu el ili ekparolis plue. Momenton poste, rabisto entrudiĝis por pirabi ilin, kaj forportis ĉiujn havaĵojn. Sed la geedzoj nur gapis silente pro la antaŭa interkonsento. Vidinte tion, la rabisto ekatencis la edzinon ĝuste antaŭ la edzo. Kvankam la edzo vidis tion, li ankoraŭ sin tenis silenta. La edzino do ekkriis pri la rabisto, kaj riproĉis la edzon: "Malsaĝulo! Kial vi ne krii pri la rabisto pro la kuko?" La edzo aplaŭdis per la manoj, kaj diris kun rido: "Virinaĉo! Jen mi havos la kukon, kaj donos al vi neniom." Kiam oni informiĝis pri tio, neniu el ili povis sin deteni de rido.

## **68. Sin Venĝi**

Iam antaŭe, viro iun malamegis, kaj afliktiĝis de tio tagnokte. Aliulo demandis lin: "Pro kio vi tiel afliktiĝas?" Li respondis: "Iu atencis min, kaj mi ne kapablas min venĝi. Mi ne scias, kiel mi povos lin atenci. Mi afliktiĝas ĝuste pro tio." La aliulo respondis: "Nur per iuspecaj sorĉvortoj vi povos atenci lin. Sed estas manko de la sorĉarto. Antaŭ ol ekatenci lin, vi jam suferos de tio." Aŭdinte la respondon, la viro ekĝojis kaj petis: "Bonvolu instrui min pri la sorĉvortoj. Kvankam mi suferos de tio, mi preferu atenci lin."

## **69. Rapida Manĝado**

Iam antaŭe, iu vojaĝis de la nordo al la sudo en Hindio. Li loĝis tie longe, kaj prenis lokan knabinon kiel sian edzinon. Apenaŭ la edzino pretigis manĝaĵon por li, li ekenglutegis haste spite al varmego. La edzino miris pri tio kaj demandis: "Ĉi tie estas neniu rabisto pirabi vin. Pro kio vi manĝas tiel rapide anstataŭ konvene?" Li respondis: "Tio estas sekreto. Mi ne povas diri al vi." Aŭdinde pri tio, la edzino des pli miris, kaj insistis pri la demando. La edzo respondis post longa paŭzo. Li diris: "Ekde mia avo ni havas metodon por manĝi rapide. Nun mi imitas tion kaj manĝas haste."

## **70. Gustumi Mangojn**

Iam riĉa prestiĝulo sendis sian serviston al alies ĝardeno por aĉeti mangojn. Li ordonis: "Vi devas aĉeti la dolĉajn kaj bongustajn." La servisto obeis lin, kaj iris kun mono al la vendisto. La vendisto diris: "Ĉiuj miaj mangoj de tiu ĉi arbo estas dolĉaj kaj bongustaj. Neniu el ili estas malbongusta. Bonvolu gustumi kaj vi bone scios pri tio." La aĉetanto respondis: "Mi devas gustumi ĉiujn antaŭ la aĉeto. Se mi gustumos nur unu, kiel mi povos scii, ke la aliaj estas ankaŭ same bongustaj?" Li do gustumis ĉiujn kaj portis ilin hejmen. Kiam la riĉulo vidis la mordsignojn, li sentis naŭzon, kaj forĵetis ĉiujn mangojn eksteren.

## **71. Blindiĝo pro la Edzinoj**

Iam iu prenis al si du edzinojn. Se li proksimiĝis al unu, la alia koleris. Ne povante ĉesigi ilian konfliktadon, li do devis kuŝi surdorse meze de ili en la nokto. En iu pluvega nokto, lia domo likis, kaj la akvo kaj koto falis en liajn okulojn. Pro la antaŭa interkonsento, li ne aŭdacis sin movi por eviti tion, do li blindiĝis pro la malpuraĵo en siaj okuloj.

## **72. Buŝo da Milio**

Iam antaŭe, iu vizitis la hejmon de sia bopatro, kaj vidis sian edzinon pistanta milion. Li do iris al ŝi kaj ŝtele metis miliograjnojn en la buŝon. Kiam lia edzino parolis al li, li ne povis respondi kun milio en la buŝo. Pro honto antaŭ la edzino, li ankaŭ ne aŭdacis eligi la milion. Li do povis fari nenion ol teni sin muta. Vidinte lin muta, la edzino palpis lin kaj certigis al si, ke lia buŝo ŝveliĝis. Ŝi do raportis al sia patro: "La buŝo de mia edzo subite ŝveliĝis tiel, ke li eĉ ne povas paroli." La bopatro haste alvenigis kuraciston. La kuracisto diris: "Tio estas plej grava malsano. Li povos resaniĝi nur se mi difendos lian buŝon." Do la kuracisto difendis lian buŝon per tranĉilo. Je tio, la miliograjnoj fluis el lia buŝo, kaj oni malkovris lian ŝteladon.

### **73. Mensogo pri la Ĉevalo**

Iam malkuraĝulo partoprenis en milito sur la nigra ĉevalo kune kun aliaj batalantoj. Sed dum la milito li ektimis, kaj ne aŭdacis batali plue. Li do ŝmiris sian vizaĝon per malpuraĵo, kuŝiĝis inter kadavroj kaj sin ŝajnigis morta. Lia ĉevalo estis forkondukita de iu alia. Kiam la batalantoj foriris, li volis reveni hejmen. Li do detranĉis la voston de blanka ĉevalo, kaj portis ĝin kune kun si. Kiam li revenis, oni demandis al li: "Kie estas via ĉevalo? Pro kio vi revenis sola?" Li respondis: "Mia ĉevalo jam mortis, kaj mi alportis nur ĝian voston." Oni demandis: "Via ĉevalo ja estis nigra, do pro kio ĝia vosto estas blanka?" Li povis respondi nenion kontraŭ tio. Oni do mokis lin pro lia malkuraĝo.

### **74. Evito de Puno**

Iam la reĝo publikigis leĝon, ke ĉiuj bramanoj kaj aliaj religianoj en lia regno devu sin lavi puraj; se ne, oni skurĝos aŭ punos ilin per peza laboro. Iu bramano portis vakan akvuĵon kaj pretendis sin pure lavita. Kiam iu verŝis akvon por li, li forverŝis ĝin dirante: "Mi ne lavu plue. Lasu la reĝon lavi por si mem." Por eviti la punon de la peza laboro laŭ la leĝo, li pretendis sin pura, sed fakte li tute ne sin lavis.

## 75. Perdo de Ambaŭ Urno kaj Kamelo

Iam antaŭe, iu metis grenon en urnon. Lia kamelo etendis sian kapon en la urnon por manĝi la grenon, sed ne plu povis ĝin eligi. Ankaŭ la homo povis fari nenion kontraŭ tio. Li do dronis en granda ĉagreno. Tiam maljunulo venis al li kaj proponis: "Ne ĉagreniĝu. Mi instruu vin, kion vi faru. Obeu min, kaj vi povos elpreni la kamelan kapon. Vi devas detranĉi ĝian kapon unue, kaj la kapo elurniĝos per si memposte." La posedanto de la kamelo do dekapigis la kamelon per tranĉilo laŭ la maljunulo. Tiel li mortigis la kamelon, kaj ankaŭ devis rompi la urnon por elpreni la kamelan kapon. Ĉiuj priridis lian malsaĝon.

## 76. Aspiro al la Reĝidino

Iam antaŭe, kiam kamparano promenis en la ĉefurbo, li vidis, ke la reĝidino estas eksterordinare ĉarma. Li do aspiris al ŝi tagnokte, kaj neniel povis sin deteni de tio. Li deziregis kontaktiĝi kun ŝi, sed povis trovi nenan metodon por realigi sian deziron. Pro tio li vakskoloriĝis, kaj eksuferis de grava malsano. Kiam liaj parencoj kaj amikoj informiĝis pri tio, ili vizitis lin, kaj demandis pri la kaŭzo de la malsano. Li respondis: "Mi vidis la ĉarman reĝidinojn antaŭ nelonge, kaj deziregis kontaktiĝi kun ŝi. Sed mi ne povis elpensi bonan metodon por tio, do mi malsaniĝis pro ĉagreno. Se mia deziro ne realiĝos, mi ne povos vivi plue." La amikoj diris: "Ni elpensu bonan metodon por realigi vian deziron. Ne turmentiĝu pri tio." Tagon poste, ili revenis al li kaj diris: "Ni jam kontaktiĝis kun la reĝidino por vi, tamen ŝi ne konsentis pri via deziro." Aŭdinte tion, la kamparano ekridis kun ĝojo. Li diris, ke li certe povos havigi ŝin al si mem.

## 77. Melki Virazenon

Iam en izolita lando malofte vidiĝis azeno. Oni nur aŭdis, ke la azena lakto estas bongusta, tamen neniu el ili gustumis. Poste, kiam iu havigis al si virazenon, ĉiuj konkure kaptis ĝin por la lakto. El ili iuj kaptis la piedojn; iuj kaptis la orelojn; iuj kaptis la voston; kaj iu eĉ

kaptis la penison. Ĉiu el ili deziregis melki ĝin kaj gustumi la lakton unua. Tiu, kiu kaptis la azenan penison, opiniis, ke tio estas la mamo. Li do forte premadis ĝin por elfluigi lakton. Sed neniomda lakto elfluis ĝis ilia elĉerpiĝo. Ili do klopodis vane kun nenia rikolto, kaj estis mokitaj de la aliaj.

## **78. Hastema Filo**

Iam patro diris al sia filo dum nokto: "Morgaŭ ni iru kune al la vilaĝo por preni ion de tie." Aŭdinte tion, la hastema filo iris al la vilaĝo sola sen scio de sia patro en la sekva mateno. Atinginte la celokon, li elĉerpiĝis de la longa irado, sed tute ne sciis, kion li prenu de tie. Kaj krome, kun nenio por manĝi, li preskaŭ mortis de malsato kaj soifo. Li do povis fari nenion alian ol reveni al sia patro. Vidinte lin reveninta, la patro kulpigis lin: "Kiel malsaĝa vi estas! Pro kio vi iris sola sen mi kaj klopodis vane? Pri tio oni mokos vin."

## **79. Porti Benkojn por la Reĝo**

Iam antaŭe, reĝo volis iri en Senĉagrenan Ĝardenon por sin amuzi. Li ordonis al sia subulo: "Prenu benkon al la ĝardeno, por ke mi ripozu sur ĝi." La subulo hontis tion fari, li do respondis al la reĝo: "Mi ne kapablas porti permane. Mi preferas porti ĝin dorse." La reĝo do ordonis, ke oni metu tridek ses benkojn sur lian dorson, ke li portu ilin al la ĝardeno. Pro tio la subulo estis mokita de aliaj.

## **80. Klistero**

Iam iu suferis de interna malsano kaj konsultis kuraciston. La kuracisto diris, ke li devas kuraci lin per klistero. Dirinte, li ekpreparis la medicinaĵon kaj klisterilojn por la malsanulo. Sed antaŭ ol la kuracisto revenis, la malsanulo englutis la preparitan medicinaĵon. Pro tio lia ventro ŝveliĝis, kaj suferigis lin multe. Li neniel povis elporti tion plue. Reveninte, la kuracisto miris, kaj

demandis al la malsanulo: "Kio okazas al vi?" "La malsanulo respondis: "Mi englutis la medicinaĵon por klistero, kaj suferas de tio neelporteble." La kuracisto riproĉis lin: "Vere malsaĝa vi estas! Vi tute ne scias, kiel oni prenu ĝin." Li ordonis la malsanulon preni alian medicinaĵon senprokraste. Iom poste, la malsanulo resaniĝis post vomado.

## **81. Venĝo Kontraŭ la Urso**

Iam patro kaj filo vojaĝis kune kun aliaj. Kiam la filo enarbariĝis sola, urso mordis lin kaj per ungoj vundis lin. Li do rapide elkuris al la akompanantoj. Vidinte la vundon de la filo, la patro ekmiris kaj demandis lin: "Kio okazis al vi?" La filo respondis al la patro: "Besto kun longa hararo vundis min." La patro do iris kun la akompanantoj en la arbaron kun pafarko kaj sagoj. Vidinte feon kun longa hararo, li levis la pafarkon. La aliaj diris al li: "Pro kio vi pafos lin? Li ja neniun atencas. Vi devas puni nur la suferiginton de via filo."

## **82. Semi Tritikon**

Iam kamparano iris al alies kampo. Vidinte, ke tritiko kreskas tre bone, li demandis ĝian mastron: "Kiamaniere vi plantis la tritikon tiel bone?" La mastro respondis: "Mi ebenigis la kampon kaj aldonis sterkon antaŭ la semado. Pro tio la tritiko kreskas bone." La kamparano ekagis laŭ la instruo. Ebeniginte kaj sterkinte la kampon, li pretis semi. Tiam li ektimis, ke li tretus la kampon malmola kaj pro tio la tritiko ne kreskus bone. Li do elpensis metodon: "Estus pli bone, ke mi semu tritikon sidante sur lito portata de aliuloj." Li do dungis kvar virojn por tio. La viroj tenis la liton respektive je ĝia piedo, kaj li semis sidante sur ĝi. Sed la kampo des pli malmoliĝis sub tretado de la 4 viroj. Oni priridis lin pro tio.

## **83. Venĝo de Simio**

Iam simio estis batita de plenaĝuloj, sed ĝi ne aŭdacis sin venĝi kontraŭ ili, ĝi do verŝis sian koleron sur la infanojn.

## **84. Bati Hundojn pro la Luna Elipso**

Iam antaŭe, kiam la reĝo de demonoj vidis, ke la luno estas tre brila, li ŝirmis ĝin per sia mano. Sed sciencistoj atribuis la malheliĝon de la luno al senkulpaj hundoj kaj batis ilin pro tio.

## **85. "Doloro nur pro la okuloj"**

Iam antaŭe, virino suferis de okuldoloro. Ŝia konatino demandis ŝin: "Ĉu vi suferas de okuldoloro?" La suferantino respondis: "Jes, mi suferas de okuldoloro." La konatino diris: "Oni havas okulojn. Ili certe doloras. Kvankam mi ankoraŭ ne eksuferas de okuldoloro, mi volas elfosi ilin por eviti la eventualan doloron." La aliaj admonis ŝin: "Se vi havas okulojn, ili jen doloras jen ne; se vi perdus la okulojn, vi suferos de doloro dumla tuta vivo."

## **86. Protekti Orelingojn**

Iam patro kaj filo iris sur vojo. Subite ili renkontis rabiston, kiu pretis prirabi ilin. La filo portis orajn orelingojn, do la patro timis, ke la rabisto forprenos ilin. Li ektiris la orelojn de la filo. Sed la oreloj ne povis tuj disiĝi je lia tiro. Li do detranĉis la kapon de la filo por protekti la orajn ringojn. Poste, kiam la rabisto foriris, li provis remeti la detranĉitan kapon, sed neniel sukcesis. Ĉiuj priridis la malsaĝan patron pro tio.

## **87. Dividi la Ŝtelaĵon**

Iam antaŭe, aro da ŝtelistoj priŝteladis kune kaj havigis al si multajn objektojn. Ili do dividis la havaĵon laŭrange. Iu altvalora teksaĵo ŝajnis ne bone kolorigita, do ili ĝin opiniis ne valora kaj donis al tiu plej malaltaranga. La malsuperulo akceptis la dividaĵon kun



malĝojo. Li plendis, ke li malprofitas de tio. Sed kiam li vendis la teksaĵon en bazaro, riĉulo en urbo pagis multe. Li enspezis pli multe ol la aliaj, kaj ekzaltiĝis de tio.

## **88. Simio kaj Sojfabloj**

Iam simio portis manplenon da sojfabloj kun si, sed pro malatento li perdis unu. Li do metis la restajn sojfablojn sur la teron por serĉi la perditan. Sed li ne trovis la perditan, eĉ la restaj sojfabloj estis formanĝitaj de kokoj kaj anasoj.

## **89. Ora Putoro**

Iam viro promenis sur vojo kaj trovis oran putoron. Li prenis ĝin en sian sinon kun granda ĝojo, kaj daŭrigis sian vojadon. Kiam li venis al rivero kaj demetis siajn vestojn por trapasi la riveron, la putoro aliformiĝis en venenan serpenton. Sed la viro pensis: "Mi preferu morti de la serpento ol forlasi ĝin." Pro lia firma volo, la serpento denove sin ŝanĝis en oron. Ĉe la vojo malsaĝulo vidis, kiel la serpento sin ŝanĝas en oron. Li do opiniis, ke serpento ĉiam povas fariĝi oro. Li kaptis serpenton kaj metis ĝin en sian sinon, sed perdis la vivon pro mordo de la serpento.

## **90. Malriĉulo kaj la Trovita Mono**

Iamalriĉulo trovis saketon da ormoneroj en sia piedirado. Li do tuj ekkalkulis ilin kun granda ĝojo. Sed antaŭ ol li finis la kalkuladon, la perdinto alvenis kaj forprenis la monon. Tiam la malriĉulo pentis, ke li devus foriri senprokraste kun la mono. Pro tio li dronis en granda afliktiĝo.

## **91. Revo de malriĉulo**

Iam antaŭe, vivis malriĉulo kun tre malmulta posedaĵo. Vidinte, ke riĉuloj posedas tre multe, li do revis esti tiel riĉa kiel ili. Sed, lia

posedaĵo tute ne povis kompariĝi kun la ilia, kiom ajn li faris ŝparadon kaj akumuladon. Li do furiozis kaj volis ĵeti la posedaĵon en riveron. La aliaj admonis lin: "Kvankam via posedaĵo estas malmulta, tamen per ĝi vi povas daŭrigi vian vivon dumkelkaj tagoj. Kial vi forĵetos ĝin en la akvon?"

## **92. Knabo kaj Knelo**

Iam patrino piediris kun sia mamsuĉa infano en la sino. Laciĝinte de la vojirado, ŝi kuŝiĝis ĉe la vojo kaj endormiĝis profunde. Tiam homo venis al la infano kaj donis al li knelon. Ricevinte ĝin, la infano estis ravita de la bongustaĵo, kaj ne plu zorgis pri siaj ornamaĵoj. La homo do demetis liajn arĝentan seruron, perlan kolringon kaj vestaĵojn, kaj forportis ĉion de ili.

## **93. Maljunulino kaj Urso**

Iam maljunulino kuŝis sub arbo. Alvenis urso kaj volis ŝin kapti. La maljunulino do kuris ĉirkaŭ la arbo por sin savi. Tiam la urso ŝin postkuris, kaj kun unu hufo sur la arbo, ĝi volis ŝin kapti per la alia. Subite, genia ideo venis al la maljunulino. Ŝi do tuj ĉirkaŭprenis la arbon, kaj premis la antaŭajn piedojn de la urso al la arbo. Pro tio la urso ne plu povis sin movi. Ĝuste tiam alvenis alia homo. La maljunulino do kriis: "Helpu min kapti la urson, ke ni mortigu ĝin kaj dividu la viandon." Tiu homo kredis la maljunulinon, kaj vere kaptis la urson. La maljunulino senprokraste forkuris, sed la homo estis embarasigita de la urso.

## **94. kanalo "Mani"**

Iam iu adultis kun alies edzino. Antaŭ ol ili finis sian aferon, la edzo revenis de ekstere kaj trovis ilian konduton. La edzo do atendis ĉe la pordo por mortigi la adultanton post lia elĉambriĝo. La virino diris al la adultanto: "Jen mia edzo trovis nian aferon. Ni ne havas alian elirejon. Vi nur povas eliri tra la mani ". Ŝi aludis, ke la

adultanto elglitu tra la kloaka kanalo. Sed la adultanto miskomprenis tion kiel la magian kaj altvaloran Mani-perlon. Li ekserĉis, sed nenie povis trovi ĝin. Li do ĵuris: "Se mi ne trovos la Mani-perlon, mi neniam eliru." Momenton poste, li estis mortigita de la edzo.

## **95. Rakonto pri Gekolomboj**

Iam antaŭe, paro da kolomboj vivis kune en sia nesto. Kiam beroj maturiĝis en aŭtuno, ili plenigis sian neston per la beroj. Sed poste, la kolektitaj beroj iom post iom malmultiĝis pro sekiĝo, kaj ĝisfine restis nur duono. La virkolombo koleriĝis kaj kulpigis la kolombinon: "Ni kune kolektis la berojn kun granda peno. Kial vi sola manĝis ilin, ke restas nur duono?" La kolombino respondis: "Mi ne manĝis la berojn. Ili malmultiĝis per si mem." La virkolombo ne kredis tion. Ĝi furioziĝis kaj refutis: "Se vi ne manĝis, kiel la beroj povus malmultiĝi per si mem?" Ĝi do mortigis la kolombinon per sia beko. Ekpluvis post pluraj tagoj. La beroj malsekiĝis, kaj pligrandiĝis ĝis la antaŭa multeco. Vidinte tion, la vira kolombo ekpentis: "Ŝi fakte neniam ŝtele manĝis berojn. Ŝin mi miskulpigis kaj erare mortigis." Ĝi do triste vokadis la kolombinon: "Kien vi iris, mia kara? "

## **96. Falsa Blindulo**

Iam antaŭe, metiisto laboris por reĝo. Kiam li ne plu povis elteni la pezan laboron, li sin ŝajnis blinda kaj liberigis de tio. Kiam iuj aliaj metiistoj informiĝis pri la afero, ankaŭ ili volis sin blindigi por eviti la pezan laboron. Saĝulo admonis ilin: "Kiel vi volas suferigi vin vane? " Tiaj malsaĝuloj estas mokitaj de aliaj.

## **97. Perdo de Ambaŭ Vesto kaj Ormonero**

Iam antaŭe, du viroj piediris en dezerto. Sur la vojo ili renkontis rabiston. Iu el ili surportis kotonan vestaĵon, kaj ĝi estis forprenita de la rabisto. La alia do sin kaŝis en herbaron. La pirabito iam metis ormoneron en la vestaĵan kolumon. Li do petis la rabiston: "La

vestaĵo valoras je ormonero. Mi aĉetu ĝin per mono." La rabisto demandis: "Kie estas via mono?" La pirabito prenis la monon el la vestaĵa kolumo, kaj donis ĝin al la rabisto: "Tio ja estas el vera oro. Se vi ne kredas, bonvolu demandi la ormetiiston, kiu sin kaŝas en la herbaro." Vidinte tion, la rabisto forprenis ankaŭ la vestaĵon de la metiisto. La malsaĝulo perdis ambaŭ vestaĵon kaj ormoneron.

## 98. Mortigi Testudon

Iam knabeto sin amuzis ĉe rivero kaj kaptis grandan testudon. Li volis ĝin mortigi, sed ne sciis kiel agi. Li do demandis al aliulo: "Kiel mi mortigu ĝin?" La viro respondis: "Metu ĝin en akvon kaj dronigu ĝin." La knabo tuj kredis la vortojn. Li metis la testudon en la akvon, sed la testudo forkuris de li senprokraste.

# LA SORĈISTINO EL KASTILIO

Talom Asch

Tradukis I. Lejzerovicz

## Antaŭparolo.

"*La judeco estas malfeliĉo*" – diris Heinrich Heine, kaj en tiuj ĉi vortoj, malgraŭ ilia multemania interpretebleco, troviĝas tiu esenca nediskutebla vero, ke esti judo signifas simple esti malfeliĉa. Neŝanĝebla estas la vojo eterna de la Tempo, kaj kiel diligenta sekretario sekvas ĝin la Historio, fidele notante ĉiun ĝian etapon. Kaj la historio instruas nin, ke ĉiu generacio de la homaro signifas aŭ almenaŭ devus signifi progreson, gravan paŝon antaŭen. Evoluado estas ja nerompebla leĝo de l' homaro. Nur en unu detalo certa parto de la homaro ne elmontris homecan progreson: en la persekutado kontraŭ la judoj. Tiurilate la sinsekvaj jarmiloj ne evoluis. Tiurilate estas neniam diferenco inter la antikva egipta periodo, la mezepoko kaj la dudeka jarcento. Tanĝiĝis la rimedoj kaj manieroj, sed la metodo kaj sinteno restis ja la samaj. La antikvaj egiptoj batalis kontraŭ la juda nacio, la mezepoko – kontraŭ la juda religio, la dudeka jarcento – kontraŭ la juda raso. Kaj la sekvoj estis ĉie kaj ĉiam la samaj: masakroj kaj ekziloj.

Motivoj por kontraŭ-juda persekutado neniam mankas, ja eĉ nuntempe: se oni volas, la judoj tenas en siaj manoj la kapitalojn de la tuta mondo, kaj se oni volas, estas la judoj ja, kiuj mortigas la kapitalismon per sia komunismo. Se oni volas, la judoj detruas ĉian moralon kaj etikon, kaj se oni volas, oni trovas en ili forĝantojn de nova ne-kritikebla justeco kaj racio. Tiamaniere ĉiu, se li nur deziras, povas vidi en judo sian plej teruran malamikon. Fanatikeco kaj evito de komprenemo faris la ceteran kaj kompletigas fine la malfeliĉon.

La mezepoko apartenas al la plej malluma periodo de la juda historio. Ĉar superstiĉo kaj fanatikeco estis tiam la ĉefaj motoroj, kiuj funkciigis malamon kaj sango-avidon. Kun funebro kaj osto-tremo la judoj pensas al tiuj tempoj, kiam dekmiloj da iliaj samgenteroj estis laŭ ordono de la Sankta Inkvizicio turmentataj ĝis morto en la torturo-keloj aŭ publike bruligataj sur la "aŭtodafeoj" de Hispanujo kaj aliaj landoj. Kaj ne sole vivaj homaj korpoj iluminis la gloron de la Inkvizicio. Judajn librojn, verkojn de nacia genio, kreitajn dum jarcentoj, formanĝis ĝiaj flamoj. Kaj ĉio ĉi estis farata ne por ekstermi la malamikon, sed "por savi la pekajn animojn" kaj feliĉigi ilin almenaŭ en la vivo postmorta.

Per flama plumo, trempita en sango, estas skribita tiu ĉi parto de la juda historio. Kaj kvankam pasis jarcentoj, dum kiuj alterne la eksterman mision de la inkvizitoroj prenis sur sin aliaj "animo-savantoj" aŭ "kulturo-portantoj", la terurega periodo de la Sankta Inkvizicio ne povas forviŝiĝi el la memoro de l' juda popolo. Kaj ankoraŭ nun la sola vorto "Inkvizicio" vekas en judo impreson de teruro kaj ansio. Ĝia historio vivas en la popolo, kiu eternigis ĝin per multaj rakontoj, legendoj kaj kantoj.

Kompreneble, tia historio incitas la fantazion de ĉiu impresiĝema artisto aŭ poeto. Ho ve! La vivo montriĝis pli rafinita ol plej altfluga poeta fantazio: ĝi surprizis per roma spektaklo, kiun la plumo apenaŭ kapablas priskribi: tia abundego da sensacio, murdoj kaj intrigoj! Kaj kie artisto trovos tiujn riĉajn abundajn farbojn, kiujn li bezonas por pentri la kolorojn de sango, fontanta el krevantaj vejnoj de inkviziciaj viktimoj, pereantaj en flamoj aŭtodafeaj!?!

Multnombre do svarmas en la juda literaturo rakontoj pri la suferado de la juda popolo en la tempo de la *Sankta Inkvizicio*.

Sed super ĉiuj ĉi multnombraj pli-malpli bonaj rakontoj brile elstaras, kiel juvelo de l' juda historio, literaturo, la majstroverko de la nuntempa plej granda juda verkisto Talom Aŝ s. t. "La sorĉistino el Kastilio". Ĝi ne estas historia romano, sed bildo. Ĉar Talom Aŝ estas talento-plena artisto. Per vortoj li pentris tiun bildon, per vortoj li el-sorĉis tiujn farbojn kaj kolorojn, kiujn paletro de pentristo

ne posedas. Por li ne sufiĉis el-senti la grandiozecon de l' juda malfeliĉo; li deziris mem vidi, kiel ĝi efektiviĝis kaj kiel tio estis ebla. Do li vizitis la sudajn landojn de Eŭropo, mem ĉion esploris kaj kontrolis. Kaj li enblovis en la verkon – apud la blindigaj flamoj de la inkviziciaj fajroj – la koloro-riĉecon kaj sunon de la sudo.

Kiel dirite, Talom Aŝ estas la plej granda verkisto de l' juda literaturo. Li estas preskaŭ la sola, kies verkoj estas konataj vaste ekster la sferoj de judaj legantoj. Liaj libroj estas tradukitaj en multajn lingvojn. Al la esperantista publiko li estas malmulte konata. Krom kelkaj malgrandaj noveloj, dise aperintaj en diversaj esperantaj gazetoj, neniu pli grava lia verko estis ĝis nun eldonita en esperanto. Antaŭ unu jaro Aŝ festis sian kvindekjaran jubileon, kaj la subskribinto opiniis per aperigo de lia verko en Esperanto-traduko ne sole kontribui merititan honoron al la granda verkisto, sed ankaŭ pli-riĉigi la esperantan literaturon per unu el la plej belaj kreaĵoj de la juda verko-arto.

La agoj de l' kreado de la Sankta Inkvizicio, la sennombraj "aŭtodafeoj" de la mezepoko, sur kiuj pereis dekmiloj da senkulpaj homoj, formas nigran ĉapitron en la historio de la homara kulturo. La disvastiĝinta tra tuta Eŭropo superstiĉa kredo, ke ekzistas sorĉistinoj, farantaj pakton kun diablo, estis epidemia psikozo, kiu unuavice elmetis al danĝero la judon, kiu estis konsiderata kiel la enkorpiĝo de la diablo mem. Neniam antaŭe kaj pli poste la fanatismo kaj superstiĉo havis tiom abundan kaj sangan rikolton. Fine de la xv-a jarcento papo Inocento VIII-a publikigis specialan bulaon, ordonante plej severajn rimedojn por ekstermi la sorĉistinojn! Ja delonge jam pasis tiu tempo de netoleremo flanke de la katolika eklezio, tamen estas terure eĉ nun memori, ke por akuzi virinon pri diabla sorĉado, sufiĉis malica klaĉo, intrigeto aŭ nura denunco, ke la koncerna junulino havas sur sia korpo iajn suspektindajn signojn aŭ rigardas kun mallevita kapo. Tuj oni trenis ŝin en la torturo-kelojn, kie oni elmetis ŝin al plej teruraj turmentoj kaj suferoj: oni rompis la ostojn, aplikis la t. n. "hispanan boton", suprentiris sur ŝnuro la viktimon, vipante kaj skurĝante ŝin senkompate, kaj ĉar oni malgraŭ ĉio ne povis malkovri en ŝi la diablon, oni fine bruligis ŝin

publike "ad majorem dei gloriam". La viktimon, kondamnitajn je morto sur aŭtodafeo, oni kutime ligis al ĉaro aŭ ĉevala vosto kaj tiel vizaĝaltere trenis ŝin tra la stratoj al la loko de l' ekzekuto. Tiun solenaĵon de l' eklezio akompanis la pastraro kun brila pompo. Ofte oni la viktimon, neniigantan en la flamoj, torturis ankoraŭ en la lastaj minutoj de l' vivo, ŝirante per ardaj pinĉiloj pecojn de la brulanta korpo en akompano de eklezia kantado. La martireco de la kristanoj en la tempo de antikva Romo estas nur komparebla al tiu de la sennombraj viktimoj de la "sankta" inkvizicio.

Tiu ĉi libro estas protesto de sendependa penso kontraŭ fanatikeco, de kulturo kontraŭ spirita mallumo, de toleremo kontraŭ malamo. Ĝi estas ve-krio de generacioj kontraŭ la neesprimebla barbareco de la "sankta" inkvizicio, kiu dum la mezepoko neniigis cent-milojn da homaj vivoj per neimageblaj torturoj kaj fajro sole pro tio, ke tiuj viktimoj havis aliajn konvinkojn. Ĝi estas signalo je aspiroj pli noblaj kaj rilatoj pli homecaj.

*Izrael Lejzerowicz*

## I.

### **Kaŝitaj trezoroj.**

*Al doktoro I.L. Magnes en la signo de rekono kaj estimo dediĉas  
la aŭtoro.*

Tra "Plazza di Judea" en la juda geto en Romo, kiun papo Julio II-a igis pavimi per ŝtonoj kaj ornami per renesanca puto, promenis la Venecia pentristo Senior Cezar Pastilla. Pastilla estis dudekelkjara viro, li havis longetan vizaĝon kun tre malĝojaj okuloj. Liaj haroj ne estis orde tonditaj. Ili malsuprenpendis malantaŭ liaj ŝultroj en longkreskintaj bukloj, kiuj evidentigis, ke ilia mastro ne zorgas pri ili, kaj ili kreskadis kaj falis laŭvole. Liaj vango-haroj estis trokreskintaj kaj aspektis kiel judaj tempiharoj, kaj tio donis ankoraŭ pli melankolian aspekton al lia vizaĝo. Li ne havis difinitan



celon, kien iri. Ĝi tien, en la judan geton, li venis hazarde. promenante inter la malpuraj stratetoj, kondukantaj al Tibro, kie de pratempo loĝis la ŝtelistoj kaj prostituitinoj de Romo, li erarvagis en la judan geton. ekinteresis lin la malvastaj, mallarĝaj stratetoj kaj la multnombraj masonitaj domoj, la turoj kaj ĉelanguloj, kiuj kvazaŭ pendis en la aero super la stratetoj. interesis lin la fremda kaj nekonata arto, la judoj kun la flavaj tunikoj, la flavaj judaj signoj en formo de hebrea litero "s" sur la brustoj, kun la dormo-ĉapoj, la judaj malsuprentorditaj ĉapeloj, la virinoj kun vualitaj vizaĝoj, la du bluaj strioj en iliaj vualoj, kiuj atestis, ke ili estas judinoj; la ĉemizoj, kiujn ili portis sur la tunikoj kaj la multaj brilantoj kaj juveloj, kiuj brilis el iliaj haroj; la longaj modestaj bluaj veluraj vestoj, kiujn portis parto de l' judoj, kio signifis, ke ili estas riĉuloj eminentaj, portantaj mantelojn, kiel la veneciaj doĝoj; la infanoj, kiuj sur siaj tunikoj portis grandajn "kvarangulojn" kun bluaj kaj ore broditaj randoj kun kvastoj, kiuj treniĝadis post ilin kaj kaj vipis iliajn vizaĝetojn; kaj la tuta negocado kaj marĝandado de unu kun la alia, la mono-ŝanĝado, la trenado de varoj el unu domo en la alian – koloraj roboj, pecoj da tolo, veluro kaj silko – ĉio ĉi logis lin. Kaptis lin la fremda kaj riĉa arto, rivelanta sin antaŭ liaj okuloj. Tajnis al li, ke li erarvenis en orientan urbon, en bazaron de la malproksima Arabujo en la sultana regno, pri kio li aŭdis tiom multe da rakontoj de komercistoj kaj maristoj, kiuj vojaĝis en oriento kaj transportadis varojn el Turkujo en Venecion.

Liaj okuloj estis logitaj al homa figuro, kiu sidis sur sojlo de domo. Ĝi estis alta, maldika judo – kun longeta vizaĝo kaj longa pintabarbo, kies komenco estis larĝa kaj la fino – pinta, kun eksterordinare alta frunto. La vizaĝo, kiu rigardis el sub granda malsupren-tordita pinta juda ĉapelo, aspektis kiel vizaĝo de sanktulo, trovebla sur la primitivaj religiaj bizancaj bildoj, kiuj tiel ofte troviĝis en la malnovaj preĝejoj de Italujo. Pastilla estis kvazaŭ surprizita de tiu figuro, kaj li aliris al judo. Kaj ju pli multe li proksimiĝis, des pli simila al Bizanca sanktulo ŝajnis al li la staturo de la judo. La okuloj de l' judo estis bluaj kaj rondaj, kaj sidis kvazaŭ glacie senmovaj en liaj okulkavoj sub la rondaj arksimilaj brovoj. La sojlo, sur kiu li sidis, ne estis sojlo, sed kvazaŭ movebla pordo de butiko, kiu estis duonmalfermita kaj

ebena, kiel tablo. La judo sidis sur la tablo kaj ĉirkaŭ li estis sternitaj diversaj ŝtofoj, novaj kaj malnovaj, koloraj manteloj kaj tunikoj, sange-ruĝaj silkaĵoj brilantaj kiel sunradioj. Kaj perle brilantaj ŝtofoj, kiuj faldiĝante brilis kiel skvamoj de fiŝo aŭ flugiletoj de papilio. La ŝtofoj kuŝis kun-ĵetitaj unu super la alia, sed kiam la judo rimarkis, ke la nobela sinjoro proksimiĝas al li, li arigis la ŝtofojn kaj kaŝis ilin sub la longajn larĝajn baskojn de sia mantelo.

– Saluton, nobela sinjoro, – kliniĝis la judo antaŭ la junulo antaŭ ol tiu proksimiĝis al li.

– Saluton, judo, – rediris al li Pastilla, kaj antaŭ ol la judo sukcesis ankoraŭ ion al li respondi, li daŭrigis: – ne kaŝu, judo, viajn silkajn ŝtofojn. Mi ne estas impostisto de la papa fisko; mi ne estas leĝo-inspektisto de la sankta eklezio, kaj mi ne venis spioni vian konduton. Mi estas pentristo el Venecio kaj civitano de la venecia respubliko. Mi estas oficisto de Lia Eminenco la kardinalo de Venecio. Mi venis en la judan geton por aĉeti silkaĵojn, per kiuj mi ornamos miajn modelojn por la freskoj, kiujn mi pentras por la monabejo "Sankta Koro". Judo, montru al mi viajn ŝtofojn, kaj mi pagos por ili per bonaj oraj dukatoj.

La pentristo tintigis la ledan monujon, kiun li portis ligitan al la zonŝnuro kaj kiu estis plena de mono.

Kiam la judo ekaŭdis la vorton "Venecio", kiu estis rifuĝejo por ĉiuj maranoj kaj judoj, ĝemantaj sub la jugo de l' papo, li eksentis simpatian al la fremdulo. Tamen li timis lin, ĉar la leĝo, malpermesanta al judoj komercadon kun kristanoj, estis tre severa.

– Ho, nobela sinjoro! Pardonu miajn parolojn. La nobela sinjoro tre bone scias, ke la Sankta Patro, Paŭlo la Kvara (*Dio benu lin per multe da jaroj kaj per venko super liaj malamikoj*) malpermesis al ni komercadon kun kristanoj. Kial vi elmetu malriĉan judon al danĝero! – mono logas ja, tiom pli efektivaj oraj veneciaj dukatoj, kiuj validas en ĉiuj landoj de l' sultano, (*La judo volis diveni, kiom la nobelo-sinjoro havas en sia monujo*).

– Vi divenis. Efektivaj veneciaj dukatoj, – tintigas la juna pentristo la monon. – kiuj validas en ĉiuj landoj de l' sultano. Ne duon-plumbaj moneroj, kiujn la Sankta Patro trudas al siaj civitanoj akcepti kiel efektivan monon, Ridas la pentristo. – Ne timu, judo. Vendu al mi viajn varojn por la kardinalo de Venecio. La venecianoj scipovas kaŝi sekretojn, – palpebrumas al li la pentristo. – Cetere, kiel vi scias, la Sankta Patro malpermesis nur al la ordinara popolo komercadon kun judoj, sed ne al si mem, nek al kardinaloj, por kiuj leĝoj ne estas kreaĵaj.

– Ho! Por la kardinalo de Venecio! Kiu arogus kaŝi siajn varojn antaŭ lia glora Eminenco? Venu, nobela sinjoro, internen. Mi posedas riĉaĵojn indajn por ornami la palacon de l' sultano de ĉiuj turkoj.

La judo leviĝis de sia loko en la butikfenestro, malaperis kaj ree elmetis sian kapon sub malgranda pordeto, kiu estis kaŝita ie sub la duonfermita fenestro, kaj li enirigis la pentriston en la butikon. Pastilla haltis mirigite, kiam li enrampis post la judon tra la malgranda aperturo en la butikon de l' judo. Interne estis malhele. Malalta, sesangula plafono malsupren-pendis super lia kapo. Murojn li ne vidis: ili disfluis en malklara nebulo. Sed tie kaj ĉi tie ek-vidiĝis angulo, kiu tage estis lumigata per malgranda flamo, brulanta en oleujo. En la lumo de la oleujo li vidis, kiel brilas kaj fajreras diversaj ŝtofoj. Kun flama lumo de fajro ekbrilis tie ruĝa velurpeco, kiu tordiĝadis en faldoj kaj kaŝis en ili la lumon de siaj koloroj. el alia brulanta en oleujo. en la lumo de la oleujo li vidis kion? Li sole rimarkis, ke la anguloj estas plenaj de varoj. La judo eltenis keston kaj, kiam li ĝin malfermis, la pentristo konsterniĝis pro la trezoroj, kiuj malfermiĝis antaŭ li.

La kesto estis plena de diversaj silkaĵoj, veluroj kaj brokatoj, broditaj kaj teksitaj, italaj kaj orientaj, kiuj verŝis lumon plenan de diversaj koloroj. La judo trenis el la kesto unu silkaĵon post la alia, portis ilin al la malgranda giĉeto, teksita el feraj dikaj kradoj, tra kiuj penetris en la kelan butikon malmultaj lumstrioj. La judo levis

la silkaĵojn kaj lasis la taglumon fali super ilin, por ke Pastilla pli bone vidu la puran brilon de iliaj koloroj.

La venecia pentristo, kiu kutimis vidi la kolorojn de silko en sia hejmurbo Venecio, ne povis deturni la rigardojn for de tiuj teksaĵoj. Ilia brilo kaj ora lumo igis liajn okulojn trinki tian riĉecon de koloroj, ke li ebriiĝis de ili, kiel de bona malnova vino. Tie estis persaj silkaĵoj, kiuj lumis per koloroj de brilantaj serpentoj. Aliaj pecoj brilis, kvazaŭ incrustation per plej mirindaj juveloj. Aliaj posedis la noblan virgulinan modestan ĉarmon de perloj, kaj estis veluroj – nigraj, kiel la nigra nokto, kaj profundaj, kiel la maro. Ankoraŭ aliaj havis la koloron de sukceso. Kaj kiam la judo tenis ilin en la lumon, ŝajnis al Pastilla, ke la sunradioj glaciigis en la silka teksaĵo kaj malsupren-verŝiĝas de sur la silkaĵo, kvazaŭ la judo tenus faskon da sunradioj en la mano.

La malmulta taglumo ne preterlasis ankaŭ la blankan barbon kaj palan vizaĝon de l' judo, kiu staris kun siaj silkaj ŝtofoj ĉe la giĉeto. Kaj la vizaĝo de la judo, kiu en tiu lumo aspektis kiel sanktulo, ravis Pastilla-n same kiel la silkaj ŝtofoj. La vizaĝo de la judo tiel impresis lin kaj incitis lian artistan instinkton, ke li forgesis, pro kio li alvenis. Do li igis la judon montri al li siajn ŝtofojn kaj varojn kun la intenco, ke li havu tempon por studi lian vizaĝon. Li pensis, kiel ĉiu artisto, utiligi tiun vizaĝon de l' judo en unu el siaj sanktaj bildoj. Sed rememorinte, ke tiun vizaĝon portas nekredanto, li – estante bona pia kristano – rezignis je tiu penso.

Dum la tuta tempo, kiam li troviĝis en la butikoj, la pentristo aŭdis voĉon, resonantan en la butikon, kvazaŭ ĝi penetrus de tre malproksime tra dikaj muroj. La voĉo estis virina. Ĝi estis duone kantanta kaj duone kvazaŭ preĝanta al dio. Kvankam la voĉo estis malproksima kaj neklara, tamen li aŭdis, ke ĝi sonas per fremdaj nekompreneblaj vortoj. Pastilla-n incitis la vibranta moleco de l' voĉo kaj la nekomprenebleco de l' vortoj. Li jam delonge rimarkis, ke tra giĉeto en la murangulo brilas lumo. Li komprenis, ke tie – malantaŭ la giĉeto – troviĝas la internaj loĝeĉambroj de la judo kaj ĝuste de tie venas la kantanta virina voĉo. Li tre volis ekrigardi tra la giĉeto por

vidi, kio tie okazas. Sed li ne havis la eblon proksimiĝi al tiu angulo. Senĉese montrante al li la silkajn ŝtofojn, la judo tenis lin proksime al la stratfenestro, sed Pastilla-n jam delonge ne interesis la silkaj ŝtofoj. Lin interesis la voĉo, aŭdiĝanta tra la giĉeto. Komence li ne atentis ĝin, sed poste pli kaj pli aŭskultis la voĉon, kiu pli kaj pli profunden penetris en lin, kvankam nekomprenablaj kaj fremdaj estis la vortoj kaj tono. Sed la vibrado, la silenta profundeco de la voĉo ŝprucigis el si ian virgulinan noblecon, kaj tiu voĉo vibrigis ion en li. Fine li trovis okazon por proksimiĝi al la giĉeto. La judo komencis malpaki alian keston de silkaĵoj kaj estis okupita per la malfermado de la multaj feraj bukloj kaj seruroj, per kiuj la kesto estis ŝlosita. Pastilla alproksimiĝis la giĉeton kaj ekrigardis internen.

Li restis konsternita ĉe la giĉeto. En lumo de brulanta arĝenta oleo-lampo li vidis maljunulon, kiu sidis volvita en tukoj, kaj knabino sidis ĉe liaj piedoj sur benketo kaj kantis ion el libro. La maljunulo certe estis blinda: liaj okuloj estis fermitaj kaj lia vizaĝo estis kvazaŭ teksita el sulkoj. Kelkaj grizaj haroj de lia barbo moviĝis sur lia brusto. La vizaĝon de l' knabino li unue ne rimarkis. Ti sidis kliniĝinta super la libro, kiu kuŝis sur ŝiaj genuoj, kaj li vidis sole la faldojn en la blua veluro, kiu malsuprenfluis super ŝiajn ŝultrojn. La lumo de la oleo-lampo, kiu pendis sur dika trabo super ŝia kapo, falis kvazaŭ ombrelo sur ŝian kapon kaj ŝultrojn, lumigante ŝin. La brilo de ŝiaj haroj fajreris kun la sama perlofascino, kiel la veluro sur ŝiaj ŝultroj, kvazaŭ perla matenroso ŝvebus super ŝi entute. Sed baldaŭ ŝi turnis sian kapon, kvazaŭ ŝi sentus, ke iu rigardas ŝin. Ti timeme ĉirkaŭrigardis, kvazaŭ serĉante iun. Ti ankoraŭ ne rimarkis lian vizaĝon ĉe la giĉeto, kaj Pastilla havis nur fulmomomenton por vidi ŝin.

Vibranta nobleco plenigis lian koron, en liaj okuloj aperis larmoj, kaj li iĝis plena de religia pieco. Tajnis al li, ke li vidas eksterordinaran aperaĵon, miraklon de Dio. Lin rigardis paro da okuloj, malĝojaj silentaj okuloj. Ankoraŭ neniam li vidis tiel malĝojajn okulojn. La okulkadroj havis longetan formon, kiel la okuloj de egipta knabo, kaj la palpebroj malsupren-pendis super ŝiaj klaraj, kvazaŭ cizelitaj pupiloj. La palpebroj vibris, kaj la okulharetoj vibris

kiel okuloj de kolombo, kiu vekas kompaton ĝis doloro. Tamen ŝiaj okuloj ne vekis kompaton, sed profundan malĝojon, – malĝojon ne el tiu ĉi mondo kaj ne el homa doloro. La frunto estis klara, ronda, levita, kaj atingis alten sur ŝia kapo, kiel la frunto de "Sankta Anna" de Leonardo da Vinĉi. La rando de ŝia frunto estis larĝa, kiel ĉe ŝia patro, sed pli kaj pli multe la linioj de ŝiaj vangoj malsupren-kuris longete kaj mallarĝe, kiel la vizaĝo de nobla genealogia cervido. Sed plej aminde reliefigis la profunda ne-perceptebla doloro kaj nekomprenbla malĝojo, kiujn ŝia vizaĝo esprimis, ĉirkaŭ ŝia buŝo. Tio ne estis buŝo. Ĝi estis kvazaŭ viva tranĉo en ŝia vizaĝo. Tia buŝo estis eksterordinare eta kaj mallonga, kvazaŭ ĝi estus kunkreskinta kaj kvazaŭ iu estus distranĉinta la kunkreskintajn lipojn, kiel folietojn de juna, apenaŭ disvolviĝanta ruĝa burĝono. Kaj tiu buŝo refermiĝis, kiel refermiĝas floro en la nokto kaj lasas sur sia rando la roson de l' nokto tiel freŝa estis la eta tranĉo de ŝia buŝo. Kiam ŝi rigardis, ŝajnis al la pentristo, ke ŝi vidas pli multe per la buŝo ol per la okuloj. Pastilla sentis, kiel en lian koron glitas la nobla malĝojo kaj la tremanta ĝojo, fluanta el ŝiaj nefermitaj okuloj kaj nefermita buŝo. Li kredis vidi ne ion realan, sed vizion, aperantan antaŭ liaj okuloj. La lumo de la kandelabro kun la briloj de silkaĵoj kaj metaloj, fajrerantaj el la ombro-vualitaj anguloj, ĉirkaŭprenis lin kvazaŭ en nubon kaj ebriigis lin.

Ti ne teruriĝis, kiam ŝi fine rimarkis fremdan vizaĝon, rigardantan en la ĉambron tra la giĉeto. Tiaj okuloj ne ekmiris. Ti sole leviĝis de sia loko, kaj Pastilla vidis, kiel la peza veluro falas sur ŝiajn ŝultrojn kaj rondan nukon, kaj aŭdiĝas agrabla tintado de la ornamaĵoj, pendantaj sur ŝi. La bukloj de ŝiaj haroj falis sur ŝian robon kaj tie dronis en la mallumo de l' veluro.

Ti leviĝis kaj proksimiĝis al la maljunulo, metante sur lin siajn longajn kvazaŭ tornitajn manojn. Sed subite ĉio ĉi malaperis, kiel iluzio. Antaŭ liaj okuloj ekbrilis oro kaj bluo. Li ekrigardis malantaŭen kaj rimarkis, ke la judo, ĉe kiu li marĉandis la varojn, ĵetas silkaĵojn super la giĉeton kaj kovras ĉion, kio interne okazas.

– Vera Florenca damasko, – montras la judo la silkaĵojn, – brodita per oro kaj purpuro!

## II.

### Sankta silentado.

Pastilla serĉis okazon por refoje renkonti la judan knabinon, la filinon de l' komercisto, kiun li vidis tra la giĉeto. Sed li ne havis eblaĵon por renkonti ŝin. Ĉiufoje, kiam li venis en la geton, li trovis ŝlositan la domon sur "Plazza di Judea". La butiko, kie li unuafoje renkontis la judon, ne plu tie troviĝis. Estis nerezoneble, ke tie iam ajn troviĝis movebla pordo. La domo staris morte-muta. La alte elstarantaj malgrandaj fenestroj estis kovritaj per feraj kradoj kaj interne kurtenitaj tiel, ke li ne povis scii, ĉu interne en la domo ekzistas vivo aŭ ne.

Sur fera tabuleto, kiun la vento balancis sur fera stango, li rimarkis eluzitan insignon de antikva Kastilio. De la ĉirkaŭe loĝantaj najbaroj li neniam povis ekscii. La judoj timis kaj evitis lin. Fine li sciigis nur tiom, ke la judon, loĝantan en tiu domo, oni nomas "la komercisto el Kastilio". Li estas riĉulo kaj reprezentanto de la granda firmo de l' riĉa maranino "Dona Grazia Mendesa", la "patrino" de la maranoj, kiu fine ekloĝis en Konstantinopolo kaj disvastigis siajn negocojn tra ĉiuj landoj.

Iun fojon li troviĝis sur la placo en la juda geto. Verŝajne estis sabato, ĉar Pastilla-n mirigis la kvieteco, kiu regis ĉirkaŭe. Ĉiuj domoj estis fermitaj. Malofte oni vidis homon, irantan tra la placo aŭ rigardantan el fenestro. Subite Pastilla ekaŭdis kriegon. Li ĉirkaŭrigardis kaj ekvidis, kiel la papaj inspektistoj kaj eklezio-soldatoj trenas el diversaj domoj junajn knabinojn kaj junulojn, ien ilin forkondukante en akompano de plorego kaj kriado de iliaj gepatroj, admonantaj ilin en nekomprenebla lingvo. Pastilla konsterniĝis; li ne kredis siajn okulojn: en la kastilia domo, en kiu loĝis la juda komercisto kaj kiun li ĉiam trovis fermita kaj senviva, subite

malfermiĝis la malnova konata butikpordo kaj super ĝi malsupren-lasis sin ŝtupo en la straton. Kaj subite super la pordo aŭdiĝis susurado de veluro, kaj li ekvidis la knabinon, kiun li tiam vidis en la giĉeto, kondukatan de du eklezio-soldatoj. Li ne povis vidi ŝian vizaĝon, ĉar sur ŝiaj kapo kaj vizaĝo pendis verda vualo, la signo de judaj infanoj. Sed li povis vidi, ke ŝi sub la vualo klinas la kapon, kaj ŝia eta, kvazaŭ tornita kapo eliĝas el sub la vualo kiel freŝa bela pomo. Malantaŭ ŝi sekvis la komercisto, klinante la kapon same kiel lia filino. Li eĉ ne unu rigardon turnis al la pentristo, kvankam li ŝajnis esti rimarkinta tiun.

Pastilla sekvis ŝiajn paŝojn.

Apud la enirejo de l' geto staris la preĝejo "Sankta Angeliko". La preĝejo, kiel la pordego en la juda geto, havis sub la kruco la surskribon el Jesajo: "Porasti et jadaĵ kol-hajom al am kŝe oref" (*mi ĉiam etendis miajn manojn al la obstina popolo*). La preĝejo estis konstruita speciale por judoj, kaj ĉiuj malnovaj dekretoj de iamaj papoj ordonis la judojn viziti ĉiu-sabate posttagmanĝe la preĝejon kaj aŭskulti la predikojn de kristanaj pastroj. Sed la judoj neniam observis tiun dekreton. Ili savis sin per mono kaj havis en la geto siajn dek "Batlonojn". Tiuj ĉi kutime ĉiu-sabate iradis en la preĝejon por aŭskulti la predikojn de la pastroj kaj tiamaniere ŝajnigi, ke la dekreto estas observata. La predikoj de l' pastro neniel povis efiki, ĉar la pli multo el la batlonoj, kiujn la geta komunumo elektis, por ke ili anstataŭu ĉiujn en la preĝejo, estis surduloj. Krome ili ŝtopis siajn orelojn, por ke la pastraj vortoj neniel influu ilin. En la tempo de Klemenso IV-a, kiam Ŝlomo Malho estis en Romo kaj akiris sian mistikan influon je l' papo por la bono de l' maranoj, tiu dekreto entute estis nuligita, kaj la kristana preĝejo en la geto staris fermita. Sed en la tempo de l' papo "Haman", kiel la judoj nomis Paŭlon la Kvaran, tiu dekreto estis renovigata kun pli granda malbono: la kristaniĝintan judon Jozefo-n Mora-n la papo nomis pastro en tiu preĝejo, kaj tiu eks-judiĝinta pastro atentis, ke ĉiuj judoj en la geto regule vizitadu la preĝejon ĉiu-sabate. La judoj timis pri la junaj infanoj, ĉar Jozefo Mora estis tre elokventa oratoro kaj konsiderata en la tuta lando, kiel unu el la plej efikaj predikantoj – do la judoj



kaŝis la infanojn hejme kaj mem iradis en la preĝejon kun memfido. Sed Jozefo Mora spite volis havi junajn senkulpajn korojn kaj ĉastajn senmakulajn orelojn inter siaj aŭskultantoj – do li ĉiu-sabate sendadis siajn eklezi-soldatojn en la domojn de l' juda geto, kaj ili perforte eltrenadis la gejunulojn, kondukante ilin en la preĝejon.

Kiam Pastilla venis en la preĝejon post la komercisto kaj lia filino, la preĝejo jam estis plena de viroj kaj virinoj, junaj knabinoj kaj knaboj, buboj kun "kvaranguloj" kaj knabinetoj. La katolika preĝejo aspektis kiel sinagogo – ĉirkaŭe ĉio estis pentrita per hebreaj versoj el la libro de profetoj, kaj tiuj versoj nerekte aludis al la kristana religio. Ĉe la orienta muro staris bele skulptita torŝranko kaj super la torŝranko pendis arĝenta kruco kandeloj brulis, grandaj vaksaj kandeloj en juda arĝenta kandelabro antaŭ la sankta bildo. Jozefo Mora, volvita en "talison", staris sur la ambono antaŭ la torŝranko. Tenante en unu mano toron, en la alia – krucon, li parolis al la judoj. Li parolis al la judoj en ilia lingvo: kastilie, kaj citis versojn el la biblio, indikis diversajn lokojn en la Talmudo kaj Midraŝ, uzis argumentojn el kabalistaj libroj. Li teruris per geheno kaj promesis hedenon, imagigante per vivaj koloroj la suferojn kaj turmentojn en la geheno kaj pentrante la hedenon. Li konsciigis al la judoj ilian malaltan malbonan situacion, kiel ili estas hontigataj kaj kiel ilia kredo estas mokata.

– Kaj kie li estas, via dio? – Li demandis. – Kie estas via mesio? Kial li silentas? Kial li ne donas al vi signon? Per kio vi estas pli malbonaj ol la nejudoj? Kial vi igis vin celo de homa mokado kaj malŝatado?

Kaj li etendis al ili la toron kaj la krucon, petante:

– Venu, venu sub ilian ŝirmon!

Lia voĉo estis profunda, metalpeza kaj vekis teruron kaj timon ĉe liaj aŭskultantoj. kaj liaj okuloj ardis, lia vizaĝo estis pala kaj malĝoja.

Apud li sidis la papa notario kun granda plumo kaj longa pergameno. Ĉiu judo, kiu aliris la ambonon kaj klinis sian kapon sub la pluvon de la sankta akvo, tuj ricevis de la notario ateston, kiu donas al li civitanajn rajtojn en Romo kaj igas lin la sola heredanto de ĉiuj havaĵoj de lia patro, kaj redonas al li la domojn, kiujn la papo konfiskis de judoj, troviĝintajn ekster la limoj de l' geto.

Sur la unua benko, kontraŭ la ambono, sidis la dek "batlonoj". Inter ili troviĝis Ĥaim Adoni kaj Mordŝaj Alpi, la "idiotoj" de l' geto. Dum edziĝaj kaj aliaj festoj ili ludadis la mortodancon. Ilin oni vokadis al la "toPePa". Ili havis ankaŭ la devon reprezenti la judan komunumon de Romo en la katolika preĝejo. Ĥaim Adoni, kiu estis ankoraŭ junulo, ŝajnis, ke lia vango ŝvelis pro dento-doloro, kaj ĉirkaŭligis sian vizaĝon per peco da lanaĵo, kiu sufiĉus por kudri tutan veston. Memkompreneble restis malmulte da loko, por ke liaj oreloj estu videblaj, kaj ne nur la voĉo de l' pastro – kiom ajn metalsonanta ĝi estis – ne penetris tra tiu lanaĵo, sed ankaŭ kanono-pafo ne atingus. La alia bandaĝis sian kapon – pro kapdoloro – per citronoj kaj blankaj vitukoj. Liaj oreloj ankaŭ havis malmulte da eblo aŭskulti la pastran paroladon. La pastro tiom iritiĝis, ke li malsuprenkuris de la ambono kun la kruco en la mano al la benko, proksimigis la krucon al la vizaĝoj de l' "idiotoj" kaj per la pugno devigis ilin rigardi la krucon. Li perforte fortiris la tukojn de-sur la vangoj, la vitukojn de-sur la kapo kaj devigis ilin kisi la krucon. Sed la idiotoj tiel ekkriegis pro siaj "dento-doloro kaj kapdoloro", ke fine oni devis ilin elĉeti el la preĝejo.

Jozefo mora turnis sin al la junaj infanoj. Li alvokis ilin kun sia metala voĉo kaj terurigis ilin.

– Kompatu, kompatu viajn junajn infanojn, kiujn vi edukas en honto kaj moko, malŝatatajn de ĉiuj, persekutatajn de ĉiuj! Havigu al ili Tirmon sub la kruco! petis la eksjudo.

Sed la junaj infanoj premis sin al siaj gepatroj, kaj murmurado portis sin de orelo al orelo, de patro al filo, de patrino al filino, unu vorto, unu flustro: "ŝma Israel!" Kaj tiu vorto posedis kvazaŭ sorĉpovon. Koroj ekstremis. Aŭdiĝis voĉo de prageracioj,

flagregantaj fajroj ekstaris antaŭ la okuloj: brulantaj homkorpoj, grandaj timaj okuloj, tremantaj lastaj vortoj "ŝma Israel!"

Kaj ili staris, junaj kaj maljunaj, infanoj kaj aĝuloj, teren klinante la kapojn, kaj murmuris kun nehoma voĉo:

– ŝma Israel!

Mutigita kaj terurita de tiu voĉo estis Jozefo Mora. Lia koro ekstremis, kaj lia sango ekadis sian propran voĉon, kaj li kunmurmuris:

– Tma Israel!

En la angulo de l' preĝejo staris Pastilla. Li teruriĝis pro la fremdo kaj grandeco, kiun li vidis. Li admiris la infanojn, obstine starantajn kun teren klinitaj kapoj kaj senmovaj manoj. Nenia movo, neniua rigardo al la etendita kruco, kiun la pastro tenis en la mano kaj kiu portas en si savon por ili por tiu kaj la postmorta mondoj. Li ne komprenis, kial ili ne volas alpreni la kredon, kiu faras finon al ĉiuj iliaj suferoj kaj estas la sola kaj vera kredo. Kial? Kial?

Li ekrigardis la komerciston el Kastilio kaj lian filinon. Lia koro tremis. Al li ŝajnis, ke ŝi etendos la manon al la kruco. Sed ne! Ankaŭ ŝi klinas teren la kapon kiel la aliaj, kaj staras obstina, murmurante ion tra la lipoj. Kaj ŝi estas ja tiom kristaneca, tiel dieca, nobla kaj pia. Ĉu ŝi ne aspektas, kiel la Sankta Madono? Ĉu ŝi ne aspektas, kiel tiu soleca sankta virgulino, al kiu dio alvenas por kuniĝi kun ŝi?

Nur nun li rimarkis ŝian kapon, kiel ŝi klinis sin teren, kaj la doloron, la senfinan, nehoman doloron, kuŝantan ĉirkaŭ ŝia infana buŝo. La doloro de l' mondo malsupren-lumas de ŝia vizaĝo. En ŝiaj okuloj kuŝas malĝojo. Sur ŝian altan klaran frunton ja disverŝiĝis la pieco mem. Li ekhavis la senton genufleksi antaŭ ŝi, levi al ŝi la manojn kaj preĝi al ŝi: "Sankta Maria, Senkulpa Ĉasteco, Vi – klareco de animoj, Vi – kiu portas la dolorojn de l' mondo, kompatu! Kompatu!"

Ekde la unua rigardo, kiam li ŝin ekvidis, li pensis pentri laŭ ŝi la Sanktan Maria-n, tiom simila ŝi estis al Dipatrino. Tiu Virgulino, al kiu Dio rivelis sin, certe havis tiajn malĝojajn okulojn kaj tiun nehoman doloron ĉirkaŭ la buŝo. Sur ŝian vizaĝon certe disverŝiĝis tiu krio, la silenta krio de niaj suferoj kaj la senfina kompatato.

Antaŭ tiu vizaĝo homoj genufleksos. Al tiu vizaĝo homoj levos siajn manojn kaj preĝos. Tiuj okuloj verŝos en la homajn korojn eldoloriĝintan noblecon kaj koran doloron, kaj silentan puran amon al ĉio, al ĉio, senfinan pardonon kaj profundan kompatemon tiel, kiel ŝi verŝis ĝin en lian koron...

Li estis veneciano ĝisoste. Li malamamis Romon kun ĝia triumfa, sata, regema vizaĝo. Li malamamis ĝian arton, kaj plej multe li malamamis la junan dion Rafael-on, kiu superregis la kristanan mondon per la beleco de siaj virinkorpoj, per la sateco de nuda, malriĉa patrinamo. Ho, Venecio, urbo flugilumita per velŝipoj de ĉiuj riveroj kaj maroj! Ho, Venecio, kiu aspektas kiel vizio de Dio, enkorpiĝinta en la blankan marmoron! Ho, Venecio, kies preĝejoj kaj palacoj ŝajnas havi flugilojn kaj ŝvebi en aero!

Sed plej multe li apoteozis la veneciajn pentristojn. Liaj majstroj estis Tintoreto, Ĝorĝoni kaj Belini. Kaj ĉefe St. Anĝeliko, kies Madonojn li vidis en Florenco. Tiu, kiu malsuprenvenigas ĉielajn figurojn kaj vestas ilin per infana senhelpeco.

Sed Romo estis superregata de la juna dio Rafaelo, kiu trakuris la teron, kiel fulmo. La tuta kristana mondo genufleksis kaj preĝis al liaj Madonoj, kiujn li pentris laŭ sia amatino, filino de bakisto. Li sklavigis kaj alforĝis al sia peniko kaj paletro ĉiujn artistojn, kiuj sekvis post li. Ĉiu Madono devis esti simila al la amatino de Rafaelo, la filino de l' roma bakisto. Se ne, la bildo ne havis ŝancon esti akceptita en preĝejon, kaj ĝia majstro mortis de malsato.

Sed Pastilla, kiel ĉiuj aliaj junaj artistoj, tiam jam portis en si la proteston kontraŭ la estreco de Rafaelo. Ne! – Li pensis – La virino, kiun Dio elektis, por ke ŝi nasku la doloron de l' mondo, posedis ne nur perfektan homan belecon, sed ankaŭ ion alian, kio,

dum ni rigardas ĝin, forigas de ni la ĉi-mondan amon kaj kondukas nin en pli altan, nehoman, nekomprenblan senliman amon...

Kaj tion esprimis la vizaĝo de l' juda virgulino, la filino de la kastilia komercisto. En ŝia vizaĝo li vidis tiun nekomprenblan belecon, kiu malkaŝas antaŭ ni la misterojn de alia mondo, kaj kiun belecon li serĉis. Al tiu vizaĝo homoj preĝos, preĝos kun tute aliaj intencoj, kun ĉastaj koroj, ne kun malgrandanimaj deziroj, ne pri iom da homa povra feliĉo, kiel oni preĝas al la Madonoj de Rafaelo, sed alie, tute alie. Senigitaj de ĉia persona deziro, de ĉia eta feliĉo, homoj preĝos pri pli alta feliĉo, pri pli alta redempto. Sed kiamaniere? Kiamaniere li – bona kristano – prenos filinon de nekredanto kaj faros ŝin simila al Dipatrino? Kiamaniere bonaj kristanoj genufleksos antaŭ vizaĝo, pentrita laŭ filino de nekredanto?

Sed tuj viviĝis en li la legendo de Kristo, kaj li demandis sin: ĉu Dio mem ne elektis por Si filinon el tiu gento? Ĉu Ti mem, la Eterna Ĉasteco, la Dipatrino, ne apartenis al tiu nacio? Tio estas ja la nekomprenbla, alta kaj mistika, kio kuŝas en tiu popolo, kiun kaj nur tiun elektis Dio, por ke el ĝi venu la redempto de l' mondo, kaj nur inter ĝiaj filinoj li trovis tiun, kiu portas la belecon, tiel longe de li serĉatan.

Li atendis la patron kaj filinon antaŭ la preĝeja pordo, kaj kiam la komercisto el Kastilio eliris kun sia filino, la pentristo genufleksis antaŭ ŝi:

– Ho, Madono, portanta vizaĝon, kiu plantas piecon kaj noblecon en homajn korojn! Vi ne rajtas kaŝi vian vizaĝon antaŭ vi mem. Dio donis ĝin al vi, por ke vi igu homojn pli belaj kaj pli noblaj. Mi volas pentri laŭ vi bildon de l' Sankta Dipatrino por la monabejo "La Sankta Koro". Homoj vidos vian vizaĝon, genufleksos antaŭ ĝi kaj preĝos al ĝi kun ĉasta koro. Ho, Madono, lasu min krei la verkon de Dio por la gloro kaj majesto de Lia nomo.

La junulino silentis kaj teren klinis la kapon, kiel ŝi faris tion en la preĝejo dum la prediko de l' pastro. Pro timo kaj respekto

ŝi elaŭskultis lin kaj poste per etaj paŝoj ŝi ekiris post sian patron – Kun teren klinita kapo ŝi ekiris sian vojon.

La pentristo restis unupiede genufleksanta sur sia loko.

### III.

## La "Pejrem".

En la jaro 1556 la inkvizicio en Ankona bruligis, laŭ la ordono de la reprezentanto de Jesuo Kristo, laŭ la ordono de l' papo, dudek ses maranojn. La aliajn, kiuj konsentis observi la kristanisman, oni katenis kaj ekzilis sur la solecan insulon Malta. La fajro de la inkvizicio en Ankona deprimis la judojn en la tuta mondo, precipe la judojn de Italujo.

Dum multaj jaroj la maranoj de Portugalujo kaj Hispanujo forkuradis el siaj sangaj kaj fajraj hejmoj en la liberemajn ŝtatojn de Italujo, kie tiutempe regis spirito de klereco, instruiteco kaj humaneco. La papoj Klemenso IV-a, Paŭlo III-a kaj Julio III-a permesis al la maranoj, forkurintaj de la sanga inkvizicio, publike reveni al judaismo, realpreni siajn judajn nomojn kaj vivi sian judan vivon. En la libera respubliko Venecio oni akceptis ilin kun malfermitaj brakoj. Tie ili starigis komercajn interrilatojn kun siaj fratoj, troviĝantaj en la sultanaj landoj, kaj kunhelpis la disvolviĝadon kaj riĉiĝadon de la respubliko. Venecion enviis la duklandoj Ferara kaj Arabena, kiuj, dezirante allogi al siaj ŝtatoj la veneciajn maranojn, per kies helpo ili povus disvolvi sian havenurbon kaj la komercon kun oriento, certigis al la maranoj pli multe da rajtoj kaj permesis al ili konstruadi sinagogojn, judajn presejojn (*Tio estis tiutempe la plej granda pruvo de religia toleremo*) kaj eduki la infanojn laŭ la spirito de l' judaismo.

En la kortegoj de Ferara, la eta paradizo sur la tero, kies dukoj arigis ĉirkaŭ si poetojn kaj pentristojn, oni pli multe diskutadis pri Virgilo kaj Dante ol pri regnaj aferoj, kaj tie la maranoj ludis gravan

rolon. Ili estis ministroj de komerco kaj financoj kaj okupis la plej gravajn postenojn en la socia kaj regna vivo. En la jaro 1553, kiam Paŭlo III-a, laŭ denunco de l' eksjudiĝinta pastro Jozefo Mora, publike bruligis sur strato de Romo ĉiujn judajn librojn, escepte la Zoharo-n, judoj el Romo kaj aliaj italaj urboj sekrete transsendis siajn librojn al Ferrara kaj Arabena por kaŝi ilin ĉe la maranoj, por ke la paroloj de juda libro ne pereu sur la itala tero.

Dum la regado de Paŭlo IV-a ĉio ĉi finiĝis. Laŭ sekreta ordono, oni kaptis la maranojn en la havenurbo Ankona kaj ĵetis ilin en la torturkelojn de la inkvizicio. Multaj el ili estis civitanoj de Turkujo, alvenintaj por mallonga tempo komerci kun Ankona. Parto lastminute rifuĝis en aliajn malgrandajn duklandojn de Italujo, kie la papa potenco ne efikis. Sed la plimulton oni torturis ĝis morto en la keloj de l' inkvizicio; multajn oni ekzilis sur insulojn, kaj dudek ses maranojn oni publike bruligis.

Tio estis preskaŭ la unua fajro, kiun la inkvizicio flamigis sur la itala tero, kaj ĝi vekis angoregon tiel ĉe judoj, kiel ĉe maranoj.

En la domo de reb Josef Pinsi aŭ la komercisto (*el Kastilio*), kiel oni nomis lin en la geto, kunvenadis la maranoj por sekrete preĝi kaj interkonsiliĝi. Ankaŭ la judoj partoprenis tiujn kunvenojn, ĉar kvankam oni ankoraŭ ne malpermesis al ili la observadon de judaismo, tamen oni fermis ĉiujn sinagogojn, lasante nur unu nefermita. Do, la judoj kaj maranoj ekaplikis la malnovan rimedon, kiel ili kutime faris en Hispanujo kaj Portugalujo, kaj kunvenadis en kaŝitaj keloj por celebri diservojn kaj aranĝi konsultadojn.

Josef Pinsi estis la roma reprezentanto de Donna Gracia Mendesa, kiu tiutempe estis jam rifuĝinta el Ferrara kun sia bofilo Josef Nasi kaj kvincent maranoj aŭ judoj en Konstantinopl-on al la sultano, kie ŝi savis sin kaj sian havaĵon el la ungoj de l' inkvizicio. Granda parto de ŝia havaĵo estis arestita de la franca reĝo, de la papo kaj aliaj etaj ŝtatoj, al kiuj ŝi pruntedonis monon. Sed ŝi ankoraŭ daŭrigis sekretan negocadon kun la havenurboj de Italujo, kien ŝi sendadis siajn ŝipojn kun varoj el Konstantinoplo al siaj agentoj, kiujn ŝi ĉie havis. Tiaj agentoj estis samtempe

la ambasadoroj de l' maranoj. Dank' al ili ŝi ricevadis de ĉie sciigojn pri la maranoj, kaj la agentoj helpis la maranojn forkuri el lokoj, kie oni persekutadis iliin, en la landojn de l' sultano.

– En la profunda trabumita kelo, kie ni unuafoje renkontis la pentriston, ariĝis nun la judoj de Romo. Estis vespero post varmega somertago. Romo dormis ĉe la bordoj de Tibro post la peza seka tago. Malhelaj estis la nigraj kurbaj stratetoj de l' geto, ĝiaj altaj mutaj domoj staris kiel gigantaj ombroj. Tra la stratetoj de l' geto sur la muroj de l' dometoj glitis solecaj ombroj, kiuj malaperis tra sekreta enirejo en la kelon de Josef Pinsi.

La kelo estis nun lumigita: la sola luma ĉelo en tuta Romo. En grandaj arĝentaj kandelabroj brulis oleo-meĉoj. Apud la mallumaj muroj grupiĝadis ombroj de junaj kaj maljunaj homoj, parolantaj sekretojn. Iliaj nigraj vestoj kaj kapkovraĵoj ĵetis terurantajn ombrojn sur la murojn de l' kelo. Sed tuj ĉio silentiĝis. La judoj ariĝis en unu grupon kaj eksilentis.

Pordo malfermiĝis, kaj la kelon eniris la maljuna blinda judo. Kvankam liaj okuloj estis malvivaj, tamen ili brilis el la larĝaj okulkavoj kun tia vicleco, kvazai ili vidus ne la vanecon de tiu ĉi mondo, sed lumon de vero kaj mondon de justeco. Lin kondukis la knabino, la filino de la kastilia komercisto. Tia nomo estis Jefta. Ti tamen ne estis filino de l' komercisto. Ti estis la nepino de la blinda maljunulo. Lia nomo estis Jakov Medigo, laŭ la familia nomo de la Abarbaneloj. Li konsideris sin membro de la familio Abarbanel, kaj li estis rekonata de la hispanaj judoj En Romo kiel ilia gvidanto. Lia familio pereis pro multa vagado tra la mondo. Multaj el ili estis kaptitaj de korsaroj kaj venditaj kiel sklavoj. Multaj infanoj estis perforte kristanigataj, kaj el la tuta familio restis nur la maljunulo kun sia nepino, kiu vivis ĉe Josef Pinsi, la agento de la riĉa Mendesa. Kun la maljunulo envenis du senditoj, venintaj al la judoj en Romo: unu, kiu rifuĝis el Ankona, kaj la alia sendita el Konstantinoplo. Li nome estis sendita de la sultano Suliman al la papo koncerne la regatojn de Turkujo; sed li estis ankaŭ la sendita de la riĉulino Donna Mendesa kun sekreta komisiono al la judoj en Romo.



En la kelo ekregis silento. Estis aŭdebla la kraketado de l' meĉoj en la oletubetoj. Kvazaŭ glaciigintaj restis la ombroj sur la muroj, senmovaj kiel la judoj en la kelo. La maljuna reb Jakov sidiĝis en profundan seĝon, kaj konforme al la kutimo de la hispanaj judoj kaj maranoj, ĉiuj unu post la alia aliris al sia gvidanto kaj kisis lian manon. La maljunulo metis sian manon sur iliajn kapojn kaj benis ilin, murmurante ion. Poste Josef Pinsi, la mastro de l' kelo, en iu sekreta loko frapis la muron, elstarantan en la straton. Ekstere, ĉirkaŭ la domo, ĉe la stratanguloj staris gardantoj, junaj maranoj, kiuj atentis, ĉu ne vidiĝas inspektistoj de la inkvizicio. Ili respondis al li per interkonsentitaj signoj, ke ĉio estas trankvila. Li elŝovis kaŝitan kurtenon, kaj vidiĝis torŝranko. La kunvenintoj komencis preĝi la vesperan preĝon.

Preĝis por ili kantoro, laŭ kiu ĉiuj mallaŭte ripetadis vorton post porto. Post "Tmona Esra" la maljunulo etendis la manon, kiel signon, ke la kunvenintoj eksilentu. En la kelo ekregis silento, kaj la sendito el Ankona stariĝis, aliris al la torŝranko kaj komencis rakonti en kastilia lingvo pri tio, kio okazis en Ankona. Li rakontis, kiel oni subite iun sabatan vesperon atakis ĉiujn sinagogojn en la urbo kaj trenis ĉiujn maranojn, virinojn kaj infanojn, en la kelojn de la inkvizicio, kie oni turmentis ilin per ĉiuspecaj torturoj, oni ligis ilin al la radoj kaj rompmaŝinoj. Multajn oni torturis ĝis morto. Multaj ne povis elteni la turmentojn kaj akceptis la kristanan kredon. Oni katenis kaj ekzilis ilin sur la insulon Malta. Sed dudek ses maranoj kun la maljuna virino Donna Majora obstine persistis la kredon de siaj prapatroj. Kun eklezia kantado kaj ekleziaj flagoj oni kondukis ilin al la brulŝtupoj, starigitaj por ili sur la urba placo. La maljuna virino Djnna Majora kuraĝigis kaj fortigis la maranojn en ilia kredo per "Tma Israel", kaj ili ĉiuj bruliĝis.

Sankta silento regis en la kelo. Ĉiu lasis la kapon sur la bruston kaj pensis esti preta, kiam venos lia tempo.

Subite la maljuna reb Jakov leviĝis de sia seĝo, etendis sian manon, kvazaŭ li vidus iun, kaj ekkriis kun tremanta voĉo:

– Sanktaj martiroj por la nomo de Dio! Sanktaj martiroj por la Nomo de Dio! Sanktaj martiroj!

Kaj la kunvenintoj respondis:

– Sanktaj martiroj!

kaj el dekoj da buŝoj subite elŝiriĝis la vortoj:

– Isgadal veiskadaŝ!

Kaj ĉiuj respondis al ili:

– Isgadal veiskadaŝ!

Kiam la kunvenintoj trankviliĝis, ekstaris la sendito el Konstantinoplo kaj ekparolis:

– Pri la kaptitaj maranoj, kiujn oni ekzilis sur Malta-n, mi povas sciigi vin, ke ili ĉiuj troviĝas sub la protekto de la granda justa sultano Suliman alta estu lia gloro! – kaj ili publike servas la unikan vivantan Dion, kaj neniu malhelpas ilin.

– Kiamaniere? Kiamaniere? – Demandis voĉoj.

– La nobla sinjorino Donna Graia Mendesa, kiu estas juvelo de nia popolo, kaj ŝia bofilo, la nobla duko Don Josef Nasi, venis al la sultano kaj ĵetis sin al liaj piedoj, petante indulgon por siaj fratoj. La sultano vidis iliajn larmojn kaj aŭskultis ilian peton. Do, ili sendis siajn ŝipojn al la insulo Malta kaj venigis siajn maranojn en la ĉefurbon de lia granda regno.

– Eterne laŭdata estu la nomo de Dio! Levis la maljunulo siajn manojn al la ĉielo.

La kunvenintoj respondis al li:

– Amen!

– Kaj mi estas sendita de la nobla sinjorino Donna Grazia Mendesa kaj duko Josef Nasi por averti vin, ke neniu ankru ŝipon en Ankona. Neniu vendu tie varojn! Inter la duko de Arbana – kiu estas malamiko de la papo kaj amiko de la maranoj – kaj la judoj el la sultanaj landoj estas farita eterna interligo. Ekde hodiaŭ ĉiuj ŝipoj, irantaj el oriento, evitu la havenojn de Ankona, sed albordiĝu en Arbana. Pekaro, la haveno de Arbana, fariĝu la celpunkto de l' juda komerco. Tie ombro la veloj de l' ŝipoj el oriento, kaj en ilia ombro la maranoj ripozu en paco.

Post li stariĝis la maljuna reb jakov kaj etendis la manojn al la kunvenintoj:

– Idoj de Izrael, turmentataj kaj nobligitaj! Aŭskultu Dion, vian Dion! En la nomo de l' martiroj, en nomo de la verŝita juda sango kaj bruligitaj judaj ostoj mi deklaras fajran "Pejrem" super Ankona, la sanga lando de niaj malamikoj. Malbenita estu tiu, kiu ankros ŝipon en la haveno de l' papo. Malbenita estu tiu, kiu etendos panon al sia malamiko, helpos lian komercon, pliriĝigos lian havaĵon. Dezertigita kaj ekstermita fariĝu Ankona – Berem! Perem!

Kaj murmurado fluis inter la kunvenintoj:

– Perem! Perem!

– Ne dormas la gardisto de Izraelo! – Levis la maljunulo siajn manojn. – Dio kompatas la restintojn inter Izraelo, kaj Li sendis al ni savanton kaj ŝirmanton en la persono de sultano Suliman. Dio fortigu lin super liajn malamikojn! Ho, ne plu verŝiĝos juda sango en Italujo. Ne plu flagros judaj ostoj sur la brulŝtipoj. Dio ne deturnas sian favoron de ni tage, nek nokte. En ĉiu generacio Li sendas al ni savanton. Ni laŭd Dion pro la favoro, kiun Li faras al ni.

Neniu sciis, pri kio la maljuna reb Jakov pensis. Sed ili komprenis, ke io grava okazis. Kaj ili levis kun li la manojn al la ĉielo kaj laŭdis Dion.

Sekvintan matenon konsterniĝis la judoj en Romo kaj ĉiuj Romanoj pro la novaĵo, kiu disvastiĝis tra la urbo: la sultano sendis al la papo delegiton, kiu en nomo de lia sultana moŝto deklaris la maranojn civitanoj de Turkujo. pro ĉiu marano, kiun oni torturos en la keloj de la Inkvizicio, la sultano igos torturi kristanon. Pro ĉiu marano, kiu estos bruligita sur aŭtodafeo en Italujo, la sultano mortbruligos kristanon en sia regno.

Kaj la keloj de la inkvizicio malfermiĝis. Kaj ĉiuj maranoj, turkaj regnantoj, estis liberigitaj je la ĉagreno de l' papo.

## IV.

### En fajro kaj akvo.

Sur la trono de Kristo en Romo sidis la maljuna, okdekjara tirano Nion Pietro Karafa, sub la nomo Paŭlo la kvara. Estante ankoraŭ kardinalo, dum la regado de Paŭlo la tria, li bruligis la judajn librojn en Romo. Sed Paŭlo la kvara estis sidigita sur la tronon de Kristo, por ke per la veneno de sia fanatismo kaj per la forto de la inkviziciaj torturadoj li konservu la papan potencon, kiu ekŝanceliĝis sub la tiel forta influo de l' herezuloj: Luther en Germanujo kaj Kalvin en Ĝenevo. Paŭlo IV, estante tro senforta por venki la protestantan movadon, kiu komencis disvastiĝi en Germanujo, ekcelis la sagojn de sia kolero kontraŭ la nekredantoj en sia propra regno: kontraŭ la judojn, maŭrojn kaj maranojn.

En sia monaba ĉelo, aranĝita kiel ĉelo de jezuita fariseo, super la supraj ĉeloj de l' Vatikano, sidis sur sia malmola benko la altkreska, peze melankolia papo. Lia vizaĝo estis kvazaŭ uragananta maro, plena de tempestaj sulkoj. La longaj haroj de la densa blanka hirta barbo moviĝis rigide, kvazaŭ dratoj. Sed el inter la ondoj de Sulkoj elrigardis desub la densaj brovoj du bluaj infanaj okuloj, estingitaj, senmovaj kiel estingitaj fajroŝtonoj.

– De kiam la Seĝo de Petro estas regata de la sultano de nekredantoj? La papo demandis la mallaŭtan, trankvilan kardinalon Aleksandro-n Fornese, kiu gvidis la eksteran politikon de Vatikano.

– La judo Josef Nasi akiris grandan influon en la kortego de l' sultano. Li estas sultana konsilanto, kaj ni devas gajni lian amikecon. La fajro en Ankona kostis al ni la komercon kun Oriento, – Trankvile respondis la kardinalo.

– Ĉu la sultano diktos al la anstataŭanto de Kristo, kiel li agu kun herezuloj kaj malamikoj de Kristo? – Demandis la papo.

– Romo estas ne nur la ĉefa sidejo de la eklezio, sed ankaŭ la rezidejo de la roma regno. Aliaj regnoj de Italujo riĉiĝis per la komerco kun Oriento dank' al la judoj. Venecio, Ferrara, Arbana gajnis la amikecon de la judaj konsilantoj de l' sultano. Eĉ Hispanujo, la ĉefmalamiko de la judoj, serĉas la amikecon de la juda ministro Josef Nasi. Ĝi ordonis al sia ambasadoro en Konstantinopolo sekrete intertrakti kun Josef Nasi – Tiel oni komunikas al ni el Porto.

Aŭdinte la vorton "Hispanujo", la papo konfuziĝis. Lia vizaĝo ruĝiĝis, kaj liaj okuloj perdis sian kvietecon, ĉar kiom ajn li malamis la judojn kaj maranojn, ankoraŭ pli li malamegis la hispanojn, kiuj militis kontraŭ li.

– Mi pruvos al la sultano de ĉiuj islamanoj, al la judoj, hispanoj kaj ĉiuj aliaj herezuloj, ke en Romo sidas ankoraŭ la anstataŭanto de Kristo, Diris la papo stariĝante. – Iru kaj alvoku mian kuzon, la gubernatoron de Romo.

Vespere, kiam la kardinalo Fornese ĉeestis la festenon de la fama hispana kurtizano Imperia, kiun ŝi aranĝis okaze de tio, ke ŝia afrika papago ellernis deklami verson el poeziaĵo de Virgilo, en la vilaon, kiu staris sur la bordo de Tibro, dum danco, prezentata de junaj nudaj knabinoj, venis viro kun maskita vizaĝo kaj postulis vidi kardinalon Fornese. Kiam la kardinalo demandis, kion li deziras, li flustris en la orelon de l' kardinalo:

– La papo donis sekretan ordonon al la gubernatoron de Romo ekbruligi la judan geton en ĉiuj kvar anguloj kaj zorgi, ke neniu judo saviĝu el la fajro.

La kardinalo paliĝis kaj demandis:

– Kiel vi eksciis tion?

– Mi estas el la kortego de la venecia kardinalo, – Respondis la viro.

La kardinalo plu ne demandis. Li sciis, ke la venecia kardinalo estas la plej bone informita viro en Romo. La venecia kardinalo estis ne nur reprezentanto de la eklezio, sed antaŭ ĉio reprezentanto de la venecia respubliko. Li sciis, ke la veneciaj spionoj, kiuj servis ĉe la kardinalo, pli rapide ekscias, kio okazas en la papa kortego, ol la kardinaloj. Kaj li sciis, ke li povas fidi lin.

– Junulo, mi ne scias, kiu vi estas, sed vi multe meritas por la Eklezio pro via misio, – Li diris. – Mi esprimas al vi mian dankon.

La junulo respondis:

– Bonfaro pro bonfaro. Mi deziras, ke vi kompanse komuniku al mi ĉiun danĝeron, minacantan al la roma geto flanke de l' Vatikano.

– Kion? Ĉu amiko de judoj?

– Ne, amiko de la eklezio.

La junulo demetis la vizaĝmaskon, kaj la kardinalo ekvidis la pentriston Pastilla.

– Pastilla, la penetristo el Venecio! – Miris la kardinalo. – Kion do vi serĉas en la geto?

– Mi perdis tie mian koron, – Respondis la pentristo.

– Kaj la okulo ĉiam gardas tie, kie la koro ripozas, – Ridetis la kardinalo.

Ne helpis la koketado de la bela safirokula Imperia al lia Eminenco, ke li restu ĝis la momento, kiam oni metos ŝian papagon en oran kaĝon, kaj li faru al la papago la honoron aŭskulti la deklamadon de verso el la poemo de Virgilo. Li komprenis, ke la vivo de dekmiloj da homoj estas pli grava ol papago. Tamen li tion ne faris dekmil homoj, nek pro la honoro de la kristana kredo, sed pro la interesoj de la eklezio.

Post duonhoro li kuŝis ĉe la piedoj de l' papo en ties dormoĉambro kaj petegis lin:

– Sankta Patro, la Eklezio estas en danĝero. El Germanujo ni ricevas sciigojn, ke la herezaj teorioj de Luther disvastiĝas tra la lando, kiel pesto. Ankaŭ Anglujo disiĝas de ni. En Francujo disvastiĝas la herezaj pensoj. Tie oni publike bruligis en la urboj la bulojn de l' papo. La Seĝo de Petro ŝanceliĝas. La reformantoj gajnas pli kaj pli da adeptoj. Nun, se oni plie aŭdos en la mondo, ke vi ordonis bruligi dekmilojn da homoj (*oni ja scios, ke la Vatikano faris tion – kaj la senditoj de judoj sidas ĉie, en ĉiuj kortegoj troviĝas judaj kuracistoj kaj financistoj*), oni utiligos tion kontraŭ la Eklezio, kaj tio donos materialon al la herezuloj kaj reformistoj daŭrigi iliajn atakojn kontraŭ la eklezio, kaj ili forŝiros de l' Krista Trono popolojn kaj landojn.

La papo kuntiris la okulojn kaj fermis ilin, kvazaŭ li ekdormetus, kaj silentis.

Ĉe la pordo, en angulo, staris la gubernatoro de Romo kun la ordono en la manoj kaj atendis la komision de la Sankta Patro.

– Kion la judoj pagis al vi pro tio? – Fine la Sankta Patro demandis la kardinalon.

La kardinalo silentis momenton. Li leviĝis de sia loko, signis krucon kaj diris:

– Dio atestu, ke mi faras tion sole por la bono de la Eklezio. Elpensu kontraŭ la judoj ĉiajn ajn suferojn kaj turmentojn, sed faru ĝin tiel, ke neniu sciu, ke tio ĉi devenas de la sankta eklezio. La judoj fariĝis potenco en la kortego de l' sultano. Reĝoj kaj dukoj serĉas ilian amikecon. Ili disvastiĝis tra la tuta mondo kaj povas multe helpi al niaj malamikoj.

– Reĝoj kaj dukoj povas serĉi la amikecon de l' judo en la sultana kortego, sed ne la papo de la katolika kredo. Kun la malamikoj de Kristo mi volas havi nenion komunan, – Energie diris la papo.

Fine ekparolis la gubernatoro de Romo:

– Sankta Patro, se vi ne povas puni ilin per fajro, punu per akvo.

– Al kio vi pensas? – Demandis la papo.

La gubernatoro rigardis la kardinalon. La papo signis al li per la mano, kaj la kardinalo eliris el la papa dormo-ĉambro, lasinte solaj la Sanktan Patron kaj la gubernatoron.

– La akvoj de l' Tibro ĉiujare elbordiĝas kaj inundas la geton, – Diris la gubernatoro. – Kaj kiam vi devigis la judojn konstrui pli alten la murojn de ilia geto, ili tion tiel ruze utiligis, ke ili fortikigis la bordojn de l' Tibro kaj starigis altajn digojn, por ke la akvo de l' Tibro ne inundu en la geton. En septembro ni ree esperas la elbordiĝon de l' Tibro. Ordonu, kaj ni sekrete forigos la digojn de l' Tibro, kaj kiam la akvo inundos, ĝi en la geton fluegos kaj dronigos ĉion, kio troviĝas en tieaj keloj, – Mallaŭte diris la gubernatoro.

– Kaj vi gardostarigu miajn fidelajn svisajn kaj germanajn soldatojn, por ke dum dudek kvar horoj post la inundo neniu homo forlasu la geton, – Ordonis la papo.

– Mi obeos, – Klinis sin la gubernatoro antaŭ lia sankta moŝto.

– Kaj nun alvoku la judason, la kardinalon.



Kiam la kardinalo eniris, la Sankta Patro ekparolis en pia tono, turnante la okulojn al la ĉielo:

– Ne pro amo al la nekredantoj ni faris tion, ne pro materia profito dum nia surtera vivo ni faris tion, sed pro la Sankta Eklezio, kiu instruas nin ami niajn malamikojn.

Kaj la Sankta Patro prenis la ordonon el la manoj de l' gubernatoro kaj ĵetis ĝin en la brulantan fornon.

Sed la kardinalo rimarkis, kiel en la bluaj okuloj de l' papo ekbrulis mistera flameto.

# **RAKONTOJ PRI AFANTI**

**Nekonata aŭtoro**

**Esperantigita de Fan Yizu**

**Ilustrita de Tian Yuan**

## **Antaŭparolo**

La rakontoj pri la heroo Nasrudin Afanti estas bone konataj de ĉiuj familioj, virinoj kaj infanoj de la dek tri naciecoj loĝantaj en la ĉina aŭtonoma regiono Xinjiang, sed precipe de la ujugura nacieco. Ĉiam, kiam oni parolas pri Afanti kaj la rakontoj pri li, ili sentas elkoran ĝojon kaj sin banas en elkora rido.

Rakontoj pri Afanti jam vaste cirkuladas kelkajn jarcentojn en Xinjiang. Ili profunde spegulas diligentecon, kuraĝon, saĝon, optimismon, humoron kaj aliajn bonajn kvalitojn de la laboranta popolo kaj akre ironies kontraŭ stulteco kaj krimoj de reakciaj feŭdaj regantoj. Afanti sentime mokis la riĉulojn, superulojn; ministrojn kaj reĝojn siatempajn. Pro tio li estas rigardata kiel saĝa kaj sagaca legenda heroo de diversnaciecaj popoloj.

Rakontoj pri Afanti vaste cirkuladas inter diversnaciecaj popoloj kaj farigis trezoro de la popola parola literaturo, post la fondiĝo de la popola respubliko, en Xinjiang kaj aliaj regionoj oni jam redaktis kaj eldonis plurajn kolektojn da rakontoj pri Afanti. Kaj iujn rakontojn oni eĉ surekranigis. En Sanhajo oni jam produktis du filmojn pri Afanti, kiujn laŭdis multaj rigardintoj.

Oni tre amas la maldikan, saĝan kaj akrevidan «avĉjon Afanti», kiu ĉiam rajdis sur azeno gaje kantante kaj ludante la tradician kordmuzikilon ĵevapo.

Nun Afanti jam fariĝis monda figuro de la popola parola literaturo. La rakontoj pri li jam delonge cirkuladis en Persio kaj arabaj regionoj, poste ankaŭ en regionoj de Mediteraneo, Balkanoj kaj Kaŭkazo. Tra la rakontoj oni povas sekvi batalojn inter saĝo kaj stulto, belo kaj malbelo, bono kaj malbono. La rakontojn oni jam tradukis en multajn lingvojn. Ili estas spritaj kaj signifoplenaj. Kaj la simpla rekta stilo devenanta de la popola buŝa lingvo igas ĉi tiun libron aparte taŭga ankaŭ kiel postkursa legaĵo.

## Serĉado por Saĝo

Foje la reĝo aŭdis, ke iu lia regnato nomata Nasrudin Afanti havas grandan saĝon kaj profundajn sciojn. Jen iun tagon li vizitis Afanti kun sia sekvantaro.

«De kie venas la sago en via kapo, Afanti?» demandis la reĝo.

«Ĝin mi trovis post peniga serĉado,» respondis Afanti.

«Ĉu tamen saĝon oni povas trovi?»

«Jes, via moŝto!»

«Diru al mi, de kie vi trovis?»

«Ho, tre facile. Prenu hojon kun vi kaj min sekvu, via moŝto.»

La reĝo tre ĝojis kaj pensis: «De kiam mi fariĝis reĝo, la popolanoj ĉiuj opinias, ke mi estas sentaŭga kaj malsaĝa. Vere, mia saĝo estas limigita. Ĉifoje, kiam mi trovos ĝin, mi plenŝtopos mian kapon per ĝi kaj krome hejmen portos du kestojn da ĝi por kaŝe konservi en la palaco, por ke mia filo uzu, kiam li plenkreskos.» Li tuj ordonis al lakeo preni hojon kaj foriris kun Afanti serĉi saĝon.

Kondukate de Afanti, ili longlonge iris, sed fine alvenis al peco da sovaĝa tero. Demetinte sian jakon, Afanti diris al la reĝo: «Bonvolu demeti vian reĝan robon kaj ekfosi per la hojo.» La reĝo devigite demetis sian robon kaj ekfosis. Post longa fosado li tamen

neniom da saĝo trovis, sed ricevis nur sangajn vezikojn sur siaj manoj. Li tiel forte koleris, ke liaj barbharoj stariĝis kiel herbo kaj liaj okuloj rondigis kiel tetasoj: «Kial mi ne trovis saĝon, Afanti?» furiozis la reĝo.

«Ne estu malpacienca, mia reĝo. Fosu, fosu daŭre! Ni plugu la terpeco ĉi-aŭtune, semu saĝon en ĝi venontan printempon kaj ni rikoltos somere,» senzorge respondis Afanti kajdenove levis la hojon.

«Ĉu ne estas greno la saĝo dirita de vi?» denove demandis la reĝo.

«Prave, prave,» respondis Afanti, «se en via palaco ne estus greno akirita per la sango kaj ŝvito de popolanoj, kiel via moŝto povus veni kun mi por serĉi saĝon?»

## **Mono kaj Justeco**

Foje la reĝo demandis al Afanti: «Afanti, se antaŭ vi estus mono kaj justeco, kiun el ili vi elektus?»

«Mi elektus monon,» respondis Afanti.

«Kiel, Afanti!» miris la reĝo. «Se estus mi, mi certe volus justecon, absolute ne monon.

La mono estas nenio valora, sed justeco estas malfacile trovebla.»

«Oni volas tion, kio al li mankas, via moŝto,» klarigis Afanti.

## **Kvarpieda Reĝo**

Afanti suferis okulinflamon, tiel ke li ne povis klare distingi objektojn. La reĝo intence ordonis lin rigardi tion kaj alion por lin moki, dirante: «Afanti, ĉu estas vere, ke unu objekto rigardata de vi

tuj fariĝas du?Pro malriĉeco vi havas nur unu azenon, sed nun ĝi fariĝis du. Do vi riĉiĝis!Ha ha ha!»

«Tute prave, via reĝo moŝto!» respondis Afanti. «Nun mi vidas, ke vi estas kvarpieda same kiel mia azeno.»

## **Ŝarĝo por Du Azenoj**

Foje la reĝo kaj ĉefkortegano iris ĉasi kun Afanti. Ĉar estis varmege, la du moŝtoj demetis vestaĵojn kaj ilin donis al Afanti, por ke li ilin portu surŝultre.

Daŭrigante la iradon, Afanti ŝvitegis sub la ŝarĝo. Tion vidinte, la reĝo ŝercis: «Ho, mia Afanti, vi estas tre kapabla. Via ŝarĝo pezas sufiĉe por unu azeno.»

Aŭdinte kion la reĝo diris, Afanti indigniĝis kaj replikis kun trankvilo: «Ne, via moŝto, sur miaj ŝultroj estas ŝarĝo por du azenoj!»

## **Li Nesubigebla**

Iu reĝo ĉiam opiniis sin saĝa kaj ŝatis subigi aliajn per malfacilaj demandoj. Foje li venigis dek du mil instruitojn por demandi ilin, kie estas la centro de la mondo. Neniu el ili povis respondi. La reĝo fariĝis ankoraŭ pli fiera kaj tuj ordonis aŭtoreklari al la publiko, ke tiu, kiu prave respondos, estos premiita kaj tiu, kiu erare respondos, punita.

Homoj venis amason post amaso por legi la aŭtoreklaron, sed foriris kapneante post la lego. Nur Afanti, leginte la aŭtoreklaron, tuj ekrajdis sur sia azeno, al la reĝa palaco.

Li eniris la palacon, kuntirante sian azenon. La reĝo mirigite demandis: «Do, vi scias, kie troviĝas la centro de la mondo?»

«Jes, via moŝto,» respondis Afanti, ĝi ĝuste situas tie, kie staras la maldekstra antaŭa piedo de mia azeno.

«Sensencaĵo, mi ne kredas!»

«Ne kredas? Bonvolu mezuri la tutan mondon.

Punu min, se estas malĝuste.»

«Tio... tio..., balbutis la reĝo, kiu post longa meditado povis nur demandi, ... do, respondu min plue, kiom da steloj estas sur la ĉielo?»

«Ĉu steloj sur la ĉielo?» Afanti enpense respondis: «Ili estas samnombraj kiel viaj vangharoj, ne pli kaj ne malpli.»

«Kion vi diras? Sensencaĵo!»

«Tio estas pura vero. Se vi ne kredas, iru al la ĉielo kaj kalkulu. Vi punu min, se estus pli aŭ malpli.»

«Do... do... diru, kiom da haroj estas sur miaj vangoj? Rapide respondu al mi!»

Afanti levis la voston de sia azeno per unu mano kaj fingromontris al la mentono de la reĝo per la alia mano, dirante: «Viaj vangharoj estas ĝuste samnombraj kiom tiuj sur la vosto de mia azeno!»

«Kia absurdaĵo, sensencaĵo!» kriis la reĝo, frapante la tablon.

Afanti trankvile aldonis: «Se via reĝa moŝto opinias min malprava, bonvolu kalkuli unue la harojn sur viaj vangoj kaj poste tiujn sur la vosto de mia azeno.

Post via kalkulado vi scios, ke mi pravas.» Aŭdinte tion, la reĝo povis nenion plu eldiri.

## **Sorĉa Povo kontraŭ Pluvo**

La reĝo iris ĉasi kun Afanti. Li kaj liaj korteganoj rajdis sur kurĉevaloj, sed ordonis al Afanti rajdi sur malrapidema ĉevalo. Rajdante, ili atingis Gobi-dezeton je la tagmezo, kiam subite ventegis, densaj nuboj kovris la ĉielon, fulmis, tondris kaj pluvegis. La reĝo kaj liaj korteganoj galopis al la ĉefurbo kun siaj vestaĵoj jam tramalsekigitaj de la pli kaj pli densiĝant pluvado. Sed la malrapidema ĉevalo, sur kiu rajdis Afanti, haltis pro timo de la fulmotondro. Afanti saltis de ĝi, deprenis sian veston kaj zorge metig ĝin sub la selon. Fine forpasis la fulmotondro kaj pluvego, kaj denove aperies la suno. Trankvile surmetinte sian veston, Afanti malrapide rajdis al la ĉefurbo. Kiam li eniris la palacon, la reĝo tre miris kaj demandis lin: «Afanti, kiamaniere vi povis reveni kun seka vesto eĉ sen unu guto da pluvo? Ĉu vi havas ian sorĉan povon kontraŭ pluvo?»

Afanti respondis kun rideto: «Ne, via reĝa moŝto, kiam vi fuĝis de la pluvo, la pluvo ankaŭ postsekvis vin. Mia maldiligenta ĉevalo malrapide kondukis min al granda pitoreska ĝardeno, vere la plej bela en la mondo – forte aroma multkolora florado, ombro de verdaj arboj, fruktoriĉaj arbustoj, sur kies branĉoj kantis najtingaloj, fluis kanaletoj kaj naĝis fiŝidoj en la klaraj ondoj. Mi iom ĝuis tie kaj poste revenis.»

Aŭdinte tion, la reĝo gapis, miregis kaj tre deziris viziti la ĝardenon.

Ankaŭ la sekvan tagon la reĝo iris ĉasi kun Afanti, sed ĉi-foje li ordonis al Afanti rajdi sur la reĝa kurĉevalo, dum li mem rajdis sur la malrapidema ĉevalo. Ili rajdis kaj rajdis kaj fine atingis Gobion, sed, kiam ili apenaŭ ekĉasis, subite ekventegis, ruliĝis nigraj nuboj kaj baldaŭ pluvegis. Afanti batetis la kokson de la kurĉevalo per sia vipo, post kio ĝi tuj ekgalopis kaj atingis la ĉefurbon en nura momento apenaŭ kun pluva guto sur si. Sed la malrapidema ĉevalo ree haltis pro timo de la fulmotondro. La reĝo batadis ĝin per piedo kaj vipo, sed ĝi staradis obstine sen movo. Senĉese verŝiĝis la pluvego, sed la reĝo povis nenion fari krom stari sub la pluvo. Post

kiam la pluvo ĉesis, la ĉevalaĉo malrapide revenis al la ĉefurbo kun la reĝo sur sia dorso.

Vidinte Afanti, la reĝo eksplodis pro kolerogo: «He vi! Afanti! Kio vi estas ke vi aŭdacis trompi eĉ min, vian reĝon?»

«Ne, via reĝa moŝto,» respondis Afanti kun rideto, «se vi metus viajn vestaĵojn sub la selon kiel mi, ankaŭ vi povus reveni seka sen eĉ unu pluvoguto sur la vestoj.»

## Plantado de Oro

Pruntepreninte kelkajn uncojn da oro, Afanti rajdis al la kamparo sur sia azeno. Poste, sidante sur apudrivera sablejo, li atenteme kribradis la oron, ĝuste kiam la reĝo preterpasis pro ĉasado. La reĝo trovis lian agon iom stranga kaj demandis: «He, Afanti, kion vi faras?»

«Ha, estas vi, via rega moŝto, mi plantas oron.»

Aŭdinte tion, la reĝo ankoraŭ pli miris kaj plu demandis: «Rapide diru al mi, saĝa Afanti, kial vi plantas oron?»

«Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas, via moŝto?» respondis Afanti. «Nun ni semas ĝin, post certa periodo ni rikoltos kaj tiam portos la unuajn dek uncojn da oro al la hejmo.»

La okuloj de la reĝo ekbrills. «Kial ne manĝi tiel malmultekostan ŝafvoston?» li pensis. Tuj li ridetante konsilis al Afanti: «Mia bona Afanti! Vi ne havos grandan riĉiĝon, se vi semos nur tiel malmulte da oro. Vi devus semi pli multe. Se semo mankas, iru al mia palaco preni! Vi rajtas preni, kiom vi volas. Alkalkulu ĝin al ni ambaŭ. Donu al mi okdek procentojn, kiam la oro estos rikoltita.»

«Bonege, via reĝa moŝto!»

La postan tagon Afanti prenis du ĝinojn (*ĝino* = 1/2 kilogramo, *ĉina mezurunuo*) da oro el la palaca trezorejo kaj redonis la prun-



titan. Post semajno li denove pruntis ĉirkaŭ dek ĝinojn da oro kaj ĝin donis al la reĝo. Vidinte la brilan oron, la reĝo ekridis, ne povante fermi sian buŝon. Li tuj ordonis iujn subulojn doni al Afanti kelkajn kestojn da oro konservitajn en la trezorejo.

Reveninte hejmen kaj redoninte la pruntitan oron, Afanti disportis la oron al la malriĉuloj.

Pasis jam unu semajno, antaŭ ol Afanti denove iris viziti la reĝon, kvankam ĉi-foje kun malplenaj manoj kaj malĝoja mieno. Vidinte, ke Afanti alvenis, la reĝo ridis kun duonfermitaj okuloj kaj malpacience demandis: «Vi venis! Ĉu ankaŭ ŝargbestoj kaj ĉaroj kun oro venis?»

«Ve al mi!» subite ekploris Afanti. «Ĉu vi ne rimarkis, ke tute ne pluvis lastatempe. Nia oro tute mortis pro la sekeco! Ni perdis eĉ la semon, se ne paroli pri la rikolto.»

La reĝo tuj eksplodis pro kolero kaj depaŝis de la trono, laŭte kriaĉante: «Sensencaĵo! Mi ne kredas vian 17 babilaĉon! Kiun vi intencas trompi! Kiel oro povas morti pro sekeco?»

«Ho, strange!» miris Afanti. «Se vi ne kredas, ke oro povas morti pro sekeco, kial vi kredas, ke ĝi povas kreski post semado?» Aŭdinte tion, la reĝo nenion povis plu eldiri, kvazaŭ io ŝtopus lian buŝon.

## **Afanti kaj la Reĝo**

Iun frostan vintran tagon anoncisto el la reĝa palaco kriaĉis inter gongado kaj tamburado en la ĉefurbo: «Aŭskultu vi ĉiuj! Jen la edikto de la reĝa moŝto: Al tiu, kiu povos nude tranokti sidante sur la urburo, la reĝo donos sian filinon kaj duonon de sia lando...» Aŭdinte tion, Afanti pensis, ke ne estus senutile provi mistifiki tiun reĝon, kiu provas mistifiki la popolon. Sekve Afanti eniris la palacon kaj sciigis la reĝon: «Plej estimata, mi volonte tranoktos sur la urburo.»

Aŭdinte la vortojn de Afanti, la reĝo tre surpriziĝis kaj ordonis iujn lakeojn depreni lian veston kaj lasi lin tranokti en la difinita loko sur la urbomuro, aldonante: «Li tutcerte mortos pro la frostoj. Hm, kreteno!»

«Via reĝa moŝto, bonvolu ordoni viajn subulojn meti grandan ŝtonon sur la muron,» petis Afanti.

«Kreteno, kion fari per ŝtonego?» demandis la reĝo.

«Tio estas mia sekreto. Mi ne suriros, se ne estos ŝtono,» persistis Afanti.

Laŭ ordono de la reĝo la servistoj deprenis la veston de Afanti, lasis lin suriri la urbomuron kaj plie portis tien ŝtonegon. Farinte ĉion ordonitan, ili forprenis la ŝtupetaron, pensante, ke li certe mortos pro la forta frostoj.

Tiun nokton estis terure malvarme, sed Afanti havis rimedon kontraŭ la frostoj. Li ne kaŭri sen unu loko, sed rulis la ŝtonegon tien kaj reen. Tiamaniere li trapasis la tutan frostan nokton.

La postan matenon la reĝo kaj liaj subuloj, veninte al la piedo de la urbomuro, aŭdis senĉesan murmuradon de Afanti: «Fu, varmege, vere varmege!» Je la sunleviĝo Afanti surmetis sian veston donitan de la palacaj servistoj kaj, malsuprengrimpinte la ŝtuparon, diris al la reĝo: «Via estimata reĝa moŝto, mi tranoktis senveste sur la urbomuro, vi devas nun doni al mi vian filinon kaj duonon de via lando laŭ via promeso.»

La reĝo mutiĝis pro la neatendita postulo kaj ekcerbumis por ruze elturniĝi. Fakte li tute ne estis sincera, ĉar li nur deziris distriĝi per la artifiko, ne kredante, ke iu travivus la provon. «Diablo scias, kial Afanti ne mortis pro la frostoj,» li ripete pensis en si. Post iom da tempo li demandis: «He! Afanti, ĉu vi vidis la lunon en la nokto?»

«Jes, mi vidis ĝin,» respondis Afanti.

La malgaja mieno de la reĝo tuj ŝanĝiĝis, kaj li laŭte kriis: «Ho, vi varmigis vin per la lunbrilo, agante kontraŭ miaj kondiĉoj. Elpelu ĉi tiun trompulon!» Tiel Afanti estis elpelita.

Afanti, plena de kolero, ne volis plu vivi en la urbo, sed transloĝiĝis al la kamparo, kie li loĝis apud iu puto.

Lun varman someran tagon la reĝo kaj lia sekvantaro ĉasis tutan tagon en la kamparo. Ili eksuferis pro soifo kaj serĉadis akvon. Subite la reĝo trovis kabanon kaj alrajdis, kriaĉante: «He, kie estas la mastro? Rapide akceptu gastojn!»

Elirinte, Afanti diris: «Via justa reĝa moŝto, ne ĝeniĝu en mia hejmo, diru kion vi volas?»

«Akvon! Mi baldaŭ mortos pro soifo,» kolere kriaĉis la reĝo.

«Ho, akvon, mi tuj iru alporti,» obeis Afanti.

Afanti ne ĉerpis akvon, sed malligis la ŝnuron de la sitelo, ĝin kaŝis sub sablon kaj sidiĝis ĉe la puto.

Post ioma atendo la reĝo malpacientiĝis kaj ordonis lakeon serĉi Afanti. La lakeo baldaŭ revenis kaj raportis: «Via reĝa moŝto, Afanti diris: 'Vi, aro da stultuloj, mem venu al la puto!' Kian absurdaĵon li diris!»

«For!» kolere riproĉis la reĝo, kiu tamen estis devigita mem veni al la puto same kiel lia sekvantaro. Vidinte Afanti, li kolere demandis lin: «Kreteno, kie estas la akvo?»

«Via saĝa moŝto, rigardu en la puton,» respondis Afanti en kvieta tono.

«Kreteno, kiel mi povas trinki, se mankas siteloŝnuro?»

«Sed estas akvobrilo, via moŝto.»

21 «Kreteno, kiel akvobriilo povas sensoifigi min?» kriacis la reĝo konfuzite.

Rigardante lian tiranan, stultan mienon, Afanti ekridis: «Ha, via reĝa moŝto, kiel akvobriilo ne povas vin sensoifigi, se lumbrilo povis min varmigi dum frosta nokto?»

La reĝo povis nenion respondi.

## **Forto de Kamparanoj**

La reĝo volis scii, ĉu trovigas iu pli forta ol li mem inter liaj popolanoj, kaj venigis Afanti por pridemandado: «Nasrudin, vi migris ĉien tra la urboj kaj kamparoj. Ĉu ie vi trovis iun pli fortan ol mi inter la popolanoj?»

«Kompreneble, via reĝa moŝto, tre multajn!» respondis Afanti.

«Kiuĵ ili estas?» surpriziĝis la reĝo.

«Ja la kamparanoj!» respondis Afanti.

«Sensencaĵo! Nenian fortecon havas la kamparanoj, kiuj scias nur plugi! Kiel ili povas esti pli fortaj ol mi?» «Ja pli fortaj ol vi!» insistis Afanti. «Kian forton vi havus, se ili ne nutrus vin?»

## **Bonege!**

Lun vintron Afanti konstruis varmejon por kulturi dolĉajn melonojn. Rikoltinte, li elektis kelke da freŝaj por la reĝo kun la celo akiri iom da mono. Neatendite por Afanti, la reĝo, akceptinte la melonojn, pagis neniom da mono, sed nur laŭdis lin, trifoje dirante al li: «Bonege!»

Afanti eliris el la palaco kun la stomako murmuranta pro malsato kaj krome havis neniom da mono kun si. Iom pensinte, li eniris

restoracion, kie li manĝis dudek farĉitajn bulkojn. «Bonege, bonege, bonege!» laŭte kriis tri-foje Afanti preta foriri, satmanĝinte.

«Kie la pago?» kriis la mastro. «Vi ankoraŭ ne pages!»

«Kiel? Ĉu ĵus mi ne donis al vi?» protestis Afanti kun ŝajnigita mirego.

Nenion plu dirinte, la mastro tiris lin la reĝo por ricevi juĝon. Aŭdinte, ke Afanti ne pagis pro la manĝaĵo, la reĝo eksplodis pro kolero: «Kial vi opinias, ke vi rajtas manĝe la bulkojn de aliulo senpage?» «Via reĝa moŝto, mi ne eraras,» respondis Afanti.

«Ĉi tiu mastro estas tro avara. Mi manĝis nur dudek bulkojn kaj pagis lin pro ĉiuj per eĉ trifoja 'Bonege', same kiel vi ĵus pages min pro la melonoj. Kial li ankoraŭ postulas de mi monon?»

Aŭdinte la pledon de Afanti, la reĝo nenion povis eldiri.

## **Sindefendo kontraŭ Ŝtelistoj**

Preteririnte la reĝan palacon, Afanti vidis amason da dungitoj kiuj konstruis ĝian muron pli alten sub direkto de kelkaj korteganoj. Surprizite, li demandis la korteganojn: «Kial ĝin ankoraŭ pli altigi?»

«Mia Afanti, vi tiel saĝa viro diras tian stultaĵon!» moke respondis unu el ill. «Ni tion faras por sekurigi la palacon kontraŭ ŝtelistoj, kiuj volus enŝovigi por rabi valoraĵojn.»

«Jes, tiamaniere ŝtelistoj eksteraj ne havos eblon enveni,» konsentis Afanti, «sed, kion vi faros kontraŭ la ŝtelistoj en palacaj?»

## **Admono de Alaho**

Afanti estis malriĉa kaj ofte suferis pro malsato. Iufoje, irante en la bazaro, li kriadis: «Mi estas sendito de Alaho, mi estas sendito de Alaho!»

Aŭdinte la krion, kontrolistoj de la bazaro tuj raportis la aferon al la guberniestro, kiu sendis venigi Afanti al sia oficejo. «Vi diras, ke vi estas sendito de Alaho, do diru al mi, kion admonis Alaho?» demandis la guberniestro.

«Per la Alaha admono alfluos la bono!» respondis Afanti. «Mi rakontos al vi, kiam mi satiĝis. Unue portu al mi manĝaĵojn.»

Pensante, ke venos multe da bonaĵo, la guberniestro tuj ordonis alporti abundan manĝon. Satiĝinte post longa manĝado, Afanti diris: «Alaho admonis min jene: ‘Afanti,’ li diris, ‘la guberniestro forrabis multajn objektojn de la popolanoj kaj tiel senhavigis vin. Do vi manĝu ĉe li.»

## **Stranga Karavano**

Iun tagon Afanti iris al la urbo pro afero. Ĉe la urbopordo li vidis la guberniestron, juĝiston, bienulon kaj distriktestron babili sidante antaŭ la pregejo.

«Ĉu vi venis viziti la urbon, Afanti?» demandis unu el la kvar, kiu konis Afanti.

«Jes,» respondis Afanti.

«Venu, venu, Afanti!» denove diris tiu. «Rakontu al ni ion interesan, ĉu bone?»

«Pardonon, mi ne havas tempon,» diris Afanti, ŝajnigante sin ne konanta ilin. «Mi ĵus renkontis iun karavanon ekster la urbo kun kvar kameloj, kiuj estas plenŝargitaj per varoj. Oni diris al mi, ke la varojn oni portas al la guberniestro, juĝisto, bienulo kaj distriktestro. Ĝuste nun mi serĉas ilin.»

Aŭdinte tion, la kvar altranguloj urĝe plu demandis: «Ĉu vi scias, kion ili portas, Afanti?»

«Jes,» respondis Afanti, «oni klarigis al mi, ke la unua kamelo portas ĉantaĝon sendatan al la distriktestro, la dua avarecon al la bienulo, la tria korupton al la juĝisto kaj la kvara barbarecon al la guberniestro.»

## **Mandareno en Boato**

Iu mandareno neniam antaŭe veturis per boato. Foje li kune kun Afanti transiris riveron per boato, kio estis la unua fojo en lia vivo. Kiam la boato atingis la mezon de la rivero, ekondetis, kio ege timigis lin. Li, tremante pro timo, forte tiris la baskon de Afanti kaj senĉese petadis: «Bona Afanti, bona Afand! Mia koro elsaltos pro timo, elpensu rimedon por mi!»

«Unu rimedo ja ekzistas, via moŝto, sed mi ne scias, ĉu vi volas akcepti ĝin aŭ ne?»

«Kial ne, Afanti? Mi volonte konsentas ion ajn. Rapidu, mi petas,» insistis la mandareno.

«Bone,» diris Afanti, do vi spertu unue en la akvo, kaj puŝis lin en la akvon. Post kiam la mandareno jam kelkfoje subakviĝis, Afanti kaptis lian hararon kaj tiris lin en la boaton.

Tiam la mandareno ne plu timis esti en la boato. Afanti afable demandis lin: «Kiel vi nun sentas vin? Ĉu vi ankoraŭ timas?»

«Ne, ne, nun mi sentas min tre komforta,» rapidege respondis la mandareno, tremante pro malvarmo.

«Jes!» meditis Afanti. «Tiu, kiu neniam vojaĝis per la piedoj, ne scias kiel bone estas rajdi sur ĉevalo; tiu, kiu neniam subakviĝis, ne sentas la sekurecon de boato. Kiel vi povas kompreni malsaton de la malriĉuloj, se vi ĉiam manĝas bongustan kuskuson?»

## **Ankaŭ Vi Estas Lupo**

Iu nobelo savis ŝafon el la buŝo de lupo.

La ŝafo sekvis lin obeeme al lia hejmo. Tuj post kiam li revenis hejmen, li preparis buĉi ĝin. La ŝafo blekadis pro la perforto, kio surprizis Afanti, kiu estis najbaro.

Afanti iris rigardi, je kio la nobelo klarigis: «Tiun ĉi ŝafon mi savis de lupo.»

«Kial ĝi do anstataŭ danki riproĉas vin?» demandis Afanti.

«Kion signifas ĝia blekado?»

«Ĉi riproĉas, ke ankaŭ vi estas lupo.»

## **Frenezulo**

Afanti venis al iu urbo kaj longe restis tie.

Post kiam li finaranĝis sian aferon, li ekreiris al sia hejmloko. Survoje li misiris en arbaron kaj renkontis ĉasantan nobelon. Tiu retenis lin per krio kaj demandis: «De kie vi venas?»

«De tiu urbo,» respondis Afanti, fingromontrante al la urbo de la nobelo.

«Kia ĝi estas?» plu demandis la altrangulo.

«Bona.»

«Kiel kondutas la riĉuloj tie?»

«Ĉiuj estas avaraj kaj kruelaj.»

«Kaj la mandareno?»

«Li estas eĉ pli tirana ol la riĉuloj.»



«Ĉu vi konas min?»

«Ne.»

«Mi ja estas tiea mandareno.»

Aŭdinte tion, Afanti demandis: «Via mandarena moŝto, ĉu vi konas min?»

«Ne,» respondis tiu.

«Mi ja estas tiea frenezulo, sed mia frenezo ne ĉiam atakas min. Mi benas vin nobelojn en miaj sanaj tagoj kaj babilaĉas dum la malsano regas min. Hodiaŭ mi estas ĝuste en malsana stato, tamen al vi mi diris la veron, kio mirigis eĉ min mem,» klarigis Afanti.

## **Kial Vi Ankorau Bezonas Surtutojn?**

Kelkaj bienuloj interkonsiliĝis por trompe mangi la ŝafon de Afanti. Ili venis al li kaj ĥore kriis: «Ho, ve! Morgaŭ venos la fino de la mondo. Estus domaĝe, se vane perdiĝus la ŝafo, por kies nutrado vi oferis multan laboron. Hodiaŭ ni venis helpi al vi ĝin formanĝi!» Dirinte tiujn vortojn, ili kune sin ĵetis sur la ŝafon kaj tuj ĝin buĉis.

«Bone!» diris Afanti. «Pro kio mi plu nutru la ŝafon, se venos la fino de la mondo? Bonvolu antaŭ ĉio demeti viajn surtutojn kaj vin malvarmetigi en la postkorto. Kaj lasu min kuiru la ŝafajon.»

Afanti ekbruligis brullignon, pendigis kaldronon kaj komencis fari preparojn por la kuirado. La neinvititaj gastoj demetis slajn surtutojn kaj kun ĝojbruo sin direktis al la postkorto.

Post la foriro de la bienuloj, Afanti tuj kaŝis la ŝafajon kaj metis ĉiujn iliajn surtutojn sur la flamantan brullignon. Kiam la bienuloj revenis por manĝi la ŝafajon, ili trovis, ke iliaj surtutoj jam fariĝis cindro. Ili refoje ĥore kriis: «Afanti, kion vi faris per niaj surtutoj?»

«Miaj karaj,» kviete diris Afanti, «ĉu morgaŭ ne venos la fino de la mondo? Kial do vi ankoraŭ bezonas surtutojn?»

## Saĝo

Oni fanfaronis al Afanti, dirante, ke iu juĝisto, kiu antaŭ nelonge venis en la loĝkvartalon, vvestas tre saĝa kaj inteligenta. «Tio eblas,» ridetis Afanti, «ĉar lia kapo estas plena de saĝo pro ĝia malofta uzo.»

## Ne Serĉu per Via Propra Vivo!

Iu juĝisto rajdante sur ĉevalo, renkontis survoje Afanti revenantan de bazaro. Afanti riverencis al li kaj diris: «Bonan vojaĝon! Kien iras via Moŝto?»

«Mi vizitos la ĉielan paradizon,» fanfaronis la juĝisto. «Ĉu vi volas iri tien, por ke ni kune ĝuu?»

«Ho, ne! Mi ne irus kune kun vi, eĉ se mi dezirus,» respondis Afanti. «Pli bone ankaŭ vi ne iru, mi admonas.»

«Kial? Pro kio?»

«Ĉu via Moŝto jam forgesis, ke vi iam diris al mi: „La homon, kiu ĉiam faras malbonaĵojn, Alaho ne povos indulgi? Kion vi faros, se vi renkontos Alahon? Ja pri vi mi maltrankviliĝas. Ne ŝercu per via propra vivo!“»

## Balai la Korton

Kiam Afanti estis infano, li devis ĉiutage balai la korton por bienulo en la vilaĝo. Laŭ la regulo, la mastro devis pagi lian salajron ĉe la jarfino, sed li ruze intencis nuligi la pagon al Afanti. Nun jam venis la lasta tago de la jaro.

La bienulo frumatene alvokis Afanti kaj ordonis: «Afanti, hodiaŭ balau la korton, tiamaniere ke post la balao, sen surverŝo de akvo, la korto estos malseka. Se vi ne povos tion fari, vi ne ricevos vian salajron ĉijaran, kaj mi ne dungos vin por la venonta jaro.» Tion dirinte kun rideto, la bienulo tuj foriris al bazaro aĉeti objektojn kaj manĝaĵojn por la Novjara Festo.

Afanti silente balais la korton. Poste li elprenis ĉiujn olekalabasojn el la konservejo de la bienulo, priverŝis la tutan korton per oleo kaj tiel foruzis la tutan stokon. Tion farinte, Afanti sidis ĉe la koridoro por atendi la revenon de la mastro kaj la ricevon de sia salajro.

Posttagmeze la bienulo balanciĝante revenis kaj rimarkis, ke la tuta korto estas priverŝita per oleo. Lia vizaĝo tuj misformiĝis pro kolero. Li streĉis sian kolon kaj kriaĉis: «Redonu mian oleon... mian oleon!»

«Estu trankvila, via Moŝto!» diris Afanti sin levante. «Mi ne priverŝis la korton per akvo, sed la korto tamen estas malseka. Ĉion mi faris laŭ via ordono. Bonvolu pagi al mi la salajron. Venontan jaron mi tamen 36 ne venos, eĉ se vi volos min dungi.» La bienulo povis fari nenion alian ol pagi la salajron al Afanti.

## **Kiu Estas Pli Frandema?**

Iu bienulo intencis moki Afanti. Li do aĉetis multe da akvomelonoj pot regali Afanti kaj aliajn. La bienulo senĉese invitis ĉiujn al manĝado kaj samtempe ŝtele ŝovis antaŭ Afanti siajn postmanĝajn selojn. Post la manĝo la bienulo ŝajnigis sin surprizita kaj kriis: «Amikoj, rigardu, kiel multe da melonaj ŝeloj kuŝas antaŭ Afanti! Li manĝis pli multe ol ni ĉiuj. Kia frandemulo li estas!» Ĉiuj ridis.

«Ha ha, ni rigardu, kiu fakte estas pli frandema!» diris Afanti kun rido. «Kiam mi manĝis melonon, mi ne manĝis la ŝelon, dum sinjoro bienulo eĉ la ŝelojn formanĝis. Rigardu, antaŭ li restas neniu ŝelo!»

## La Plej Altaj Maksimoj

Pot vivteni sian familion, Afanti kunportis ŝnuron kaj iris al la bazaro por trovi dunganton. Li staris inter la serĉantoj de taglaboro kaj rigardadis tien kaj reen. Fine iu dikventra riĉulo venis kaj kriis: «Mi aĉetis keston da delikataj porcelanaĵoj. Tiu, kiu volas dorsporti ĝin al mia hejmo, sciiĝos rekompence pri la tri plej altaj maksimumoj. Kiu volas?»

Neniu el la laborserĉantoj reagis. Sed Afanti pensis, ke monon oni ĉie ajn povas perlabori, sed la plej altaj maksimumoj estas malfacile akireblaj.

Li do decidis porti la keston por la riĉulo, por ke tiu diru al li la tri sentencojn kaj tiel li povos plivastigi sian horizonton. Tial Afand elpasis, metis la keston sur sian dorson kaj sekvis la riĉulon.

Survoje, Afanti pensis, ke la riĉulo diru al li siajn plej altajn maksimumojn. Responde la riĉulo diris: «Bone, aŭskultu! Se iu diros al vi, ke la malsato estas pli bona ol la sato, tion ne kredu!»

«Bone, bonege!» diris Afanti, «Do, kio estas la dua?»

«Se iu diros al vi, ke piediri estas pli bone ol rajdi, tion absolute ne kredu!»

«Prave, pravege!» reagis Afanti, «Kiaj maksimumoj! ... vere malofte aŭdeblaj!.. kaj la tria?»

«Aŭskultu!» daŭrigis la riĉulo, «Se iu diros al vi, ke en la mondo troviĝas ankoraŭ iu pli malsaĝa ol vi, tion neniel kredu!»

Tion aŭdinte, Afanti subite liberigis la ŝnuron. «Kraĉ...tin... tan,» la kesto kun kraĉbruo falis sur la teron. Fingromontrante al la kesto, Afanti maksimumis al la riĉulo: «Se iu diros al vi, ke la porcelanaĵoj en la kesto ne estas disrompitaj, tion neniam kredu!»

## Kaldrono Naskis Idon

Afanti pruntis kaldronon de iu tre avara riĉulo.

Oni forte miris, ke la riĉulo estis tiel malavara al Afanti, sed fakte la riĉulo traktis Afanti per sia kutima avareco. Afanti ĝin prunteprenis lue.

Pasis iom da tempo, kiam Afanti revenis kaj ĝoje diris al la riĉulo: «Mi havas ion bonan por informi al vi!»

«Ion bonan?» demandis la riĉulo mire.

«Via kaldrono naskis idon, ĉu tio ne estas io ĝojinda?» respondis Afanti.

«Sensencaĵo! Ĉu kaldrono povas naski idon?»

«Se vi ne kredas, rigardu. Kio estas tio?» Dirante, Afanti malfermis sakon kaj elprenis el ĝi kaldroneton. Malgraŭ ke Afanti aspektis seriozmiene, la riĉulo ankoraŭ ne kredis.

«Sed,» pensis la riĉulo, «ĉu mi mem ne estus stultulo, se mi ne profitus el tio, ke la stultulo faras malsaĝaĵon?» Tiel pensante, la avarulo afektis ĝojan mienon kaj diris: «Oho mia kaldrono vere naskis idon!»

«Ĉu vi ne opinias, ke tio estas bona informo?» demandis Afanti.

«Kompreneble tio estas!Kompreneble!» konsentis la riĉulo.

Afanti atenteme transdonis la kaldroneton al la riĉulo kaj admires: «Kiel bela ĝi estas!»

«Jes, jes!La ido tre similas al sia patrino,» akordis la avarulo, sin amuzante per la kaldroneto.

Afanti adiaŭis la riĉulon, post kiam ĉi tiu akceptis 41 la kaldroneton, sed la avarulo aldone avertis Afanti: «De nun bone prizorgu mian kaldronon, por ke ĝi nasku multajn tiajn idojn.»

Respondinte «Bone!» Afanti hejmeniris. Post nelonge Afanti refoje vizitis la avarulon kaj malĝoje diris: «Mi devas sciigi al vi malagrabraĵon!»

«Kian malagrabraĵon?» scivolis la avarulo.

«Via kaldrono mortis!» respondis Afanti.

«Sensencaĵo! Kiel povas morti kaldrono?» kriis la avarulo.

«Kial la kaldrono ne povas morti, se ĝi povas naski?» respondis Afanti.

Tion aŭdinte, la avarulo subite ekkomprenis, kial Afanti donacis al li la kaldroneton. Fakte, ne Afanti, sed li mem estis malsaĝulo.

La riĉulo ne volis, ke Afanti tiamaniere deprenu la kaldronon de li; kaj postulis: «Nu, mia kaldrono jam mortis, do bonvolu redoni al mi la kadavron!»

«Mi jam ĝin entombigis,» respondis Afanti.

«Kie?»

«En la forno de forgiŝto.»

Tion aŭdinte, la riĉulo ne povis afekti plu kaj rekte diris: «Ĉesigu vian trompadon! Ĉu vi intencas trompe rabi mian kaldronon?»

«Estas vi, kiu trompe rabis mian kaldroneton antaŭe!..» refutis Afanti.

Ili ekkverelis. La avarulo timis, ke najbaroj ekscios kaj la afero eble malhonoros lin, tial li cedis al Afanti kaj petis, ke se Afanti ne mencios la kaldroneton, li volonte 42 donacos al li la kaldronon.

La avarulo pensis, ke li certe konsentos. Sed Afanti tute rifuzis. La disputado daŭris ĝis multaj homoj alvenis, kaj tiam li foriris digne, ĉar Afanti fakte faris tion ne por la kaldrono, sed por moki la avaran riĉulon.

## **Mi Malkonstruas Nur Mian Etaĝon**

Afanti prunteprenis cent arĝentajn monerojn de iu riĉulo por konstrui al si domon kun du etaĝoj. La tuta familio partoprenis en la konstruado. La domo fine estis konstruita, sed Afanti kaj liaj familianoj ankoraŭ ne enloĝiĝis. La riĉulo vidis, ke la nova domo estas tre bela, kaj planis preni la supran etaĝon kiel repagon de Afanti. Se ĉi tiu ne konsentos, li devigos lin tuj redoni la monsumon.

«Bonege, bonege!» Aŭdinte la vortojn de la riĉulo, Afanti montris neniom da malkonsento kaj daŭrigis: «Mi ĝuste estas ĉagrenita de la ŝuldo. Jen estas bona rimedo repagi. Ni do agu laŭ via opinion!»

La tuta familio de la riĉulo fieraĉe transloĝiĝis en la supran etaĝon de la nova domo. Post kelkaj tagoj Afanti invitis dekon da najbaroj, kiuj komencis detruj muron de la domo per hojoj. Aŭdinte la bruegon, la riĉulo tuj elŝovis sian kapon el la fenestro por esplori kaj surpriziĝis: «Ĉu vi freneziĝis, Afanti? Pro kio vi malkonstruas la novan domon?» «Restu trankvile en via hejmo! Tio vin ne koncernas,» respondis Afanti kaj daŭrigis detruj la muron.

«Kio? Tio centprocente koncernas min!» La riĉulo tiel maltrankviliĝis, ke li malpacience piedfrapadis la plankon kaj kriegis: «Mi ja loĝas en la supra etaĝo. Kion 44 fari, se la domo falos?»

«Ĉu gravas?» demandis Afanti. «Mi malkonstruas nur mian etaĝon, ne la vian. Vi bone zorgu vian etaĝon, por ke ĝi ne falu kaj premvundu nin!» Post tiuj vortoj Afanti kaj la najbaroj daŭrigis sian malkonstruadon.

La riĉulo povis fari nenion alian ol sin fleksi antaŭ Afanti: «Mia bona Afanti, mi petas, ke vi vendu al mi vian etaĝon pro nia amikeco, ĉu bone?»

«Ĉu vi volas aĉeti?Do konsentite, vi pagu al mi ducent arĝentajn monerojn,» respondis Afanti. Kaj tiel la riĉulo devigite konsentis aĉeti la domon.

## **Kalkulado de la Konto de Kokino**

Iam estis portisto, kiu en gastejo manĝis unu kokinon.

Manĝinte, li demandis la mastron, kiom li devas pagi.

La mastro respondis: «Se hazarde vi ne havas sufiĉan monon, mi povas enskribi la sumon je via kredito. Vi povus pagi iam ajn, kiam vi havos monon.» Tiu diro tre ĝojigis la portiston. Estis la unua fojo, ke li renkontis tiel bonkoran mastron. Li adiaŭis lin kaj daŭrigis sian vojaĝon.

Post kelka tempo la portisto venis por kvitigi kun la mastro. La mastro ŝovis kuprajn monerojn tien kaj reen sur la tablo, kvazaŭ estus tro malfacila kalkulado. La portisto malpacience demandis: «Kiom kostas via kokino?Ĉu tio indas vian ripetitan kalkuladon?» La mastro ne respondis, sed nur mansignis al la portisto, ke li lin ne ĝenu. La portisto povis fari nenion krom atendi.

Finfine la mastro elkalkulis la sumon kaj la portisto konsterniĝis pro la tro alta prezo de la kokino, kiu estis kelkcentoble pli alta ol ĝenerale. Li demandis: «Ĉu via kokino valoras tiom da mono?»

«Pro kio ne?Mem kalkulu kiom da ovoĵ demetus la kokino, se ĝi ne estus manĝita de vi!.. kaj kiom da kokidoj ili povus fariĝi!.. kaj kiam ili maturiĝus, kiom da ovoĵ ankaŭ ili demetus!» diris la mastro per unu spiro. Rekalkulante per la kupraj moneroj, la mastro daŭrigis: «Rigardu, mi ne miskalkulis eĉ moneron.»



La portisto ne povis plu sin deteni kaj indigne diris: «Tio 46 ne estas negoco sed simpla trompo! Mi ne pagos!»

Vidinte, ke la portisto ne volas pagi al li la ŝuldon, la mastro vole-nevole diris: «Bone, ni iru al la moskeo, por ke oni jucu.»

La portisto kun granda aplombo respondis: «Kun justeco oni povas iri ĉien, sed kun maljusteco nenien. Se ne paroli pri la moskeo, almenaŭ Alaho devas respekti la justecon.» Disputante inter si, ili venis al la moskeo.

La imamo estis ne nur prizorganto de la religiaj aferoj, sed ankaŭ la plej aŭtoritata juĝisto. Por la religiuloj ĉiu vorto lia estis leĝo observenda. Kiam la mastro kaj portisto eniris, li manĝis hasiŝon sidante sur tapiŝo. Li ĵetis straban rigardon al la enirantoj kaj malrapide demandis kun basa kaj raŭka voĉo: «Ĉu vi havas aferon?»

La mastro la unua rakontis detale la okazaĵon. Tion aŭdinte, la imamo opiniis, ke li pravus. Tial, antaŭ ol aŭskulti la pledon de la portisto, li jam juĝis, ke la portisto pagu la ŝuldon laŭ la postulo de la mastro. La portisto sciis, ke nenio al li helpos plu. Li povis nur petegi, ke la imamo permesu al li pagi la ŝuldon post kelkaj tagoj. Tion konsentis la imamo.

La portisto sentis, ke li estas maljuste traktita, kaj malvigle reiris hejmen. De malproksime aŭdiĝis kanto. Iu rajdanto sur azeno renkonte iris al li kantante. La rajdanto respekte salutis lin kun la dekstra mano ĉe la brusto: «Saluton, frato!» Pro la malbona humoro la portisto ne volis saluti la senĝenan rajdanton, sed nur respondinte tra la nazo, rapide preterpaŝis. Tio mirigis la 47 rajdanton, kiu tuj sin turnis kaj postkuris lin.

«Pro kio vi tiel ĉagreniĝas? Ĉu mi povus helpi vin?»

La portisto haltis, kun miro rigardis la rajdanton kaj demandis: «Kiu vi estas?»

«Mi nomiĝas Nasrudin Afanti,» respondis la rajdanto.

«Ho!Vi estas sinjoro Nasrudin!» kriis la portisto surprizite kaj ĝoje. Fakte delonge la nomo de Afanti estis konata por li, kaj li sciis, ke Afanti ĉiam helpas la maljuste traktitajn malriĉulojn. Nun li propraokule vidis, ke li efektive estas tiel sincera kaj helpema.

La portisto detale rakontis sian travivaĵon al li. Pripensinte momenton, Afanti propones: «Tuj reiru al la moskeo kaj plendu, ke la afero ne estis juste jugita, kaj petu rejuĝon antaŭ la publiko. Mi vin helpos por gajni la proceson.» La portisto agis laŭ lia propono. La imamo 48 vole-nevole konsentis, ĉar tie estis tradicia regulo, ke peto de publika juĝo estas permesata, sed la petinto ricevas punon pli severan, se li perdas la proceson refoje.

Venis la tago por la publika juĝo. Asesoroj kaj popolanoj alvenis al la moskeo unuj post aliaj. La imamo deklaris la komencon de la proceso. La mastro refoje klarigis sian motivon. Venis la vico de la portisto, sed li silentis. «Kial vi ne pledas?» demandis la imamo.

«Mia advokato ankoraŭ ne venis,» respondis la portisto.

«Kiu estas via advokato?»

«Sinjoro Nasrudin Afanti.»

Tion aŭdinte, la imamo kaj asesoroj sulkigis la brovojn, dum la popolamaso subĝojis kaj murmuris: «Ni vidu, tuj estos interesa spektaklo...»

Pasis longa tempo, antaŭ ol Afanti fine alvenis. Salutinte la popolamason, li diris al la imamo kaj asesoroj: «Pardonon, ke mi malfruas pro grava afero.»

«Ĉu troviĝas afero ankoraŭ pli grava ol nia hodiaŭa proceso?» ironiis unu el la asesoroj.

«Kompreneble troviĝas! Pensu, morgaŭ mi semos tritikon, sed miaj semoj ankoraŭ ne estis rostitaj. Ĉu troviĝas afero ankoraŭ pli grava ol tio? Mi rostis tri mezurujojn da semoj kaj pro tio malfruis.»

Aŭdinte liajn senraciajn vortojn, la imamo kaj asesoroj tre amuziĝis kaj preskaŭ unuvoĉe kriis: «Frenezaĵo! Ĉu oni povas semi rostitan tritikon?» Ili laŭte kriadis, celante nuligi la advokatecon de Afanti, 49 tiel ke ili povu fari verdikton lawvole. Tion vidinte, la publiko maltrankviligis por Afanti, ĉar se li ne povos respondi la demandon de la imamo kaj asesoroj, lia advokateco certe estos nuligita.

Afanti tamen restis aplomba. Kiam kvietiĝis la bruo, li diris: «Vi pravas! Se oni devas ne semi rostitan tritikon, kiel do la kokino manĝita de la portisto povus demeti ovon?» La vortoj tuj sigelis la lipojn de la imamo kaj asesoroj.

Nur nun ili komprenis, ke lia malfruiĝo kaj la senorda parolado estis intencaj.

La popolamaso ĝojkriis: «Jes, jes! Kiel kokino manĝita povus demeti ovon?» Sub la nerefutebla riproĉo de Afanti kaj la popolamaso, la imamo kaj asesoroj ne povis ne ŝanĝi la verdikton kaj finis la aferon per tio, ke ili ordonis la portiston pagi laŭ la normala prezo.

## **Por ke Ĝi Ne Estu Soifa**

Iun tagon Afanti ĉeestis geedziĝan festenon.

Li rimarkis, ke iu gasto kaj manĝegas kaj avide enpoŝigas bongustajn manĝaĵojn.

Li do prenis tekruĉon kaj ŝtele verŝis teon en lian poŝon.

La gasto surpriziĝis: «Aĥ! Kial vi verŝas teon en mian poŝon?»

«Ej! Via poŝo jam manĝis tiel multe da bongustaĵoj, kaj mi faras tion, por ke ĝi ne estu soifa!» klarigis Afanti.

## **Manĝigi Veston**

Foje Afanti, portante eluzitan veston, iris por festeni ĉe amiko. Ĉi tiu timis, ke li estos mokita kaj malhonorita pro sia kontaktado kun malriĉulo kaj tio forigis Afanti.

Reveninte hejmen, Afanti surmetis novan veston kaj tuj reiris al la domo de la amiko. Lia amiko vidis, ke ĉi-foje Afanti sin vestis bele, kaj tuj respekte invitis lin sidi sur la honoraloko kaj afable montris al li diversajn mangaĵojn, dirante: «Bonvolu gustumi laŭ via plaĉo, mia amiko!»

Afanti rapide direktis sian manikon al la manĝaĵoj dirante: «Bonvolu gustumi, mia nova vesto!»

Tion vidinte, la mastro surpriziĝis kaj demandis: «Kion vi faras, mia amiko?»

«Mia amiko,» respondis Afanti, «ĉu vi ne vidas, ke mi regalas mian veston, kiun vi plej respektas?»

## **En Razejo**

Pro la varmega vetero Afanti volis razigis sian kapon kaj iris al razejo. Verŝajne la razisto ne estis tre sperta en sia laboro, ĉar li plurloke vundis al li la kapon kaj metis vaton sur la vundetojn. Poste Afanti stariĝis kaj rigardis sin en la spegulo: «Ho!Vi estas vere lerta majstro en via laboro!Rigardu, sur duono de mia kapo vi plantis kotonon. Nu, bone, sur la alia duono mi mem plantos olelinon.»

## **Honto**

Foje ŝtelisto venis en la hejmon de Afanti. Afanti ekvidis lin kaj tuj sin kaŝis en keston.

La ŝtelisto serĉis ĉie en la ĉambro, sed nenion ŝtelindan trovis. Fine li malfermis la keston kaj kun eksalto vidis Afanti: «Ha!Kion vi faras en la kesto?»

«Nu, ĉar en mia hejmo troviĝas nenio, kio plaĉas al vi, mi tre hontas kaj pro tio kaŝis min en la kesto,» respondis Afanti.

## **Kia Sono Estas la Plej Bela?**

Unu tagon Afanti gastis ĉe amiko, kiu tre ŝatis muzikon kaj tial ludis diversajn muzikilojn por Afanti.

Post tagmezo Afanti jam de longe sentis sin tre malsata, sed la amiko ankoraŭ senĉese plukis kordojn kaj ankaŭ demandis: «Nasrudin, kia sono estas la plej bela en la mondo?Ĉu tiu de dutaro aŭ jevapo (*dutaro, jevapo: ujuguraj muzikiloj*)?»

Afanti respondis: «Mia kara amiko, nun la sono de kulerego skrapanta kaserolon estas pli bela ol iu ajn alia sono en la mondo.»

## **Veneno**

En sia infaneco Afanti vizitis la hejmon de instruisto por lerni el la Korano. Unu tagon iu donacis al la instruisto bovlon da mielo. Afanti al ĝi direktis sian rigardon ŝtele el la okulanguloj. Tion vidinte, la instruisto tuj metis ĝin sur bretaron kaj admonis al Afanti: «En la bovlo estas veneno. Tuj mortas tiu, kiu ĝin manĝas. Nepre ne tuŝu ĝin.»

Kiam la instruisto forestis, Afanti intence disrompis lian inkujon. Poste li formanĝis la mielon kiel ankaŭ pasteĉojn, frititajn pastostriojn kaj bulkojn donacitajn al la instruisto de aliaj lernantoj. Fine li eĉ

forlekis la restaĵon en la mielbovlo kaj poste remetis la bovlon sur la bretaron. La instruisto revenis kaj rimarkis la bovlon malplena.

Li kolere demandis: «Kiu ĝin formanĝis?»

Montrante la romopitan inkujon, Afanti diris: «Rigardu, kiel grandan akcidenton mi kaŭzis! Mi volis morti, antaŭ ol vi revenos hejmen, do mi fortrinkis la venenon. Sed mi vere ne komprenas, kiel mi ankoraŭ ne mortis.»

## **Turbano**

Portante sur la kapo turbanon grandan kiel korbo, Afanti promenis sur strato, kie li renkontis iun, kiu petis: «Sinjoro instruito, bonvolu helpi al mi legi ĉi tiun leteron.»

Afanti respondis: «Mi ne konas eĉ unu literon kaj tial ne povas legi la leteron.»

La petinto ege miris kaj sekve plu demandis: «Sed ĉirkaŭ via kapo vi volvis tiel grandan turbanon! Ĉu tamen vi vere ne povas legi leteron?»

Afanti malvolvis la turbanon de sia kapo, volvis ĝin ĉirkaŭ la kapon de la homo kaj respondis: «Bone! Bone! Se vi kredas, ke sub la granda turbano kuŝas erudicio, vi mem provu, ĉu vi nun povas legi la leteron.»

## **Kie Estas la Kato?**

Foje Afanti portis hejmen tri ĝinojn da viando kaj petis sian edzinon fari el ĝi bongustajn pasteĉetojn por la vespermanĝo.

La edzino tamen fritis la viandon kaj mem ĝin formanĝis. Por la vespermanĝo ŝi prezentis al Afanti nur farunaĵon.

«Kial ne pasteĉetojn?» mire demandis Afanti.

«Ĉar la viandon ŝtelmanĝis la kato, kiam mi knedis la paston.»

Afanti tuj kaptis la katon kaj metis ĝin sur la pesilon. Li pesis ĝin. Ĝi pezis tri ĝinojn, ne pli nek malpli. Li turnis sin al la edzino: «Mia kara,» li demandis, «se tiom pezas la kato, kie do estas la viando? Se tiom pezas la viando, kie do estas la kato?»

## Aĉeti Oleon

Ĉiuj diris, ke Afanti estas la plej granda saĝulo en la mondo, sed lia edzino obstine opiniis, ke li estas la unua stultulo en 1a mondo. Iufoje la najbaroj kverelis kun ŝi: «Se vi opinias lin malsaĝa, bonvolu diri, kiajn stultaĵojn li faris.»

Ŝi respondis: «Multajn stultaĵojn li jam faris, sed mi rakontos nur unu el ili. Vi tamen certe konvinkiĝos.»

La najbaroj diris: «Bone, se vi diros prave, ni konfesos nian malvenkon.»

«Ho!Vi certe malvenkos.» Sekve ŝi rakontis okazaĵon de antaŭ kelkaj tagoj. Nasrudin rondvizitis estere longan tempon, sed fine iun tagon li revenis hejmen. Tuj kiam li paŝes trans la sojlon, mi severe riproĉis lin: 'Longlanga pigo! Ĉu vi ankoraŭ rekonas vian neston?' Vi ĉiuj scias, ke Nasrudin antaŭ la bienulo estas tigro, sed antaŭ mi li estas obeema ŝafo. Kvankam mi jam riproĉis lin, li ankoraŭ obeeme riverencis profunde antaŭ mi kaj senĉese min benis. Poste li ridante diris: 'Mia kara alaŭdeto, ĉu mi ne jam revenis nun?' Aŭdinte tion, mia kolero tuj kvietiĝis, kaj mi kiel movlerta alaŭdo rapide alflugis al liaj etenditaj brakoj. Mi fermis la okulojn kaj pensis: 'Kiel feliĉa mi estas, ke Alaho donacis al mi tiel bonan edzon.' Sed post nelonge li denove kolerigis min pro tio, ke li subite memoris iun aferon komisiitan de alia kaj senĉese murmuris pri ĝi. Li eĉ ne aŭdis, ke mi parolas al li. Tio estis malbona aŭguro, ke li refoje forflugos de mi. Tial mi haste enmetis en lian manon olebovlon kun iom da moneroj kaj petis lin iri aĉeti iom da oleo.

«Mi intencis rompi lian pensadon por restigi lin hejme. Sed survoje li ŝajne ankoraŭ pensadis pri la afero kaj eĉ kiam la olevendisto enverŝis oleon en la bovlon, li ankoraŭ okupis sian kapon per ĝi». La bovlo estis rapide superplenigita pro lia malatento, sed ankoraŭ restis iom da oleo enverŝota. La vendisto do demandis: 'Sinjoro Afanti, kien enverŝi la reston? Nasrudin traserĉis sin, sed nenion trovis, kio povus enteni ĝin. Li tiam renversis la bovlon de oleo kaj, montrante la kavan malsupron, diris: «Enverŝu ĉi tien!» La oleo en la bovlo tute elverŝiĝis teren. Ĉiuj ĉirkaŭe eksplodis per ridego; sed Nasrudin, ankoraŭ montrante al la kava malsupro, stulte ripetis: «Enverŝu! Enverŝu!» La vendisto povis nur enverŝi la oleon en la kavan malsupron de la bovlo.

«Kiam Nasrudin revenis hejmen, mi estis tre surprizita de tio kaj demandis: 'Kial vi aĉetis nur tiel malmulte da oleo per tiel multe da mono?' Nasrudin respondis: 'Ne, estas pli ĉi tie.' Tiam li ree renversis la bovlon, tiel ke ankaŭ la oleo en la kava malsupro elverŝiĝis teren...»

La najbaroj ridegis, tiel ke iliaj ventroj preskaŭ krevis, kaj ili ĉiuj devis forviŝi la elverŝitajn larmojn de ridego. La edzino de Afanti, ekkaptante la ŝancon, demandis: «Ĉu en la mondo troviĝas ankoraŭ pli granda stultulo ol li?»

Post la ridego la najbaroj ankoraŭ ne volis akcepti ŝian opinion, sed trovis multajn vortojn por senkulpiĝi Afanti: «Li ne estas stultulo. Li tion faris pro tio, ke lin distras la komizio de alia homo. Se vi tion ne kredas, demandu sinjoron Nasrudin, pri kio li tiam pensis? Se li ne pensis pri io tia, ni estos konvinkitaj.»

La edzino ne plu diskutis kun la najbaroj pri tio, ĉu Afanti estas saĝulo aŭ stultulo, ĉar ŝi sciis pli bone ol iu ajn. Kvankam ŝi ofte riproĉis sian edzon, nomante lin pigo nevolante reveni nesten; tamen kiam oni laŭdis ŝian edzon, neniu estis pli goja ol ŝi.

## **Donaco Falinta de la Ĉielo**



Afanti estis tre malriĉa kaj havis multajn infanojn.

Ili ofte suferis pro malsato kaj devis sin vesti en ĉifonaĵoj. Luvespere li elpensis ruzaĵon kaj tuj poste sin direktis al la muro de la najbara bienulo, kiu kutimis ripozi post ampleksa vespermanĝo. Afanti petkriis al la ĉielo: «Ho, mia Alaho! Donu al malriĉulo nur milon da arĝentaj moneroj el via neelĉerpebla trezoro! Tiel malmulte ne malpliigos vian riĉaĵon. Sed se vi avare donos al mi eĉ unu moneron malpli, mi tamen tion ne akceptos.»

La bienulo, kiu ĉiam ekspluatis kaj subpremis la malriĉulojn laŭplane, aŭdis la vortojn kaj intencis amuzi sin per provo al Afanti. Li alportis el sia monkestego kaj trans la muron ĵetis al Afanti monsakon, en kiu li metis naŭcent naŭdek naŭ arĝentajn monerojn. Poste li grimpis sur la tegmenton por observi, kion faras Afanti.

Afanti, kiu trankvile sidis atendente kun sia dorso apogata al la muro, subite aŭdis, ke falis iu pezaĵo kun bruo de interfrapiĝantaj moneroj. Li tuj alkuris kaj trovis la monsakon. Kalkulinte, li rimarkis, ke ĝi entenas je unu monero malpli ol mil. Afanti ŝajnigante ĉie serĉis ĝin, sed vane. Poste li laŭte kriis: «Mia Alaho, vi volis doni al mi mil arĝentajn monerojn, sed pro via okupiteco al vi mankis la tempo por, ilin ĉiujn kalkuli. Certe tial en la sako estas nur naŭcent naŭdek naŭ moneroj. Mi devas ne koleri kontraŭ vi kaj povas nur danke akcepti la tuton de via donaco.» Tion dirinte, Afanti kun granda ĝojo 62 kuris en sian dometon kaj enŝlosis la donacon falintan de la ĉielo en sia kesto.

Kiam la bienulo staranta sur la tegmento aŭdis la vortojn kaj vidis, ke Afanti forportas la sakon, li preskaŭ svenis pro kolero. Li tuj alkuris pugnofrapi la pordon de Afanti. Afanti, kiu pretigis sin por enlitiĝo, malfermis la pordon kaj, rekoninte la bienulon, diris: «Bonvenon! Bonvenon! Kvankam estas tre malfrue, tamen permesu al mi regali vin!»

La bienulo koleris: «Mi ne bezonas vian regalon, vi elprenu la monsakon!»

Ankaŭ Afanti ekflamiĝis: «Sinjoro bienulo, Alaho opiniis min kompatinda kaj donacis al mi la sakon da mono. Ĉu vi volas forrabi ion, kio ne apartenas al vi?»

Kun ploromieno la bienulo, retenante sian koleron, respondis: «Vi asertis, ke vi ne akceptos malpli ol plenan milon da moneroj. Mi intencas provi vian vorton. Tial mi ĵetis apud vin la sakon kun naŭcent naŭdek naŭ arĝentaj moneroj. Ĉio estis nur ŝerco, nun tuj redonu al mi la monon.»

Ŝajnigante sin ŝokita, Afanti respondis: «Via Bienula Moŝto, bonvolu ne fari tian malseriozaĵon. La monon mi plore petis de la kompatema Alaho, kaj Alaho donis al mi kun granda kompatato. Ĉu vi volas nun forpreni ĝin?»

«Malsaĝulo, Alaho neniel kompatas vin malriĉulon kaj neniam ĵetas de la ĉielo mil monerojn.»

«Ĉe Alaho certe venos reago, se nur estas peto. Se vi ne kredas tion, bonvolu foriri.» Pum! Afanti forte batfermis la pordon.

La bienulo estis sufokata pro kolero kaj, frapante sian kapon, malesperis: «Mi falis en fatalon.» La sekvan tagon la bienulo refoje iris al Afanti por tiri lin al loka juĝisto. Afanti protestis: «La oficejo de la juĝisto estas tiel malproksima, ke mi ne povas tien piediri.» La bienulo kontraŭvole devis tiri el sia stalo grandan ĉevalon kun preta selo. Vidinte tion, Afanti denove protestis: «Mi estas vestita tiel ĉifone, ke mi ne povas rajdi sur tia altvalora ĉevalo, mi ne iras.» Tion dirinte, Afanti ekreiris hejmen. La bienulo tuj haltigis lin kaj demetis sian brokajan palton por lin vesti.

Kiam ili atingis la juĝejon, la juĝisto vidis, ke Afanti sin vestis en tiel bela brokaĵa palto kaj rajdis sur tiel bela ĉevalo, kaj li prenis Afanti por nobelo. Tial li invitis Afanti okupi la honoran lokon kaj ignoris la bienulon.

La bienulo prezentis akuzoskribon al la juĝisto, petante repreni la sakon da moneroj. La juĝisto demandis al Afanti: «Sinjoro, kion

vi opinias pri lia plendo?»

Afanti kun la manoj en la manikoj respondis: «Saĝa juĝisto, ĝi estas senkaŭza provoko. Mi preĝis al Alaho, kaj Alaho simpatie donacis al mi naŭcent naŭdek naŭ arĝentajn monerojn.»

La juĝisto plu demandis: «Ĉu vi ne aŭdis la vortojn de la akuzanto?»

Afanti diris: «Sinjoro juĝisto, ĉu ĉi mia najbaro estas fifama kanajlo. En la tuta mondo tia aĉulo estas malofte trovebla. Li kalumnias senkulpulon por profitaĉi el tio. Se vi ne kredas, bonvolu atenti, ke li ankoraŭ eĉ pretendos, ke la ĉevalo, sur kiu mi rajdis ĉi tien, kaj la palto, kiun mi portas, ambaŭ apartenas al li.»

Tion aŭdinte, la bienulo tuj furioziĝis kaj protestis, ke efektive la ĉevalo kaj palto apartenas al li.

Afanti ankoraŭ kun la manoj en la manikoj komentis: «Ĉu tion vi aŭdis? Mi jam antaŭvidis, ke tion li nepre diros. Nun li verŝajne diros, ke ankaŭ via palto apartenas al li. Jen kia senhonta fripono!»

La juĝisto vere kredis Afanti kaj forpelis la bienulon. Kiam Afanti estis preta foriri, jam dirinte ĝentilajn vortojn, la juĝisto haltigis lin kaj, karesante sian barbon, diris: «Venu proksimen al mi.» Post kiam Afanti alproksimiĝis al li, li murmuris al Afanti: «La mono, kiun vi gajnis, ankoraŭ estas iom problema.»

«Kiel problema?» mire demandis Afanti.

«Estas strange, ke tiel peza monsako falis el la ĉielo. Alportu al mi la sakon kun la moneroj. Vin mi kredos, nur post kiam mi vidos la sakon,» respondis la juĝisto.

«Konsentite, sinjoro,» diris Afanti kaj reiris hejmen. Survoje li pensis, «Se mi alportos la sakon al la juĝisto, la monon li certe konfiskos.» Tial li kolektis naŭcent naŭdek naŭ ŝafajn fekbuletojn

de la tero kaj metis ilin en la sakon. Poste li alportis kaj prezentis ĝin al la juĝisto.

Per tremantaj manoj la juĝisto tuj volis malligi la ŝnuron. Afanti intermetis: «Ne hastu, sinjoro.» Sed la 65 juĝisto jam malligis la ŝnuron kaj malpacience elŝutis la ŝaffekaĵon sur tapiŝon. Sekve li indigne kriis: «Ha fi, kio estas tio? Ĉu vi prenas min por stultulo?»

Afanti kapskuante diris: «Ho ve! Malbone, malbone! Bedaŭrinde, ke vi fuŝis la aferon. Mi ĵus vin atentigis, ke vi ne hastu, sed vi ne volis aŭskulti min.»

«Kion vi celas?»

«Mi celas, ke antaŭ ol malligi la ŝnuron, oni unue devas preĝi al Alaho. Kiel oni povas subtaksi la donacon donitan de Alaho? Rigardu, ke la moneroj fariĝis fekaĵo. Ve! Tio estas vera fatalo.»

Afanti faris longan ĝemon kaj eliris el la oficejo de la juĝisto. Sed la juĝisto gapis antaŭ la ŝaffekaĵo sur la tapiŝo.

## **Neniu Scias Nun**

Kiam Afanti mem fariĝis loka juĝisto, multaj homoj konkuris amikiĝi kun li. Iu laŭdis lin. «Nasrudin, vi estas tre admirinda, ke vi havas tiom da amikoj!»

Afanti respondis: «Kiom da amikoj mi havas, neniu scias nun. Nur post kiam mi ekŝiĝos de la juĝisteco, oni povos ekscii, kiuj vere estas miaj amikoj.»

## **Preni Azenon kiel Modelon**

En la ĉefurbo Afanti klaĉis al urbanoj, ke lia azeno estas pli saĝa ol la ĉefministro. Kiam la vortoj atingis la ĉefministron, li tuj sendis soldatojn kapti Afanti kaj tiri lin antaŭ la reĝon, al kiu li akuzis, ke Afanti kalumnias lin, kaj postulis severan punon al Afanti.

La reĝo indigne demandis al Afanti: «Ĉi tio estas grava afero. Se vi ne povos pruvi vian aŭdacan aserton, mi senkapigos vin.»

«Kompreneble!» konsentis Afanti. «Foje mi, rajdante sur mia azeno, transpasis lignan ponteton. Unu kruro de la azeno hazarde enfalis en trueton sur la ponto, tiel ke la besto stumblis. Sed ĝi fine, kvankam pene, eltiris la kruron. Baldaŭ mi revenvoje rajdis sur mia azeno trans la saman ponton. Kion vi supozas?Ĉi-foje mia azeno ĉirkaŭpasis la trueton, tiel ke ĝia transiro okazis sen akcidento. Sed koncerne vian ĉefministron, li multfoje ŝtelis monon el la ŝtata trezorejo, kaj civitanoj ja multfoje denunciis lin pro lia ŝtelado. Li tamen ankoraŭ etendas sian grasan manon en la regnan kason. Via reĝa Moŝto, ĉu mia azeno ne estas pli saĝa ol via ĉefministro?»

La imperiestro ridegis. «Ĝi estas pli saĝa,» li diris kaj poste admonis sian ĉefministron, «Aŭfand pravas. Vi prenu la azenon de Afanti kiel vian modelon.»

## **Ĝi Diris, ke...**

Afanti fanfaronis, ke li bone komprenas la birdan lingvon. Lia aserto atingis la orelojn de la reĝo, kiu iun tagon invitis Afanti ĉasi kune kun li. Survoje ili subite aŭdis kelkan ululadon de strigo, kiu staris ĉe preskaŭ defalonta kaverno. La reĝo demandis al Afanti, kion ĝi diris.

Afanti respondis: «Ĝi diris, ke se la reĝo daŭre subpremados senkompate la popolon, lia regno baldaŭ disfalos same kiel ĝia nestaĉo.»

## **Ne Aŭskultu la Edzinon**

En la ĉefurbo la reĝo publikigis dekreton, sur kiu legiĝis, ke en la limo de tri tagoj ĉiu familio en la tuta urbo devas senkompense donaci al la kortego unu grasan ŝafon.

Krome, pro kverelo kun sia edzino, la reĝo proklamis, ke la edzoj devas ne aŭskulti sian edzinon. Ĉiu malobeo alportos severan punon.

En la tri tagoj ĉiu familio en la tuta urbo sendis al la kortego unu grasan ŝafon. Nur Afanti nenion sendis.

La kvaran tagon la reĝo venigis Afanti kaj kun murdema minaco demandis lin: «Afanti, damninda! Kie estas via ŝafo?»

«Via Reĝa Moŝto,» trankvile diris Afanti kun rideto, «post kiam mi legis la dekreton, mi reiris hejmen kaj konsiliĝis kun mia edzino. Ŝi insistis, ke ni donu. Sed Via Moŝto ankaŭ ordonis, ke edzo devas ne aŭskulti sian edzinon, tial mi ne alsendis ŝafon.»

## **Kulpo de la Hundo**

Unu vesperon Afanti, surdorse portante brullignon, piediris hejmen. Kiam li preterpasis la pordon de iu bienulo, subite elkuris feroca hundo, kiu ĵetis sin al lia kapo. Afanti devis tuj eltiri sian hakilon kaj per ĝi celis la kapon de la hundaĉo. Tiel la hundo estis mortigita per la unua hako. Aŭdinte la bruon, ankaŭ la bienulo mem elkuris kaj, kaptinte Afanti, kolere demandis: «Kiam la hundo sin ĵetis al vi, ĉu vi ne povis bati ĝin per la tenilo de via hakilo anstataŭ la klingo?»

«Via Bienula Moŝto, kiel maljusta vi estas!» respondis Afanti. «Se via hundaĉo sin ĵetus al mi kun la postaĵo antaŭen, mi kompreneble batus ĝin per la tenilo. Sed ĝi alkuris kun la dentaro antaŭen, tial mi povis nur trakti ĝin per la klingo de mia hakilo. Tio estis la kulpo nur de via hundo.» Tion dirinte, Afanti foriris surdorse portante sian brullignon.

## **Morti Du Tagojn Pli Frue ol Vi**

Afanti akiris reputacion pro sia aŭgurado kaj iun tagon ŝerce diris al la ĉefministro, ke li mortos morgaŭ.

La sekvan tagon la ĉefministro falis de sur ĉevalo kaj efektive mortis. Kiam la reĝo tion eksciis, li eksplodis de kolero kaj tuj sendis soldatojn kapti Afanti. Li kolere demandis: «Afanti, mia ĉefministro mortis pro via malbena, do se vi ne povos antaŭdiri al mi, en kiu tago vi mem mortos, vi ricevos severan punon.»

«Mi bedaŭrinde ne scias precize,» respondis Afanti. «Mi nur scias, ke mi mortos du tagojn pli frue ol vi.»

Aŭdinte tion, la reĝo pensis, ke plej secure estus lasi Afanti vivi kiel eble plej longe.

Tial li liberigis Afanti.

## **Kokovendo**

Unu tagon, Afanti portis al foiro la grandan kokon, kiun li mem bredis, kaj ĝin forvendis. Kiam li kalkulis la ricevitan monon, iu ĝemante diris:

"Ve, Afanti! Vi forvendis vian kokonon kvazaŭ por nenio; laŭ sia vosto ĝi ja povas meti tri ovojn ĉiutage."

Enmetinte la monon en sian poŝon, Afanti respondis:

"Kara amiko, se vi jam vidis la voston de la koko, bonvolu vidi ankaŭ la kapon. Se mi ne havas malsanajn okulojn, nek estas freneza, mi kredas ke mi certe ne faris eraron forvendante mian virkokon povantan meti tri ovojn ĉiutage."

## **Ĉevalorajdo**

Afanti estis invitita gastigi ĉe sia intima amiko. Post festeno li rajdis hejmen sidante dors-al-fronte sur la ĉevalo.

La ĉevalo portis Afanti al la hejmo kaj haltis antaŭ la pordo. Ĉe vido de tio lia edzino, povante nek plori, nek ridi, kriis laŭte:

"Honto, Honto, Afanti! Kion vi faras! Ĉu vi ne scias honti? Ĉu vi ne hontas tiel rajdi? Pro kio vi sidas sur la ĉevalo en inversa direkto?"

"Kiu diras ke mi sidas sur la ĉevalo en inversa direkto?" diris Afanti. "Fakto estis: kiam mi surĉevaliĝis, ĝi mem staris en inversa direkto."

## **Glavo kaj Fajrostango**

Afanti vagadis en foiro, jen li vidis subite iun alvenantan kun glavo en sia mano.

"Kiom kostas ĉi-tiu glavo?" Afanti demandis.

"Dek arĝentajn ingotetojn," la homo respondis.

"Tro multe! tro multe!"

"Jes, la prezo estas alta, sed mia glavo havas unikan kvaliton: Kiam vi pikas lupon per ĝi, ĝi mem etendiĝos antaŭen je cent futoj."

Palpante sian frunton Afanti diris: "Mem etendiĝi antaŭen je cent futoj, tio ne estas tiom mirinda. Kiam mia edzino ekkoleras, kaj batas min per fajrostango, ĝi povas etendiĝi antaŭen per si mem je ducent futoj por atingi mian kapon."

## **Ĉasisto**

Iu ĉasisto demandis al Afanti: "Mi ĉasis jam de multaj jaroj, Afanti, sed mi ankoraŭ ne komprenas, pro kio la ĉasistoj fermas unu okulon kaj malfermas la alian, kiam ili celas kaj pafas per sia pafilo."

"Ankaŭ vi devas agi same, malfermante unu kaj fermante la alian," diris Afanti. "Se vi fermus ambaŭ viajn okulojn, vi povus nenion vidi."



## Farado de Fajro

Iun tagon, kiam la edzino ne estis hejme, Afanti volis mem prepari teon por si. Sed malgraŭ ekbruligoj kaj blovado, li ne sukcesis fari fajron. Nenion plu povante fari, li eniris en la ĉambron kaj revenis en la vesto de sia edzino -- sed jen fajro jam ekbrulis.

"He! ci daŭre ne ekbrulu por mi!" Afanti diris, "ci do timas mian edzinon!"

# TRI NOVELOJ

Mark Twain

Esperantigis EDWIN GROBE

## KONFESO DE MORTANTO

Ni alproksimiĝis vilaĝon Napoleonon en ŝtato Arkansaso. Tial mi komencis pripensi mian tiean taskon. La horo: tagmezo. La vetero: hela kaj suna. Tio estis malbona. Almenaŭ, ne bonega. Ĉar mia tasko ne estis (*laŭprefere*) tagmeza speco. Ju pli mi meditis, des pli tiu fakto sin trudis al mi – jen unuforme, jen aliforme. Finfine ĝi prenis la formon de preciza demando. Ĉu estas bonsence plenumi la taskon dumtage kiam, vin senigante je iom da komforto kaj inklino, vi povas elprofiti la nokton por tio, sen scivolemaj gvatokuloj? Tio decidis la aferon.

Klara demando kaj klara respondo konsistigas la plej mallongan elirejon por la plejmulto da konfuzaĵoj.

Mi kunvenigis miajn amikojn en mia kajuto kaj diris ke mi bedaŭras esti ĝenon kaj malesperon sed ke, post meditado pri la afero, laŭŝajne estos pli bone ke ni alborderu niajn bagaĵojn kaj vizitu Napoleonon. Ilia malaprobo estis tuja kaj laŭta; ilia lingvaĵo, ribelema. Ilia ĉefa argumento estis tiu kiu ĉiam malmergiĝas la unua en tiaj okazoj, ekde la komenco de tempo. "Sed vi elektis kaj antaŭkonsentis resti sur ĉi tiu boato," ktp.; kvazaŭ, decidiĝinte fari malsaĝaĵon, laŭ nepre neceso oni restu sur la sama vojo kaj aliigi ĝin en du malsaĝaĵojn per la plenumo de la komenca decidiĝo. Mi utiligis diversajn taktikojn por mildigi ilian sintenon, kun sufiĉe bona sukceso. Rezulte de tiu kuraĝigo mi plimultigis miajn klopodojn. Kaj por komprenigi al ili ke ne estis mi kiu postulis la plenumon de la koncerna taskaĉo kaj ke mi nepre senkulpas pri la afero,

mi baldaŭ ekkuraĝis rakonti ties historion, preskaŭ samvorte kiel mi ĉi-poste raportas.

Ĉirkaŭ la fino de la pasinta jaro mi pasigis kelkajn monatojn en Munkeno, en Bavario. En novembro mi loĝis en la pensiono de Fraŭlino Dalvejnero, ĉe numero 1 de Karlostrato. Sed mia laborejo situis unu mejlon for, en la domo de vidvino sin vivtenanta per gastigado. Ŝi kaj ŝiaj du junaj infanoj kutimis veni ĉe mi ĉiun matenon kaj kunbabiladi en la Germana – responde al mia peto. Unu tagon, dum mi vagpromenadis en la urbo, mi vizitis unu el la du lokoj kie la registaro retenas kaj prizorgas kadavrojn ĝis la kuracistoj certas ke tiuj finmortis kaj ne daŭre vivas en tranca stato. Estis makabra loko, tiu ĉambrego. Vidiĝis tridek ses plenkreskulaj kadavroj, sternite surdorse sur iom oblikvangelaj tabuloj en tri longaj vicoj – kaj havante ĉiuj vaksoblankajn rigidajn vizaĝojn sub la blankaj mortotukoj volvitaj ĉirkaŭ ili. Laŭ la flankoj de la ĉambro estis profundaj orielaspektaj alkovoĵoj kaj en ĉiu el tiuj kuŝis pluraj marmormienaj beboj, entute kaŝite kaj enterigite sub tavoloj da freŝaj floroj krom siaj vizaĝoj kaj interfalditaj manoj. Ĉirkaŭ fingro de ĉiu el tiuj kvindek senmovaj formoj, grandaj kaj malgrandaj, estis ringo. Ekde la ringo, drato etendiĝis ĝis la plafono kaj de tie ĝis sonorileto en tiea kontrolĉambro kie, tage kaj nokte, kontrolisto sidas ĉiam en vigla atendado, preta alvenigi eksaltan urĝohelpo al iu ajn ano de tiu palvanga kompanio kiu, vekiĝinte el la morto, estigas korpomovon – ĉar ĉiu movo, eĉ la plej minimuma, agitos la draton kaj sonigos tiun timindan sonorileton. Mi imagis min mortosentinelo kiu dormetis en nepra tiea soleco en tre malfrua horo dum malrapidege evoluanta gvatdeĵorado de iu muĝventega nokto kaj eksentis sian korpon aliiĝi palpebrumtempe en tremetantan ĵeleon pro la subita bruaĉo de tiu terura alvokilo!

Tial mi enketis pri tiu aĵo, demandis kio kutime okazas? Ĉu la gvatisto mortis kaj la revivinta kadavro alvenis por komfortigi kiel eble plej multe liajn lastajn momentojn? Sed oni riproĉis al mi mian klopodon nutri sencelan kaj senvaloran scivolemon en tiel solena kaj funebra loko. Kaj mi foriris tre humiligite.

La sekvintan matenon mi rakontadis mian aventuron al la vidvino kiam ŝi ekkriis:

"Venu kun mi. Mi havas loĝanton kiu rakontos al vi ĉion kion vi deziras ekscii. Li estis noktosentinelo tie."

Li estis vivanta homo sed ne havis vivantan aspekton. Li kuŝis surlite kaj altaj kusenoj subtenis lian kapon. Lia forvelkinta vizaĝo estis senkolora. Liaj profunde sinkintaj okuloj estis fermitaj. Lia mano, kuŝante sur lia brusto, estis ungegaspekta, tiel osta kaj longfingra ĝi estis. La vidvino komencis min prezenti. La okuloj de la viro malfermiĝis malrapide kaj briletis malice el la krepusko de siaj kavernoj. Li kuntiris nigre la brovojn. Li levis la maldikan manon kaj entreprenis nin forsendi per ordonema gesto. Sed la vidvino daŭre parolis ĝis eksciigi al li la fakton ke mi estas fremdulo kaj Usonano.

La mieno de la viro tuj ŝanĝiĝis, pliheliĝis, eĉ avidiĝis – kaj en la sekvinta momento li kaj mi ekĝuis kunan solecon.

Mi komencis paroli en roksolida Germana lingvo. Li respondis en ege fleksebla Angla lingvo. Post tio ni nepre flankenlasis la Germanan.

Tiu ftizulo kaj mi intime amikiĝis. Mi vizitis lin ĉiun tagon kaj ni parolis pri ĉio. Almenaŭ pri ĉio krom edzinoj kaj infanoj.

Se menciigis la edzino aŭ la infano de iu ajn, ĉiam postokazis tri fenomenoj: la plej afabla kaj amema kaj dolĉa lumo briletis en la okuloj de la viro dum momento; en la sekvinta momento la lumo forpaliĝis kaj ĝin anstataŭis tiu minaca mieno jam ekflaminta tie kiam mi vidis liajn okulojn malfermiĝi la unuan fojon; triavice, li ĉesis paroli tie kaj tiam por tiu tago, restis senparole daŭre enlitiĝite, perдите en abstrakta kaj absorbita pensado, laŭŝajne aŭdante nenion kion mi diris, malatentante miajn adiaŭojn, kaj evidente prikonsciis nek vide nek aŭde pri mia foriro el la ĉambro.

Kiam mi jam estis dum du monatoj la ĉiutaga kaj sola intimulo de tiu Karolo Ritero, li diris abrupte ion tagon:

"Mi rakontos al vi mian historion."

Tiam li daŭrigis kiel jenas:

\* \* \*

Mi neniam rezignis antaŭ nun. Sed nun mi rezignas. Mi estas mortonta.

Mi finkonkludis hieraŭnokte ke devas okazi tiel kaj, aldone, ege baldaŭ. Vi diras ke vi celas reviziti vian riveron iun tagon kiam la okazo prezentiĝos. Nu, bonege. Tio, kune kun stranga sperto kiun hazarda sorto okazigis al mi hieraŭnokte, devigas min rakonti al vi mian historion – ĉar vi vidos vilaĝon Napoleonon en Arkansaso kaj por mia bono vi haltos tie kaj plenumos taskon por mi – taskon kiun vi entreprenos bonvole post aŭskulti mian rakonton.

Ni mallongigu la rakonton kie ajn eblas ĉar ĝi estas longa kaj bezonos mallongigon. Vi jam scias kiel okazis al mi aliri Amerikon kaj kiel mi decidiĝis ekloĝi en tiu soleca regiono de la Sudo. Sed vi ne scias ke mi havis edzinon. Mia edzino estis juna, belega, amema, kaj, ho! tiel die bona kaj senkulpa kaj milda. Kaj nia filineto estis miniatura kopio de sia patrino. Tio estis la plej feliĉa el ĉiuj feliĉaj hejmoj.

Unu nokton – okazis ĉirkaŭ la fino de la milito – mi vekiĝis el ebria stuporo kaj min trovis manligita kaj buŝstopita dum la ĉirkaŭanta aero estis malpurigita per kloroformo. Mi vidis du virojn en la ĉambro kaj unu el ili diris al la alia en raŭka frustrado: "Mi \_diris\_ al ŝi ke mi faros tion se ŝi faros bruon, kaj rilate al la infano – "

La alia viro interrompis en mallaŭta duonplora voĉo:

"Vi diris ke ilin ni nur buŝstopos kaj prirabos, ne difektos, alie mi ne konsentintus alveni."

"Ĉesu plendaĉi. \_Necesis\_ ŝanĝi la planon kiam ili vekiĝis. Vi faris \_vian\_ plejon por ilin protekti. Nun tio vin kontentigu. Venu, helpu

serĉfosadi."

Ambaŭ viroj surportis maskojn kaj krudajn ĉifonajn "nigrul"-specajn vestaĵojn. Ili havis celpunktan lanternon helpe de kies lumo mi konsciis ke al la dekstra mano de la pli milda el la du rabistoj mankas dikfingro. Ili serĉfosadis hazardacele en mia malriĉa loĝejo dum momento. La ĉefbandito diris tiam en teatra flustrado:

"Tio estas tempomalŝparo. Li malkaŝu kie ĝi estas kaŝita. Forigu lian buŝŝtopilon kaj lin revigligu."

La alia diris:

"Bone. Kondiĉe ke ne okazu klabado."

"Sen klabado estu, tial. Kondiĉe ke li daŭre silentu."

Ili min alproksimiĝis. En tiu momento aŭdigis eksterdomaj sonoj, sonoj de voĉoj kaj hufotretado. La rabistoj retenis la spiradon kaj aŭskultis. Malrapide la sonoj pli kaj pli proksimiĝis. Tiam eksonis kriego:

"\_Saluton\_, la domo! Vidigu lumon. Ni deziras akvon."

"La voĉo de la kapitano, per Dio!" diris la teatre flustrinta brutulo, kaj ambaŭ banditoj forfuĝis pere de la malantaŭpordo, malŝaltante sian lanternon dum la kurado.

La fremdulo alvokis plurajn pluajn fojojn, tiam preterrajdis – estis laŭŝajne dekduo da ĉevaloj – kaj nenion pluan mi aŭdis.

Mi luktis sed ne sukcesis min liberigi el miaj ligoj. Mi klopodis paroli sed malhelpis tion mia buŝŝtopilo. Mi kapablis eligi nenian sonon.

Mi serĉaŭskultis la voĉojn de miaj edzino kaj infano – aŭskultis longe kaj atentege. Tamen nenia sono eliris la alian ekstremaĵon de la ĉambro kie staris ilia lito. Tiu silento pli kaj pli aĉiĝis, pli kaj pli minaciĝis, en ĉiu momento. Ĉu vi opinias povinti toleri horodaŭron

da tiaĵo? Kompatu min tial, al kiu necesis toleri trihoran daŭron. Ĉu trihoran? Trieternecan, diru! Kiam ajn eksonis la horloĝo ŝajnis ke jam forpasis jaroj ekde kiam mi aŭdis ĝin la antaŭan fojon. Dum la tuta tempo mi baraktis en miaj ligoj kaj finfine, ĉirkaŭ la nova tagiĝo mi min liberigis kaj ekstreĉis miajn rigidajn membrojn.

Mi povis distingi detalojn iom bone. Disrubis la plankon aĵoj tien ĵetitaj per la ŝtelistoj dum ili serĉis miajn ŝparmonojn. La unua objekto kaptinta mian apartan atenton estis dokumento mia kiun mi vidis ekrigardi kaj tiam forĵeti la pli krudan el la du brutuloj. Sango ĝin makuligis. Mi atingis stumblapaŝe la alian ekstremaĵon de la ĉambro.

Ho, kompatindaj, senofendaj, senhelpaj estuloj, tie ili kuŝis. Jam forpasis iliaj ĉagrenoj. Nur komenciĝis la miaj.

Ĉu mi apelaciis al la juro? Ĉu mi? Ĉu satiĝas la soifo de la malriĉulo se la reĝo trinkas por li? Ho, ne, ne, ne! Mi deziris nenian impertinentan sintrudon de la juro. Leĝoj kaj la pendumilo ne povus kontraŭpagi la ŝuldoprezon kiun mi rajtis ricevi. La juro lasu sentime al mi la tiurilatan respondecon. Mi malkovrus la ŝuldanton kaj kolektus la ŝuldon. Kiel efektiviĝi tion, ĉu vi diras? Kiel efektiviĝi tion kaj tiom ekcerti pri ĝi se mi neniam vidis la vizaĝojn de la ŝtelistoj nek aŭdis iliajn kutimajn voĉojn nek konceptis ununuran ideon pri kiuj ili povus esti? Malgraŭ tio tamen mi estis jes ja certa – ege certa, ege memfida. Mi disponis indicon – indicon kiun vi taksintus senvalora – indicon kiu ne multe helpintus eĉ detektivon pro tio ke mankus al li la sekreto pri kiel ĝin apliki. Mi parolos pri tio baldaŭ. Vi vidos. Ni daŭrigu nun, konsiderante la aferon en taŭga ordo. Por komenci estis cirkonstanco kiu disponigis al mi precizdirektan vidpunkton. Tiuj du rabistoj estis klarŝajne soldatoj trompvestitaj kiel vagabondoj, kaj ne novvenitaj al milita servado sed spertaj pri ĝi – konstantuloj, eble. Ili ne akiris siajn soldatajn sintenon, gestojn, starpozojn en unu tago, nek en unu monato, nek en unu jaro.

Tiel mi opiniis, sed nenion diris. Kaj unu el ili diris, "La voĉo de la kapitano, per Dio!"—la viro mem kiun mi deziris senvivigi. Du mejlojn for tendumis pluraj regimentoj kaj du kompanioj de Usona kavalerio.

Kiam mi eksciis ke Kapitano Blakelio de Kompanio C preterpasis nin dum la nokto kun eskorto, mi diris nenion sed decidiĝis serĉi mian viron en tiu kompanio. Dum diversaj konversacioj studeme kaj obstine mi priskribis la rabistojn kiel vagabondojn, kampadejo-parazitulojn. Kaj inter tiu socia klaso miaj kunkonversaciintoj serĉis vane, ĉar nur mi suspektis la soldatojn.

Laborante pacience dumnokte en mia afliktita hejmo, mi fabrikis kamuflaĵon por mi el diversaj vestaĵpecoj kaj – eroj. En la plej proksima vilaĝo mi aĉetis paron da bluaj ŝirmvitroj. Post kelke da tempo, kiam la milita kampadejo disiĝis kaj Kompanio-C-on oni forsendis cent mejlojn norden, al Napoleono, mi kaŝis mian etan monprovizon en mia pantalonzono kaj efektivigis mian foriron dum la nokto. Kiam Kompanio C atingis Napoleonon mi estis jam tie. Jes, mi estis tie – kun nova metio: sortodivenisto. Dezirante ŝajni egalpartia, mi amikiĝis kaj divenis sortojn inter ĉiuj kompanioj tie garnizonigitaj. Tamen mi atentis plejparte pri Kompanio C. Mi min komplezemigis senlime inter tiuj apartaj viroj. Ili petis de mi nenian komplezon, starigis antaŭ mi nenian minacon kiujn mi malakceptis. Mi fariĝis bonvola viktimo de iliaj ŝercoj. Tio pligrandigis mian popularecon. Mi fariĝis favorato.

Baldaŭ mi trovis soldaton al kiu mankis dikfingro. Kian ĝojon tio havigis al mi! Kaj kiam mi ekcertis ke nur li, el ĉiuj kompanianoj siaj, perdis dikfingron, malaperis mia lasta dubo. Mi certegis suresti la ĝustan spurvojon. La viro nomiĝis Krugero. Li estis Germano. Estis naŭ Germanoj en la kompanio. Mi kontrolgvatadis por ekscii kiuj estas liaj intimuloj, sed laŭŝajne li havis neniajn apartajn amikojn.

Tamen intimulo lia estis mi kaj mi prizorgis kreskigi la rilaton.

Kelkfoje mi tiel sopiris al venĝo ke mi apenaŭ sukcesis malhelpi min surgenuiĝi antaŭ li kaj petegi ke li fingremontru la viron mortigintan miajn edzinon kaj infanon sed mi ekscipovis bridi al mi la langon. Mi atendadis pacience kaj daŭre sortodivenis, laŭokaze.

Mia aparataro estis simpla: iom da ruĝa farbo kaj peceto da blanka papero. Mi farbis la malsupron de la klienta dikfingro, faris



surpaperan premaĵon de ĝi, ĝin studadis dum la nokto kaj sciigis lian sorton al li la sekvintan tagon. Kiun ideon mi nutris, efektivigante tian sensencaĵon? Jen ĝi estis. Kiam mi estis knabo mi konis maljunan Francon estintan provoso dum tridek jaroj kaj li diris al mi ke ĉiu homo havas unu trajton kiu neniam ŝanĝiĝas ekde la lulilo ĝis la tombo: la linioj sur la malsupra flanko de la dikfingro. Kaj li diris ke tiuj linioj neniam nepre samaspektas ĉe iu ajn homparo. Nuntagare ni fotas la novan krimulon kaj pendas lian bildon en la Kanajlo-Galerio por estonta referenco. Sed tiu Franco, dum sia aktiva laborkariero, kutimis fari premaĵon pri la dikfingra malsupraĵo de nova malliberulo kaj ĝin staplis por ebla estonta uzado. Li diris ĉiam ke bildoj senvaloras ĉar eventualaj kamuflovestaĵoj povas ilin senutiligi. "La dikfingro estas la ununura certaĵo," li diris. "Ĝi ne kamuflovesteblas." Kaj li kutimis pravigi sian teorion helpe de miaj amikoj kaj konatoj. Tio sukcesis ĉiam.

Mi daŭre sortodivenis. Ĉiun nokton mi min izoligis, en nepra soleco, kaj pristudis sub lupeo la dikfingrajn premaĵojn de la tago. Vi imagu la vorantan avidon per kiu mi okulkontrolegis tiujn labirintajn ruĝajn spiralojn, tenante apude tiun dokumenton surportantan la dekstramanajn dik- kaj alifingrajn premaĵojn de tiu nekonata murdinto, presitajn per la plej kara sango – por mi – iam defaligita sur ĉi tiu tero! Kaj foje kaj refoje necesis al mi ripeti la saman malnovan senkuraĝigan rimarkon: "Ĉu \_neniam\_ samaspektos ili?"

Sed finfine alvenis mia rekompenco. Ĝi estis la dikfingra premaĵo de la kvardektria viro de Kompanio C partopreninta en mia eksperimento:

Soldato Franzo Adlero. Unu horon antaŭe mi sciis nek la nomon nek la voĉon nek la figuron nek la vizaĝon nek la naciecon de la murdinto.

Sed nun mi sciis ĉiujn tiujn detalojn. Mi opiniis rajti certi pri la afero. La ripetitaj demonstradoj de la Franco estis mia rajtigilo. Tamen restis rimedo por ĉion \_nepre\_ certigi. Mi disponis pri premaĵo de la maldekstra dikfingro de Krugero. En la mateno

mi flankenapartigis lin dum lia maldeĵorado. Kiam ni staris ekster la vid- kaj aŭdkampo de eblaj atestontoj mi diris en impona maniero:

"Parto de via sorto estas tiel serioza ke mi juĝis esti pli bone ne malkovri ĝin al vi okaze de publika kunveno. Vi kaj cetera viro, kies sorton mi pristudis hieraŭnokte – Soldato Adlero – murdis virinon kaj infanon. Oni vin spuras. Antaŭ ol forpasos kvin tagoj oni murdos vin ambaŭ."

Li falis surgenuen, timigite ĝis frenezio. Kaj dum kvin minutoj li ade elverŝis la saman litanion, kiel demenculo, kaj en tiu sama duonplora maniero restinta unu el miaj memoraĵoj pri tiu murdonokto en mia ĉambreto:

"Mi ne faris tion. Laŭ mia animo, tion mi ne faris. Kaj mi strebis malhelpi ke \_li\_ faru tion. Tiel mi agis, Dio estu mia atestanto. Li faris tion solapersono."

Jen estis ĉio kion mi volis. Kaj mi klopodis min senigi je la stultulo.

Sed ne, li alkroĉiĝis al mi, petegante ke mi lin protektu kontraŭ la murdinto. Li diris:

"Mi havas monon. Dek mil dolarojn. En kaŝejo. La fruktaĵo de ŝtelado kaj rabado. Savu min. Diru al mi kion fari kaj ĝi estos al vi, ĉiu cendo. Du trionoj el ĝi apartenas al mia kuzo, Adlero, sed vi rajtas alpreni ĝin entute. Ni kaŝis ĝin kiam ni alvenis ĉi tien komence.

Sed mi rekaŝis ĝin hieraŭ en nova loko kaj ne diris tion al li. Mi intencis dizerti kaj ĝin forpreni entute. Ĝi estas oro kaj tro peza por manporti kiam oni kuras kaj evitas. Sed virino kiu jam transiris la riveron antaŭ du tagoj por pretigi mian vojon postsekvos min kun la mono. Kaj se mi ne havus la ŝancon priskribi la kaŝejon al ŝi, mi intencis ruzdoni mian arĝentan poŝhorloĝon en ŝian manon aŭ transsendi ĝin al ŝi kaj ŝi komprenus la aferon. Estas paperpeco en la malantaŭaĵo de la ujo kiu ĉion rakontas. Jen, prenu la horloĝon kaj diru al mi kion fari."

Li penadis trudi sian horloĝon al mi kaj elmontradis la paperon, klarigante ĝin al mi, kiam Adlero eniris la vidkampon fordistance je ĉirkaŭ dek du jardoj. Mi diris al la kompatinda Krugero:

"Enpoŝigu denove vian horloĝon, ĝin mi ne deziras. Nenia difektado vin atingos. Foriru nun, mi devas diveni lian sorton por Adlero. Baldaŭ mi diros al vi kiel eskapi de la murdinto. Intertempe, necesos al mi rekontroli la premaĵon de via dikfingro. Nenion diru al Adlero pri ĉi tiu afero. Nenion diru al iu ajn."

Li foriris plena je timo kaj dankemo, kompatinda diablulo. Mi diris al Adlero longan sortodivenon – laŭintence tiel longan ke mi ne povis ĝin findiri. Promesis alveni lian gvardpostenejon tiun nokton kaj diri al li ties vere gravan parton – ties tragedian parton, mi diris. Tial, necesas esti ekster la aŭdkampo de subaŭskultantoj. Oni ĉiam postenigis pikedon ekster la urbo. Nuraj disciplino kaj ceremonio. Nenia bezono tiurilate. Nenia malamiko en la ĉirkaŭejo.

Ĉirkaŭ noktomezo mi survojiĝis, provizite per la kontraŭsigno, kaj gvidis miajn paŝojn ĝis la soleca regiono kie Adlero estis gvardonta.

Estis tiel malhele ke mi stumblis senpere kontraŭ malklaran figuron preskaŭ antaŭ ol povi eligi ŝirmvorton. La sentinelo salutis kaj mi respondis, ambaŭ en la sama momento. Mi aldonis: "Estas nur mi, la sortodivenisto." Tiam mi glitpaŝis al la flanko de la kompatinda diablulo kaj ŝovegis mian ponardon en lian koron. "\_Ja wohl\_" mi ridis. Jen \_estis\_, efektive, la tragedia parto de lia sorto. Dum li falis de sur sia ĉevalo, li strebis alkroĉiĝi al mi kaj miaj bluaj ŝirmokuloj postrestis en lia mano. Kaj foren plonĝis la besto, lin trenante kun piedo en la piedingo.

Mi forfuĝis tra la arbaro kaj efektivigis mian eskapon, postlasinte miajn ŝirmokulojn en la mano de la mortinto.

Tio okazis antaŭ dek kvin-dek ses jaroj. Ekde tiam mi vagiradas sencele ĉirkaŭ la mondo, foje laborante, foje senlabore; foje havante monprovizon, foje senmone; sed ĉiam lacigite per troa vivado kaj dezirante finvivi, ĉar mian surteran mision plenumis la faro de tiu

nokto. Kaj la nuraj plezuro, konsolo, kontentiĝo kiujn mi spertis en ĉiuj tiuj tedaj jaroj estis la ĉiutaga penso: "Mi senvivigis lin!"

Antaŭ kvar jaroj mia sano komencis malbonfarti. Mi vagatingintis Munkenon laŭ mia sencela maniero. Malhavante monon, mi serĉis kaj akiris laborpostenon. Mi plenumis mian taskon fidele dum ĉirkaŭ unu jaro. Tiam oni postenigis min kiel noktosentinelon tie en tiu mortodomo kiun vi vizitis lastatempe. La loko konvenis al mia humoro.

Ĝi plaĉis al mi. Plaĉis al mi esti kun la mortintoj – esti sola kun ili. Mi kutimis vagiradi inter tiuj rigidaj kadavroj kaj enrigardi iliajn aŭsterajn vizaĝojn dum horoj. Ju pli malfrua estis la horo, des pli impona estis la situacio. Mi preferis la malfruan horon.

Foje mi malheligis la lumojn. Tio estigis perspektivon, vi komprenu, kaj liberigis la imagon. Ĉiam la malklaraj, malantaŭenirantaj mortintovicoj estigis ĉe oni strangajn kaj fascinajn fantaziojn.

Antaŭ du jaroj – mi jam estis tie ekde unu jaro – mi sidis tute sole en la gvatĉambro en ventega vintra nokto, malvarmigite, sensentigite, senkonsole, ekdormetante iom post iom en senkonscion. La plorego de la vento kaj la klakado de foraj ŝutroj sonadis pli kaj pli mallaŭte en miaj senaŭdiĝontaj oreloj ĉiumomente kiam subite kaj akute la mortosonorilo eligis sangofrostigan alarmon super mia kapo! Preskaŭ paralizis min la ŝoko ĉar neniam antaŭe mi aŭdis la signalon.

Mi min renormaligis kaj hastegis al la kadavroĉambro. Preskaŭ mezdistance for laŭ la ekstera vico sidis rektaspina figuro envolvita en mortotuko, svingante la kapon malrapide de flanko al flanko: makabra spektaklo! Ĝia flanko alfrontis min. Mi aliris ĝin haste kaj enrigardis fikse ĝian vizaĝon. Ĉielo! Adlero ĝi estis!

Ĉu vi povas diveni kio estis mia unua ekpenso? Envortigite, jen ĝi estis: "Ŝajnas tial ke vi eskapis de mi unuan fojon. Okazos kontraŭa rezulto ĉi-foje!"

Verŝajne tiu etulo spertis neimageblajn terurojn. Imagu kion li devis eksenti vekiĝinte meze de tiu senvoĉa silento kaj ĉirkaŭspektadinte tiun malgajan mortintaron! Kiu dankemo brilegis en lia magrega blanka vizaĝo kiam li vidis vivantan formon antaŭ si! Kaj kiel la fervoro de tiu senparola dankemo plimultiĝis kiam lia rigardo atingis la vivigajn kordialojn kiujn mi portis en la manoj! Tiam imagu la hororon kiu eniris lian pinĉitan vizaĝon kiam mi metis la kordialojn malantaŭ min kaj diris moke:

"Ekparolu, Franzo Adlero! Alvoku tiujn mortintojn! Sendube ili aŭskultos kaj kompatos. Sed en ĉi tiu loko auŝkultos kaj kompatos neniu alia."

Li penadis paroli. Tamen rezistis kaj malpermesis paroladon tiu parto de la mortotuko kunpremanta liajn makzelojn. Li strebis levi petegajn manojn sed ili restis, kunmetite kaj kunligite, sur lia brusto. Mi kriegis:

"Kriegu, Franzo Adlero! Veku la dormantojn en la foraj stratoj, petante ilin alvenigi helpon al vi. Kriegu – sen malŝpari tempon, ĉar estas malmulte da tempo por malŝpari. Kio, ĉu vi ne povas? Kia domaĝo!

Tamen ne gravas. Kriegado ne ĉiam alvenigas helpon. Kiam vi kaj via kuzo murdis senhelpajn virinon kaj infanon en kabano de Arkansaso – mia edzino estis kaj mia infano – ili kripetis helpon, ĉu vi memoras? Sed tio ne sukcesis. Vi memoras ke tio ne sukcesis, ĉu ne? Viaj dentoj klaketadas – tial kial vi ne povas ekkrii? Malfiksu la bandaĝojn per viaj manoj. Tiam vi povos ekkrii. Ho, mi komprenas. Viaj manoj estas ligitaj kaj ne povas helpi vin. Kiom strange eventoj ripetiĝas post longaj jaroj. Ĉar ankaŭ \_miaj\_ manoj estis ligitaj tiun nokton, ĉu vi memoras? Jes, tiel forte ligitaj kiel viaj manoj estas ligitaj nun.

Kiom stranga tio estas! Mi ne povis min liberigi. La ideo malligi min ne eniris vian menson. La ideo malligi vin ne eniras mian menson nun.

Ŝŝŝ! Jen malfruhora paŝsono! Ĝi venas en nia direkto. Aŭskultu, kiom proksima ĝi estas! Eblas kompti la paŝsonojn: unu, du, tri! Jen, ĝi staras ĵus aliflanke de la pordo. Jen estas la horo! Kriegu, viro, kriegu! Estas la ununura ŝanco inter vi kaj eterneco! Ho, vidu! Vi hezitis tro longan tempon. Ĝi preterpasis. Jen. Ĝi mallaŭtiĝas. Ĝi estas for! Pripensu tion! Primeditu tion! Vi ĵus aŭdis homan paŝsonon je la lasta fojo. Kiom strange devas esti aŭskulti tiel ordinaran sonon kaj konscii ke neniam denove oni aŭdos samaĵon."

Ho, amiko mia! La dolorego en tiu envolvita vizaĝo estis vidinda ekstazo! Mi elpensis novan torturon kaj ĝin aplikis, min helpante per iom da mensoga kreivo:

"Tiu kompatinda Krugero strebis savi miajn edzinon kaj infanon kaj mi havigis al li reciprokan komplezon en la taŭga momento. Mi konvinkis lin prirabi vin. Kaj mi kaj iu virino helpis lin dizerti el sia militservo kaj lin alvenigis al sekurejo."

Rigardo de surprizo kaj triumfo ekbrilis malhele tra la angoro en la vizaĝo de mia viktimo. Mi perpleksiĝis, maltrankviliĝis, diris:

"Nu, kio? Ĉu li ne eskapis?"

Nea kapskuo.

"Ĉu ne? Kio okazis tial?"

La kontento en la envolvita vizaĝo ankoraŭ pliklariĝis. La viro strebis murmuraĉi kelkajn vortojn – sensukcese; penadis esprimi ion per la malhelpitaj manoj – malsukcesis; paŭzis momenton, tiam klinis malforte la kapon en signifocela maniero, en la direkto al la kadavro kuŝanta la plej proksime al li.

"Ĉu mortinta?" mi demandis. "Ĉu ne sukcesis eskapi? Ĉu kaptita fuĝante kaj pafita?"

Cetera kapskuo nea.

"Tial, kiel?"

Denove la viro entreprenis fari ion permane. Mi zorge atentis sed ne sukcesis diveni la celon. Mi antaŭenkliniĝis kaj rigardis eĉ pli zorge. Li ĉirkaŭtordis dikfingron kaj per ĝi malforte pikis la bruston.

"Ho, ĉu vi volas diri: ponardita?"

Jesa kapmovo, akompanite de fantoma rideto de tioma diableco ke ĝi ekŝaltis veklumon en mia malakra cerbo kaj mi kriegis:

"Ĉu ponardis lin \_mi\_, lin preninte por vi? Ĉar tiu pikbato celis ununure vin!"

La jesa kapmovo de la denove mortanta fripono estis tiel ĝoja kiel lia mankanta fortiko kapablis elmontri.

"Ho, mizera, mizera mi, mortiginte la kompatan personon kiu amikiĝis kun miaj karuloj kiam ili estis senhelpaj kaj kiu ilin servintus se li povintus! Mizera, ho, mizera, mizera mi!"

Mi imagis aŭdi la dampitan glugleton de primoka rido. Mi eligis la vizaĝon de inter la manoj kaj vidis mian malamikon malantaŭensinki sur sian klintabulon.

Necesis al li sufiĉe longa tempo por morti. Li disponis mirindan vitecon, surprizan konstitucion. Jes, li pasigis plaĉe longan tempon pri la afero. Mi alportis seĝon kaj ĵurnalon, sidiĝis apud li kaj legis. De tempo al tempo mi trinketis brandon. Tion mi bezonis pro la malvarmo. Sed mi trinketis ankaŭ pro tio ke, en la komenco, kiam mi etendis la manon por alpreni la botelon, li supozis ke mi celas havigi iom al li. Mi legis laŭtvoĉe: ĉefe fantaziajn raportojn pri homoj urĝe forkaptitaj de sur la tombosoĵlo kaj revenigitaj al vivo kaj viglo pere de kelkaj kulerplenoj da likvoro kaj varma bano. Jes, li pasigis longan malfacilan tempon mortante: tri horojn, ses minutojn, ekde la momento kiam li aŭdigis la sonorilon.

Laŭ onia opinio, dum la dek ok jaroj forpasintaj ekde kiam iniciatiĝis tiu kadavrogvatado, nenia en tuko envolvita gasto de la Bavariaj mortodomoj iam sonorigis sian sonorilon. Nu, tio estas senĝena opinio.

Ĝi restu tia.

La malvarmo de la mortoĉambro jam penetris miajn ostojn. Ĝi revigligis kaj retrudis al mi la malsanon antaŭe min afliktintan sed kiu, ĝis la koncerna nokto, konstante kaj ade malaperis. Tiu viro murdis mian edzinon kaj mian infanon. Kaj post tri tagoj li aldonintos mian nomon al sia murdolisto. Ne gravas! Dio! Kiel bonsapora estas la memoraĵo pri tio. Mi kaptoatingis lin eskapantan el sia tombo kaj lin reŝovis en ĝin!

Post tiu nokto mi devis enlitiĝi dum tuta semajno. Sed ekde kiam mi povis iom rondiradi, mi konsultis la mortodomajn registrolibroj kaj eksciis la numeron de la domo en kiu Adlero mortis. Mizera pensionaĉo tiu estis. Mi konceptis la ideon ke kompreneble li akirintus la personajn havaĵojn de Krugero, estante la kuzo de tiu, kaj mi deziris obteni la horloĝon de Krugero se eblus al mi. Tamen dum mi estis malsana la posedaĵojn de Adlero oni forvendis kaj dislokis, krom pluraj malnovaj leteroj kaj ceteraj senvaloraj diversaĵoj. Tamen, pere de tiuj leteroj, mi spurtrovis filon de Krugero, la nuran restantan parencon lian. Tridekjara nun, li estas faka ŝuisto kaj loĝas ĉe Numero 14 Reĝostrato en Manhejmo. Vidvo, li havas plurajn junajn gefilojn. Sen klarigi al li la kialon de tio, konstante ekde tiam mi provizas lin per du trionoj el lia financa subteno.

Nu, rilate al tiu horloĝo – vidu kiom strange evoluas la aferoj!

Mi ĉirkaŭspuris ĝin en Germanio dum pli ol jaro je granda monkaj ĉagrenkosto. Kaj finfine mi ekhavis ĝin! Ekhavis ĝin kaj nedireble ekĝojiĝis. Malfermis ĝin kaj nenion trovis interne. Ho, mi devintus antaŭscii ke tiu paperpeceto ne restos tie ĉiun tiun tempon.

Kompreneble, mi rezignis pensi pri la dek mil dolaroj tiam. Rezignis tion kaj forigis ĝin el mia menso. Kaj ege malĝoje, ĝin



dezirinte por la filo de Krugero.

Hieraŭnokte, kiam finfine mi konsentis pri mia neevitebla morto, mi komencis pretigi miajn havaĵojn. Mi entreprenis bruligi ĉiujn senutilajn dokumentojn kaj certege, de inter la dokumentoj de Adlero ne antaŭe zorge kontrolitaj elfalis tiu longe dezirata peceto. Tuj mi ĝin rekonis. Jen ĝi. Mi ĝin tradukos:

\_Brika lustablo, mezurbe, angule de Orleano- kaj Merkato-Stratoj. Angulo alfrontanta urbodomon. Tria ŝtono, kvara vico. Tien enŝovu mesaĝon dirantan kiom alvenos.\_

Jen. Prenu kaj konservu ĝin! Krugero klarigis ke tiu ŝtono formoveblas, kaj ke ĝi estas en la norda muro de la fundamento, kvaravice ekde la supro, triaŝtone ekde la okcidento. La mono kaŝiĝas malantaŭ ĝi. Li diris ke la lasta frazo estas trompaĵo por devojigi okaze ke la papero enfalu malĝustajn manojn. Sendube ĝi plenumis tiun funkcion por Adlero.

Nun mi deziras petegi ke kiam vi faros vian proponitan vojaĝon laŭ la rivero, vi spurtrovu tiun kaŝitan monon kaj sendu ĝin al Adamo Krugero, ĉe la Manhejma adreso kiun mi menciis. Ĝi riĉuligos lin kaj mi dormos des pli trankvile en mia tombo sciante ke mi faris mian plejon por la filo de la viro kiu klopodis savi miajn edzinon kaj infanon – kvankam mia mano senscie lin mortigis, kontraŭe al la impulso de mia koro kiu preferintus lin ŝirmi kaj savi.

\* \* \*

"Tia estis la rakonto de Ritero," mi diris al miaj du amikoj. Estiĝis profunda kaj impona silento kiu daŭris ne mallongan tempon. Tiam ambaŭ viroj estigis pafadon da ekscititaj kaj admiraj ekkrioj pri la strangaj eventoj de la rakonto. Kaj tio, kune kun klakadanta fluego da demandoj kiu daŭre persistis ĝis ĉiuj partneroj preskaŭ senspiriĝis.

Tiam miaj amikoj komencis renormaliĝi kaj retiriĝi, subŝirme de kelkfojaj vortpafoj, en silenton kaj abisman revadon. Dum dek

minutoj nun aŭdiĝis nur silento. Tiam Roĝero diris reveme:

"Dek mil dolaroj!" Aldonante, post paŭzeco:

"Dek mil. Tio estas vera monamaso."

Baldaŭ la poeto demandis:

"Ĉu vi celas sendi ĝin al li tujege?"

"Jes," mi diris. "Tio estas stranga demando."

Nenia respondo. Post iom da tempo, Roĝero demandis heziteme:

"Ĉu la tutan sumon? Tio estas – mi volas diri – "

"Certege, la tutan sumon."

Mi estis dironta pli, sed haltis – haltis pro pensadsinsekvo naskiĝinta en mi. Tompsono parolis sed mia menso estis for kaj mi ne aŭdkaptis lian diraĵon. Sed mi aŭdis Roĝeron respondi:

"Jes. Tia ĝi ŝajnas al mi. Tio devus ege sufiĉi. Mi opinias ke \_li\_ nenion faris."

Baldaŭ la poeto diris:

"Kiam vi pripensas la aferon, tio \_pli\_ ol sufiĉas. Vi nur konsideru!

Kvin mil dolaroj! Nu, li ne kapablas elspezi tion en la daŭrotempo de sia vivo. Kaj tio lin difektus, aldone. Eble eĉ lin ruinigus.

Vi konsideru tion. Post malmulte da tempo li forĵetus la restintan monon, fermus sian butikon, eble komencus drinkadi, mistraktus siajn senpatrinajn infanojn, sinkus en ceterajn malboncelajn irvojojn, progresus laŭvice de malbono al plimalbono – "

"Jes, vi pravas," interrompis Roĝero fervore. "Mi jam vidis tion cent fojojn. Jes, pli ol cent fojojn. Vi metu monon en la manojn de tia

viro nur se vi deziras lin detruji, tio estas fakto. Vi nur metu monon en liajn manojn, necesas fari nenion ceteran. Kaj se tio ne malaltigas lin kaj lin senutiligas kaj lin senigas je ĉiu memestimo kaj ĉio, tiam mi ne konas la homan naturon – ĉu ne, Tompsono? Kaj eĉ se ni transdonas al li \_trionon\_ el ĝi; nu, en malpli ol ses monatoj – "

"Malpli ol ses \_semajnoj\_, vi diru," respondis mi, ekscitiĝante kaj interrompante. "Escepte se li metus tiun tri-mil-dolaran sumon en sekurajn manojn kie li ne povus ĝin ektuŝi, ne pli ol ses semajnoj forpasus antaŭ ol – "

"\_Certege\_, ne pli ol ses semajnoj!" diris Tompsono. "Mi redaktis librojn por tiuspecaj homoj kaj en la momento mem kiam ili enmanigas sian tantiemon – eble temas pri tri mil, eble du mil – "

"Kial tiu ŝuisto rajtas disponi du mil dolarojn, plaĉus al mi ekscii?" Roĝero interrompis serioze. "Viro eble nepre kontenta nun, tie en Manhejmo, ĉirkaŭate de samranguloj, manĝante sian panon kun tiu apetito kiun povas estigi nur laborema entreprenado, ĝuante sian modestan vivon, honesta, justa, purkora, kaj \_benita\_! Jes, mi diru 'benita' super la miriadoj ĉirkaŭirantaj en silkaj vestaĵoj, laŭpromenantaj la malplenan artefaritan rondvojon de socia malsaĝeco.

Sed vi nur metu \_la koncernan\_ tenton antaŭ li nuran fojon! Vi nur metu dek kvin cent dolarojn antaŭ tia viro kaj diru – "

"Dek kvin cent diablojn!" mi protestis. "\_Kvin\_ cent putrigus liajn principojn, paralizus lian entreprenadon, trenus lin al la rumvendejo, de tie ĝis la defluilo, de tie ĝis la almozdomo, de tie ĝis – "

"\_Kial\_ trudi al ni mem tiun krimon, sinjoroj?" interrompis la poeto serioze kaj alloge. "Li estas feliĉa tie kie li estas ke tia kia li estas. Ĉiu sento pri honoro, ĉiu sento pri karitato, ĉiu sento pri alta kaj sankta bonvolo nin avertas, nin petegas, nin ordonas lin lasi en senĝeno. Jen vera amikeco, jen aŭtenta amikeco. Ni povus funkciigi aliajn rimedojn pli pompajn. Sed nenian tiel vere komplezan kaj saĝan, kredis min."

Post iom da daŭra diskutado, evidentiĝis ke ĉiu el ni, en la profundo de sia koro, sentis kelkajn dubojn pri tiu aranĝo pri la afero. Klarege estis ke ĉiuj sentis la devon sendi al la kompatinda ŝuisto \_ion\_.

Estiĝis longa kaj pripensa diskuto pri tiu punkto kaj finfine ni elektis sendi al li kolorlitografon.

Nu, post kiam ĉio laŭŝajne bonordiĝis por ĉiuj partoprenantoj, elstariĝis nova ĝeno. Okazis ke tiuj du viroj celis dividi la monon egalparte kun mi. Mi ne samopiniis. Mi diris ke ili povos sin taksu bonŝancaj se ili kunricevos duonon el la mono. Roĝero diris:

"Kiu estintus \_iel ajn\_ bonŝanca se ne partoprenintus en la afero mi? Estis mi kiu faris la unuan sugeston. Sen mi ĉio irintus al la ŝuisto."

Tompsono diris ke li mem pripensis la aferon jam en la sama momento kiam Roĝero unue parolis.

Mi replikis ke la sugesto naskiĝintus ĉe mi sufiĉe baldaŭ kaj sen la helpo de iu ajn. Mi estas malrapida pensanto eble, sed fidinda.

La debato varmiĝis en kverelon, tiam en batalon. Ĉiu viro ekvundiĝis iom forte. Post min iom kuraci, laŭ mia maniero, mi supreniris en malbonaĉa humoro al la uraganferdeko. Mi renkontis Kapitanon Makordon tie kaj diris, tiel plaĉe kiel permesis mia humoro:

"Mi alvenas por adiaŭi, Kapitano. Mi deziras alteriĝi ĉe Napoleono."

"Vi deziris alteriĝi kie?"

"Ĉe Napoleono."

La kapitano ekridis sed, ekkonsciinte ke mi ne estas en gaja humoro, li ĉesis ridi kaj diris:

"Sed ĉu vi seriozas?"

"Mi jes ja tre seriozas."

La kapitano rigardis la supranivelan navigejon kaj diris:

"Li deziras elboatiĝi ĉe Napoleono!"

"Ĉu ĉe Napoleono?"

"Tiel li diras."

"Laŭ la fantomego de Cezaro!"

Onklo Mumfordo alproksimiĝis laŭ la ferdeko. La kapitano diris:

"Onklo, jen amiko via kiu deziras elboatiĝi ĉe Napoleono!"

"Nu, laŭ—!"

Mi diris:

"Bonvolu, pri kio temas ĉio tio? Ĉu viro ne rajtas alteriĝi ĉe.

Napoleono se tion li deziras?"

"Nu, damnu, ĉu vi ne scias? Ne plu ekzistas Napoleono. Jam de jaroj kaj jaroj ĝi ne plu ekzistas. Arkansaso-Rivero ĝin krevis, ĝin ĉifonigis, ĝin forŝovis en Misisipo-Riveron!"

"Ĉu forbalais la \_tutan\_ urbon? Ĉu bankojn, preĝejojn, malliberejojn, ĵurnalajn redaktojn, urbodomon, teatron, fajrobrigadejon, lustablon – ĉu \_ĉion?\_"

"Ĉion. Nur dekkvinminuta tasko, aŭ similaĵo. Postlasis de la urbo nek haŭton nek haron, nek ŝiraĵon nek ŝindon krom la malantaŭa ekstremaĵo de iu domaĉeto kaj unu brika fumtubo. En la nuna momento nia boato padelnavigas en la mezo mem de la antaŭa starloko de la urbo.

Jen fore estas la brika fumtubo – la ununura restaĵo de la urbo. Tiu densa arbaro ĉe la dekstra flanko situas antaŭe mejlon for de la urbo.

Rigardu malantaŭ vi, kontraŭflue. Nun vi komencas rekoni la pejzaĝon, ĉu ne?"

"Jes, mi jes ja ĝin rekonas nun. Tio estas la plej mirinda afero kiun mi iam priaŭdis. De multege la plej mirinda kaj la plej neatendita."

S-ro Tompsono kaj S-ro Roĝero jam alvenis, intertempe, kun valizoj kaj ombreloj kaj aŭskultis silente la novaĵon de la kapitano. Tompsono metis duondolaron en mian manon kaj diris mallaŭte:

"Por mia porcio de la kolorlitografo."

Roĝero agis same.

Jes, mirindege estis vidi Misisipo-Riveron ruliĝi inter senhomaj bordoj rekte super la loko kie antaŭ dudek jaroj mi kutimis vidi bonan grandan memkontentan urbeton. Urbeton kiu estis sidejo de granda kaj grava konteo. Urbeton kun granda Usona marsoldatara malsanulejo.

Urbeton kiu havis sennombrajn batalojn kun ĉiutaga enketo. Urbeton kie antaŭe mi konis la plej belan kaj la plej talentan knabinon de la tuta Misisipo-valo. Urbeton kie ni ricevis la unuan presitan novaĵon pri la lamentinda katastrofo de batalŝipo Pensilvanio antaŭ kvaronjarcento.

Urbeton ne plu ekzistantan, englutitan, forsinkintan nutradi la fiŝojn.

Urbeton de kiu restas nenio krom ero de domaĉeto kaj dispeciĝanta brika fumtubo!

## **LA FIFAMA SALTANTA RANO DE KALAVERO-KONTEO**

Konforme al peto de amiko skribinta al mi el Oriento, mi vizitis afablan paroleman maljunan Simonon Hveleron kaj enketis pri amiko de mia amiko, Leonido V. Smilejo, responde al la peto, kaj mi ĉi tie alfiksas la rezultaĵon. Mi sentas kaŝitan suspekton ke Leonido V. Smilejo estas mito; ke mia amiko neniam konis tian personon; kaj ke li nur hipotezis ke se mi demandus al Hvelero pri li, tio memorigus al la multaĝulo sian fifaman \_Jaĉjon\_ Smilejon, kaj li ekofikus, enuigante min per kelkaj agacantaj tiurilataj rememoraĵoj tiel longaj kaj tedaj kiel senutilaj por mi. Se tio estis la celo, okazis sukceso.

Mi trovis Simonon Hveleron en komforta dormetado apud la servoĉambra stovo de la kadukinta drinkejo de mortanta mineja kampadejo nomiĝanta Ĉe-Anĝelo kaj konstatis ke li estas dika kaj kalva kaj portas sur sia trankvila vizaĝo mienon de ĉarmaj mildeco kaj simpleco. Li vekiĝis kaj salutis, dezirante al mi bonan tagon. Mi diris al li ke amiko mia petis ke mi enketu pri kara kamarado de lia knabeco nomiĝanta Leonido V. Smilejo – Pastoro Leonido V. Smilejo, juna predikisto pri la Biblia mesaĝo laŭraporte loĝinta antaŭe en Ĉe-Anĝelo. Mi aldonis ke, se S-ro Hvelero scipovos informi min pri tiu Pastoro Leonido V. Smilejo, mi ŝuldos al li multajn reciprokajn komplezojn.

Simono Hvelero malantaŭenirigis min en angulon kaj blokadis min tie per sia seĝo, tiam sidiĝis kaj evoluadigis la tedan rakonton sekvontan ĉi tiun alineon. Li neniam ridetis, neniam kuntiris la brovojn, neniam senigis la voĉon je la mildaritma tonalo al kiu li agordis sian komencan frazon, neniam elmontris la plej etan indicon pri entuziasmo.

Tamen laŭ la tuta longo de la senfina rakonto kuris vejno da imponaj seriozo kaj sincero komprenigantaj klarscie al mi ke, anstataŭ imagi ke lia rakonto ampleksas ridindan aŭ absurdan temaron, li taksas ĝin vere grava afero kaj admiras ties du heroojn kiel virojn disponantajn transcendan genion pri altnivela \_lerteco\_. Mi lasis lin daŭrigi siamaniere la rakontadon, neniam lin interrompante ununuran fojon.

"Pastoro Leonido V. – Ho, nu, Pastoro Leo – Nu, foje ĉeestis ĉi tie ulo nomiĝanta \_Jaĉjo\_ Smilejo, en la vintro de 49, aŭ eble estis la printempo de 50—mi ne memoras precize, iel, kvankam la kialo pro kiu mi opinias ke estis unu aŭ la alia estas tio ke mi memoras ke la klintrogego ankoraŭ ne estis finkonstruita kiam li alvenis la kampadejon. Tamen li estis la plej stranga ulo kiun oni iam vidis kiam temis pri ĉiam veti pri kio ajn surscenejiĝas kondiĉe ke li sukcesu instigi iun veti pri la kontraŭa flanko, kaj se ne, li mem ŝanĝis vetflankon. Plaĉis al li iu ajn aranĝo plaĉanta al la kontraŭvetanto. Se li nur sukcesus starigi veton, \_li\_ kontentiĝis.

Tamen li estis bonŝanca, malkutime bonŝanca. Preskaŭ ĉiam li venkis. Li estis ĉiam preta kaj atendanta oportunon. Kion ajn oni menciis, li proponis priveti ĝin kaj priveti iun ajn flankon, laŭ via deziro, kiel mi ĵus menciis. Se okazis vetkuro por ĉevaloj, je ties finiĝo vi trovis lin multriĉigita aŭ nepre senmonigita. Se okazis hundobatalo, li vetis pri ĝi. Se okazis katbatalo, ĝin li privetis. Se okazis kokbatalo, li ĝin privetis. Nu, se du birdoj sidis sur barilo, li vetis pri kiu el ili forflugos antaŭ la alia.

Kaj se okazis evangeliza kunveno, li ĉeestis ĝin senmanke por veti pri Pastoro Valkero kiu estis, laŭ lia takso, la plej bona oratoro de la regiono, kaj tia li estis certe, kaj bona viro. Kaj se li vidis krampkrur-insekon eksurvojiĝi en iu ajn direkto, li vetis pri kiom da tempo la besteto bezonos por atingi sian celokon – kiu ajn estu la loko. Kaj se vi konsentis priveti kontraŭ li, li konsentis postsekvi tiun krampkrur-insekon ĝis Meksikio por ekscii kien ĝi celas iri kaj dum kiom da tempo ĝi estos survoje. Multaj el la knaboj de ĉi tie vidis tiun Smilejon kaj kapablas raporti al vi pri li. Nu, entute egalas al \_li\_ – li bonvolis veti pri io \_ajn\_ – la laŭdamne plej stranga ulo. La edzino de Pastoro Valkero malsanis foje, dum multe da tempo, kaj ŝajnis ke oni ne sukcesos ŝin savi. Tamen iun matenon li eniris kaj Smilejo ekdemandis al li kiel ŝi fartas kaj li diris ke ŝi fartas iom pli bone nun – danke al Nia Sinjoro pro Lia senfina kompato – kaj progresas tiel favore ke, kun la beno de Providenco, ŝi finfine resaniĝos kaj Smilejo, antaŭ ol pripensi la aferon, diris: 'Nu, mi vetas je du dolaroj kaj duono ke ne.



"Ĉi tiu ĉi Smilejo havis ĉevalinon – la knaboj kromnomis ŝin la 'dekkvinminutaĵo' sed ili faris tion nur por ŝerci, vi scias, ĉar kompreneble ŝi estis pli rapida ol tio – kaj li ofte vetgajnis monon pri tiu ĉevalinaĉo, malgraŭ tio ke ŝi estis tiel malrapida kaj ĉiam suferis pro astmo aŭ tempro aŭ ftizo aŭ io simila. Kutime ili ĉiam cedis al ŝi du-tricent-jardan frustarton kaj tiam preterpasis ŝin survoje. Tamen ĉe la finfiniĝo de la konkurso ŝi ekscitiĝis kaj fariĝis kvazaŭ urĝpelata kaj komencis antaŭenkaprioli kaj larĝe dispartigi la gambojn, etendante la kruojn facilartike, foje en la aeron, foje vojoflanken en la direkto al la bariloj kaj suprenlevante piedbate tr-o-o-n da polvo kaj estigante tr-o-o-n da bruaĉego pro tusado kaj ternado kaj mungado – kaj ĉiam atingi la venkobudon kun ĉirkaŭ kololonga antaŭeco, laŭ la plej bona takso.

"Kaj li havis etan malgrandan buldogidon kiu, kiam vi ĝin rigardis, ŝajnis tute senvalora, kapabla nur sidadi kun feroca aspekto, atendente bonan ŝancon por ŝtelpreni ion. Tamen tuj post kiam oni privetis ĝin, ĝi fariĝis tute alia hundo. Ĝia submentono komencis elstari kiel vaporboata teŭgo kaj ĝiaj dentoj malkovriĝis kaj ekbrilis kiel altfornoj. Kaj se cetera hundo ĝin atakis kaj ĝin skuis ĉifonaĉe kaj mordis ĝin kaj lanĉis ĝin du-trifoje trans la ŝultron, Andreo Ĝaksono – tio estis la nomo de la hundido – Andreo Ĝaksono ĉiam ŝajnis propran kontentiĝon, kvazaŭ atendinte nenion alian – rezulte de kio la vetoj daŭre kaj redaŭre duobliĝis kaj reduobliĝis en la kontraŭa flanko, ĝis kiam ĉiuj finvetis. Tiam subitege li alkroĉis tiun alian hundon perbuŝe ĵus ĉe la artikolo de ties malantaŭa kruo kaj tenis ĝin en seninterrompa frostiĝo. Li ne maĉaĉis, vi komprenu, nur buŝtenis kaj persistegis ĝis kiam ili koncedis la venkon, eĉ se temis pri tutjara daŭrotempo. Smilejo ĉiam gajnis la vetpremion helpe de tiu hundido ĝis kiam la besto devis konkursi kontraŭ hundo perdinta siajn malantaŭajn kruojn forsegitajn per disksegilo, kaj kiam la vetado atingis finan punkton kaj la mono jam kuŝis surgrunde kaj Andreo Ĝaksono ekpretis efektiviĝi sian plej ŝatatan alkroĉmanovron, tujege li konsciis kiel oni lin supertrompis kaj kiel la alia hundo lin kontraŭmurenigis, por tiel diri, kaj li aspektis surprizite kaj tiam li aspektis iom malkuraĝigite kaj ĉesis penadi gajni la venkon kaj finiĝis tute fintrompita. Li direktis rigardon al Smilejo,

kvazaŭ por diri ke lia koro estas rompita kaj ke la kulpinto estis la mastro pro konsenti priveti kontraŭ hundo kiu ne havas malantaŭajn krurojn al kiuj oni povas alkroĉi, kio en batalo estis lia ĉefa atakmanovro, kaj tiam li iom foriris lampaŝe, sin kuŝigis kaj mortis. Bonega hundido estis tiu Andreo Ĝaksono kiu sin famigintus se ĝi sukcesintus travivi, ĉar ĝin enestis bona konsistigaĵo kaj genio. Tion mi scias, ĉar antaŭe ĝi disponis neniam apartajn preparolindajn oportunojn kaj estas mallogike ke hundo povas batali tiel sukcese en tiaj cirkonstancoj se ĝi ne havas talenton. Ĉiam mi ekbedaŭras pensante pri tiu lasta batalo ĝia kaj ties finiĝo.

"Nu, ĉi tiu ĉi Smilejo havis rathundojn kaj virkokojn kaj virkatojn kaj ĉiujn tiajn speciaĵojn ĝis senripozigi vin kaj vi ne povus alporti al li privetaĵon kontraŭ kiu li ne kapablus kontraŭstarigi samaĵon.

Iun tagon li kaptis ranon kaj hejmenportis ĝin kaj diris intenci ĝin klerigi. Tial dum tri monatoj li faris nenion ceteran krom sidi en sia malantaŭdoma ĝardeno kaj lernigi saltadon al tiu rano. Kaj estu certa ke li jes ja lernigis ĝin. Li kutimis iom ŝoveti la ranon de malantaŭe kaj en la sekvinta minuto vi vidis la ranon kirliĝadi en la aero kiel pastoringo, vin vidis efektiviĝi transkapiĝon, aŭ eble paron da ili, se li sukcesigis bonan starton, kaj retereniĝi platpiede kaj bonsane, kiel kato. Li al kutimigis la ranon al tiaspeca saltado lernante al ĝi kiel kapti muŝojn kaj trejni ĝin tiurilate tiel konstante ke la besteto sukcesis trafi muŝon ĉiun fojon kiam la insekto eniris ĝian vidkampon. Smilejo diris ke mankas al la rano nur taŭga edukado por ke ĝi povu fari ion ajn – kaj mi kredas lin. Nu, mi vidis lin meti Danielon Vebsteron ĉi tien sur ĉi tiun plankon – Danielo Vebstero estis la nomo de la rano – kaj ekkriegi, 'Muŝoj, Daĉjo, muŝoj! – kaj pli rapide ol vi povas palpebrumi ĝi suprensaltis vertikallinie kaj forlekegis la muŝon de sur la tablo kaj refalaĉis surplanken tiel solide kiel kotbulo kaj komencis grati la kapoflankon kun malantaŭa piedo tute apatie kvazaŭ ne konsciante esti farinta pli ol kutimas fari iu ajn rano. Vi neniam vidis ranon tiel modestan kaj honestan malgraŭ ties grandaj talentoj. Kaj kiam temis pri honesta kaj senruza saltado sur ebena plataĵo, ĝi kapablis atingi pli grandan distancon en ununura salto ol iu ajn besto de sia speco iam vidita de vi. Saltado sur ebena

plataĵo estis ĝia specialaĵo, vi komprenu, kaj kiam temis pri tio Smilejo bonvole vetis monon pri ĝi ĝis restis al li nenia plua cendo.

Smilejo fieregis pri sia rano kaj li tute rajtis fieregi ĉar uloj vojaĝintaj ĉien kaj estintaj ĉie diris ĉiuj senescepte ke la besto superas ĉiun ajn ranon iam viditan de \_ili\_.

"Nu, Smilejo tenis la beston en lataĵa skatoleto kaj foje li kunportis ĝin en la kampadejocentron kaj proponis ĝin kiel monvetobjekton. Iun tagon ulo – nekonato en la kampadejo – renkontis lin kun lia skatoleto kaj diris:

"Kio povus esti tio kion vi tenas en la skatoleto?"

"Kaj Smilejo respondas, iom indifere, 'Povus esti papago, aŭ povus esti kanario, eble, tamen ne estas tiaĵo. Nur rano ĝi estas.

"Kaj la ulo prenis ĝin kaj okulkontrolis ĝin zorge kaj turnis ĝin en diversaj direktoj kaj diris: 'Nu, vi pravas. Do, por kiu \_ĝi\_ utilas?"

"Nu, diris Smilejo, trankvile kaj senzorge, ĝi utilas por \_unu\_ afero, mi opinias. Ĝi kapablas pretersalti iun ajn ranon de Kalavero-Konteo.

"La ulo reprenis la skatolon, direktis novan longan apartan rigardon al ĝi, retransdonis ĝin al Smilejo kaj diras meditege: 'Nu, li diras, 'mi vidas neniajn ecojn ĉe tiu rano kapablajn plibonigi ĝin rilate al aliaj ranoj.

"Eble vi ne vidas ilin, diras Smilejo. 'Eble vi konas ranojn kaj eble vi malkonas ilin. Eble vi estas spertulo pri tio kaj eble vi ne estas nura amatoro tiurilate, por tiel diri. Tamen, opinion \_mian\_ mi havas kaj kuraĝas veti kvardek dolarojn pri ĝia kapablo pretersalti iun ajn ranon de Kalavero-Konteo.

"Kaj la ulo primeditis momenton, tiam diras, en iom malfeliĉa maniero, 'Nu, mi estas nur fremdulo ĉi tie kaj ne havas ranon, sed se ranon mi havus, mi bonvolus priveti kontraŭ vi.

"Kaj tiam Smilejo diras, 'Ne gravas – ne gravas – se vi bonvolos teni mian skatoleton momenton, mi iros akiri ranon por vi. Tial la ulo prenis la skatolon kaj metis siajn kvardek dolarojn apud tiujn de Smilejo kaj sidiĝis por atendi.

"Tial li sidis tie dum iom longa tempo pensante kaj repensante pri la afero kaj tiam li eligis la ranon, levstangumis ties buŝon kaj prenis kafkuleron kaj plenigis la besteton je koturnkugletaĵoj – ĝin plenigis ĝis preskaŭ la mentono – kaj surplankenigis ĝin. Smilejo, siaflanke, aliris la marĉon kaj vagserĉis dum longa tempo en la kotaĉo kaj finfine mankaptis ranon kaj ĝin revenportis kaj transdonis al la ulo, kaj diras:

"Nu, se vi pretas, metu ĝin apud Danielon, kun ĝiaj antaŭpiedoĵoj en paralela pozo kun tiuj de Danielo, kaj mi diros la signalvorton.

Tiam li diras, 'Unu – du – tri – \_eku\_! kaj li kaj la ulo ektuŝis la ranojn de malantaŭe kaj la nova rano forsaltis vigle sed Daĉjo faris klopodegon kaj kuntiris la ŝultrojn – tiel – kiel Franca viro – sed sensukcese – li ne povis ekmoviĝi. Li restis fiksite tiel solide kiel preĝejo kaj ne pli kapablis ekiri ol ankrita ŝipo. Smilejo estis iom surprizita kaj eĉ naŭzigita sed kompreneble li havis nenan ideon pri kio temas.

"La ulo prenis la vetmonon kaj komencis foriri. Kaj kiam li estis sur la pordosoĵlo li iom skumovis la dikfingron transŝultren – tiel – en la direkto al Daĉjo, kaj reiris, tre egalritme, 'Nu, li diras, 'mi vidas neniajn ecojn ĉe tiu rano kapablajn plibonigi ĝin rilate al aliaj ranoj.

"Smilejo, li staris gratante la kapon kaj malsuprenrigardante Daĉjon dum longa tempo, kaj finfine li diras, 'Mi jes ja priscivolas kio ajn en la lando estus povinta malebligi tiun ranon – mi scivolas ĉu eble ĝi spertas iuspecan ĝenon – ŝajnas al mi ke ĝi estas iom pufigita.

Kaj li alkroĉis Daĉjon per la kolnuko kaj levis ĝin kaj diras, 'Nu, kulpigu miajn katojn se ĝi ne pezas kvin funtojn! kaj ĝin renversis kaj la besteto elruktegis duoblan manplenon da kugletaĵoj. Kaj tiam

li komprenis kio okazis kaj ege koleriĝis – li formetis la ranon kaj komencis postkuri la ulon sed neniam lin atingis. Kaj – "

En tiu momento Simono Hvelero aŭdis iun alvoki lian nomon en la antaŭdoma ĝardeno kaj stariĝis por foriri ekscii pri kio temas. Kaj turniĝante al mi, dum li foriris, li diris: "Restu tie kie vi estas, fremdulo, kaj mallacigu vin, mi estos for nur ununuran sekundeton."

Sed, kun via permeso, mi juĝis ke daŭrigo de la historio pri la entreprenema vagabondo Jaĉjo Smilejo ne povos disponigi al mi multajn informaĵojn pri Pastoro Leonido V. Smilejo, kaj tial mi survojiĝis.

Ĉe la pordo mi renkontis la afablan Hveleron en revenado kaj li al kroĉis min kaj rekomencis:

"Nu, ĉi tiu ĉi Smilejo havis flavan unuokulan bovinon kiu havis nenian voston, nur mallongan bananaspektan stumpon, kaj – "

Tamen, disponante nek tempon nek deziron, mi ne restis por aŭskulti pri la afliktita bovino sed adiaŭis kaj foriris.

## **LA RAKONTO PRI LA MALBONKONDUTA KNABETO**

Foje estis malbonkonduta knabeto nomiĝanta Jaĉjo – tamen, se vi bonvolas tion konstati, okazas ke malbonkondutaj knabetoj preskaŭ ĉiam nomiĝas Jaĉjo en viaj dimanĉlernejaj instrulibroj. Strange estis, tamen vere, ke ĉi tiu knabeto nomiĝis Jaĉjo.

Ankaŭ li ne havis malsanan patrinon – malsanan patrinon kiu estis pia kaj suferis pro ftizo kaj ĝojus kuŝiĝi en la tombo kaj ripozadi se ŝi ne sentis fortan amon al sia knabo kaj ansiecon ke la mondo fariĝu kruela kaj malamikema pri li post ŝia forpaso. Plejparte la malbonkondutaj knaboj de la dimanĉlernejaj instrulibroj nomiĝas Jakobo kaj havas malsanajn patrinaĵojn kiuj lernigas al ili kiel diri, "Nun mi min kuŝigas," ktp., kaj dormigas ilin kantante kun dolĉaj plendaj

voĉoj kaj tiam kise deziras al ili bonan nokton kaj surgenuiĝas apud la lito kaj ekploras. Sed pri tiu ulo estis malsame. Li nomiĝis Jaĉjo kaj lia patrino estis tute bonsana – suferis pro nenia ftizo nek alia ajn malsano. Ŝi estis pli dika ol maldika, ne estis pia. Krome, ŝi sentis nenian anksiecon pri Jaĉjo. Ŝi diris ke se li rompigus al si la kolon, la perdo ne estus granda. Ŝi ĉiam deziris bonan nokton al Jaĉjo pugfrape, neniam kise. Tute male, kiam ŝi estis preta lin postlasi, ŝi tordis al li la orelojn.

Foje tiu malbonkondata knabeto ŝtelprenis la ŝlosilon de la manĝoŝranko kaj eniris tien ŝtelpaŝe kaj provizis sin per marmelado kaj plenigis la ujon je gudro por ke la patrino neniam prikonsciu la diferencon. Sed subite horora sento ne invadis lin kaj nenio ŝajnis flustri al li, "Ĉu estas juste malobei mian patrinon? Ĉu fari tion ne estas peko? Kien foriras malbonkondataj knabetoj kiuj elmanĝas la marmeladon de sia bona afabla patrino?" kaj tiam li ne surgenuiĝis tute sole, promesante neniam plu malbonkonduki kaj stariĝis kun malpeza feliĉa koro kaj iris konfesi ĉion al sia patrino kaj petis ke ŝi lin pardonu kaj ricevis ŝian benon dum plenigis ŝiajn okulojn larmoj de fiereco kaj dankemo. Ne. Tiel la afero evoluas ĉe ĉiuj ceteraj malbonkondataj knaboj en libroj. Sed tute alimaniere ĝi evoluis ĉe tiu Jaĉjo, malgraŭ ties strango. Li manĝis la marmeladon kaj taksis ĝin ĉefranga en sia peka kruda maniero; kaj li enigis la gudron kaj taksis ankaŭ tion ĉefranga kaj ridis kaj rimarkis "ke la oldulino ekhenos" kiam ŝi ekscios tion kaj kiam ŝi eksciis efektive tion, li malkonfesis havi informaĵojn pri ĝi kaj ŝi pugfrapis lin severe kaj estis li mem kiu ekploris. Ĉiel tiu knabo estis stranga. Ĉio rezultis malsame ĉe li ol ĉe la malbonkondataj Jakoboj de la libroj.

Foje li suprengrimpis en la pomarbojn de Kultivisto Akorno por ŝtelpreni pomojn kaj la branĉego ne rompiĝis kaj li ne falis kaj rompigis al si la brakon, ne sin mordigis per la hundego de la kultivisto, ne malviglis dum semajnoj sur malsanula lito, ne pentis, ne entreprenis ekbonkonduki. Ho, ne! Li ŝtelprenis tiom da pomoj kiom li deziris kaj malsuprengrimpis en bona stato. Kaj li estis nepre preta por la hundo ankaŭ kaj renversis ĝin per lanĉita briko kiam tiu

atakis lin. Estis ege strange. Similaĵo neniam okazis en tiuj mildaj libretoj havantaj jaspitajn kovrilojn kaj bildojn pri viroj surportantaj hirundovostaĵajn jakojn kaj sonorilkronitajn ĉapelojn kaj pantalonojn havantajn malsufiĉe longajn krurumojn kaj virinoj kies robtalioj estas subbraknivelaj kaj ne havas subjupajn ringegojn. Nenio simila en iu ajn el la dimanĉlernejaj libroj.

Foje li ŝtelprenis la poŝtranĉilon de la instruisto kaj kiam li timis ke la misfaro malkovriĝu kaj ke la instruisto vipu lin, li ŝtelmetis ĝin en la kaskedon de Georgo Vilsono – la filo de la kompatinda Vidvino Vilsono, la morala knabo, la bonkondata knabeto de la vilaĝo kiu ĉiam obeis al sia patrino, neniam diris mensogojn, ŝatis siajn lecionojn, ŝategis Dimanĉ-Lernejon. Kaj kiam la tranĉilo terenfalas el la kaskedo kaj la kompatinda Georgo klinis la kapon kaj ruĝiĝis kvazaŭ agnoskante sian kulpon, kaj la ĉagrenita instruisto taksis lin kulpa pri la ŝtelpreno kaj kiam la viro staris apud la knabo, malsuprenigonte la vipon sur la tremantajn ŝultrojn de tiu, subite aperis meze de ili nenia blankhara malprobabla juĝisto de la paco, prenante belan starpazon kaj dirante: "Liberigu tiun noblan knabon! Jen staras la kaŭranta kulpinto! Mi preterpasis la lernejpordon dum la interleciona ludpaŭzo kaj, malvidate mi mem, mi vidis fari la ŝtelprenon!" Kaj tiam Jaĉjo ne ricevis pugbatadon kaj la respektinda juĝisto ne deklamis homilion al la plorema lernejanaro kaj ne prenis la manon de Georgo kaj diris ke tia knabo meritas laŭdadon kaj tiam ne invitis tiun veni loĝi ĉe li kaj balai la oficejon kaj estigi fajrojn kaj fari irtaskojn kaj haki lignon kaj studi la juron kaj helpi lian edzinon plenumi domtaskojn kaj disponi pri la tuta postrestanta tempo por ludi kaj ricevi ĉiumonatan kvardekcentosalajron kaj esti feliĉa. Ne. En la libroj okazintus tiel sed ne okazis tiel al Jaĉjo. Nenia enmiksigema maljuna pektenaspekta juĝisto ekaperis por estigi ĝenojn kaj tial la modelknabo Georgo ricevis pugbatadon kaj Jaĉjo feliĉis pro tio ĉar, vi scias, Jaĉjo malamegis moralajn knabojn. Jaĉjo diris ke li "malestimas tiajn molaĉulojn." Tia estis la lingvaĵaĉo de tiu malbonkondata malbonzorgata knabo.

Sed la plej stranga evento iam okazinta al Jaĉjo estis la fojo kiam li iris boatadi en dimanĉo kaj ne sin dronigis kaj tiu cetera fojo kiam ŝtormo kuratingis lin dum li fiŝkaptadis en dimanĉo kaj ne trafis lin fulmo. Ho, vi povus tralegi ĉiujn dimanĉlernejajn instrulibrojn inter nun kaj Kristnasko sen iam malkovri similaĵon. Ho, ne! Vi ekscius ke ĉiuj malbonkonduktaj knaboj irantaj boatadi en dimanĉo senmanke dronas.

Kaj ĉiujn malbonkonduktajn knabojn kuratingatajn de ŝtormoj dum ili fiŝkaptadas en dimanĉo senmanke fulmo trafas. Boatoj veturigantaj malbonkonduktajn knabojn ĉiam renversiĝas en dimanĉo kaj ĉiam okazas ŝtormoj kiam malbonkonduktaj knaboj fiŝkaptadas en dimanĉo. Kiel tiu Jaĉjo iam eskapis tian sorton mi taksas nepra mistero.

Tiu Jaĉjo ĝuis sorĉitan vivon – devas esti tiel. Nenio sukcesis lin difekti. Li eĉ transdonis al bestoĝardena elefanto tabakbulon kaj la elefanto ne forfaligis al li la kapon per rostrobato. Li kontrolis la enhavon de la mangoŝranko serĉante pipromentan esencon kaj ne eraris trinkante brandon. Li ŝtelprenis la pafilon de sia patro kaj iris ĉasadi en dimanĉo kaj ne forpafis tri-kvar fingrojn. Li pugnebatis sian fratineton sur la tempion kiam li koleriĝis kaj ŝi ne restis en dolorego dum longaj somertagoj kaj ne mortis kun dolĉaj surlipaj pardonvortoj kiuj duobligis la angoron de lia rompiĝanta koro. Ne, ŝi baldaŭ resaniĝis. Li forfuĝis kaj finfine surmariĝis kaj kiam li revenis li ne estis malfeliĉa kaj sola en la mondo kaj liaj gekaruloj ne dormis en la trankvila preĝeja tombejo kaj la de grimpoplantoj kovrata loĝdomo de lia knabeco ne falis en kadukecon kaj ruinaĵojn.

Ho, ne! Li hejmenrevenis tiel ebria kiel sakŝalmisto kaj tuj sukcesis aliĝi al la fajrobrigado.

Kaj li plenkreskuliĝis kaj edziĝis kaj naskigis grandan familion kaj sencerbis ilin ĉiujn iun nokton per hakilo kaj sin riĉigis uzante diversajn trompaĵojn kaj ruzojn kaj nun li estas la plej infera, plej malica kanajlo de sia naskiĝvilaĝo kaj estas universale respektata parlamentano.



Tial vi konsciu ke neniam estis malbonkondata Jaĉjo en la dimanĉlernejaj libroj ĝuinta tian sinsekvon da bonŝancoj kiel tiu pekema Jaĉjo kun la sorĉita vivo.

Transcriber's note: Obvious spelling and punctuation errors have been corrected in this etext. Unusual forms have been retained, however, if used consistently, or suspected to be intentional or simply archaic. See comments inside the HTML file for details.

# LA INFANOJ CHE LA STRATO BRUFARANTOJ

Astrid Lindgren

El la sveda tradukis Irina Krotova

## 1. Lotta estas tre naiva

Mia frato, li nomiĝas Jonas, kaj mi, mi nomiĝas Maria, kaj nia eta fratino nomiĝas Lotta. Ŝi aĝas nur iom pli ol tri jarojn, Lotta. Paĉjo diras, ke antaŭ ol aperis iuj infanoj en la domo, tiam estis plena kvieto. Sed poste tie aperis kelkaj kreaĵoj. Mia frato, li naskiĝis antaŭ mi. Kaj paĉjo diras, ke en la domo komenciĝis bruo preskaŭ tuj, post kiam Jonas fariĝis sufiĉe granda, ke li povis klaki per klakilo kontraŭ litrandon, kiam paĉjo volis dormi dum dimanĉaj matenoj. Kaj poste Jonas bruis pli kaj pli. Do tial paĉjo nomas lin Bruego. Min li nomas Brueto. Kvankam mi tamen ne bruas same multe, kiel Jonas. Fojfoje mi estas silenta dum kelka tempo. Poste ni ricevis plian infanon, ĝi estis Lotta. Ŝin paĉjo nomas Krieto, mi ne scias kial. Panjo nomas nin Jonas kaj Maria kaj Lotta, kiel ni nomiĝas. Kvankam fojfoje ŝi nomas min Mia-Maria, kaj ankaŭ Jonas kaj Lotta faras tion.

Ni loĝas en flava domo ĉe la strateto, kiu nomiĝas la strato Potfarantoj.

– Eble, loĝis potfarantoj ĉe ĉi tiu strato iam antaŭe, sed nuntempe ĉi tie loĝas nuraj brufarantoj, diras paĉjo. Mi kredas, ni rebaptu la straton al la strato Brufarantoj, li diras.

Lotta koleras, ke ŝi ne estas same granda, kiel Jonas kaj mi. Krome, Jonas kaj mi rajtas iri en la bazaron tute solaj, sed tion ne rajtas Lotta. Jonas kaj mi iras en la bazaron ĉiusabate kaj aĉetas karamelojn de karamelvendistinoj, kiuj staras tie kaj vendas

karamelojn. Sed ni kunprenas hejmen karamelojn ankaŭ por Lotta, ĉar tiel ni devas.

Foje sabate pluvis tiel terure, ke ni preskaŭ ne povis iri en la bazaron. Sed ni prenis grandan ombrelon de paĉjo kaj tamen iris, kaj ni aĉetis ruĝajn karamelojn. Kiam ni hejmeniris, ni iris sub la ombrelo kaj manĝis karamelojn, kaj estis agrable. Sed Lotta ne povis eliri en la ĝardenon eĉ unufoje, nur ĉar pluvis tiel terure.

– Kial devas pluvi? diris Lotta.

– Por ke kresku sekalo kaj terpomoj, kaj ke ni ricevu ion manĝeblan, diris panjo.

– Kial devas pluvi en la bazaro do? diris Jonas. – Ĉu tio estas por ke karameloj kresku?

Tiam panjo nur ekridis.

Kiam ni enlitiĝis vespere, Jonas diris al mi:

– Vi, Mia-Maria, kiam ni venos al avo kaj avino, tiam ni ne plantos karotojn en nia vilaĝa ĝardeno, sed karamelojn, tiel estos multe pli bone.

– Jes, kvankam karotoj estas pli bonaj por dentoj, mi diris. Sed ni povas akvumi ilin per mia verda akvumilo, karamelojn mi celas.

Mi tre feliĉiĝis, kiam mi rememoris mian etan verdan akvumilon, kiun mi havis ĉiam en la vilaĝo ĉe avo kaj avino. Ĝi staras surbrete en kelo.

Ni gastas ĉe avo kaj avino ĉiam, kiam estas somero.

Ĉu vi povas diveni, kion Lotta faris foje en la vilaĝo ĉe avo kaj avino? Estas granda sterkamaso malantaŭ bovejo, tie onklo Johansson prenas sterkon kaj ĵetas ĝin sur plugokampon, por ke tritiko kresku bone.

– Por kio oni devas havi sterkon? demandis Lotta. Kaj tiam paĉjo diris, ke ĉio kreskas bonege, se oni metas sterkon sur ĝin.

– Devas esti ankaŭ pluvo, diris Lotta, ĉar ŝi bone memoris, kion panjo estis dirinta, kiam pluvigis tre multe tiusabate.

– Ĝuste tiel, Krieto, diris paĉjo. Posttagmeze ekpluvigis.

– Ĉu estas iu, kiu vidis Krieton? diris paĉjo.

Sed ni ne vidis ŝin dum longa tempo, kaj ni ekserĉis ŝin. Unue ni serĉis ĉie en la domo kaj en ĉiuj ŝrankoj, sed tie estis neniu Krieto. Kaj paĉjo maltrankviliĝis, ĉar li estis promesinta al panjo zorgi pri ŝi. Finfine ni eliris kaj serĉis, Jonas kaj paĉjo kaj mi, en la bovejo kaj en la fojnejo kaj ĉie. Sed poste ni iris malantaŭ la bovejon, kaj imagu, tie staris Lotta meze de la pluvo kaj meze de la sterkamaso, kaj ŝi estis tute ĝisoste malseka.

– Sed kara Krieto, kial vi staras tie? diris paĉjo. Tiam Lotta ekploris kaj diris:

– Ĉar mi devas kreski kaj fariĝi granda, kiel Jonas kaj Mia-Maria.

Oj, kiom naiva ŝi estas, Lotta!

## **2. Ni ludas dum tutaj tagoj**

Jonas kaj mi, ni ludas, kaj ni ludas, kaj ni ludas dum tutaj tagoj, jes, ankaŭ Lotta povas kunludi, kiam ni ludas tiajn ludojn, kiuj konvenas por ludi kun ŝi. Sed fojfoje ni ludas piratojn, kaj tiam Lotta nur ĝenas. Ĉar ŝi nur falas de la tablo, kiun ni havas kiel nian ŝipon. Sed ŝi krias kaj tamen volas kunludi. Antaŭ kelkaj tagoj ni ludis piratojn kaj ne povis liberiĝi de Lotta, tiam Jonas diris:

– Ĉu vi scias, kiel oni faras, kiam oni ludas piratojn, Lotta?

– Oni staras surtable kaj saltas kaj estas pirato, diris Lotta.

– Jes, sed ekzistas alia maniero, kiu estas multe pli bona, diris Jonas. Oni kuŝas surplanke sub lito, tute precize senmova...

– Kial do? diris Lotta.

– Nu, oni kuŝas tie kaj estas pirato, kaj tiam oni diras senĉese tute mallaŭte: "Pli da manĝaĵo, pli da manĝaĵo, pli da manĝaĵo". Estas tiel, kiel faras piratoj, diris Jonas.

Finfine Lotta ekkredis, ke estis tiel, kiel faras piratoj, kaj ŝi enrampis sub sian liton kaj komencis paroli:

– Pli da manĝaĵo, pli da manĝaĵo, pli da manĝaĵo. Jonas kaj mi elmarŝis la infanĉambron kaj navigis for en la oceanon, jes, ni nur ludis, kompreneble.

La tutan tempon Lotta kuŝis sub sia lito kaj parolis "Pli da manĝaĵo", kaj ni preskaŭ pensis, ke estis pli amuze rigardi ŝin ol esti pirato.

– Kiom longe piratoj kuŝas sublite kaj parolas "Pli da manĝaĵo"? finfine diris Lotta.

– Ĝis kiam venos Kristnaska vespero, diris Jonas.

Tiam Lotta elrampis kaj leviĝis de la planko kaj diris:

– Mi ne volas esti pirato, ĉar ili estas stultaj.

Sed fojfoje estas bone havi Lottan, kiam ni devas ludi. Fojfoje ni ludas, ke ni estas anĝeloj, Jonas kaj mi. Ni devas gardi, kaj tiam ni devas havi iun gardeblan, kaj tiam ni prenas Lottan sub nian gardon. Ŝi devas kuŝi en sia lito, kaj ni staras apude kaj svingas la brakojn kaj ŝajnigas, ke estas flugiloj, kiujn ni svingas, kaj ni flugas tien-reen. Sed Lotta ne trovas tiun ludon amuza, ĉar ŝi devas nur kuŝi senmove. Kaj se oni pripensas, do estas ja preskaŭ same por ŝi, kiam ŝi ludas piratojn, nur ke tiam ŝi kuŝas sublite kaj diras "Pli da manĝaĵo", sed tamen tio similas.

Ni ludas ankaŭ kuracejon. Tiam Jonas estas doktoro, kaj mi estas flegistino, kaj Lotta estas malsana infano, kiu kuŝas en sia lito.

– Mi ne volas kuŝi en mia lito, diris Lotta, kiam ni volis havi ŝin finfine kiel malsanan infanon. Mi volas esti doktoro kaj ŝovi kuleron en la gorĝon de Mia-Maria.

– Vi ne povas esti doktoro, diris Jonas, ĉar vi ne scias skribi resefton.

– Kion do mi ne scias skribi? diris Lotta.

– Resefton, tiun umon, kie doktoro skribas, kiel oni devas flegi malsanan infanon, sciu, diris Jonas.

Jonas scias skribi per tipografiaj literoj, kvankam li ankoraŭ ne estas komencinta lernejon. Kaj li scias ankaŭ legi.

Finfine ni igis Lottan enlitiĝi kaj esti malsana infano, kvankam ŝi ne volis.

– Kiel fartas ĉi tiu? diris Jonas kaj sonis precize kiel oĉjo doktoro, kiu venas al ni, kiam ni malsanas kaj havas morbilon.

– Pli da manĝaĵo, pli da manĝaĵo, pli da manĝaĵo, diris Lotta. Mi ludas, ke mi estas pirato, ŝi diris.

– Ho, kiom stulta vi estas, kriis Jonas. Ĉesigu tion, vi ne devas kunludi, se vi estas tiom stulta.

Kaj tiam Lotta fariĝis malsana infano, kaj ni metis kompreson ĉirkaŭ ŝiajn brakojn, kaj Jonas metis grandan lignan tubon al ŝia brusto kaj aŭdis en la tubo, ke ŝi estis forte malsana en la brusto. Kaj li ŝovis kuleron en ŝian gorĝon kaj vidis, ke ŝi estis malsana ankaŭ tie.

– Mi devas injekti ŝin, diris Jonas. Ĉar kiam Jonas foje estis malsana, tiam li ricevis injekton en la brakon de la doktoro, por ke li

pliboniĝu, tial li volis injekti Lottan. Kaj li ekprenis flikkudrilon, kaj ni ŝajnis, ke ĝi estis tia injektilo, kian havas doktoroj.

Sed Lotta ne volis esti injektita. Ŝi piedbatis kaj kriis:

– Vi ne devas injekti min.

– Ho, kia stultulino, ni ja nur ŝajngigas, diris Jonas. Mi ne devas vere piki vin, komprenu.

– Mi tamen ne volas esti injektita, kriis Lotta. Tiam ni preskaŭ ne plu povis ludi kuracejon.

– Mi tamen devas skribi resefton, diris Jonas. Kaj

li sidiĝis ĉe la tablo kaj skribis per blua kreto sur paperaĵo. Li skribis per tipografiaj literoj, sed mi ne povis legi tion. Rigardu la sekvan paĝon, kiel mizere tio aspektas.

Jonas kaj mi pensas, ke estas amuze ludi kuracejon. Sed tion ne pensas Lotta.

### **3. Lotta estas obstina, kiel maljuna kaprino**

Nia paĉjo estas tre ŝercema. Kiam li hejmenvenas el la kontoro, ni staras en la antaŭĉambro kaj renkontas lin, Jonas kaj mi kaj Lotta. Kaj tiam paĉjo ridas kaj diras:

– Ho, kiom multe da infanoj mi havas!

Foje ni kaŝis nin malantaŭ vestoj en la antaŭĉambro kaj staris tute vere silente, kaj tiam paĉjo diris al panjo:

– Kial estas neniu bruo en la domo, ĉu la infanoj malsanas?

Tiam ni venis el post la vestoj kaj ridis pri paĉjo, kaj tiam li diris:

– Vi ne devas timigi min ĉi tiel. Devas esti tondro kaj bruoj, kiam mi hejmenvenas, alie mi maltrankviliĝas.

Sed pri tio li ne bezonis aparte maltrankvili.

Foje estis du kamionoj, kiuj veturis laŭ la strato tute antaŭ nia domo, kaj ili krakegis tiom terure, ke Lotta vekigis, kvankam ŝi ĵus endormis. Kaj tiam Lotta diris:

– Kion Jonas ĵus faris? Ĉar ŝi kredis, evidente, ke estas Jonas, kiu faras ĉiun tondron kaj bruon ĉi tie en la mondo.

Lotta estas tre dolĉa kaj havas tiajn dikajn krurojn. Jonas kaj mi kutimas kisi Lottan kaj taŭzi ŝin, sed tion ŝi ne ŝatas. Estas multe da tiaĵoj, kiujn ŝi ne ŝatas, Lotta. Ŝi ne ŝatas preni medikamenton, kvankam ŝi devas, kiam ŝi malsanas. Pasintsemajne Lotta tuis, kaj tiam panjo volis, ke ŝi prenu tusmedikamenton. Sed Lotta nur kuntiris la lipojn kaj skuis la kapon.

– Vi estas eta stultulino, Lotta, diris Jonas.

– Mi ne estas eta stultulino, diris Lotta.

– Jes ja, ĉar vi ne volas preni tusmedikamenton, do vi estas stulta, diris Jonas. Kiam mi devas preni medikamenton, do mi simple ordonas al mi preni ĝin, kaj poste mi ĝin prenas.

Tiam Lotta diris:

– Kiam mi devas preni medikamenton, tiam mi ordonas al mi ne preni ĝin, kaj poste mi ĝin ne prenas.

Poste ŝi kuntiris la lipojn denove kaj skuis la kapon tien-reen. Panjo glatumis ŝin kaj diris:

– Jes, do vi povas ja kuŝi ĉi tie kaj tuis, povra eta Lotta!

– Jes, kaj ne dormi eĉ iomete, diris Lotta tre kontente.



Lotta ne ŝatas enlitiĝi vespere, kaj tion, sincerdire, ankaŭ mi ne ŝatas. Mi pensas, ke panjo estas tre stranga, ĉar ŝi volas, ke ni enlitiĝu vespere, kiam ni estas tute klare vekaj, sed matene, kiam ni dormas, tiam ŝi volas, ke ni leviĝu.

Estis ja bone, ke Lotta tamen prenis la medikamenton, ĉar sekvan tagon ŝi iĝis eĉ pli tusema kaj pli nazmuka, kaj panjo diris, ke ŝi ne devis eliri. Sed mi devis iri pro komisio de panjo en kudrobotikon, kaj kiam mi staris tie kaj atendis, ke venu mia vico, tiam Lotta venis enkurante tra la pordo, tute nazmuka.

– Iru hejmen, mi diris.

– Tion mi, certe, ne faros, diris Lotta. Ankaŭ mi volas iri en kudrobotikon.

Ŝi ronkis kaj ronkadis, kaj finfine estis onklino en la butiko, kiu diris al ŝi:

– Hej, ĉu vi ne havas naztukon?

– Jes, sed mi ne pruntos ĝin al tiuj, kiujn mi ne konas, diris Lotta.

Mi devas rakonti pli pri Lotta. Foje panjo kunprenis nin al dentisto, Jonas kaj min kaj Lottan. Panjo trovis, ke Lotta havas trueton en la dento, kaj tion dentisto devis ripari.

– Se vi estos vere brava ĉe la dentisto, tiam vi ricevos 25 oerojn, diris panjo al Lotta.

Panjo sidiĝis en atendejo, dum ni estis ene ĉe la dentisto. Unue li rigardis miajn dentojn, sed mi havis neniujn truojn, do mi povis eliri al panjo en la atendejon. Ni devis sidi tie tre longe, tre longe kaj atendi Jonas kaj Lottan, kaj panjo diris:

– Imagu, ke Lotta ne krias!

Post kelka tempo la pordo malfermiĝis kaj Lotta eliris.

– Ĉu vi ĵus estis brava? diris panjo.

– Jes ja, diris Lotta.

– Kion faris la dentisto? demandis panjo.

– Li eltiris la denton, diris Lotta.

– Kaj vi ne kriis? Ho, kiom brava vi estis, diris panjo.

– Ne, mi ne kriis, diris Lotta.

– Jes, jen vere brava knabino, diris panjo. Jen, ricevu 25 oerojn.

Lotta prenis 25 oerojn kaj ŝovis ĝin en la poŝon kaj aspektis ĝoja.

– Ĉu mi povas vidi, ĉu ĝi sangas? mi diris.

Lotta faŭkis, sed mi ne povis vidi, ke mankis iu dento ĉe ŝi.

– Li ja entiris neniun denton, mi diris.

– Jes ja, tiun de Jonas, diris Lotta.

Poste eliris Jonas kaj ankaŭ la dentisto. La dentisto montris al Lotta kaj diris:

– Pri ĉi tiu eta fraŭlino mi ne povis fari ion, ĉar ŝi ne volis malfermi la buŝon.

– Pri tiu ido oni devas honti ĉie, diris Jonas, kiam ni hejmeniris.

– Mi ne konis lin, diris Lotta. Mi ne povas faŭki antaŭ homoj, kiujn mi ne konas.

Paĉjo diras, ke Lotta estas obstina, kiel maljuna kaprino.

## 4. Onklino Berg estas la plej afabla, kiu povas esti

En la apuda domo loĝas onklino Berg, ni vizitas ŝin fojfoje. Estas barilo inter ŝia ĝardeno kaj nia ĝardeno, sed ni povas grimpi sur ĝin, Jonas kaj mi. Lotta ne povas grimpi, sed la hundo de onklino Berg elfosis grundon sub la barilo ĉe unu loko, tiel ke estiĝis truo, tra kiu Lotta rampas.

Antaŭ kelkaj tagoj ni estis ĉe onklino Berg kaj havis agrablan tempon. Ŝi havas klapburoon, kaj la buroo plenplenas je tirkestetoj, kiuj enhavas belajn aĵojn.

– Kara onklino Berg, ĉu ni povas vidi ĉiujn ĉi belajn aĵojn? diris Jonas.

Kaj tion ni povis. Unue ni trovis pupeton, kun kiu onklino Berg ludis, kiam ŝi estis infano. Ĝi nomiĝas Roza, la pupo.

Onklino Berg estas tre maljuna, ege maljuna, sed tamen ne tiom maljuna, kiom Lotta kredis. Jen kiel Lotta diris:

– Onklino Berg, ĉu vi kunhavis Rozan en arkeo de Noa?

Ĉar precize antaŭvespere paĉjo estis rakontinta al ni pri la arkeo de Noa. Li diris pri kiel oĉjo Noa konstruis por si grandan ŝipon, kiu nomiĝis arkeo. Kaj poste pluvis multajn semajnojn kaj ĉiuj, kiuj ne estis kun Noa en la arkeo, dronis, kaj tio okazis antaŭ multaj jarmiloj.

Onklino Berg, ŝi ridis kaj diris:

– Eta Lotta, mi ne estis kun Noa en la arkeo, sciu.

– Kial do vi ne dronis? diris Lotta.

Roza kuŝas en unu el la tirkestetoj en la buroo, kiun ŝi havas kiel sian liton. Ŝi kuŝas sur rozkolora vato kaj havas verdan silkpeceton

kiel kovrilon, kaj ŝi mem surhavas bluan robon. Kaj imagu, en unu el la aliaj tirkestoj onklino Berg havas etetan vitran korbon kun rozkoloraj rozoj sur ĝi. Ni povas ludi kun Roza, kaj ŝi ricevas la vitran korbon en la manon, kaj ni ludas, ke ŝi estas Ruĝoĉapulino, kiu iras al sia avino kun manĝaĵo kaj botelo da siropo. En bovlo sur piano onklino Berg havis ĉokoladkaramelojn. Multaj el ili estis kiel boteletoj kun staniolpapero ĉirkaŭe. Tiam boteleton ni metis en la korbeton de Ruĝoĉapulino kaj iom da rosinoj kaj migdaloj, kiujn ni ricevis de onklino Berg. Kaj la hundo de onklino Berg, Skotty, estis nia lupo, kaj mi estis avino, kaj Jonas estis ĉasisto, kiu venis kaj pafmortigis la lupon.

– Jes, sed mi ja, diris Lotta. Ĉu mi ne povos esti iu?

Sed Lotta povis porti Rozan kaj paroli tion, kion Ruĝoĉapulino devus diri, ĉar Roza mem ja ne povis paroli. Sed kiam Ruĝoĉapulino alvenis dometon de la avino (*kiu estis hejme, atendante onklinon Berg*), tiam ne plu restis rosinoj en la vitra korbeta kaj neniuj migdaloj.

– Kie estas la manĝaĵo por avino? diris Jonas.

– Roza formanĝis ĝin, diris Lotta.

Tiam Jonas ne volis, ke Lotta kunludu Ruĝoĉapulino. Kaj Skotty ne volis kunludi kaj ŝajnigi sin, ke li formanĝas avinon. Jonas retenis lin, sed li baraktis kaj baraktis, kaj finfine li liberiĝis kaj rampis sub la sofon kaj nur elŝovis iom la nazon jen kaj jen kaj rigardis nin kolere. Skotty ne ŝatas, sincerdire, kiam ni venas al onklino Berg.

Sed ni havis tre agrablan tempon, kaj ni rigardis ankaŭ ĉion ceteran en la buroo de onklino Berg. Ŝi havis pinglokusenon el ruĝa silko, kiu aspektas kiel koro, kaj bildeton en ora kadro, kaj sur la bildo estas bela anĝelo kun longaj, lumaj haroj kaj blanka noktoĉemizo kaj du grandaj blankaj flugiloj surdorse. Lotta multege ŝatas ĉi tiun bildon, kaj ankaŭ mi faras tion.

– Sed kiel la anĝelo sukcesis surmeti la noktoĉemizon super la flugilojn? diris Lotta. Jonas diris, ke, eble, estas zipo en la ĉemizo surdorse.

Onklino Berg bakis vaflojn por ni. Tion ŝi faras fojfoje, kiam ni venas por viziti ŝin, kvankam ne ĉiam.

– Estas tre belega printempa vetero, do ni povas sidi ekstere en la ĝardeno kaj trinki ĉokoladon kaj manĝi vaflojn, diris onklino Berg.

Dum onklino Berg estis en la kuirejo kaj bakis vaflojn, ni estis solaj en la gasteĉambro kaj ludis. Estas du fenestroj en la ĉambro, kaj ili estis malfermitaj, ĉar estis tre varme. Jonas kaj mi elŝovis la kapojn tra la fenestro, kaj Jonas ĵetis al mi ŝtonglobon, kiun li havis en la pantalonpoŝo. Kaj mi reĵetis ĝin al li, kaj ni ĵetadis ĝin tien-reen. Sed finfine mi faligis la ŝtonglobon, kaj ĝi falis sur la herbotapiŝon. Poste Jonas kaj mi devis konkuri kaj vidi, kiu povis pendi sufiĉe longe el la fenestro. Ni konkuris kaj konkuradis, kaj subite Jonas elruliĝis. Mi tre ektimis. Kaj ankaŭ onklino Berg tre ektimis. Ŝi envenis la ĉambron ĝuste kiam Jonas elruliĝis. Ŝi alkuris la fenestron kaj kriis:

– Nu, sed Jonas, kiel tio okazis?

Jonas sidis sur la herbotapiŝo kaj havis grandan ŝvelon sur la frunto.

– Mia-Maria kaj mi devis vidi, kiu povus pendi longe el la fenestro, kaj mi gajnis, diris Jonas.

Sed dum Jonas kaj mi konkuradis, Lotta estis trovinta trikaĵon de onklino Berg sur la sofo. Onklino Berg trikas puloverojn kaj jaketojn, kiujn homoj povas aĉeti de ŝi. Kaj imagu, tiu stulta Lotta eltiris trikilojn kaj implikis la tuton, kion onklino Berg estis trikinta. Ŝi sidis sur la sofo kaj estis tute volvita en fadenojn, kiujn ŝi ŝiris kaj taŭzis. Kaj onklino Berg kriis:

– Nu, sed Lotta, kion vi faris?

– Puloveron, diris Lotta. La fadenoj iĝis tute krispaj, ŝi diris.

Tiam onklino Berg diris, ke, evidente, estus plej bone, ke ni eliru en la ĝardenon kaj manĝu vaflojn, kaj poste estus, evidente, plej bone, ke ni hejmeniru.

Ni sidis en la ĝardeno de onklino Berg kaj trinkis ĉokoladon kaj manĝis tre multe da sukeritaj vafloj. Estis tre bele en la suno, kaj ĉirkaŭ ni saltetis paseretoj kaj ricevis panerojn de ni. Sed poste onklino Berg laciĝis kaj diris, ke ni devas hejmeniri. Kaj tiam ni grimpis sur la barilon, Jonas kaj mi, kaj Lotta rampis tra la truon, kaj ni hejmeniris kaj eniris la kuirejon por vidi, kion ni ricevos por tagmanĝo.

– Ni ricevos stufitajn perkojn, diris panjo. Tiam Jonas diris:

– Do estas bone, ke ni havas tre multe da vafloj en la ventroj.

– Ho, ĉu tiel, ĉu vi estis ĉe onklino Berg? diris panjo. Ĉu ŝi feliĉiĝis?

– Jes ja, diris Jonas. Ŝi feliĉiĝis dufoje. Unuafoje ŝi feliĉiĝis, kiam ni venis, kaj poste ŝi feliĉiĝis, kiam ni foriris.

Onklino Berg estas la plej afabla, kiu povas esti.

## **5. Ni faras ekskurson**

Foje paĉjo diris:

– Dimanĉe ni faros ekskurson!

– Hura, diris Jonas kaj mi.

– Hura, ĉar ni faros ekskurson, diris Lotta.

Dimanĉe panjo surpiediĝis frue kaj bakis patkukojn kaj preparis sandviĉojn kaj faris sufiĉe da ĉokolado en termobotelo kaj kafon, kiu

estis por ŝi kaj paĉjo. Ankaŭ ni kunhavis limonadon.

Kiam paĉjo alveturis per la aŭto, li diris:

– Nun ni vidos, ĉu ni havas spacon por ĉiuj en ĉi eta veturilaĉo. Nun ni vidos, ĉu mi povas enpaki panjon kaj Bruegon kaj Brueton kaj Krieton kaj dudek ses patkukojn kaj mi ne scias, kiom da sandviĉoj...

– Kaj Bamsen, diris Lotta.

Bamsen estas granda ŝtofa porko, kiun havas Lotta kaj kiun ŝi volas kunhavi ĉie. Ŝi kredas, ke ĝi estas urso, tial ŝi nomas ĝin Bamsen.

– Sed ĝi estas porko kaj ĝi ĉiam estis porko, diras

Jonas. Tiam Lotta krias kaj diras, ke ĝi estas urso.

– Ursoj ja ne estas rozkoloraj, diras Jonas. Ĉu vi kredas, ke ĝi estas blanka urso aŭ ordinara urso?

– Ĝi estas porkurso, diras Lotta.

Lotta povis kunpreni sian porkurson al ekskurso. Kiam ni sidiĝis en la aŭton, ŝi diris jene:

– Panjo, ĉu povas porkoj havi idojn?

– Ĉu vi celas Bamsen aŭ verajn porkojn, kiuj estas en la vilaĝo ĉe avo kaj avino? diris panjo.

Tiam Lotta diris, ke ŝi celis verajn vivajn porkojn kaj ne tiajn ursojn, kiel Bamsen. Panjo diris, ke veraj vivaj porkoj, certe, povas havi idojn.

– Tion ili, certe, ne povas, diris Jonas.

– Tion ili, certe, povas, diris panjo.

– Ne, ili ne povas havi idojn, diris Jonas. Ili povas nur havi porketojn.

Tiam ni ridis ĉiuj kune, kaj paĉjo diris, ke ne ekzistis pli petolemaj infanoj, ol Bruego kaj Brueto kaj Krieto.

Ni veturis al malgranda lago. Paĉjo lokis la aŭton sur arbarvojon, kaj poste ni portis ĉiujn sakojn kun manĝaĵo al la lago. Estis longa ponteto, kiu eliris en la lagon, kaj Jonas kaj mi kaj Lotta volis suriri la ponteton kaj rigardi, ĉu estis fiŝo en la akvo. Panjo tuj kuŝiĝis sur la herbon kaj diris al paĉjo:

– Ĉi tie mi kuŝos la tutan tagon kaj ne interrompos min eĉ por sekundo, vi devas varti la infanojn!

Paĉjo sekvis nin ĝis la ponteto, kaj ni kuŝis surventre kaj vidis plenan svarmon da etetaj fiŝoj naĝi tre rapide. Kaj paĉjo faris por ni fiŝkanojn el longaj bastonoj, kiujn li plukis en la arbaro, kaj metis ŝnurojn sur ilin kaj pinglojn por hoko. Kaj ni metis panerojn sur la hokojn, kaj ni sidis longe kaj fiŝkaptis, sed ni kaptis neniun fiŝon.

Tiam ni iris en la arbaron, kvankam panjo diris, ke ni ne rajtas iri malproksimen.

Ni vidis birdeton, kiu enflugis arbedon, kaj poste elflugis denove. Tiam ni iris tien kaj rigardis, kaj inter branĉoj en la arbedo preskaŭ sube ĉe la grundo estis birdnesteto kun kvar bluaj ovetoj en ĝi. Ho, ili estis la plej dolĉaj ovoj, kiujn mi iam vidis! Lotta volis resti kaj kontempli la birdneston senĉese, kaj ŝi etendis Bamsen antaŭ sin, por ke ankaŭ ĝi vidu. Sed Jonas kaj mi sciis pri bona grimpebla arbo tuj apude, kaj ni volis iri kaj grimpi sur ĝin, do Lotta devis kuniri, kvankam ŝi ne volis.

Mi kuraĝas grimpi sur arbon, kaj ankaŭ Jonas kuraĝas. Sed ne Lotta. Ni helpis ŝin grimpi sur etetan piceon, sed tiam ŝi kriis:

– Prenu min suben, prenu min suben!



Kaj kiam ŝi malsupreniris, ŝi rigardis tre kolere la arbon kaj diris:

– Estas ja freneze grimpi sur ĉi tian arbaĉon!

Poste panjo ekkriis, ke ni devas manĝi, kaj ni rekuris al la lago. Kaj ŝi metis plastan tukon sur la herbon kaj eĉ metis primolojn en glason sur la tukon kaj elmetis ĉiujn sandviĉojn kaj patkukojn kaj ĉion.

Ni sidis surherbe kaj manĝis. Tio estas multe pli agrable ol sidi ĉirkaŭ tablo. Patkukoj estis tre frandaj, ĉar ni havis konfitaĵon kaj sukeron sur ili. Ankaŭ sandviĉoj estis bongustaj. Mi pleje ŝatis tiujn, kiuj havas viandobulojn sur si, kaj Jonas pleje ŝatis tiujn, kiuj havas ovon kaj kaviaron sur si, do ni interŝanĝis tiel, ke li ricevis mian kaviarsandviĉon, kaj mi ricevis lian viandobulsandviĉon. Lotta pleje ŝatas ĉiujn specojn de sandviĉoj kaj volas interŝanĝi kun neniu. Ŝi manĝas multe, Lotta. Estis nur unu fojo, kiam ŝi malsanis, tiam ŝi entute ne havis apetiton, kaj panjo tre ĉagreniĝis, ĉar ŝi ne volis manĝi. Tiam Lotta diris jene foje vespere, kiam ŝi devis legi sian vesperan preĝon:

– Kara bona Dio, faru tiel, ke mi volu manĝi denove. Kvankam ne fiŝbulojn!

Ni ĉiuj ricevis nian limonadon, Jonas kaj Lotta kaj mi. Lotta prenis iom da sablo sube ĉe la strando kaj ŝovis ĝin en sian limonadon, kaj kiam ni demandis ŝin, kial ŝi faris tion, tiam ŝi diris, ke ŝi nur volis koni, kiel ĝi gustis.

Post la manĝado paĉjo etendiĝis surherbe kaj diris:

– Kiom bele estas ĉi tie en la suno. Mi kredas, ke mi dormos iom. La infanoj mem povas varti sin iom. Sed vi ne eliros en la arbaron, tion vi bone komprenas.

Ni ne eliris en la arbaron. Sed iom pli longe for ĉe la lago estis vere altega monteto, kaj tien ni eliris. Jonas diris, ke li montrus al ni, kiel paĉjo faras, kiam li plonĝas kapantaŭen.

– Jen kiel li faras, diris Jonas kaj etendis la brakojn aeren kaj faris salteton. Kaj imagu, tiam li ruliĝis en la lagon, kvankam tio ne estis intence. Kaj krome panjo estis dirinta, ke ni ne povas ankoraŭ baniĝi, ĉar estis tute tro malvarme en akvo.

Jonas, li sinkis, kaj Lotta kaj mi kriis per ĉiuj fortoj. Sed mi prenis branĉon, kiu kuŝis sur la monteto, kaj kiam Jonas emerĝis, li kaptis la branĉon kaj tenis ĝin. Kaj tiam Lotta ridis. Ĝuste tiam paĉjo kaj panjo alkuris, kaj paĉjo levis Jonas el la akvo.

– Jonas, kion vi elpensis, diris panjo, kiam Jonas elvenis sur la strandon tute malseka.

– Li nur estis montronta, kiel paĉjo faris, diris Lotta kaj ridis tre terure pri Jonas. Ĉar lia pantalono aspektis tre ridinde, ŝi diris.

Jonas demetis ĉiujn siajn vestojn, kaj panjo pendigis ilin sur sekigilon sur arbo. Sed kiam ni estis veturontaj hejmen, la vestoj ankoraŭ ne estis sekaj, do Jonas devis sidi volvita en plejdon. Kaj ankaŭ pri tio Lotta ridis. Sed poste ŝi vere ne ridis. Ĉar kiam ni estis veturontaj, ni ne povis trovi Bamsen. Ni serĉis kaj serĉadis ĉie, sed Bamsen estis for, kaj panjo diris, ke ni devis veturi hejmen sen Bamsen. Tiam Lotta ekkriis multe pli terure ol kiam Jonas ruliĝis en la lagon.

– Bamsen povas havi belan kaj plaĉan tempon nokte en la arbaro tute sola, diris paĉjo. Kaj morgaŭ mi povas reveni ĉi tien kaj trovi ĝin.

Sed Lotta nur kriis.

– Monstro povas veni kaj timigi Bamsen, ŝi diris.

– Se Bamsen renkontos monstron, tiam estas monstro, kiu pleje ektimos, diris paĉjo.

– Rememoru, kiam vi havis Bamsen laste, demandis panjo.

Lotta pripensis.

– Proksimume je la dekdua, ŝi diris.

Kvankam Lotta ne komprenas pri horoj eĉ iomete, do tio estis nura blago. Paĉjo diras, ke Lotta estas ĝisfunde blagema infano, kiu muelas per sia lango ion ajn.

Sed mi rememoris, ke Lotta havis Bamsen, kiam ni estis ĉe la birdnesto. Ni revenis ĉiuj kune al la grimpebla arbo, ĉar Jonas kaj mi sciis, ke la birdnesto estis tie, tuj apude.

Kaj apud la arbedo kun la birdnesto, tie vere sidis Bamsen, kaj Lotta prenis ĝin kaj kisis ĝin sur la muzelon kaj diris:

– Eta Bamsen, ĉu vi estis ĉi tie dum la tuta tempo kaj sidis sur tiuj dolĉaj, dolĉaj ovojn?

Jonas diris, ke tiu povra birdpatrino, certe, ne kuraĝis reveni al siaj ovojn dum la tuta tago, ĉar porkursoj estas la plej bonaj birdtimigiloj, kiuj ekzistas, diris Jonas.

Tiam Lotta ekkoleris kaj diris:

– Bamsen tuŝis nenion. Ĝi nur sidis kaj rigardis tiujn dolĉajn, dolĉajn ovetojn.

Poste ni veturis hejmen, kaj Jonas sidis en la plejdo la tutan tempon.

Panjo kaj paĉjo venis en la infanĉambron por diri 'bonan nokton' al ni vespere, kiel ili kutimis fari. Kaj paĉjo lokis sin apud la lito de Lotta, kie ŝi kuŝis kun sia malpuraĉa Bamsen apud si.

– Nu, Krieto, diris paĉjo, kio estis hodiaŭ la plej amuza dum la tuta tago? Estis, certe, kiam ni trovis Bamsen?

– Ne, plej amuze estis, kiam Jonas ruliĝis en la lagon, diris Lotta.

## **6. Ni veturas al avino kaj avo**

Kiam venas somero, ni veturas kun panjo al avino kaj avo en vilaĝon. Ankaŭ paĉjo venas tien, kiam li havas feriojn. Al avino ni vojaĝas per trajno, ĉar panjo ne scias stiri aŭton.

– Nun vi devas esti obeemaj en la trajno, por ke panjo ne ricevu malfacilaĵojn, diris paĉjo, kiam ni estis veturontaj ĉi-somere.

– Ĉu ni devas esti obeemaj nur en trajno? diris Jonas.

– Ne, ĉie, diris paĉjo.

– Vi diris, ke estas nur en trajno, kie ni devas esti obeemaj, diris Lotta.

Sed ĝuste tiam venis trajno, kaj paĉjo sukcesis nur mansvingi al ni, kaj ni mansvingis al li kaj kriis 'adiaŭ'.

Ni sidis preskaŭ solaj en eta kupeo. Tie sidis ankaŭ maljuna oĉjo, li estis la sola, kiu ricevis spacon. Lotta kunhavis sian Bamsen, kaj mi kunhavis mian plej grandan pupon, kiu nomiĝas Maud Yvonne Marlene (*mod ivon marlen*). Tiu oĉjo havis verukojn sur la mentono, kaj kiam li elvenis kaj lokis sin ĉe fenestro en la koridoro por iom, tiam Lotta flustris tute laŭte al panjo:

– Tiu oĉjo havas verukojn sur la mentono...

– Ĉit, flustris panjo, li povas aŭdi tion. Tiam Lotta mienis tre surprizite kaj diris:

– Ĉu li mem ne scias pri tio, ke li havas verukojn sur la mentono?

Poste venis kondukisto kaj tondis biletojn. Estis nur panjo kaj Jonas, kiuj havis biletojn, ĉar Lotta kaj mi vojaĝas senpage dumtempe.

– Kiom aĝas ĉi knabineto do? demandis la kondukisto kaj montris al mi. Mi diris, ke mi devis fariĝi sesjara.

Li ne demandis, kiom aĝis Lotta, ĉar li povis, certe, vidi, ke ŝi estis tro malgranda por bezoni bileton. Sed Lotta diris:

– Mi aĝas kvar jarojn, kaj panjo – tridek du. Kaj jen Bamsen. Tiam kondukisto ridis kaj diris, ke en ĉi trajno ĉiu Bamsen vojaĝas senpage.

Unue ni sidis senmove kaj rigardis tra la fenestro, sed poste ni laciĝis pro tio. Jonas kaj mi eliris en la koridoron kaj en aliajn kupeojn, kaj ni parolis kun homoj, kiujn ni ne konis. Sed fojfoje ni revenadis al panjo, por ke ŝi ne maltrankviliĝu. Panjo sidis kaj rakontis ĉiujn eblajn fabelojn al Lotta, por ke Lotta sidu senmove. Ŝi ne volis, ke Lotta eliru en la koridoron, ĉar oni neniam scias, kion Lotta povas elpensi, diris panjo.

– Rakontu pri la tri kaproj Bruska (*"La tri kaproj Bruska" {orig. "De tre bockarna Bruse"}* – *popola fabelo, notita en 1840 en Norvegio de Peter Christen Asbjørnsen kaj Jørgen Moe por "Norske folkeeventyr" {"Norvegaj popolaj aventur fabeloj"}*), alie mi elvenos en la koridoron, diris Lotta.

Ni manĝis sandviĉojn kaj trinkis limonadon en la trajno. Subite Lotta prenis tranĉaĵon da punktita kolbaso el sia sandviĉo kaj metis ĝin firme sur la fenestron. Panjo tre ekkoleris kontraŭ ŝi pro tio kaj diris:

– Kial vi ŝmiraĉas kolbason sur la fenestron?

– Jes, ĉar ĝi gluiĝas firme kaj multe pli bone ol viandobuloj, diris Lotta.

Tiam panjo eĉ pli ekkoleris kontraŭ ŝi. Kaj panjo devis froti la fenestron per papertuko longe-longe, antaŭ ol ĝi fariĝis pura post la kolbaso de Lotta.

Foje, kiam la trajno haltis ĉe stacio, Jonas elpensis, ke li kaj mi devas eliri por promeneto kaj ricevi iom da freŝa aero. Ni ne povis malfermi la pordon, sed estis onklino, kiu helpis nin.

– Ĉu vere vi devas eliri ĉe tiu stacio? ŝi diris.

– Jes, ni diris. Ĉar ni ja devis eliri, sed ni ja devis reveni, kompreneble.

Kiam ni eliris la trajnon, ni foriris al la lasta vagono, kaj ĝuste antaŭ ol la trajno estus startinta denove, ni ensaltis en la lastan vagonon kaj iris tra la tuta trajno, ĝis kiam ni venis al nia propra kupeo. Kiam ni venis tien, ni ekvidis panjon kaj la damon, kiu estis helpinta nin pri la pordo, stari kaj interparoli kun la kondukisto, kaj panjo kriis:

– Vi devas haltigi la trajnon, ĉar miaj infanoj for trotis. Sed ĝuste tiam ni alvenis, kaj Jonas diris:

– Kvankam ni retrotis.

Tiam panjo ekploris, kaj la kondukisto kaj la damo, kiu estis helpinta nin malfermi la pordon, kriis al ni. Kvankam kial la onklino krii, kiam estis ŝi, kiu estis helpinta nin?

– Nun vi iros kaj sidiĝos en kupeo kun Lotta kaj ne elvenos eĉ por sekundo, diris panjo.

Sed Lotta ne estis en la kupeo. Ŝi estis malaperinta. Tiam panjo preskaŭ rekomencis plori. Ni iris ĉiuj kune kaj serĉis Lottan. Kaj finfine ni trovis ŝin en kupeo multe pli longe for, tie ŝi rakontadis al amaso da homoj. Ni aŭdis ŝin diri jene:

– En nia kupeo, tie ni havas oĉjon, kiu havas verukojn, sed li mem ne scias pri tio. Tiam panjo firme kaptis Lottan kaj trenis ŝin for kun si al nia propra kupeo. Kaj tie ni devis sidi tute, tute senmovaj, ĉar panjo koleris kontraŭ ni kaj diris, ke estus pli facile varti plenan aron da sovaĝaj bovidoj, ol varti nin.

Tiam mi ekpensis, ke mi baldaŭ ekvidos bovidojn ĉe avino kaj avo. Kaj mi tre feliĉiĝis.

Avino kaj avo staris sur verando kaj renkontis nin, kiam ni venis. Kaj ilia hundo, kiu nomiĝas Lukas, bojis kaj saltis, kaj odoris somerece en la ĝardeno.

– Ĉu estas miaj oraj infanetoj, kiuj venas? diris avino.

– Jes, estas belaj oraj infanetoj, diris panjo.

– Morgaŭ vi povos rajdi al Blacken (*Blacken – preskaŭ la plej okcidenta fjordo ĉe Mälaren, lago, tria en Svedio laŭ granda*), diris avo.

– Kuniru suben al draŝejo, tiam vi vidos katidojn de Murra, diris avino. Lotta ektiris antaŭtukon de avino kaj diris:

– Ĉu vi havas karamelojn restintaj en ŝranko, avino?

– Ho, jes, tio ja povas okazi, diris avino. Kelkaj etajn karamelojn, eble, mi havas en ŝranko, ŝi diris. Tiam ni eksentis, ke ni estis venintaj hejmen al avo kaj avino.

## **7. Lotta parolas preskaŭ per nuraj sakraj vortoj**

Ĉe avino kaj avo estas tre multe da agrablaĵoj. Imagu, sur granda arbo, kiu staras en la ĝardeno, estas precize kvazaŭ verando. Alte supre sur arbo! Tien supren kondukas ŝtuparo, kaj kiam oni estas grimpintaj supren per ĉi tiu ŝtuparo, do oni venas al tiu verando, kaj tie estas tablo kun benkoj kaj barileto ĉirkaŭe, tiel ke oni ne povas ruliĝi suben. Avino nomas tiun verandon Verda Plezurdometo. El ĉiuj lokoj, kie oni povas sidi kaj manĝi, mi pleje ŝatas tiun, kiu situas supre sur la arbo.

Kiam ni vekiĝis unuan tagon ĉe avino kaj avo, tiam Jonas tuj diris:

– Avinjo, ni ja povas, certe, decidi, ke ni manĝos en la Verda Plezurdometo precize ĉiam?

– Oj, oj, oj, diris avino, kion vi kredas, ke Majken dirus, se ŝi estos devigita treni manĝaĵojn supren laŭ tiu malstabila ŝtuparo trifoje ĉiutage?

– Tiam mi diros "spit", diris Majken.

Majken, ŝi estas domhelpantino de avino. Ŝi estas tre afabla, sed ŝi tute ne ŝatas manĝi surarbe.

– Sed avinjo, ni ja povas tamen kunpreni supren nian manĝaĵon al la Verda Plezurdometo, mi diris.

– Ĉar alie ni tre ekkoleros, diris Lotta, ŝi estas stulteta, Lotta!

Kaj tiam avino diris, ke ŝi ne volis, ke Lotta ekkoleru, kaj tial ni povis kunpreni patkukojn surpen al la Verda Plezurdometo.

Avino bakis tutan mason da patkukoj, kaj ŝi metis la patkukojn kaj paketon da sukero kaj skatoleton da konfitaĵo en korbeton por ni, ŝi ankaŭ enmetis telerojn kaj forkojn kaj boteleton da lakto kaj tri tasojn.

Kaj poste ni grimpis en la Verdan Plezurdometon. Jonas grimpis la unua kun la korbeto, kaj poste venis mi, kaj poste venis Lotta.

– Se vi faligus la korbeton, Jonas, tiam mi, sendube, ridus, diris Lotta.

Sed Jonas ne faligis la korbeton, kaj ni surtabligis la tuton supre surarbe kaj sidis sur la benkoj kaj manĝis siajn patkukojn kun multe da konfitaĵo kaj sukero sur ili kaj trinkis lakton, kaj la arbo susuris la tutan tempon. Estis tiom terure multe da patkukoj, kaj Lotta ne kapablis finmanĝi la siajn. Kaj imagu, tiam ŝi pendigis la patkukojn sur la arbobranĉojn!

– Mi ludas, ke ili estas folioj, diris Lotta.

Kaj la patkukoj swingis sin tien-reen, kiam blovis, kaj aspektis preskaŭ kiel folioj.



– Gardu vin, se panjo ekscios tion, mi diris.

Sed Lotta, ŝi ne zorgis pri kion mi diris. Ŝi nur sidis tie kaj rigardis siajn patkukojn kaj kantis kanteton, kiun paĉjo kutimas kanti, kaj kiu komenciĝas jene: "Hej, kiel susuras en la folioj!" Ŝi baldaŭ refariĝis malsata, kaj tiam ŝi mordis de ĉiuj patkukoj, tiel ke sur la arbo restis nuraj duonpatkukoj.

– Mi ludas, ke mi estas ŝafideto, kiu mordas foliojn sur arbedo, ŝi diras.

Subite birdo venis flugante, kaj tiam Lotta diris al la birdo:

– Vi povas volonte manĝi de miaj patkukoj, sed ne Jonas kaj ne Mia-Maria.

Kvankam la birdo volis havi neniujn patkukojn. Sed Jonas kaj mi eksentis, ke ni estis pli malsataj, kaj mi etendis la manon al Lotta kaj diris:

– Mizerulo, donu al mi iom en mian manon!

Kaj tiam Lotta donis al mi patkukon, kiun ŝi estis mordinta, kaj mi superŝutis ĝin per sukero kaj ŝmiris per konfitaĵo kaj manĝis, kaj ĝi estis tre bongusta, kvankam ĝi estis nura duonpatkuko. Kaj ankaŭ Jonas ricevis patkukon de Lotta, kiam li diris "Mizerulo, donu al mi iom en mian manon", ĉar tiajn, kiuj estas iom idiotaj, Lotta ŝatas. Finfine ni formanĝis ĉiujn patkukojn anstataŭ Lotta, kaj tiam ŝi diris:

– Nun la patkukfolioj elĉerpiĝis. Nun vi devas ekmanĝi el la verdaj!

Kaj ŝi forŝiris plenan pugnon da verdaj folioj kaj volis, ke ni manĝu. Sed Jonas kaj mi diris, ke ni estis sataj.

– Kun sukero kaj konfitaĵo, tiel oni faras tion, diris Lotta, kaj tiam ŝi superŝutis per sukero kaj ŝmiris per konfitaĵo la verdan folion kaj formanĝis ĝin.

– Kontrolu, ke ne sidu vermo sur la folio, diris Jonas.

– Vermo povas ja mem kontroli sin, diris Lotta. Ŝi havas multajn ideojn, tiu infano, diras avo.

Imagu, sekvan tagon, kiu estis dimanĉo, tiam ni ricevis klupeon por tagmanĝo, kaj, krom fiŝbuloj, ĝi estas pleja aĉaĵo, kiun Lotta konas. Estis tre bela vetero, kaj ĉi-kaze avino kaj avo ĉiam manĝas en la ĝardeno ĉe tablo, kiu staras sub la plej granda arbo, kiu estas tie. Kaj ni sidas ĉiuj kune ĉirkaŭ la tablo, avino kaj avo kaj panjo kaj Jonas kaj mi, sed Lotta daŭre ludas kun katino kaj ne venas, kvankam panjo vokis ŝin multfoje. Fine ŝi venis, kaj kiam ŝi ekvidis, ke estis klupeo, tiam ŝi diris:

– Klupeo dimanĉe... fi, diablo!

Tiam panjo tre ekkoleris kontraŭ ŝi, ĉar ŝi diris al Lotta milfoje, ke ŝi ne devas diri "fi, diablo", kiu estas preskaŭ sakra vorto. Kaj panjo diris, ke se Lotta dirus "fi, diablo" ankoraŭfoje, do ŝi ne povus resti ĉe avino kaj avo, sed devus reveturi hejmen en la urbon. Kaj Lotta ne rajtis sidi kun ni kaj manĝi nur ĉar ŝi diris tiel, kaj tiam ŝi iris ĉirkaŭe en la ĝardeno kaj kriis senĉese, dum ni manĝis.

Poste ŝi devis sidi sola ĉe la tablo kaj manĝi, sed ŝi nur kriis. Panjo forsendis Jonas kaj min kaj diris, ke ni devas iri kaj ludi, por ke Lotta estu sola, ĝis ŝi fariĝos afabla. Sed ni haltis malantaŭ domangulo kaj staris tie kaj rigardis Lottan, kiu nur kriis kaj kriadis. Sed finfine ŝi silentiĝis, kaj tio estis nur ĉar ŝi estis reakirinta unu el ĉiuj siaj strangaj ideoj. Ŝi prenis la klupeon, kiu kuŝis sur ŝia telero, kaj poste ŝi iris al akvobarelo, kiu staris sub pluvtubo, kaj tien ŝi trempis la klupeon. Tiam panjo venis ĝustatempe kaj ekvidis tion, kaj tiam Lotta diris:

– Ĝi ja povas pro diablo naĝi iom!

– Lotta, rememoru, kion mi diris, diris panjo.

Tiam Lotta kapjesis, kaj poste ŝi iris en la domon, kaj post kelka tempo ŝi eliris denove kaj havis sian propran vojaĝosaketon enmane, kaj el la saketo pendis zono, kiu treniĝis post ŝi, kiam ŝi iris.

Kaj panjo kaj avino kaj avo kaj Jonas kaj mi staris kaj rigardis Lottan, kiam ŝi estis vojaĝonta. Ŝi aliris avinon kaj avon kaj riverencis kaj diris:

– Mi veturos hejmen al paĉjo, ĉar li estas multe pli afabla ol panjo.

Ŝi ne diris 'adiaŭ' al panjo kaj ankaŭ ne al Jonas kaj mi. Kaj ni staris tie kaj rigardis, kiam ŝi iris kun la zono, treniĝanta post ŝi. Sed kiam ŝi malsupreniris ĝis la barilpordo, tiam ŝi haltis. Ŝi staris tute senmova longan tempon. Kaj tiam panjo iris renkonte al ŝi kaj diris:

– Nu, eta Lotta, vi ne forveturos, ĉu?

Tiam Lotta diris:

– Jes ja, panjo, pro kiu diablo mi povas vojaĝi sola en trajno!

Kaj tiam panjo prenis kaj kisis Lottan kaj diris, ke estis, certe, bonege, ke ŝi haltis, kie ŝi estis, ĉar ni ĉiuj tre ĉagreniĝus, se ŝi forvojaĝus. Kaj Lotta pendis ĉirkaŭ la kolo de panjo kaj ploris kaj ne volis paroli kun Jonas kaj mi, kvankam ni volis konsoli ŝin kaj kisi ŝin.

Sed vespere, kaim ni estis enlitiĝintaj, tiam avino sidis ĉe ni kaj rakontis por ni bibliajn historiojn kaj montris al ni bildojn en bela biblio, kiun ŝi havis. Kaj tie estis bildo, sur kiu estis nigra monstro, kaj tiam avino diris, ke diablo estis malbenita de Dio.

Tiam Lotta diris:

– Aj, aj, avino, kion vi ĵus diris! Sed Lotta mem preskaŭ neniam plu diras 'diablo'.

## **8. Lotta havas sprittagon**

Preskaŭ la plej amuza afero, kiu estas ĉe avino kaj avo, ĝi estas luddometo, kiun panjo kaj onklino Kajsa havis, kiam ili estis infanoj.

Ĝi estas ruĝa kaj situas en ĝardenangulo, kaj tien kondukas mallarĝa pado kaj antaŭ ĝi estas herbotapiŝo, sur kiu kreskas lekantoj. Kaj en la luddometo estas etaj blankaj mebloj, tablo kaj seĝoj kaj ŝranko, kaj en la ŝranko estas pupvazaro kaj pateto kaj pupgladilo kaj karafeto kun glaso aldone por havi sukron en ĝi. En la luddometo loĝas pupoj de panjo kaj de onklino Kajsa. Kaj tie estas benketo, kiun avino havis, kiam ŝi estis infano, imagu, ke benketoj povas iĝi tiom malnovaj!

Unu tagon ni ludis en la luddometo, kiam ni estis ĉe avino kaj avo. Tiam ni ludis, ke Jonas estis paĉjo kaj mi estis panjo, kaj Lotta estis nia domhelpantino kaj nomiĝis Majken.

– Nun paĉjo eliros kun Beбето, tuj diris Jonas kaj prenis pupĉareton kun bebpupeto de onklino Kajsa ene kaj eltrenis ĝin en la ĝardenon.

– Kaj nun mi devas lavi en la kuirejo, diris Lotta.

– Ne, unue ni devas fari fromaĝon, mi diris, ĉar estis ja mi, kiu devis decidi, ĉar mi estis panjo.

– Fariĝos neniuj fromaĝoj, antaŭ ol mi estos lavinta, diris Lotta.

Sed tiam Jonas kaj mi diris, ke Lotta ne devis kunludi, se ŝi ne faris, kiel ni diris. Kaj poste ni faris fromaĝon. Kiam oni faras fromaĝon, oni prenas ribojn kaj frambojn kaj metas ilin en naztukon, kaj poste oni elpremas tutan sukron, kaj kio restas en la naztuko, el tio oni faras malgrandajn rondajn fromaĝojn, kiuj estas plej acidaj en la mondo.

– Ĉu oni povas nun finfine lavi la kuirejon? diris Lotta.

Kaj tiam ŝi prenis lavsitelon kaj iris en la kuirejon de avino por akvo, kaj preskaŭ la tutan akvon ŝi elverŝis sur la plankon en la luddometo kaj komencis lavi per broso, sur kiun ŝi metis sapon. La tuta Lotta ĝisfunde malsekiĝis.

– Ĉu vi naĝas aŭ kion vi faras? diris Jonas, kiu ne plu estis ekstere kun Beбето.

– Mi lavas la kuirejon, diris Lotta. Ĉar oni devas

lavi la kuirejon, kaj tio estas la plej amuza afero. Sed Jonas kaj mi devis helpi viŝi la akvon. Lotta ne volis. Ŝi nur staris apude kaj rigardis.

Majken, vera Majken, ŝi kutimas kanti kaj danci, ŝi eksvingas la krurojn kaj kantas, "Trarallanrallanli, mi versas pri vi", kantas Majken.

Lotta faris simile al Majken, ŝi eksvingis la krurojn kaj kantis "trarallanrallanli", ŝi kantis, "mi verŝas pri vi". Kaj kiam ŝi kantis "verŝas", tiam ŝi prenis penikon, kiu pendas sur la muro en la luddometo, kaj trempis ĝin en la lavsitelon kaj verŝis tutan mason da akvo sur Jonas kaj min kaj ridis per ĉiuj fortoj. Tiam ni ekkoleris kaj diris, ke se ŝi estis tiom stulta, do ŝi mem povis viŝi la akvon. Sed Lotta nur daŭre svingis la krurojn kaj kantis "Mi verŝas pri vi". Estis tute glite sur la planko pro ĉiu sapo, kaj kiam Lotta svingis la krurojn tiom arde, ŝi renversiĝis, kaj ŝia kapo batiĝis kontraŭ la ŝrankon, povra Lotta! Tiam ŝi ekkriis kaj diris:

– Ne estas amuze esti Majken.

Kaj ŝi eliris por trovi la katon anstataŭe, kaj Jonas kaj mi ludis solaj kaj faris spinacon el siringofolioj kaj manĝis fromaĝon kaj spinacon, kvankam estis nur, ke ni ŝajnis.

Subite ni aŭdis Lottan krei ekstere, kaj kiam ni elrigardis, ni ekvidis ŝin treni la katon je la vosto, kaj tiam la kato ekkoleris kaj gratis ŝin. Tiam ŝi eniris la luddometon ĉe nin kaj ploris kaj kriis kaj diris:

– Mi nur tenis lin je la gambo, kaj tiam li gratis min!

Panjo kaj avino ne estis hejme, do ni iris por trovi Majken kaj ricevi plastron por Lotta. Majken ne estis en la kuirejo. Sed Lotta,

ŝi estis forgesinta reŝtraŭbi akvokranon, kiam ŝi alportis lavakvon, kaj mi povas diri, ke estis dekoble pli multe da akvo sur la kuireja planko, ol estis en la luddometo, kiam Lotta lavis. Jonas tretetis tra ĉiu ĉiu akvo kaj reŝtraŭbis la kranon, kaj ĝuste tiam venis Majken. Ŝi kunfrapis la manojn kaj ekkriis:

– Kion vi faras, Jonas?

– Li naĝas, diris Lotta kaj ridis per ĉiuj fortoj. Sed Majken volis scii, kiu malŝtraŭbis la kranon, kaj tiam Lotta diris:

– Tion faris mi.

– Kial vi faris tion? diris Majken.

– Ĉar mi havas spittagon hodiaŭ, diris Lotta.

"Spittago" diras Lotta. Tiam ŝi celas misfortunan tagon, kiam ĉio pasas idiote. Mi opinias, ke Lotta havas misfortunan tagon preskaŭ ĉiam.

Sed Majken, ŝi viŝis la plankon kaj metis plastron sur Lottan kaj donis al ni ĉokoladon kaj bulkojn ĉe la kuireja tablo kaj dancis por ni kaj svingis la krurojn kaj kantis "Trarallanrallanli, mi versas pri vi".

Lotta formanĝis kvin bulkojn, kaj Jonas formanĝis kvar, kaj mi formanĝis tri.

– Ĉi tio estas vere tre plaĉa spittago, diris tiam Lotta. Kaj poste ŝi brakumis Majken laŭpove plej firme kaj kantis:

– Trarallanrallanlin, mi forte kisas vin.

Kaj poste ŝi faris tion, kaj tiam Majken diris, ke ŝi estis ĉarma infaneto.

## 9. Lotta estas negrosklavo

Jonas kaj Lotta kaj mi, ni havas du gekuzojn, kiu estas idoj de onklino Kajsa. Kiam ni gastis ĉe avino kaj avo en la vilaĝo somere, tiam ankaŭ onklino Kajsa venis tien kaj kunprenis Anna-Klaran kaj Totten. Anna-Klara kaj Totte, ili estas niaj gekuzoj. Anna-Klara estas same maljuna, kiel Jonas, kaj Totte estas same juna, kiel Lotta. Anna-Klara povas draŝi Jonas, ĉar ŝi estas tre forta kaj tial ŝi estas vere tre decidema. Kaj Lotta povas draŝi Totten tre facile, tion ŝi ja vere faris, kvankam panjo diris, ke ŝi ne rajtas.

– Kial vi batas Totten, kiu estas tre afabla? diris panjo al Lotta.

– Ĉar li estas tre dolĉa, kiam li ploras, diris Lotta.

Tiam Lotta devis sidi sola en la luddometo, por ke ŝi fariĝu obeema. Kaj tiam Anna-Klara elpensis, ke ni ludu, ke Lotta sidas en prizono kaj ni devas savi ŝin.

– Unue ni devas kaŝe sendi al ŝi iom da manĝaĵo, diris Anna-Klara. Ĉar en prizono oni ricevas nur akvon kaj panon.

Kaj ni iris en la kuirejon kaj petis Majken, ke ni ricevu malvarmajn viandobulojn. Anna-Klara metis la viandobulojn en korbeton, kiun ni havis por pluki berojn en ĝin. Poste Jonas kaj Anna-Klara suprengrimpis sur tegmenton de la luddometo kaj kriis al Lotta, ke ni mallevos la manĝaĵon por ŝi tra la fumtubo. Sed tiam Lotta elŝovis la kapon tra la fenestro kaj demandis, kial ŝi ne povis ricevi manĝaĵon tra la fenestro aŭ tra la pordo.

– Ĉu la pordo ne estas ŝlosita? diris Anna-Klara.

– Ne, en vero tio estas falsprizono, diris Lotta. Venu ĉi tien kun la viandobuloj!

Sed tiam Anna-Klara ekkoleris kontraŭ Lotta kaj diris, ke kiam oni sidas en prizono, tiam oni devas ricevi manĝaĵon mallevita tra fumtubo.

– Tio certas, diris Anna-Klara.

– Do ek, diris tiam Lotta.

Kaj Anna-Klara prenis longan ŝnuron el la korbo kaj mallevis ĝin tra la fumtubo. Jonas povis helpi mallevi, kvankam ne multe. Sed Totte kaj mi povis nur stari sube kaj rigardi.

– Jen venas la viandobuloj, kriis Lotta en la luddometo. Kaj krome multe da fulgo, ŝi diris.

Totte kaj mi rigardis tra la fenestro kaj vidis Lottan formanĝi la viandobulojn. Sed estis multe da fulgo sur ili, do Lotta fariĝis tute nigrovizaĝa kaj nigromana. Anna-Klara diris, ke tio estis nur bone, ĉar tiam Lotta povis esti kaptita negrosklavo, kiun ni povis savi. Kaj Lotta ŝmiris sur sin eĉ pli da fulgo, por ke ŝi fariĝu vera negrosklavo. Sed Totte ploris, ĉar li kredis negrosklavojn esti danĝeraj.

– Ili ne estas danĝeraj, diris Anna-Klara.

– Sed ili aspektas danĝeraj, diris Totte kaj ploris eĉ pli.

Tiam Lotta fariĝis kontentega kaj grimacis al Totte kaj diris:

– Multaj negrosklavoj estas sufiĉe danĝeraj. Poste ŝi diris:

– Savu min tuj, ĉar mi volas iri ĉirkaŭe kaj timigi homojn. Mi ŝatas, kiam homoj ektimas min.

Kaj Anna-Klara kaj Jonas decidis, ke ni savu Lottan tra la fenestro, kiu estas en malantaŭa flanko de la luddometo. Ni iris kaj alportis tabulon de balancilo, ĉar Anna-Klara diris, ke la tabulo estu ponto super abismo, kiu estis antaŭ la prizono. Ni metis la tabulon al la fenestro, kaj Anna-Klara kaj Jonas kaj mi engrimpis por savi la negrosklavon. Sed ne Totte. Li nur rigardis kaj ploris.

Kiam ni envenis la luddometon, tiam Lotta ne estis tie. Anna-Klara tre ekkoleris.

– Kien malaperis ĉi infano? ŝi kriis.



– Mi eskapis, diris Lotta, kiam ni kaptis ŝin. Ŝi sidis en ribarbedoj kaj manĝis ribojn.

– Ni ja devis savi vin, diris Anna-Klara.

– Mi mem saviĝis, diris Lotta.

– Oni neniam povas ludi kun vi, diris Jonas.

– Ha ha, diris Lotta.

Tiam panjo venis kaj ekvidis, ke Lotta ne plu estis en la luddometo.

– Ĉu vi estas obeema nun, Lotta? diris panjo.

– Jees... kvankam nigra, diris Lotta.

Ankaŭ panjo, evidente, ektimis la negrosklavon, ĉar ŝi kunfrapis la manojn kaj diris:

– Dio kompatema, kiel vi aspektas! Kaj Lotta devis iri en la bandomon kaj lavi sin dum tuta duonhoro.

Sed posttagmeze ni kunprenis la viandobulkorbon kaj plukis fragojn en ĝin. Estas tre multe da fragoj en herbejoj ĉe avino kaj avo. Sed ho, ni tre ektimis, kiam ni plukis fragojn, ĉar ni ekvidis serpenton. Nura Totte ne ektimis.

– Vidu, jen vosto, kiu ne havas hundeton, diris Totte. Li ne komprenis, ke ĝi estis serpento.

Ni hejmeniris, kaj Anna-Klara dividis ĉiujn fragojn, tiel ke ni ĉiuj ricevis precize same multe. Kvankam Anna-Klara ricevis la plej grandajn kaj la plej ruĝajn. Totte kaj Lotta sidiĝis sur verando por formanĝi siajn fragojn. Tiam ni aŭdis Totten plori. Kaj onklino Kajsa elŝovis la kapon kaj demandis:

– Kial Totte ploras?

- Li ploras, ĉar li ne povas gustumi miajn fragojn, diris Lotta.
- Ĉu liaj propraj fragoj finiĝis? demandis onklino Kajsa.
- Jes, diris Lotta, ili tute finiĝis. Kaj li ploris, kiam mi formanĝis ankaŭ ilin.

Tiam panjo venis kaj prenis la fragojn de Lotta kaj donis ilin al Tote, kaj Lotta diris:

- Tralala, mi kredas, ke mi iros kaj enlitiĝos.
- Tiel ja estas plej bone, diris panjo. Vi ja laciĝis nun, Lotta.
- Tia mi, certe, ne estas, diris Lotta. Mi havas tre multe da kuro en la gamboj. Sed mi tamen iros kaj enlitiĝos.

Kvankam ĉi-vespere Lotta estis tre ĝentila rilate al Tote. Tote estis dormonta tute sola en eta gastoĉambro. Tiam li tre timis mallumon kaj ploris kaj volis, ke la pordo restu malfermita. Onklino Kajsa diris:

- Jes, sed Toĉjo, vi ja neniam timas dormi en mal
- lumo, kiam vi estas hejme. Tiam Lotta diris:
- Estas lia propra mallumo hejme, komprenu, onklino Kajsa. Li ne kutimas al la mallumo de avino, komprenu.

Kaj tiam Tote rajtis kuŝi en la sama ĉambro, kie estis mi kaj Jonas kaj Lotta. Kaj Lotta kisis lin kaj volvis lin kaj diris:

- Nun mi kantos por vi, tiam vi ne timos. Kaj poste Lotta kantis, kiel panjo kutimas fari por ni:

"L' anĝeletoj de Dio

Disvolvas la flugilojn,

ĉe infanoj ili staras,  
ĝis kiam la ĉielo klaros."

– Kaj ankaŭ Lotta, diris Lotta. Kaj neniu nigra negrosklavo!

## **10. Ni havas tre agrablan tempon, kiam venas Kristnasko**

Foje Jonas diris al mi:

– Kion vi ŝatas plej multe, la sunon aŭ la lunon aŭ la stelojn?

Mi diris, ke mi ŝatas same multe ĉion. Sed, eble, iom-iom pli la stelojn, ĉar ili lumas tre bele, kiam ni iras al la julottan (*Julottan – en Svedio – diservo, okazanta frue en Kristnaska mateno*). Kaj ankaŭ Kristnaskon mi ŝatas tre multe.

Baldaŭ venos Kristnasko, kaj mi deziras por mi skiojn kiel Kristnaskan donacon. Kaj tial mi tre timis, ke estos neniu neĝo. Ankaŭ Lotta volis, ke neĝu, ĉar ŝi deziris por si sledon.

Kiam ni enlitiĝis foje vespere tuj antaŭ la Kristnasko, tiam Lotta diris:

– Mi estis petinta paĉjon pri sledo, nun mi devas nur peti Dion, ke neĝu, alie mi ne povos sledi. Ŝi diris jene:

– Kara bona Dio, faru tiel, ke neĝu tuj. Pensu pri povraj floroj, ili bezonas varman kovrilon, kiam ili kuŝas en la tero kaj dormas kaj tre frostas.

Poste ŝi rigardis super la litrandon kaj diris al mi:

– Ĉi-foje mi estis ruza, mi ne diris, ke neĝo estu por mia sledo.

Kaj imagu, sekvan tagon, kiam ni vekiĝis, tiam ekneĝis. Kaj Jonas kaj Lotta kaj mi staris apud la fenestro en nuraj piĝamoj kaj spektis

fali pli kaj pli da flokoj sur la ĝardenon, kaj sur nian ĝardenon, kaj sur tiun de onklino Berg. Kaj ni vestis nin tiom rapide, kiom ni povis, kaj elkuris kaj ĵetis neĝobulojn kaj faris belegan neĝoĉjon, sur kiun paĉjo metis sian ĉapelon, kiam li hejmenvenis.

Ni tre amuziĝis la tutan tagon, kaj panjo trovis, ke estis tre bone, ke ni estis ekstere, ĉar sinjorino Fransson estis ĉe ni kaj helpis panjon beligi la domon por Kristnasko. Lotta ŝatas babili kun sinjorino Fransson kaj diras "ci" al ŝi, kvankam panjo diras, ke ŝi ne rajtas. Lotta devas diri "sinjorino Fransson", diras panjo. Sinjorino Fransson ŝatas babili kun Lotta, sed panjo estis dirinta al ŝi, ke ŝi ne devas respondi, kiam Lotta diras "ci" al ŝi.

Tiutage, kiam ni faris la neĝoĉjon, tiam Lotta diris al sinjorino Fransson, kiam ni estis endome kaj matenmanĝis:

– Hej ci, vidu, kiom miaj gantoj estas malsekaj!

Tiam sinjorino Fransson ne respondis, kaj Lotta diris:

– Ĉu ci vidis nian neĝoĉjon?

Sed sinjorino Fransson tamen ne respondis. Tiam Lotta silentiĝis por longa tempo, sed poste ŝi diris:

– Pro kia diablo ci koleras, sinjorino Fransson? Tiam panjo diris:

– Lotta, vi scias, ke vi ne devas diri "diablo" kaj "ci" al sinjorino Fransson.

– Do mi entute ne povas paroli kun ŝi, diris Lotta.

Sinjorino Fransson diris, ke ŝi volis por la tuta mondo, ke Lotta parolu kun ŝi kaj petis panjon, ke Lotta tamen rajtu diri "ci" al ŝi. Kaj tiam panjo ekridis kaj diris, ke Lotta rajtas diri "ci".

– Kaj ankaŭ "diablo", diris Lotta.

– Ne, ne "diablo", diris panjo. Poste panjo eliris, kaj tiam Lotta diris:

– Mi scias, kion mi faru. Kiam mi celos "diablo", tiam mi diros "Fransson". Ĉar panjo ŝatas, kiam mi diras "Fransson".

Kaj poste ŝi diris:

– Fi, Fransson, kiom amuze estas, kiam estas Kristansko.

Kaj tiel vere estas, amuze, mi celas. Jonas kaj mi kaj Lotta, ni helpis panjon pri la Kristanska festeno kaj rastis neĝon en la ĝardeno kaj elmetis Kristnaskajn faskojn (*Kristnaska fasko {orig. Julkärve} – fasko da aveno, kiajn oni elmetas ĉirkaŭ la Kristnasko por nutri malgrandajn birdojn*) por birdoj. Panjo trovis, ke ni estis tre diligentaj.

– Mi ne scias, kion mi farus, se mi ne havus vin, ŝi diris.

Lotta viŝis tranĉilojn ĉiutage tre fervore, kaj ŝi diris:

– Mi ne scias, kion mi farus, se mi ne havus min. Kvankam, fi, Fransson, kiom mi devas labori.

Ni tre amuziĝis ankaŭ kiam ni aĉetis Kristnaskajn donacojn. Ni prenis monon, kiun ni ŝparis dum la tuta jaro, el niaj ŝparporkoj, kaj poste ni eliris ĉiuj tri al la strato kaj aĉetis Kristnaskajn donacojn, dum neĝas, kaj ĉie sur la placo plenplenas je Kristanskaj abioj kaj homoj en– kaj elkuras la butikojn. Jonas kaj mi estis aĉetontaj banpupeton por Lotta, do ni diris al ŝi, ke ŝi devas resti stari surstrate kaj atendi, dum ni eniros la ludilbutikon.

– Sed vi ne povas rigardi, diris Jonas.

– Ne, vi povas rigardi en fenestron de la kukejo de Karlman anstataŭe, mi diris.

Tion Lotta volonte faris, ĉar estis tre multe da marcipanaj porketoj kaj aliaj belaj aĵoj en la fenestro ĉe Karlman.

Kiam Jonas kaj mi aĉetis banpupeton kaj elvenis surstraten, tiam Lotta estis malaperinta. Sed subite ŝi elvenis tra la pordo de Karlman.

– Kion vi faris? diris Jonas.

– Mi aĉetis Kristnaskan donacon por vi, diris Lotta.

– Kion do vi aĉetis? diris Jonas.

– Kremkukon, diris Lotta.

– Ho, vi stultulino, ĝi ne konserviĝos ĝis la Kristnaska vespero, diris Jonas.

– Jes, jen ĝuste tio, pri kion mi ekpensis, diris Lotta. Tial mi formanĝis ĝin.

Imagu, ĝuste tiam nia paĉjo venis surstraten. Li ne sciis, ke ni eliris solaj kaj aĉetadis Kristnaskajn donacojn.

– Ĉi tiujn infanojn, mi kredas, mi estis vidinta foje, mi ne memoras, kie, diris paĉjo. Sed ili aspektas ĉarme, do mi kredas, ke mi invitos ilin en kukejon.

Ho, kiom ni ekĝojis! Ni povis trinki ĉokoladon kaj manĝi kukojn precize tiom, kiom ni volis, kaj ni sidis sur verda sofo ĉe Karlman, kaj estis multe da homoj ĉirkaŭ ni, kiuj zumis kaj babilis, kaj ĉiuj havis paketon kun Kristnaska donaco, kiun ili estis aĉetintaj, kaj esktere surstrate neĝis, kaj la kukoj plenplenis je kremo, jen kia amuza tago estis. Alvenis onklino, kiu nomiĝas sinjorino Friberg, kaj komencis paroli kun paĉjo. Jonas kaj mi sidis silentaj, sed Lotta, ŝi parolis multe pli ol sinjorino Friberg. Tiam paĉjo diris:

– Lotta, vi ne devas paroli, kiam interparolas granduloj; vi devas atendi, ĝis kiam ili finos.

– Hoho, diris Lotta, tion ja mi jam provis, sed tio fiaskas. Ĉar ili neniam finas. Tiam sinjorino Friberg ekridis kaj diris, ke nun ŝi devis

hejmeniri kaj baki Kristanskajn spickukojn.

Ankaŭ ni bakis spickukojn, kvankam nur la sekvan tagon. Oj, ni bakis tre multe, tiam Jonas kaj Lotta kaj mi – ĉiu el ni havis sian skatolon plena, ni bakis ilin tute solaj. Ĉiujn skatolojn ni metis en la infanĉambro, kaj ni diris, ke ni ŝparu la spickukojn por la Kristnaska vespero. Sed Lotta formanĝis la siajn jam en la sama tago kaj ne manĝis betkaĉon por tagmanĝo.

– Ili, eble, ne konserviĝus ĝis la Kristnaska vespero, diris Lotta.

Sed poste ŝi venadis ĉiutage kaj almozpetis la spickukojn de Jonas kaj mi kaj diris:

– Mizera homoj donu al mi iom en mian manon.

Sed poste venis la Kristnaska vespero, kaj ĝi estas la plej amuza tago en la tuta jaro. Jen kion ni faris en la Kristnaska vespero.

Tuj post kiam ni vekiĝis, ni kuris suben en la kuirejon, kaj tie estis panjo, preparanta kafon. Kaj poste ni ĉiuj sidis antaŭ la fajrujo en la gastoĉambro kaj trinkis kafon, kvankam ni neniam ricevis kafon antaŭe. Kaj ni ricevis safranbulkojn kaj spickukojn kaj klenäter (*Klenäter {kleneter} {pluralo; aŭ klenor} – svedaj Kristnaskaj kukoj, kiujn oni bakas el elasta pasto kun ovoĵ kaj lakto, ofte ankaŭ kun konjako kaj citrono. Post fritado oni trempas ilin en sukero*). Kaj la Kristnaska abio staris tie kaj odoris tiel diable bone. Tuj post kiam ni estis eltrinkintaj la kafon, ni ornamis la abion, paĉjo kaj Jonas kaj mi kaj Lotta, panjo estis en la kuirejo kaj faris klupean salaton.

– Estas tre bele en nia domo, diris Jonas, do mi kredas, ke ĝi estas la plej fajna domo en la tuta urbo.

– Kaj kiu odoras plej bone, diris Lotta.

Panjo plantis plenan mason da blankaj hiacintoj, kiuj odoris tre ĉarme, kaj tial ĉio plenis je lumo, kaj ili aspektis tute malsame ol aliaj,

kaj odoris malsame. Mi ŝatas, kiam odoras malsame dum Kristnasko.

Ni manĝis multe dum la tuta tago, kaj ni manĝis en la kuirejo kaj trempis panon en marmiton (*Trempi panon en marmiton {svede Dopp i grytan}* – sveda Kristnaska tradicio, oni trempas panon en marmiton, plenon je buljono post kuirita ŝinko, kaj manĝas ĝin kiel almanĝon kun alia manĝaĵo) sur la fornelo. Kaj posttagmeze ni vizitis kun panjo onklinon Berg kaj donis al ŝi Kristnaskan donacon kaj ricevis knäck-on (*Knäck {knek}* – hejmfarata sukeraĵo, kiu konsistas el siropo, sukero kaj kremo, ofte oni aldonas ankaŭ hakitajn migdalojn) kaj frititajn migdalojn. Kaj Lotta ricevis dolĉan ruĝan ĉapeton, kiun onklino Berg estis trikinta por ŝi.

– Nun mi preskaŭ povas esti jultomte (*Jultomte {kristnaska gnomo}* – sveda fabelrolulo, kiu alportas Kristnaskajn donacojn), diris Lotta.

Sed ŝi ne estis. Ĉar vespere venis vera jultomte. Li stamfis sur la perono kaj frapegis al la pordo kaj envenis kaj havis sakon surdorse, kiu plenplenis je Kristnaskaj donacoj.

– Mi ne bezonas demandi, ĉu estas iuj obeemaj infanoj ĉi tie, diris jultomte, ĉar tion mi vidas en la ŝildeto.

Kaj poste li diris al Lotta:

– Gardu vin, tiel ke viaj okuloj ni forruliĝu el via kapo. Ĉar Lotta staris kaj gapis al li, kaj ŝiaj okuloj estis tute grandaj kaj rondaj.

Poste jultomte eliris kaj revenis kun granda paketo, en kiu estis miaj skioj, kaj granda paketo, en kiu estis sledo por Lotta. Sed Lotta nur staris silente kaj senmove, ĝis kiam la gnomo estis foririnta.

– Kiam vi estas tiom silenta, Lotta? diris panjo.

– Mi havas tikladon en la stomako, kiam mi vidas jultomten, diris Lotta. Fi, Fransson, kiom tiklas en mia stomako!



Ni bezonus iri kaj enlitiĝi en Kristnaska vespero nur kiam ni mem volus. Ni manĝis nuksojn kaj oranĝojn antaŭ la fajrujo, kaj ni dancis ĉirkaŭ la abio, kaj ĉio estis tre mirakla. Kaj sekvan tagon, en Kristnaska tago, ni iris al julottan. Ĉiuj Kristnaskaj faskoj estis kovritaj de neĝo sube en la ĝardeno, sed ni forskuis ĝin, tiel ke paseroj povu manĝi, kaj poste ni iris al la julottan. Tiam lumis la steloj, tial mi plej ŝatas la stelojn, kvankam ankaŭ la suno kaj la luno estas bonaj. Kiam la steloj brilas super la strato Brufarantoj, tiam la strato fariĝas tre mirinda. Lumo brilas en preskaŭ ĉiuj domoj, ankaŭ tio aspektas bele kaj mirinde. Longe, longe for, tute super la tegmento de la magistratdomo, tie troviĝas steloj, ili estas la plej grandaj steloj, kiujn mi iam vidis.

– Ili ja estas Kristnaskaj steloj, diris Lotta.

# TAGLIBRO DE VILAĜ-PEDELO

**Steen Steensen Blicher**

**Tradukis H. J. Bulhuis**

En tiu ĉi traduko mi skribis preskaŭ ĉie la nomojn kiel en la dana teksto. Ekzemple:

Føum aŭ Föulum, Søren aŭ Sören, Cornelius aŭ Kornelius, Thiele aŭ Tile, Samsø aŭ Samsö ktp.

Nur nomojn, kiujn oni renkontas ofte en la literaturo, mi skribis Esperante; ekzemple: Siberujo, Danujo ktp. Nur la klarigojn de la latinaj kaj francaj frazoj mi notis kiel mi trovis ilin en la dana verketo. Tie, kie la verkinto ne aldonis klarigojn, mi ankaŭ ne donis ilin en ĉi tiu traduko. La traduko ne estas laŭvorta, sed iom libera kaj tute laŭ la reguloj de la Fundamento.

*La tradukinto.*

## **Enkondukaj vortoj.**

Milton, la fama angla poeto, kies nomon ĉiu konas, bezonis preskaŭ kvarcent paĝojn por priskribi en sia "Perdita Paradizo" la falon de Adamo kaj Evo kaj ilian forpeladon el la paradizo. Tion li povus fari, kopiante la unuan ĉapitron de Genezo (*Voltaire*).

Blicher, la dana verkisto, kies nomon konas preskaŭ neniu ekster Danujo kaj Norvegujo, verkis en la jaro 1824 romanon de granda morala kvalito kaj kun enhavo ne malpli granda ol tiu, trovata en la ĉie legata ĉefverko de Daniel de Foe, kaj bezonis nur 40-paĝan taglibron por efektivi tiun mirindaĵon.

Lia verko pro tio kaj antaŭ multaj aliaj verkoj indas aperi en internacia vestaĵo.

Mi prenis sur min la taskon liveri ĝin kaj esperas, ke ĝi povu plaĉi al la legantaro de Esperantaj verkoj.

*La tradukinto.*

## **Føulum, la 1-an de Januaro 1708.**

Dio donu al ni ĉiuj ĝojigan novjaron! Kaj gardu nian bonan sinjoron Søren! Li estingis la lumon hodiaŭ vespere, kaj patrino diras, ke li ne vivos ĝis la venonta novjaro.

La vespero tamen estis agrablega, kiam sinjoro Søren deprenis sian ĉapon post la manĝado kaj diris, kiel li kutimis: "Agamus gratias!" Li fingre montris min anstataŭ Jens'on. Estis la unua fojo, ke mi legis mian latinan preĝon: pasis hodiaŭ unu jaro, ke Jens legis ĝin; sed mi larĝe malfermis la okulojn, ĉar tiam mi komprenis nenian vorton, kaj nun mi povas kompreni la duonon de Cornelius.

Tio antaŭdiras al mi, ke mi fariĝos predikisto en Føulum, ho kiel multe miaj gepatroj ĝojus, se ili ĝisvivus tian tagon! Kaj se Jens, la filo de la predikisto, povus estiĝi episkopo en Viborg – kiel diras lia patro – nu, kiu povas scii tion? Dio ordonas en ĉio; lia volo fariĝu! Amen in nomine Jesu!

## **Føulum, la 3-an de Septembro 1708.**

Hieraŭ mi atingis per helpo de Dio mian dekkvinan jaron. Jens ne povas plu fari min klera en latinaĵo. Hejme mi estas pli diligenta ol li, mi legas, dum li iras kun Petro la ĉasisto sur la kamparo. Tiamaniere li ne povos estiĝi episkopo. La kompatinda sinjoro Søren! Li vidas tion klare, larmoj staras en liaj okuloj, kiam kelkfoje li diras al li: "Mi filii! mi filii! otium est pulvinar diaboli!"

En novjaro ni komencos la grekan studadon, sinjoro Sören donis al mi la grekan testamenton. "Ĉu tio ne estas stranga skribaĵaĉo? Tio estas ankoraŭ kiel akrigilo por viaj okuloj," diris li amike al mi kaj pinĉis mian orelon, kion li ĉiam faras, kiam li estas ĝoja. Sed ha! Kiajn larĝajn okulojn li montros vidante, ke mi jam kapablas legi rapide en mia testamento.

## **Føulum, die St. Martini 1708.**

Finiĝos malbone je Jens – sinjoro Sören tiel koleris pri li, ke la tutan tagon li parolis al li dane; al mi li parolis latine. Unu fojon mi aŭdis, ke li diris kvazaŭ al si mem: "Vellem hunc esse filium meum!" (*Mi dezirus, ke tiu ĉi estus mia filo.*) Estis mi, pri kiu li parolis. Kiel Jens kriplige legis en sia Cicero. Mi bone scias kial, ĉar antaŭhieraŭ, kiam lia patro estis ĉe edziĝofesto en Vinge, li estis kun Petro la ĉasisto en la arbaro de Lindum, kaj – Dio protektu nin! – sovaĝa virporko deŝiris lian pantalonon. Li mensogis al sia patrino kaj diris, ke virbovo de Thiele faris tion, sed ŝi donis al li fortan vangofrapon – habeat! (*Li havu ĝin!*)

## **Føulum, Calendis Januar. 1709.**

Proh dolor! Sinjoro Sören estas morta! Vae me miserum! Kiam ni sidis ĉetable kristnask-vesperon, li flanken ŝovis sian kuleron kaj rigardis Jens'on longe kaj melankolie – "fregisti cor meum!" (*Vi rompjis mian koron*) diris li ĝemante kaj eniris la dormoĉambron. Ho ve! li ne plu ellitiĝis. Depost tiu tempo mi vizitis lin ĉiutage, kaj li donis al mi multajn bonajn konsilojn kaj instruaĵojn; sed nun mi lin vidos neniam plu.

Ĵaŭdon mi lin vidis lastfoje; neniam mi forgesos, kion li diris farante al mi kvazaŭ paroladon kortuŝantan: "Dio donu al mia filo honestan koron!" Li interplektis siajn malgrasajn manojn kaj, dum lia kapo refalis sur la kusenon, li flustris: "Pater! In manus tuas committo spiritum meum! "

Tio estis liaj lastaj vortoj. Kiam mi vidis, ke la sinjorino levis la antaŭtukon al la okuloj, mi kuris eksteren tute malĝoja. Eksterdome staris Jens ploranta. "Seras dat poenas turpi poenitentia (*Lia pento venas tro malfrue*)", pensis mi; sed li falis sur mian kolon kaj ploregis. Dio pardonu al li lian petolemecon! Tio malĝojigis min plej multe.

## **Føulum, Pridie Iduum Januarii MDCCIX.**

Hieraŭ mia kara patro iris al Viborg por serĉi domon, kie mi povos tagmanĝi, kiam mi iros lernejon. Kiom mi sopiris al tiu tempo! Mi legas la tutan tagon, sed la tagoj estas nun tiel mallongaj, kaj patrino diras, ke ne valoras legadi ĉe lamplumo. Mi ne povas fini ĉi tiun leteron al Tuticanus – ho, estis tute alie, kiam vivis la bona sinjoro Sören! Eheu! Mortuus est!

Ĉi tiu vintro estas terura! Ĉielo kaj tero kvazaŭ unuiĝis; neĝamaso sterniĝas de nia tegmento ĝis la garbejo. Estintan nokton Jens pafis du leporojn en nia brasikĝardeno – li baldaŭ forgesis pri sia patro. Sed se la ĉasisto Petro ekscios tion, li ekkoleregos.

## **Føulum, Idibus Januarii MDCCIX.**

Patro ankoraŭ ne rehejmiĝis, kaj la vetero estas ankoraŭ tre malbona – se li nur ne perdas la vojon. Jen Jens laŭiras la garbejon kun pafilo kaj kelkaj birdoj en la mano – li eniras. – Tio estas perdrikoj, kiujn li pafis sur la tegmento de Mads Madsens. Li deziras, ke patrino rostu ilin, sed ŝi ne kuraĝas tion fari, antaŭ ol venos mia patro.

## **Føulum, XVIII Calend. Febru. 1709.**

Ho ve! Mia kara patro frostmortis! Viro de Kokholm lin trovis en la neĝamaso kaj veturigis lin hejmen – mi tiom ploris, ke mi ne povas plu vidi per la okuloj. – Patrino ankaŭ. – Dio helpu nin ambaŭ!

## **Føulum, la 18-an de Februaro 1709.**

Mi preskaŭ ne rekonis Jens'on. Li portis verdan frakon, kaj verda plumo staris sur lia ĉapelo. "Vidu," diris li, "nun mi estas ĉasisto! Kio vi estas? Bubo, kiu iras lernejon, latinisto!" –

"Jes, Dio nin helpu!" mi respondis. "La latinaĵo preteriris! Mi povus estiĝi predikisto tie, kie vi estus episkopo! Mia patrino ne mortus pro malsato, se mi kantus antaŭ la pordoj de Viborg. Mi devas resti hejme kaj perlaboros panon por ŝi. – Ve, Jens, se via patro vivus!"

"Ni ne parolu pri tio!" li diris. "Neniam mi lernus latinaĵon – la diablo ĝin prenu! Jen tiel, vi povos veni en la bienon! Tie estos bonaj tagoj kaj agrabla vivmaniero!" –

"Kiel mi povus?" mi respondis. –

"Ni klopodos pri tio!" ekkriis li kaj foriris. Tiu Jens tamen havas bonan koron, sed li estas senzorga kaj senpripensema. Antaŭ ses semajnoj oni enterigis lian patron, kaj tri semajnojn poste sekvis lia patrino. Ŝajnas, kvazaŭ Jens estas nun tute alia kiel antaŭe. Li povas plori ĉi tiun horon kaj ridi alian horon.

## **Thiele (elparolu Tile), la 1-an de Majo 1709.**

Jen mi estas nun servisto ĉe lia sinjora moŝto; Adiaŭ pastra ofico! Adiaŭ, latino! Ho, miaj karaj libroj! Valete plurimum! vendidi libertatem (*Adiaŭ, mi vendis mian liberecon*) por dekdu taleroj. Ok el ili havos mia kompatinda patrino, kaj lia sinjora moŝto promesis al ŝi brulolignon, tiel ke ŝi ne malsatos nek sentos la malvarmon. Jens havigis al mi tiun oficon. Li havas multan influon en la bieno; li estas diabla Jens, kiun amas ĉiuj virinoj. La mastrumistino multfoje donis al li grandan pecon da kuko; la edzino de la bienestro ridis tiel amike al li, same la knabinoj – eĉ unu el la bienaj fraŭlinoj kapklinis milde, kiam ŝi lin preteriris. Pro ĉio ĉi li estiĝis ĉasisto en la loko de Petro. Plej bedaŭrinde estas, ke li kutimas kolere blasfemi pli multe ol iu ajn maristo.

## **Thiele, la 12-an de Majo 1709.**

Mi sanas bonege, Dio estu glorata! Ni estas ses servistoj por la sinjoro, la sinjorino, la junkro kaj la du fraŭlinoj. Mi havas sufiĉan tempon por legi, kaj mi ne malzorgas miajn karajn librojn. Ili ne utilas al mi, sed mi ne povas ne okupi min pri ili. Hieraŭ estis vendataj la libroj de la mortinta sinjoro Sören, mi aĉetis por du taleroj kaj ekhavis tiel multajn, ke mi preskaŭ ne povis porti ilin. Inter ili estas multaj de Ovidius; unu havas la titolon: "ars amoris ", alia: "remedium amoris "; ilin mi legos unue, ĉar mi volas ekscii, pri kio ili temas. Unu fojon mi foliumis ilin en la studejo de sinjoro Sören, sed li tuj ekprenis ilin de mi, dirante: "Abstine manus! Forigu la fingrojn de tiuj paperaĵoj! Tio ne taŭgas por vi."

## **Thiele, la 3-an de Junio 1709.**

Kiu do komprenas francon! La sinjoro parolas nur france, kiam li manĝas, kaj mi komprenas ne unu vorton. Hodiaŭ ili parolis pri mi, ĉar multfoje ili min rigardis. Unu fojon mi preskaŭ lasis fali teleron; mi staris post la seĝo de fraŭlino Sofia, ŝi turnis sin kaj rigardis min rekte en la vizaĝon – ŝi estas belega fraŭlino, tiu fraŭlino Sofia! Mi tre ĝojas vidante ŝin.

## **Thiele, la 13-an de Septembro 1709.**

Hieraŭ estis tie ĉi malkvieta tago. Multaj venis de Viskum, kaj okazis granda ĉasado. Mi ĉeestis kaj ricevis pafilon de lia sinjora moŝto. En la komenco ĉio iris bone, sed subite preteriris lupo. Pro ektimo mi preskaŭ lasis fali la pafilon kaj tute forgesis pafi. Jens staris ĉe mia flanko, kaj li pafis la lupon. "Vi estas stultulo!" li diris, "sed mi ne vin perfidos!" Tuj poste preteriris la sinjoro. "Vi estas simplulo, Martino!" li ekkriis. "Vi ricevis subaĉetmonon."

"Mi plej humile petas pardonon," mi respondis, "mi estas tute senkulpa, sendube kalumniantoj parolis malbonon pri mi al via moŝto. Per la helpo de Dio mi servos vin honeste kaj fidele!"

Tiam li vidis plej indulge kaj diris: "Vi estas granda simplulo!"

Sed kun tio ne finiĝis la okazintaĵo.

Kiam la gesinjoroj sidis cetable, ili ankoraŭfoje parolis pri la lupo kaj demandis al mi: kiom multe ĝi donis al mi? kaj cetere. Mi ne sciis, kion ili celis; sed tion mi povas kompreni, ke ili mokis min france kaj dane. Kaj fraŭlino Sofia partoprenis, ŝi ekridis al mi rekte en la okulojn – tio doloris min plej multe. Sed mi povus lerni tiun tra-la-naz-parolatan lingvon. Ĝi ja ne estus pli malfacila ol latino.

## **Thiele, la 2-an de Oktobro 1709.**

Ĝi ne estas malebla – tion mi jam vidis. Franco estas nenio krom kripligita latino. Inter la multaj libroj, kiujn mi aĉetis, troviĝas Metamorfozo en la franca lingvo – tio estas feliĉa okazo! La latinan mi jam komprenas. Sed unu afero estas stranga; se mi aŭdas ilin interparoli france tie supre, tiam ŝajnas al mi, kvazaŭ nenia franca vorto sin trovas en ilia interparolado – ne estas pri Ovidius, ke ili diskutas. Fine mi ankaŭ min dediĉas al la pafado. La sinjoro deziras, ke mi ĉeestu la ĉasadon, sed neniam mi povas lin kontentigi, jen li min insultas, jen li ridas pri mi – kelkafoje li faras ambaŭ kune: mi portas malbone la pafilon, mi ŝarĝas malbone, mi celas malbone, kaj malbone mi pafas. "Jens devas instrui vin. Rigardu al Jens!" diris la sinjoro. "Tio estas ĉasisto! Vi iras kun la pafilo, kvazaŭ ĝi estus rastilo, kiun vi portas sur la ŝultro, kaj kiam vi celas, ŝajnas, kvazaŭ vi falus surdorsen."

Fraŭlino Sofia ankaŭ min mokridas, – tamen tio plibeligas ŝian vizaĝon, ĉar ŝi havas belajn dentojn.

## **Thiele, la 7-an de Novembro 1709.**

Hieraŭ mi pafis vulpon! La sinjoro nomis min bona knabo kaj donacis al mi inkrustitan pulvujon. La instruado de Jens portis bonajn fruktojn. La pafado estas tamen agrabla. – La studado en la franca



lingvo prosperas pli bone, mi eklernas la elparoladon. Antaŭ nelonge mi aŭskultis ĉe la pordo, kiam mademoiselle legis kun la fraŭlino. Kiam ili finis kaj iris for, mi enŝteliĝis por vidi, kiun libron ili uzis. Diable! Kiel mi miris! Ĝi estis la sama, kiun mi mem posedas kaj kiu nomiĝas: L'école du monde . Nun mi staras ĉiutage ekster la pordo kun la libro en la mano kaj aŭskultas — tio funkcias bone. La franca lingvo estas pli bela ol mi supozis; ĝi sonas mirinde, kiam fraŭlino Sofia ĝin parolas.

## **Thiele, la 13-an de Decembro 1709.**

Hieraŭ Dio savis mian sinjoron pere de mia malforta mano. Ni havis grandan peladon en la arbaro de Lindum. Venante ĉe la griza marĉo, subite virporko aperis, kiu rekte alkuris al la sinjoro. Li pafis kaj trafis ĝin, sed malgraŭ tio la besto lin atakis. La sinjoro ne timis, li eltiris sian tranĉilegon kaj volis enpuŝi ĝin en la bruston de la virporko, sed malsukcesis. Kion fari? – Ĉio okazis en unu momento tiel, ke neniu povis veni por helpi. Ĝuste kiam mi volas iri tien, ni vidas nian sinjoron sur la dorso de la virporko, kaj jen ili forrapidis. "Pafu!" li ekkriis al la rajdistestro – kiu estis lia dekstra flankulo – sed li ne kuraĝis. "Pafu en liajn korpon kaj krurojn!" ekkrias li al Jens, dum li preteriras lin; la pafilo de Jens ne funkcias. Nun la virporko sin turnas kaj preterkuras min. "Pafu Martino! se ne, mi rajdos kun la virporko rekte al la infero!" li ekkrias.

En la nomo de Dio! pensis mi, celante al la postaĵo de la besto, kaj mi trafis ĝin tiel feliĉe, ke mi frakasis ambaŭ ĝiajn koksojn. Mi ĝojis, ĉiuj ĝojis, sed plej multe ĝojis nia sinjoro.

"Tio estis majstra pafo," diris li, "gardu la pafilon, kiun vi manuzis tiel lerte! Kaj aŭdu!" li diris al la rajdistestro, "vi azenido! Stampu la plej dikan fagon en la arbaro por lia maljuna patrino! Jens povas iri hejmen kaj meti pli bonan ŝtonon sur sian pafilon!" Kiam ni rehejmiĝis tiun vesperon, ĉiu informiĝis kaj rakontis pri la okazintaĵo. La sinjoro frapis mian ŝultron, kaj fraŭlino Sofia ridetis tiel amike al mi, ke mia koro kvazaŭ saltis en mian gorĝon.

## **Thiele, la 11-an de Januaro 1710.**

Estas agrabla vetero! La suno leviĝas tiel ruĝa kiel brulanta karbo. Estas stranga vidaĵo, kiam ĝi tiel brilas tra la blankaj arboj, kaj ĉiuj arboj aspektas kvazaŭ pudritaj, kaj la branĉoj ĉirkaŭe pendas teren. La maljuna "Grand Richard" estas ruinigita, kelkaj el ĝiaj branĉoj jam rompiĝis. Ĝuste tian saman veteron ni havis antaŭ ok tagoj, kiam mi glitveturis al Fusingø kaj kiam mi staris post fraŭlino Sofia. Ŝi volis mem konduki la ĉevalojn, sed post kvarono da horo ŝiaj fingretoj ekfrostiĝis.

"J'ai froid ", ŝi diris al si mem.

"Ĉu mi kondukos, fraŭlino?" mi diris.

"Comment! " ŝi diris, "ĉu vi komprenas france?"

"Un peu, mademoiselle! " mi respondis.

Tiam ŝi turnis sin kaj rigardis min fikse en la okulojn. Mi prenis kondukilon en ĉiu mano kaj tenis ambaŭ brakojn ĉirkaŭ ŝi. Mi etendis ilin kiel eble plej multe por ne proksimiĝi al ŝi tro multe; sed ĉiufoje kiam la glitveturilo skuiĝis kaj mi ŝin tuŝis, estis, kvazaŭ mi tuŝis varman fornon. Ŝajnis al mi, kvazaŭ mi flugus kun ŝi tra la aero, kaj antaŭ ol mi tion sciis, ni estis en Fusingø. Se ŝi ne estus ekkriinta: "Tenez Martin! Arrêtez-vous! " mi estus veturinta rekte al Randers aŭ ĝis la fino de la mondo. Ĉu ŝi refoje glitveturilos hodiaŭ? Sed jen venas Jens kun la pafilo de la sinjoro, kiun li purigis – sekve ni ĉasos.

## **Thiele, la 13-an de Februaro 1710.**

Mi ne sentas min bonstata. Estas kvazaŭ peza ŝtono kuŝus sur mia brusto. Mi preskaŭ ne manĝas, kaj nokte mi ne povas dormi. Estintan nokton mi havis strangan sonĝon: mi imagis, ke mi staras sur la posta parto de l' glitveturilo de fraŭlino Sofia; sed subite mi sidis en la glitveturilo kaj ŝi sur miaj genuoj. Mi tenis mian

dekstran brakon ĉirkaŭ ŝia talio, kaj ŝi tenis la maldekstran ĉirkaŭ mia kolo. Ŝi sin kurbis kaj kisis min; sed en la sama tempo mi vekigis. Ve! Mi tiel volonte daŭrigus tiun sonĝon! – Tio estas stranga libro, kiun ŝi pruntedonis al mi; mi amuzas min per ĝi ĉiuvespere – kiu do povus estiĝi tiel feliĉa kiel tiu tartara princo! – Ju pli mi legas la francan lingvon, des pli multe mi ŝatas ĝin; mi preskaŭ forgesas mian latinaĵon pro tio.

## **Thiele, la 23-an de Marto 1710.**

Hieraŭ, kiam ni revenis de la skolopĉasado, la sinjoro diris al mi: "Kaj mi konstatis, ke vi komprenas france?" "Malmulte, sinjoro," mi respondis. "Sekve vi ne plu povas servadi ĉetable; ni ja ne povos malfermi la buŝon pro vi." "Ve!" mi ekkriis, "ĉu via sinjora moŝto do ne volas min eksigi?"

"Point du tout ," li respondis. "De nun vi povos esti mia valet de chambre ! kaj kiam junkro Kresten vojaĝos Parizon, vi lin akompanos – kion vi opinias pri tio?"

Mi estis tiel kortuŝata, ke mi ne povis diri unu vorton, sed kisis lian manon. Kvankam mi nun tre ĝojas, ŝajnas tamen al mi, ke mi nevolonte volas forlasi ĉi tiun lokon, kaj mi vere kredas, ke mia sano de post tiu tempo estiĝis pli malbona.

## **Thiele, la 1-an de Majo 1710.**

Ho ve, mi malfeliĉulo! Nun mi scias, kio al mi mankas; Ovidius al mi ĝin diris, tre precize li priskribis al mi mian malsanon. Se mi ne eraras, ĝi nomiĝas Amor , t. e. amo, kaj tiu, en kiun mi enamiĝis, estas sendube fraŭlino Sofia.

Ho, mi kompatinda malsaĝulo! Kiel tio finiĝos? Mi devas ekzameni liajn remedia amoris!

– Ĵus mi ŝin vidis staranta kaj parolanta en la koridoro kun Jens; tio tratanĉis mian koron. Ŝajnas al mi, ke mi devus dispafi lian kranion, sed jen ŝi pretersaltetis min kun rideto; – mi sentis, kvazaŭ mi estus ĉasanta kaj kvazaŭ ĉasotaĵo venis sub la trafpovo de mia pafilo, mia koro frapis al miaj ripoj, kaj nur kun peno mi povis spiri, kaj miaj okuloj estis kvazaŭ kunekreskintaj kun la ĉasotaĵo – ah, malheureŭ que je suis!

### **Thiele, la 17-an de Junio 1710.**

Kiel dezerta ŝajnas al mi la bieno kaj enuiga. La gesinjoroj estas for kaj revenos post ok tagoj. Kiel mi pasigos ilin? Mi havas plezuron por nenio. Mia pafilo pendas polvokovrita kaj rustita, kaj mi ne ĝin purigas. Mi ne povas kompreni, kiel Jens kaj la aliaj povas esti tiel ĝojaj kaj gajaj; ili parolas kaj ridas tiel, ke ĝi kaŭzas eĥon en la flankaj konstruaĵoj – mi ĝemas kiel botaŭro. Ho, fraŭlino Sofia! Ke vi estu farmista knabino aŭ mi princo!

### **Thiele, la 28-an de Junio 1710.**

Nun la bieno staras antaŭ miaj okuloj, kvazaŭ ĝi ĵus estus kalkpentrita kaj ornamita. La arboj en la ĝardeno ricevis delikatan koloron, kaj ĉiuj homoj aspektas tiel mildaj. – Fraŭlino Sofia rehejmiĝis, ŝi eniris tra la pordego kiel la suno tra nuboj; tamen mi tremetas kiel poplofolio. Estas bone kaj samtempe malbone esti enamiĝinta.

### **Thiele, la 4-an de Oktobro 1710.**

Ni havis belegan ĉasadon hodiaŭ! La arbaro de Hvidding enhavis pli ol tricent pelistojn, ĉar ili venis de Viskum kaj Fussingø kun ĉiuj siaj ĉashundoj. Ĉe tagiĝo ni estis jam tie venintaj de Thiele. Estis tute kviete en la aero, kaj dika nuboj kovris la tutan ĉirkaŭaĵon: oni vidis nur la pintojn de Bavu-altaĵoj super ĝi. Tre malproksime ni povis aŭdi la bruantajn paŝojn de la pelistoj kaj kelkan bojadon de hundoj.

"Nun ili venas de Viskum," diris la sinjoro, "mi povas aŭdi la ĉasistojn."

"Jen ili ankaŭ venas de Fussingø," diris Jens, "tio estas Perdriks, kiu bojas."

Ni povis vidi ankoraŭ nenion pro la nuboj, sed ni aŭdis la bruadon de veturiloj, la spiradon de la ĉevaloj, kaj la paroladon kaj ridadon de la pafistoj. Jen la suno aperis kaj la nuboj foriĝis iom post iom. Estiĝis plena de movado ĉiuflanke. La arbaradministranto jam komencis ordigi la pelantojn, oni aŭdis ilin flustri al tiuj, kiuj volis paroli laŭte, kaj kelkfoje ekmoviĝis la bruiloj. De okcidento kaj sudo ĉasistoj venis veturantaj kaj post ili sekvis veturiloj kun hundoj, kies vostoj pendis trans la plankoj de la veturiloj, kaj de tempo al tempo altiĝis hundkapo, kiu ekhavis vangfrapon de la ĉasist-knaboj. Nu, la sinjoro mem deĉevaliĝis kaj irinte laŭlonge de la longa valo, li haltis en la mezo de la arbaro. Tie li fajfis, kaj subite la kornoludisto ludis gajan melodion. La hundoj estis malkunigitaj, kaj baldaŭ ili bojis, unu post la alia kaj fine ĉiuj kune. Leporoj, vulpoj kaj cervoj aperis kaj malaperis sur la arbarkovrita monteto. De tempo al tempo pafo sonis, kaj ĝia eĥo aŭdiĝis ĝis en la valo. La pelantojn mi ne povis vidi, sed mi aŭdis iliajn vokadojn kaj ekkriojn, kiam cervo aŭ leporo volis preterkuri ilian vicon. Mi pafis du vulpojn kaj unu kapron antaŭ la matenmanĝo. Dum la matenmanĝo la hundoj estis kunligitaj kaj la kornoludisto ludis, kaj poste ni refoje ĉasis. Vidu: jen ĉe la fino de la valo ekhaltis du veturiloj kun ĉiuj sinjoroj kaj fraŭlinoj kaj inter ili fraŭlino Sofia. Tio savis la vivon al vulpo, ĉar kiam mi ekvidis la fraŭlinon, la vulpo preteriris min. Du horojn antaŭ la vespero la arbaro estis senigita de ĉasotaĵo kaj la ĉasado finiĝis. Ni ĉiuj ricevis tridek el la pafitaj ĉasaĵoj, kaj junkro Kresten, kiu estis pafinta la plej multajn vulpojn, estis honorata per muzikaĵo de la kornoludisto.

## **Thiele, la 17-an de Decembro 1710.**

Hieraŭ mi sekvis mian karan patrinon al ŝia ripozejo. La nova predikisto – Dio rekompencu lin pro tio! – honoris ŝin per funebra

predikaĵo, kiu daŭris sep kvaronojn da horo. Ŝi estis al mi bona kaj kara patrino – Dio donu al ŝi feliĉan reviviĝon! (*Tri krucosimboloj*)

## **Thiele, la 23-an de Januaro 1711.**

Malagraba vintro! Nenia glitveturado! Mi sopiris ĝin de post la sankta Martinotago, sed vane! Pluvado kaj ventego, suda vento kaj malĝojiga vetero. Pasintan jaron en tiu ĉi tempo ni veturis al Fusingø; ho kiam mi pensas pri tiu vespero! La luno lumis tiel blanke kiel arĝenta telero sur la blua ĉielo kaj ĵetis nigrajn ombrojn sur la vojoflankon en la blankan neĝon. Mi klinis min tiel, ke mia ombro kunfandiĝis kun tiu de fraŭlino Sofia, tiam ŝajnis al mi, kvazaŭ ni estas unu. Malvarma vento blovis renkonte al ni, kaj ĝi reblovis ŝian dolĉan elspiron – mi ĝin enspiris kiel vinon – ho ve, mi malsaĝulo! mi enamiĝinta malsaĝulo! je kio utilos al mi ĉiuj tiuj pripensadoj? Dimanĉon mi vojaĝos al Kopenhago kun junkro Kresten, kaj ni restos tie la tutan someron. Mi pensas, ke mi mortos, antaŭ ol venos la monato Majo. – Ah, mademoiselle Sophie! adieu! unè ternel adieu!

## **Sur la maro inter Samsø kaj Sälland, la 3-an de Februaro 1711.**

La suno subiras post la kara Jylland; ĝia rebrilaĵo sternaĝas malproksimen sur la kvietaj maro kiel senfina vojo el fajro. Mi imagas, ke ĝi min salutas de mia hejmo – ve, tio estas tre malproksima, kaj mi pli kaj pli malproksimiĝas.

Kion do oni nun faras en Thiele? Io tintetas en mia dekstra orelo, – – ĉu tio estas fraŭlino Sofia, kiu nun parolas pri mi? Ho ne! mi estas ja nur malriĉa servisto, kiel do ŝi povus pensi pri mi, same kiel pri la maristo, kiu iras tien kaj returnen sur la ferdeko kun krucigitaj brakoj? – li rigardas tiel ofte norden – kio do estas tie por rigardi? "Svedo!" li diras; "Dio helpu kaj savu nin!"

## Kallundborg, la 4-an de Februaro 1711.

Nun mi scias, kio estas milito – mi ĉeestis batalon kaj – glorata estu la Sinjoro de Zeboat! – ni venkis. Estis svedaj kaperistoj, kiel diris la ŝipestro. Matene, tuj kiam tagiĝis, ni vidis ilin je distanco de duona mejlo; oni estis dirinta, ke ili nin persekutis.

"Ĉu estas inter la pasaĝeroj kelkaj, kiuj havas la kuraĝon batali kontraŭ la svedaj gastoj?" diris la ŝipestro.

"Mi havas bonan pafilon," respondis junkro Kresten, "kaj mia servisto havas ankaŭ unu; ĉu ni foje klopodos la ĉasadon, Morten?"

"Kiel ordonas la junkro!" mi diris, kurante kajuton, kie mi ŝarĝis niajn pafilojn; tiam mi portis ilin kun pulvo kaj kugloj sur la ferdekon. Du jutlandaj soldatoj venis el la ŝipkelo, ĉiu havis sian muskedon kaj la ŝipestro hispanan pafilon, tiel longan kiel li mem; la direktisto kaj la maristoj alportis hakilojn kaj hokstangojn.

"Ĉu ni ne povas velforkuri de ili, mia kara kapitano?" mi demandis.

"Ne, pro la diablo," li respondis. "Vi ja vidas, ke ili velatingas nin tiom, kiom ili povas; vi aŭdos baldaŭ iliajn kanonojn; sed se vi timas, vi povos iri hejmen kaj kuŝiĝi antaŭ la komodo de via patrino."

Subite strio da fumo rulis de la sveda ŝipo, kaj tuj poste ni aŭdis teruran bruadon kaj krakadon super niaj kapoj. Baldaŭ nova ekpafo aŭdiĝis kaj refoje unu, kaj la lasta kuglo forŝiris spliton de nia masto. Mi sentis min tre stranga, mia koro ekbatis, kaj ĉio krakis ĉirkaŭ mi. Sed la sveda ŝipo tiom alproksimiĝis al ni, ke la kugloj de niaj pafiloj povus atingi la kaperojn, kaj kiam mi pafis por la unua fojo, estis al mi, kvazaŭ mi partoprenis pelĉasadon. La svedoj alproksimiĝis pli kaj pli, kaj ni staris post la kajuto kaj pafis al ili je ĉiuj niaj fortoj. Multaj kaperistoj falis precipe per la kugloj de la junkro kaj de mi.

"Se ni povas trafi skolopon, Morten, ni povas ankaŭ trafi svedon, kiam li staras senmove!" li diris.

"Viglaĵ knabegoj!" ekkriis la kapitano. "Ĉu vi vidas la svedan kapitanon, kiu iras tien kaj reen kun tiu granda glavo? Pafu lin, kaj ni gajnos la ludadon!"

Tiam mi lin celis kaj pafis, kaj kiam mi formetis la pafilon de mia vango, mi vidis lin rulfali kaj trafi per la nazo sur la ferdekon. "Hura!" ekkriis nia ŝipestro, kaj ni ĉiuj imitis lin; sed la kaperistoj deflankiĝis kaj veliris for. Kun la dana flago sur la masto ni veliris en la fjordon de Kallundborg kaj estis fieraj kaj ĝojaj, ĉar neniu el la niaj estis vundita, kvankam la kugloj flugis trans kaj tra nia ŝipo. La provizadministranto, sinjoro Hartman, estis la ununura, kiu vidis sian sangon kaj eĉ laŭ mirinda maniero. Li kuŝis en la lito de la ŝipestro kaj fumis pipon, kiam la batalo komenciĝis. Tuj poste mi supreniris al li por preni tolon por la kugloj.

"Morten!" li diris: "quid hoc sibi vult? " ("*Kion signifas tio?*") Sed antaŭ ol mi respondis, kuglo trairis la fenestron de la kajuto, ekprenis kun si la pipon – kiu elstaris el la lito – kaj la pipekstremaĵo faris truon en lia palato. Nun ni estas ekster danĝero kaj en la haveno. Kiel dolĉa estas la ripozo post tia batalo!

## **Kopenhago, la 2-an de Junio 1711.**

Mia kapo estas plenplena je ĉiuj strangaj aferoj, kiujn mi aŭdis kaj vidis. Mi ne povas ordigi miajn pensojn, ĉar unu forpelas la alian kiel nuboj dum ventego. Sed la plej stranga el ĉio estas, ke mi estas senigota de mia enamiĝo. Ju pli longe mi restas tie ĉi, des pli malmulte mi sopiras je fraŭlino Sofia, kaj mi preskaŭ povus kredi, ke estas ankaŭ belaj knabinoj en Kopenhago. Se mi verkus notaĵojn pri Ovidii remedium amoris , tiam mi rekomendus ekskurson al la ĉefurbo kiel unu el la plej belaj rimedoj kontraŭ tiu danĝera malsano.

## **Ankrita apud Kronborg, la 1-an de Septembro 1711.**



Ho, indulgema ĉielo! Kiom mi travivis! Kiom da ĉagreno kaj mizeraĵo mi vidis proprokule! Dio nin punis pro niaj pekoj kaj ulcerfrapis sian popolon. Ili falis kiel muŝoj ĉirkaŭ mi, sed mi malindulo estis savata de la morto. Ve, mia kara junkro! Kion mi diros, kiam mi rehejmiĝos sen li? Sed mi ne lin forlasis, antaŭ ol li elspiris sian lastan elspiron; mi donus por li mian vivon, sed Dio ĝin indulgis – glorata estu lia nomo! Dum mi pensas pri tiuj teruraj tagoj, mia koro rompiĝas.

Kun timo kaj senparole ni sidis de l' mateno ĝis la vespero en nia izolita domo, rigardis unu la alian kaj ĝemadis. Nur malofte ni rigardis malsupren en la senhomajn stratojn, kie antaŭe ŝvarmadis multaj homoj; de tempo al tempo ia triste figure ŝanceliĝis sur la pavimo kiel fantomo; sed post la fenestroj ni vidis sidadi la homojn kiel arestitojn; la plej multaj sidis senmove, kvazaŭ ili estus pentritaj portretoj. Kiam la rulado de la pestveturiloj aŭdiĝis, tuj ĉiuj forkuris de la fenestroj, por ne vidi la teruran vidaĵon. Mi vidis ĝin nur unu fojon; neniam mi tion forgesos. Jen veturis tiu nigra mortanĝelo kun la longaj veturiloj plenaj je mortintoj; ili kuŝis ĵetitaj unu sur la alian kiel bestoj. De malantaŭ la veturilo pendis la kapo kaj brakoj de juna virino; ŝiaj okuloj elstaris el la nigre-flava vizaĝo, kaj la longaj kapoharoj balais la straton.

Tiam la junkro tremis por la unua fojo; li ŝancelis en sian dormejon kaj kuŝiĝis sur sian mortlilon; sed mi ĝemis en mia koro: "Ili estos ĵetataj en la tombon kiel bestoj, la morto forkonsumis ilin; sed Dio savis mian animon de la tomba potenco, ĉar li akceptis min, Sela!"

## **Thiele, la 29-an de Septembro 1711.**

Fine mi rehejmiĝis. Kiam mi eniris la pordegon, mia koro batis preskaŭ kiel en la tago, kiam ni ekbatalis kontraŭ la Svedo. Kaj kiam mi eniris en la ĉambron kaj vidis la gesinjorojn, vestitajn nigre, mi ekploris kiel infano, kaj ili ĉiuj ploris. Pro plorado mi preskaŭ ne povis paroli, kaj antaŭ ol mi finrakontis tiun teruran okazintaĵon, la sinjoro foriris kaj eniris en sian ĉambron – Dio konsolu lin laŭ sia kompatemo, Amen!

## **Thiele, la 8-an de Oktobro 1711.**

Hodiaŭ por la unua fojo post mia alveno ni iris ĉasadi. Ve! tio ne estis kiel en pasintaj tagoj, kaj ĝi donis nur malgrandan kontentecon.

"Morten," diris la sinjoro multfoje al mi, "mankas al ni junkro Kresten." Kaj tiam li ĝemis tiom, ke ĝi tratranĉis al mi la koron. Ni revenis hejmen longe antaŭ la vespero kaj kun malgrasa leporo.

## **Thiele, la 2-an de Novembro 1711.**

Ekreviviĝas en la bieno; ni atendas tre altrangajn fremdulojn: lian ekscelencan moŝton Guldenlö ve kun sekvantaro. Li intencas resti kelkajn semajnojn, kaj li sin distros per ĉasado. Hieraŭ la sinjoro parolis multe pri tio ĉetable.

"Li devenas de reĝa familio kaj estas perfekta kavaliro," diris la sinjorino, rigardante fraŭlinon Sofia'n.

Ŝi ruĝiĝis, mallevis la okulojn teleren kaj ridetis, sed mia tuta korpo malvarmiĝis kiel glacio. Ve! ve! mi pensis, ke mi estu senigita je mia malsaĝa amo, sed mi sentas, ke la malsano revenis en terura maniero. Mi baraktas kiel perdriko en reto, sed tio tute ne helpas – ho ke mi estu mil mejlojn for de tie ĉi!

## **Thiele, la 14-an de Novembro 1711.**

Fine alvenis lia ekscelenca moŝto kun la plej granda pompo kaj beleco; du kurieroj kun altaj arĝent-ornamitaj ĉapeloj venas kuretante en la korton, centon da paŝoj antaŭ li. Ili stariĝas kun siaj longaj multkoloraj bastonoj ĉe ambaŭ flankoj de la granda pordo. La sinjorino sin movas kaj sin ŝovas de unu pordo al alia, neniam antaŭe mi ŝin vidis tiel facilmove. Fraŭlino Sofia staris en la salonego, rigardante jen en la spegulon jen el la fenestro. Ŝi tute ne min vidis, kiam mi trairis la salonegon.

Fine li venis mem kun ses fieraj ĉevaloj antaŭ sia veturilo, li estas bela sinjoro! Li aspektis eminenta kaj indulga, tamen ŝajnis al mi, ke io malplaĉa estas videbla je li. Li ridetis tiel fidolĉe kaj palpebrumis, kvazaŭ li rigardis al la suno. Li sin klinis antaŭ ĉiu el la gesinjoroj, sed ŝajnis, kvazaŭ li sin klinis nur por restariĝi pli alte. Venante ĉe fraŭlino Sofia, la sango supreniris en lian palan vizaĝon, kaj li flustris longan francan komplimenton.

Ĉetable li preskaŭ ne deturnis la okulojn de ŝi, eĉ kiam li parolis kun la aliaj. Dume ŝi lin ŝtelrigardis, sed mi bruligis mian manon je la telero tiel, ke ĝi estas hodiaŭ kovrita je veziketoj; ho, ke tio estu la sola loko, kiu min doloris!

### **Thiele, la 20-an de Novembro 1711.**

Estas sendube: el tio fariĝos geedziĝo. Oni bezonas nur atenti la sinjorinon. Kiam ŝi rigardis la fraŭlinon, ŝi posten ĵetis la kapon kvazaŭ anaso, kiu havas plenan kropon, deturnas la okulojn kaj fermas ilin, kvazaŭ ŝi estus ekdormonta, kaj tiam ŝi diras: "Un cavalier accompli, ma fille! n'est-ce pas vrai? et il vous aime, c'est trop clair!" (*Perfekta kavaliro, mia filino! Ĉu ne vere? Li vin amas, tio estas tute klara.*)

Ho ve, jes, tio estas sufiĉe klara; kaj ŝi reciproke lin amas, ankaŭ tio estas klara. Ŝi estiĝu feliĉa.

### **Thiele, la 4-an de Decembro 1711.**

Lia ekscelenca moŝto ankoraŭ ne multe amuziĝis per la ĉasado; du fojojn ni ĉasis, sed ĉiufoje tio jam enuigis lin duonvoje. Estas ĉasotaĵo hejme en la bieno, kiu altiras lin kiel magneto. Ve, ke mi estu restinta en Kopenhago!

### **Thiele, la 8-an de Decembro 1711.**

Hodiaŭ la geedziĝo estas publike deklarita, kaj post ok tagoj okazos la edziĝa festo. Kie mi kaŝos min tiel longe? Mi ĝin ne eltenos; kiam li metas sian brakon ĉirkaŭ ŝia talio, estas, kvazaŭ iu trapikas mian koron per tranĉilo.

Ho, kara ĉielo! Mi kredas, ke Jens kaj mi estas samsortuloj; kiam mi al li diris tion pri la geedziĝo, li tiel forte puŝis la pafilon teren, ke la pafiltenilo dispeciĝis, kaj tiam li kuris kun la stumpo en erikejon. Mi do ne estas la sola malsaĝulo en la mondo.

### **Thiele, la 16-an de Decembro 1711.**

La variolo atakis fraŭlinon Sofian. Ve! Kiel mi tremas pro ŝia vivo! Ho, se mi povus morti anstataŭ ŝi, sed mi povas havi tiun malsanon nur unu fojon. Ŝia bela vizaĝo estas tute kovrata de ulceroj.

### **Thiele, la 19-an de Decembro 1711.**

Ĉi tie estas granda malĝojo. Fraŭlino Maria mortis, kaj la sinjoro estas nekonsolebla; sed la sinjorino parolas nur pri ŝia enterigo kaj kiel tio okazos. Fraŭlino Sofia ja sekvos sian fratinnon, ĉar ŝi estas tre malsana. Lia ekscelenca moŝto estas forvojaĝonta. – Feliĉan vojaĝon! –

### **Thiele, la 13-an de Marto 1712.**

Refoje mi ellitiĝis post longdaŭra malsano. Mi kredis, ke ĝi estus la lasta, kaj kore petegis al mia Dio pri savo. Sed mi promenos ankoraŭ momenton en tiu ĉi ĉagrenejo – tio estas lia volo – kiu estu! Estas al mi, kvazaŭ mi forsavis min de la morto, kaj ŝajnas al mi, ke tiu tri-monata malsano daŭris tri jarojn. Hieraŭ mi ŝin revidis unuafoje de post mia enlitiĝo, kaj eĉ kun malkonsterno, preskaŭ mi kredus, ke la malsano forprenis kun si mian malsaĝan amon. Ŝi estis iom pala, kaj mi opiniis, ke ŝi ne aspektis tre ĝoje. Ho ve! Ŝi ne havas specialan kaŭzon por tio. Lia ekscelenca moŝto revenis la estintan semajnon, kiel mi aŭdis. Li sendube estas granda

diboĉulo; antaŭ nelonge mi vidis tra fendaĵo de mia pordo, ke li kondukis tre maldece kun la servistino de la sinjorino. Ho, la kompatinda fraŭlino Sofia! Se mi estus lia ekscelenca moŝto, mi ŝin alpreĝus kiel anĝelon de la ĉielo.

## **Thiele, la 1-an de Majo 1712.**

Lia ekscelenca moŝto forvojaĝis kaj lasis tie ĉi sian karulinon. Si jam enuigis lin, – Dio pardonu min! – mi kredas, ke li same enuigis ŝin. Ŝi sekve ne plu sopiras je li, ĉar ŝi estas tiel vivoplena kiel antaŭe, preskaŭ pli vivoplena; tamen de tempo al tempo iom fiera. Kelkfoje ŝi parolas al mi kvazaŭ al almuzulo kaj kelkfoje kvazaŭ mi estus ŝia egalulo. Mi kompatindulo, mi preskaŭ kredas, ke ŝi min mokas –. Mi ne estiĝis ankoraŭ saĝa, ĉar ŝi povas fari min ĝoja aŭ malĝoja, tute laŭ sia plaĉo.

## **Thiele, la 3-an de Junio 1712.**

Mian sanon mi neniam rekiros; la vigleco de mia juna aĝo tute foriĝis. Mi sentas min peza kaj laca en tuta mia estaĵo, kaj nenio povas min amuzi. Mi ne deziras ĉasi nek legi; mia pafilo kaj mia Ovidius estas ambaŭ polvokovritaj. La franca lingvo, kiun mi tiel amis antaŭe, komencas malplaĉi al mi, mi ne volas plu legi nek aŭdi ĝin – ĝi estas trompa lingvo!

## **Thiele, la 2-an de Julio 1712.**

Jens kaj mi interŝanĝis nian ĉambron. Li fine volis havi la mian, ĉar li ne kuraĝis kuŝi tute apud la enterigejo, la malsaĝulo! Tamen li mem iam kuŝos tie por ĉiam. La interŝanĝo tre plaĉas al mi, ĉar nun tra la fenestro mi povas vidi la tombojn de miaj karaj gepatroj – ili estas bone protektataj – Dio ĝojigu iliajn animojn en la ĉielo! Tie malproksime estas la tombo de sinjoro Sören; ĉiam kreskas sur ĝi ĉiaj kardoj – mi devas ilin elŝiri!

## **Thiele, la 13-an de Decembro 1712.**

La servistino de la sinjorino naskis fileton. Ŝi kulpigis puntovendiston – sed en la tuta bieno ĉiu scias, kiu estas la kulpulo. La juna fraŭlino mem mokŝercis pri tio. Mi ne komprenas, kiel ŝi povis tion fari; sed ŝi estas senzorga kaj ridas pri ĉio – mi ne havas tian karakteron.

## **Thiele, la 27-an de Februaro 1713.**

Ĉu mi sonĝas aŭ ĉu mi maldormas? Ĉu mia prudento min trompis, aŭ ĉu vere ŝi estis mia? Jes, ŝi estis mia – mi ŝin ĉirkaŭbrakis per miaj brakoj, ŝi ripozis sur mia brusto kaj kovris mian vizaĝon per kisoj – per varmegaj kisoj – nun mi volonte mortus, tiel feliĉa mi estos neniam plu. Sed ne! kiel tio okazis al mi? Ĉu mi revas? Kion mi faris? Ve, mi ne scias, kion mi skribas – mi timas, ke mi freneziĝos.

## **Thiele, la 5-an de Marto 1713.**

Mi memore revokas ĉi tiun dolĉan matenon! Mi bone pripensu, kiel feliĉega mi estis; estas nur nun, ke mi kvazaŭ elebriiĝas. – La sinjoro revenis de ĉasado, kaj Jens estis restinta en la arbaro por eltiri la hundon, kiu estis falinta en truegon. Mi bone sciis, ke li ne revenos antaŭ tagiĝo, kaj tiel min ekkaptis la deziro kuŝi en mia antaŭa ĉambro. Mi ĵus ekdormis, kiam mi estis vekata per kiso. Terurite mi eksidis kaj estis vokanta; tiam subite mi sentis manon sur mia buŝo kaj brakon ĉirkaŭ mia nuko, kaj dolĉa voĉo flustris – ho ĉielo! Tio estis la ŝia, mi ne kuraĝis eldiri ŝian nomon. Tiam – tiam – ho mi pekulo! mi hardita pekulo! mi perfidis mian sinjoron! kaj mi eĉ ne povas sincere kaj kore bedaŭri tion. Ĉiufoje kiam mi volas pentofari, mi estas malhelpata de kaŝita ĝojo, kiu mokas pri mia pento. Mi sentas tion: mi sopiras ripeti tiun malbonfaron, kiun mi devus malbeni.

"Eterne la mia!" estis la unuaj vortoj, kiujn mi provis eldiri; sed tiam ŝi sin eltiris el miaj brakoj kun ekkrio, kaj – mi estis sola. La pordo knaris, kaj mi eksidis en mia lito; mi dubas, ĉu ĉio tio estas fantomaĵo.

Ho! kial ŝi forkuris? kial do ŝi eniris al mi nevokita, netentita? Ĉu ŝi min amis, kiel mi amis ŝin, silente, interne, brulante?

### **Thiele, la 6-an de Marto 1713.**

Ho mondo! ho mondo! kiel trompa vi estas! Honesteco jam ne ekzistas, virto kaj honoro estas piedpremataj! Sed kial mi volas plendi? Ĉu mi estas pli bona ol ŝi? Ĉu mia peko estis pli malgranda, ĉar mi kredis, ke mia amo estas pli granda? Ho ve, mi akiris la rekompencan, kiun mi indas, ni estas egale malbonaj, unu perfidas la alian. Ho! vi trompa virino! vi falsa edzino de Potifaro! estis tial, kial vi eligis ekkrion kaj forkuris pro tio, ke vi aŭdis mian voĉon. Tio do estas malnova kutimo – kiam vi serĉis mian liton – ne, la liton de Jens! Malnova amo, malnova peko! dum mi vin adoris, dum mi konsideris vin kun respekto kiel sanktan anĝelon, tiam vi amintrigis kun mia kunservisto!

- Estis en la mezo de la nokto. Ebria pro dolĉaj rememoroj, mi iris en la ĝardenon. En malluma vojo mi vidis ion moviĝantan – ŝajnis al mi, ke tio estas ŝi. Rapide mi tien kuris – estis ŝi! Jes, estis ŝi, sed kiel mi ŝin trovis? Sur la genuo de Jens, kun la brakoj ĉirkaŭ lia kolo – ekterurite ĉiu forkuris sian vojon, kaj mi staris, kvazaŭ mi estis tuj falonta en abismon. La suno trovis min sur tiu sama loko, estis al mi malvarmege – mi tremis kiel poplofolio. Ho, vi mizera trompa malvirtigita mondo!

### **Thiele, la 9-an de Marto 1713.**

Mi ŝin vidis por la unua fojo post tiu pekoplana nokto. Subita ruĝiĝo trakuris ŝian vizaĝon, ŝi ĉirkaŭrigardis en la ĉambro por ne vidi min. Mi sentis, ke mi fariĝas malvarma kaj varma samtempe.

En la momento, kiam ni estis solaj, ŝi preteriris min rapide kaj diris kun duone fermitaj okuloj: "Silence! " Samtempe ŝi premis mian manon, kaj jen ŝi estis ekster la ĉambro.

### **Thiele, la 13-an de Aprilo 1713.**

Ĉiuj en la bieno scias ĉion: La sinjoro, la sinjorino, tuta la bieno tion scias, kaj estas Mamsel Lapus , kiu ĝin malkovris kaj publikigis. La juna fraŭlino volonte ŝin mokŝercis; sed tion ŝi bone enskribis en sian memoron. Neniu rimarkis, ke tiu ruza virino komprenas la danan lingvon, kaj tial oni kelkfoje ne singarde diris ion, pri kio ŝi eksciis la veron. Poste ŝi tiel longe spionadis, ke fine ŝi sukcesis vidi ilin kune en la lito.

Ĉielo! kia skandalo estiĝis el tio! La sinjoro ĉirkaŭ-iradis kiel frenezulo kun sia pafilo por pafmortigi Jens'on, sed Jens estis jam malproksime sur sia ĉevalo. La juna fraŭlino sidis kiel malliberulino en la angulsalono, por ke la sinjoro ne faru al ŝi malbonon. Kara ĉielo! Kiel tio finiĝos? Mi tremas ĉiufoje, kiam mi aŭdas lian voĉon. Mia konscienco min kondamnas kaj faras min timemulo. Pento kaj timo tiel min atakis, ke amo kaj ĵaluzo estas tute pelitaj el mia brusto. Ho, ke mi estu kvindek mejlojn sub la tero!

### **Thiele, la 14-an de Aprilo 1713.**

Jens estis tie ĉi. Li venis en la nokto en mian ĉambron por ekaŭdi, kiel ĉio okazas. Li estis kvazaŭ ebria homo, ploris kaj blasfemis samtempe. "Ne malkaŝu, ke mi estis tie ĉi," li diris, kiam li iris for, "alie vi estos morta homo!" Li sendube plenumos sian promeson; kaj mi estu singarda. Sed kion li do intencas? Li mem ne scias tion.

### **Thiele, la 17-an de Aprilo 1713.**

La juna fraŭlino malaperis!



Estintan nokton ŝi forkuris tra la fenestro. Jens sen dubo estis tie ĉi por forkonduki ŝin, ĉar iu renkontis meznokte du personojn sur unu ĉevalo, sed pro la mallumeco li ne povis vidi, ĉu ambaŭ estas viroj. Tio okazis sur la vojo al Viborg, kaj ni ĉiuj estis eksterdome la tutan tagon por serĉi. Ni revenis ne trovinte ilin. Mi sciiĝis, ke ili transiris la ponton de Skjerno, sed mi estas prudenta kaj ne venos tro proksime al ili.

Ve, ve al la mondo, en kiu ni vivas! Ve al mia kompatinda sinjoro! Li certe mortos pro tio. Li kuŝas, kaj al neniuj estas permesate viziti lin.

## **Thiele, la 20-an de Aprilo 1713.**

Hodiaŭ la sinjoro venigis min al si. Ho, kara Dio! Kiel pala li estis, kiajn kaviĝintajn vangojn li havis! Mi preskaŭ povus diri, ke li jam ne vivas.

"Morten!" li diris, kiam mi eniris. "Ĉu tio estas vi? Venu ĉi tien al mi!"

Tuj kiam mi aŭdis lian voĉon, mi ekploris. Ĉar estis, kvazaŭ lia voĉo venis el barelo, kaj kiam li vokis tra la pordego: "Morten! Venu kun la hundoj!", tiam estis, kvazaŭ la bieno renversiĝus, kaj kokoj kaj anasoj ekflugis ĉirkaŭe kun timego. Sed tiam li parolis mallaŭte, tiel flustre, ke mia koro estis rompiĝonta.

"Morten!" li diris, "ĉu vi ne vidis skolopojn?"

"Ne, via moŝto!" mi respondis plorante. "Mi tute ne estis eksterdome."

"Ho, vi ne estis?" li diris. "Mi ne plu pafos multajn!"

"Ho jes!" mi respondis. "Dio povas refoje helpi vin!"

"Ne, Morten!" li diris, "kun mi ĉio finiĝis. Se mi havus ankoraŭ Kresten!"

Jen li retenis du larmojn, kiuj estis eniĝontaj liajn kavajn okulojn.

"Kie estas Vaillant?" li demandis.

"Ĝi kuŝas ĉe la kameno," mi respondis.

"Voku ĝin!" li diris.

La hundo venis kaj kuŝigis la kapon sur la liton. La sinjoro longe frapetis ĝin karese kaj rigardis ĝin melankolie.

"Vi estis por mi fidela knabo," li diris. "Vi ne min forlasis. Kiam mi estos mortinta, vi pafmortigu kaj enterigu ĝin sub la granda frakseno ekster la enterigejo, sed pafu ĝin bone, kaj ne lasu ĝin diveni, kion vi intencas – promesu tion al mi!"

"Jes, via moŝto!" mi respondis.

"Ĝi apartenos al neniu alia," li diris, refalante sur la kapkusenon. "Mian ĉasĉevalon kaj la pafilon kaj mian portepeon vi heredos; mian blankfruntan ĉevalon vi neniam forlasos; se ĝi estiĝos tiel aĝa, ke ĝi ne povos plu manĝi, tiam mortpafu ĝin."

"Jes, kara sinjoro!" mi respondis; mi preskaŭ ne povis diri tion pro plorado.

"Kaj jen," li diris, "kuŝas papera saketo sur la tablo, vi ĝin heredu pro viaj bonaj servoj. – Nun iru, Morten! kaj preĝu al Dio por mia kulpa animo!"

Mi kisis lian manon, kiun li etendis al mi, kaj ŝanceliris al mia ĉambro – ho! Dio donu al li feliĉan morton! Li estis por mi tiel bona kaj favora sinjoro!

## **Thiele, la 3-an de Majo 1713.**

Fine ankaŭ li mortis! Nun mi havas plu nenian amikon sur la tero. – Ĉi tie mi ne volas resti; mi volas foriri en la mondon por senigi min

je miaj melankoliaj pensadoj –. Kompatinda Vaillant! Kiam mi ekprenis la pafilon, ĝi saltis ĉirkaŭe tiel ĝoja, ĝi ne sciis, ke mi kondukas ĝin al la morto –. Ne! tian ekpafon mi faros neniam plu dum mia vivo; kiam mi streĉis la ĉanon kaj ĝi tion aŭdis, svingis la voston kaj ĉirkaŭrigardis, ĝi atendis ĉasotaĵon kaj tute ne pensis, ke la kuglo estis destinata por ĝi mem; kiam la pulvo ekbrulis, kaj ĝi konvulsie kuŝis tere, estis, kvazaŭ mia koro estis saltonta el mia brusto. Ho, mia kara, mortinta sinjoro! Tio estis la lasta, la plej malfacila servo, kiun mi faris por vi.

### **Surŝipe apud Thune, la 17-an de Majo 1713.**

Duan fojon – eble lastan fojon – mi adiaŭas vin, ho mia kara naskiĝlando! Adiaŭ, ho verda arbaro – kaj bruna stepo! Adiaŭ ĉiu ĝojo de mia juna aĝo! Pli malpeza estis mia koro, kiam antaŭ du jaroj mi trafendis tiujn ĉi ondojn; tiam mi havis mian bonan sinjoron, nun li ripozas en sia tombo, same kiel mia junkro; kaj ŝi – kiun mi volonte forgesus – vagadas en la mondo, Dio scias kie kaj kiel. Mi do provos la ludadon de la sorto kaj manĝos mian panon inter fremduloj. Jes! la militon mi provos! Ĝi donos panon aŭ morton! La blankfrunta ĉevalo kaj mi iros kune, ĝi estas mia lasta amiko en la mondo.

### **Svedujo, la 13-an de Junio 1716.**

Ĉi tie mi sidas kiel milit-kaptito en fremda lando. Ĝis nun mia glavo min helpis. Mia kolonelo kaj mi batalis kontraŭ malamikoj; sed ni estis du kontraŭ dek. Ho ve, mia kompatinda ĉevalo! Vi devis morti – ho ke mi mortu ankaŭ!

### **Stockholm, la 14-an de Junio 1716.**

Tio ne povas daŭri pli longe! Ili min trenis de unu fortikaĵo al alia; ili allogis kaj minacis min, por ke mi soldatiĝu, sed prefere mi pereos en subtera malliberejo ol batali kontraŭ mia propra reĝo kaj estro.

Ankoraŭ pli volonte mi havus mian liberecon. Mi klopodos ĝin akiri aŭ trovi la morton!

## **Nordkøping, la 3-an de Februaro 1718.**

Fine kaj spite al ĉio mi estiĝis sveda soldato! Kvankam mi kiel eble plej singarde min kaŝis kiel ĉasotaĵo en arbaro kaj meze de ŝtonegoj, tamen ili min trovis. Kion alian mi devus fari? Pli bone estas sub la bona ĉielo de Dio inter glavoj kaj kanonoj ol inter kvar muroj de malliberejo! Ili promesis al mi, ke neniam mi batalos kontraŭ miaj samlandanoj, sed nur kontraŭ Grandrusoj – ili eble havas la veran kuglon kun la nomo de Morten Vinge sur ĝi.

## **Siberujo, la 15-an de Majo 1721.**

Sinjoro mia Dio! Kiel strangaj estas viaj vojoj! Multajn milojn da mejloj de Danujo mi estas tie ĉi en duone sovaĝa kaj zorgoplena lando; mi iras trans frostitajn riverojn kaj vagas en la neĝo ĝis miaj genuoj; sed hejme la arbaro kaj la kamparo surmetis sian verdan somer-vestaĵon. Ekster mia malnova ĉambrofenestro staras la pomujo plena je floroj, la kanabeno kantas en la grosarbetaĵo, la sturno sidas sur la preĝejo kaj flutas sian ĝojan melodion, kaj la alaŭdo kantas alte en la nuboj. Tie ĉi blekas vulpoj kaj ursoj; akcipitroj kaj korvoj blekas en la nigraj arbaroj. Kie do finiĝos tiu ĉi dezerto? Ve! kie finiĝos mia mizera vivo?

## **Riga, la 2-an de Septembro 1743.**

Ĉu mi unu fojon ĝisvivos la tagon, kiam mi revidos mian naskiĝlandon? Dum longaj zorgoplenaj jaroj, dum dudek-kvar vintroj mi ĉasadis zibelojn kaj mustelojn en la arbaroj de Siberujo! Kiel longe jam tedis min la vivo! Sed pacience mi volas atendi, ĝis kiam mia Dio kaj savinto min vokos. Eble li volas, ke miaj lacaj membroj ripozu en la tero de mia patrujo –. Ho, mi vidas suprentirita la danan

flagon, la karan signon de la Kruco kaj de la Savinto! Mia animo, gloru la Sinjoron! Ĉio, kio estas en mi, gloru lian sanktan nomon.

### **Falster, la 23-an de Oktobro 1743.**

Mi estas tute proksime de la morto aŭ tre malproksime de ĝi! En ventego kaj malbonega vetero mi alproksimiĝis al mia amata naskiĝlando. La ondegaj bategis nian ŝipon kaj minacis engluti nin! Sed la Sinjoro savis min, lia mano min subtenis –, li ne volas nun retiri ĝin de mi, kvankam malriĉa kaj duone nuda mi estas ironta inter fremduloj.

### **Corselidse, la 2-an de Novembro 1743.**

Mi trovis rifuĝejon kontraŭ la ventego de la mondo; pia kaj nobla sinjoro, preninte min en sian servon, promesis zorgi pri mi ĝis mia morto.

### **Corselidse, la 1-an de Majo 1744.**

Kiel belega lando estas ja ĉi tiu! Ĉio en plena florado! Verdaj arbaroj kaj verdaj herbejoj! Floroj ĉie! En Siberujo estas ankoraŭ vintro. Dio estu glorata pro tia interŝanĝo!

Mia sinjoro multe min amas, ofte mi devas sidi multajn horojn kaj rakonti al li pri milito kaj pri ĉiuj landoj, kiujn mi travagadis. Kaj se li volonte aŭskultas, mi volonte rakontas; ĝojigas min, rememorigi al mi miajn multajn suferitajn malfeliĉojn.

### **Corselidse, la 2-an de Julio 1744.**

Ho, kompatema Dio! tiu maldolĉa pokalo ne estis ankoraŭ malplenigita! Ĉu la iama vundo refoje devas esti ŝire malfermata!? Jes, ĉar tio plaĉis al vi! – Mi ŝin revidis – ŝin? ho ne! ne ŝin! falintan

anĝelon mi vidis, figuron de la mallumo –; ofte mi deziris esti mortinta, sed nun – mi malamas la vivon – mi ne povas plu skribi – –

## **Corselidse, la 8-an de Aŭgusto 1744.**

Ne estas pro plezuro, ke mi reprenis la plumon; sed se iu ekvidos tiun ĉi taglibron post mia morto, tiam li vidos, kiel la peko punas la pekulon.

Tiun malĝojigan tagon mi distris min per promenado en nia bela ĝardeno. Kiam mi preteriris malfermitan kradpordon, tie staris viro, kies vizaĝo ŝajnis al mi konata, tamen la densa nigregriza barbo kaj malgajega rigardo preskaŭ min timigis.

"Ĉu vi estas ankaŭ tie ĉi?" diris li grimacante. La bastono defalis de mia mano, kaj ĉiuj miaj membroj ekstremis – tio estis Jens!

"Kara mia Dio!" mi diris; "ĉu vin mi renkontas tie ĉi? Kie estas fraŭlino Sofia?"

Li eligis laŭtan blasfemon: "La diablo prenis la fraŭlinon kaj eĉ la virinecon; sed ĉu vi volas vidi mian kore amatan edzinon, jen tie ŝi estas kaj sarkas. Sofi'!" li ekkriis, "jen estas iama konato!"

Ŝi sin turnis duone – ŝi estis surgenu tri paŝojn de mi –, rigardis min unu momenton kaj denove eksarkis. Mi ekvidis eĉ ne unu movon sur ŝia vizaĝo – tiu vizaĝo! tiu iam tiel belega vizaĝo! kiel ĝi ŝanĝiĝis! Paleflava, kovrita je sulkoj; melankolia ĝi aspektis, kvazaŭ ĝi ridetis neniam. Larĝborda ĉapelo kun longaj ĉifonoj de nigra puntaĵo ĝin faris ankoraŭ pli malhela. Malpuraj vestaĵaĉoj, kiuj iam estis elegantaj kaj belegaj, pendis ĉirkaŭ ŝia dika, malgracia korpo. Mi sentis, ke mi tuj svenos. Min ekkaptis timo, abomeno, kvazaŭ mi subite vidis serpenton. Mi ne povis paroli, nek formovi min de tiu loko.

Jens eligis min de tiu stato. Li ekkriis: "Nun ŝi ne estas plu tiel bela kiel en tiu nokto, kiam ŝi enŝteliĝis en vian liton!"

Mi ekstremis.

"Orumaĵo eluziĝis," li diris plue, "sed la belan haŭton ŝi havas ankoraŭ, fiera kaj malica ŝi estas ankoraŭ, kaj la buŝon ŝi povas movadi. He! via sinjorina moŝto! Parolu iom kun ni!"

Ŝi silentis kaj ŝajnigis, ke ŝi tion ne aŭdis, kvankam li parolis sufiĉe laŭte.

"Nun ŝi ne volas," li diris, "sed post kiam ni rehejmiĝos, ŝia buŝo estos kvazaŭ moviĝanta klaketilo. Ĉu vi ne havas ion por mi pro memoro al nia iama amikeco, Morten?"

Mi donis al li kelkan monon kaj foriris kvazaŭ en sonĝo en nian ĝardenon. Ĉe la ĝardenpordo staris mia sinjoro.

"Ĉu vi konas tiujn homojn?" li demandis.

"Ho ve, vi bona Dio!" mi respondis. "Jes, mi konis ilin antaŭ multaj jaroj."

"Ili estas malbonaj homoj," li diris. "Ŝi estas malica kaj ekzilita, kaj li drinkas kiel porko. Ili loĝas de antaŭ kelkaj jaroj en domo ĉe la marbordo! Li fiŝkaptas kaj dum la labortagoj ŝi laboras en la ĝardeno. Ĉu ŝi devenas de honesta popolo?"

Tiam miaj larmoj ekfluis kaj senpezigis mian premitan koron. Mi rakontis al li, kiuj ili estas, kaj lia teruro estis tiel granda kiel mia malĝojo.

## **Corselidse, la 14-an de Septembro 1744.**

Mi dubas pri tio, ĉu mi daŭre restos en tiu ĉi loko. Mia loĝado tie ĉi tute ne plu plaĉas al mi, de kiam mi scias, ke mi estas en ŝia proksimeco, kaj ĉar mi ne ĉiam povas eviti ŝin. Mi ankoraŭ ne parolis kun ŝi, ĉar mi ŝin evitas kiel demonon. Jens serĉas min kun trudemo, kiu plaĉas nek al mi nek al mia sinjoro. Kiam mi flaras lian

brandodoran spiradon, tiam estas al mi, kvazaŭ iu prezentas al mi venenon por trinki.

Li rakontis al mi sian historion – ho, kiel terura, kiel abomena ĝi estas! En Danujo, en Germanujo ili vagadis de unu urbo al alia – li ludadis la kornon, kaj ŝi kantadis kaj ludadis sur la liuto; per tio ili perlaboris sian panon, kaj kiam tio ne sufiĉis plu, ŝi komencis metion, kiu disŝiras mian koron, kiam mi pensas pri tio. Fine ankaŭ tio devis fini, kaj ili estus pereontaj pro malhavo, se mia sinjoro ne estus kompatinta ilin. – Dio pardonu! Mi povus deziri denove esti en Siberujo.

## **Corselidse, la 1-an de Majo 1745.**

Dio benu mian noblan sinjoron! Li divenis mian deziron morti en mia naskiĝloko, kaj tial ekhavigis al mi bonan oficon ĉe nova sinjoro en Thiele. Mardon mi forvojaĝos per ŝipo de Stubbekjøbing. Dio eterne rekompencu lin pro tio!

## **Surŝipe inter Sälland kaj Samsø, la 4-an de Junio 1745.**

"Ne timu tiun, kiu mortigas nur la korpon; sed timu tiun, kiu ruinigas samtempe korpon kaj animon!"

Mi sentas la forton de tiuj vortoj de Dio.

Kiam mi staris en mia juneco sur tiuj ĉi ondoj antaŭ la kugloj de la svedoj, tiam mi sentis min pli bona, ol kiam mi vidis la falintan anĝelon de mia juneco en la ĝardeno de Corselidse. Glavoj kaj kugloj, batoj kaj pikoj, vundo kaj morto estas nenio kompare kun la perdiĝo de la amo kaj kompare kun ruiniĝo de senkulpa animo. Se mi estus vidinta tiam disŝirita de sovaĝaj bestoj ŝian belegan korpon, tio ne povus tiel premi mian bruston kiel en la tempo, kiam mi ŝin revidis insultata, ruinigita, malestimata kaj perdita sen savo. Kiam ŝi kuŝis tie kaj sarkadis la teron, ŝajnis al mi, kvazaŭ



ŝi enterigis mian lastan esperon, mian lastan restaĵon de kredo al honoro kaj virto.

Sed mi diros, kiel ĉiam diris en Siberujo mia kunkaptito, la maljuna turko, meze de la plej grandaj mizeroj: "Dio estas granda!" Jes, kaj kompatema! Li povas kaj volas fari multe pli ol ni kompatindaj homoj komprenas.

## **Thiele, la 4-an de Julio 1745.**

Fine mia ŝipo eniris mian lastan havenon! Dum pli ol tridek jaroj mi vagadis ĉirkaŭe sur la sovaĝa haveno de la mondo por fini tie, kie mi komencis. Kion mi faris en tiuj jaroj? Kion mi gajnis? Tombon – ripozejon ĉe miaj praavoj. Tio estas nenio kaj tamen ne tiel malmulte; mi havas amikojn, konatojn sur kaj sub la tero. Tie staras ankoraŭ la pomarbo ekster mia fenestro, ĝi estiĝis pli aĝa, sed forteco estas en ĝia trunko, uraganoj kurbigis ĝian kapon, kaj sur ĝiaj branĉoj kreskas musko kiel grizaj haroj sur la kapo de maljunulo. Ĉe la preĝeja muro mi vidas la grandan fraksenon, sub kies blanka radiko mi enterigis la kompatindan Vaillant. Tiamaniere mi rekonas multajn arbojn, multajn erike-kovritajn altaĵojn kaj eĉ la senvivajn ŝtonojn starantajn neŝanĝe dum miljaroj, kaj kiuj vidas generacion post generacio kreski kaj velki. La generacio, kiun mi konis, ankaŭ malaperis. Nova sinjoro, novaj servistoj – mi estas fremdulo, alilandulo inter ili ĉiuj.

## **Thiele, la 2-an de Septembro 1749.**

Hodiaŭ forpasis kvindek-ses jaroj, de kiam mi vidis la lumon de la mondo! Sinjoro Dio! kie estas tiuj jaroj? tiuj multaj miloj da tagoj? Kie estas la ĝojoj de mia juneco? Ili estas ĉe miaj tiamaj amikoj. – Estis en ĉi tiu sezono; ni vere ĝuis la plezurojn de la ĉasado. Kiel ĝoje tio okazis, kiam ni eliris en la matenon! La ĉasistoj ekkriis, kaj la hundoj bojis, kaj la ĉevaloj piedfrapetadis tiel senpacience kiel ni mem. Ni serĉis jen perdrikojn sur la erikejo, jen la cervojn en la arbaro –, kun ludado kaj kantado ni iris hejmen. Nun ĉio estas tie ĉi silenta kiel

en monaĥejo, la sinjoro tute ne sin okupas pri ĉasado. Silenteme kaj sole la ĉasisto eliras, kaj senparole li revenas: Tiu generacio estas malĝoja kiel mi mem.

## **Thiele, la 12-an de Januaro 1751.**

Estas trankvila belega vintronokto! Ĉio, kion mi vidas, estas blua kaj blanka. La luno forpelis antaŭ si la stelojn, ĉar ĝi volas lumi sola. Tiel bele ĝi lumis ankaŭ foje – antaŭ multaj jaroj, kiam mi kondukis la veturilon de fraŭlino Sofia. Mia juna amo lumis tiel hele kaj ĝoje kiel la luno, kaj ŝia estis ankaŭ pura kaj nemakulita kiel la ĵus falinta neĝo. Nun mia amo estas malluma kiel la erikejo, kiam vintre la neĝo forfandiĝis, kaj ŝia – se ŝi vivas ankoraŭ – certe estas simila je valo de Siberujo post superakviĝo, plena je mallumaj serpentformaj riveretoj plenŝutitaj de altaĵetoj kaj renversitaj arboj.

"Jes, Sinjoro! Sinjoro! Se vi trafas iun per granda puno pro malbonaj faroj, tiam vi faras tion, por ke lia mizera korpo forfandiĝu kiel tineo; certege! Ĉiuj homoj estas vantaĵo!"

## **Føulum, la 12-an de Majo 1753.**

Dimanĉon por la unua fojo mi funkciis kiel dekanano de Thiele kaj Vinge. La favora sinjoro venigis min tien ĉi, kiam li estis mortonta. Nun mi loĝas en la domo de mia patro; sed mi loĝas tutsola. Ĉiuj amikoj de mia juneco jam delonge mortis; nur mi postrestis kiel senfolia arbo sur la erikejo, sed post mallonga tempo mi ripozos ĉe ili kaj estos la lasta de mia generacio. Ĉi tiuj paĝoj estos miaj postsignoj.

Se iu – kiam mi estos mortinta kaj for – legos ilin, tiam li ĝemos dirante:

"Kiel la herbo estas nia vivo, Kiel la flor' staranta sur la kampo En plena belegeco, sed sen forto. – Ĉar kiam vento blovas trans la floron, Rompiĝas la trunket', perdiĝas belegaĵo, Kaj oni eĉ ne

scias, kie ĝi iam staris. – Sed la kompatemo de Dio estas de eterneco ĝis eterneco."

## **Maksimoj kaj Pensoj.**

### **De Markizo de Maricá.**

La aŭtoro, Markizo de Maricá (*Mariká*) estas la plej fama brazila moralisto.

\* \* \*

*La bonfarado estas ĉiam feliĉiga kaj ĝustatempa, se la prudento ĝin direktas kaj rekomendas.*

\* \* \*

*La malŝparemulo povas esti bedaŭrata, sed la avarulo estas preskaŭ ĉiam malŝatata.*

\* \* \*

*La intereso klarigas la plej malfacilajn kaj malsimplajn fenomenojn de la socia vivo.*

\* \* \*

*La sensaĝa agemo estas pli ruiniga ol la mallaboremo.*

\* \* \*

*Malriĉeco kaj mallaboremo loĝas kune.*

\* \* \*

*La fantazio estas la paradizo de l' feliĉuloj kaj la infero de l' malfeliĉuloj.*

\* \* \*

*Oni povas kunigi ĉiujn virtojn, sed ne kunamasigi ĉiujn malvirtojn.*

\* \* \*

*Neniu registaro estas bona por la malbonaj homoj.*

\* \* \*

*La avarulo estas la plej lojala kaj fidela gardanto de la havaĵo  
de siaj heredontoj.*

\* \* \*

*La sincereco estas multfoje laŭdata, sed neniam enviata.*

\* \* \*

*La timo kaj la entuziasmo infektas.*

\* \* \*

*Kiu al Dio fidas kaj esperas, tiu neniam malesperas.*

\* \* \*

*La ĝentileco instruas: maski por ne ofendi.*

\* \* \*

*La homa vivo sen religio estas vojaĝo sen direktilo.*

\* \* \*

*Kiu pli multe timas Dion, tiu malpli multe timas la homojn.*

\* \* \*

*La modesteco orumas la talentojn, la vanteco ilin senbriligas.*

\* \* \*

*Se la popolo ne kredas al la honesteco, la malmoraleco estas ĝenerala.*

\* \* \*

*Kiel la spaco enhavas ĉiujn korpojn, tiel la ambicio enhavas ĉiujn pasiojn.*

\* \* \*

*La homoj plej multe respektataj ne ĉiuokaze estas la plej multe respektindaj.*

\* \* \*

**El la portugala lingvo tradukis A. Couto Fernandes.**

# TIEL DO RAKONTOJ

**Rudyard Kipling**

**Tradukis Wouter Pilger**

Joseph Rudyard Kipling (1865-1936), Brito, naskiĝis en Bombajo en la tiama Brita Hindujo kaj edukiĝis tie kaj en Britujo. Li laboris kelkajn jarojn kiel ĵurnalisto en Hindujo kaj poste loĝis en Usono kaj Britujo. Li famiĝis per noveloj kaj per patriotismaj, imperiismaj poemoj. Nun li estas ankoraŭ fama pro siaj infanlibroj: "Ĝangalo-libroj", "Kim", "Tiel do-rakontoj". Li ricevis la Nobelpremion por literaturo en 1907.

## **Kiel la baleno ekhavis sian gorĝon**

IAM, en la maro, Ho mia Plej Amata, estis Baleno, kaj ĝi manĝis fiŝojn. Ĝi manĝis la barbofiŝon kaj la kardofiŝon, kaj la marstelon kaj la sardelon, kaj la plateson kaj la fleson, kaj la blikon kaj ties amikon, kaj la soleon kaj la klupeon, kaj la verdire veran lirla-kirlan angilon. Ĉiujn fiŝojn kiujn ĝi povis trovi en tuta la maro ĝi manĝis per sia buŝo — tiel! Ĝis fine restis en tuta la maro nur unu malgranda fiŝo, kaj ĝi estis eta Ruza Fiŝo, kaj ĝi naĝis iom malantaŭ la dekstra orelo de la Baleno, por esti ekster danĝero. Tiam la Baleno ekstaris sur sia vosto kaj diris: "Mi malsatas." Kaj la eta Ruza Fiŝo diris per eta ruza voĉo: "Nobla kaj larĝanima Cetaco, ĉu vi iam gustumis Homon?"

"Ne," diris la Baleno. "Kia ĝi estas?"

"Plaĉa," diris la eta Ruza Fiŝo. "Plaĉa sed tenaca."

"Tiam havigu al mi iom da," diris la Baleno, kaj ĝi ŝaŭmigis la maron per sia vosto.

"Po unu sufiĉas," diris la Ruza Fiŝo. "Se vi naĝos al latitudo Kvindek Norde, longitudo Kvardek Ueste (*tio estas Magio*), vi trovos, sur floso, en la mezo de la maro, kun nenio vestita krom blua drelika kalsono, paro da ŝelkoj (*vi ne forgesu la ŝelkojn, Plej Amata*), kaj poŝ-tranĉilo, unu ŝippereintan Mariston, kiu, ja mi honeste diru al vi, estas viro de senfina-eltrovemo-kaj-sagaceco."

Tiel do la Baleno naĝis kaj naĝis al latitudo Kvindek Norde, longitudo Kvardek Ueste, tiel rapide kiel ĝi povis naĝi, kaj sur floso, en la mezo de la maro, kun nenio alia por vesti ol blua drelika kalsono, paro da ŝelkoj (*vi precipe memoru la ŝelkojn, Plej Amata*), kaj poŝ-tranĉilo, ĝi trovis unu solan, solecan ŝippereintan Mariston, kiu trempis siajn piedfingrojn en la akvo. (*Li havis permeson de sia Panjo por eniri la akvon, aliokaze li neniam estus farinta, ĉar li estis viro de senfina-eltrovemo-kaj-sagaceco.*)

Tiam la Baleno malfermis sian buŝon malantaŭen kaj malantaŭen kaj malantaŭen ĝis ĝi preskaŭ tuŝis la voston, kaj ĝi glutis la ŝippereintan Mariston, kaj la flosan sur kiu li sidis, kaj lian bluan drelikan kalsonon, kaj la ŝelkojn (*kiujn vi nepre ne forgesu*), kaj la poŝ-tranĉilon. — Ĝi glutis ilin en siajn varmajn, mallumajn, internajn ŝrankojn, kaj tiam ĝi lekis siajn lipojn — tiel, kaj turniĝis trifoje sur sia vosto.

Sed tuj kiam la Maristo, kiu estis viro de senfina-eltrovemo-kaj-sagaceco, trovis sin vere interne de la varmaj, mallumaj, internaj ŝrankoj de la Baleno, li tretis kaj li ĵetis kaj li impetis kaj li baletis, kaj li dancis kaj li prancis, kaj li paŝis kaj li draŝis kaj li ĉardaŝis, kaj li frapis kaj li skrapis, kaj li tuŝis kaj li puŝis, kaj li taktis kaj li baraktis, kaj li spasmis kaj li entuziasmis, kaj li menuetis kaj li piruetis, kaj li popoldancis kie li ne devus, kaj la Baleno sentis sin tute ne komforte. (*Ĉu vi forgesis la ŝelkojn?*)

Do ĝi diris al la Ruza Fiŝo: "Ĉi tiu homo estas tre tenaca, kaj krome li kaŭzas al mi singulton. Kion mi faru?"

"Diru al li ke li eliru," diris la Ruza Fiŝo.

Do la Baleno vokis en sian propran gorĝon al la ŝippereinta Maristo: "Eliru kaj kondu tu bone. Mi havas singulton."

"Ne, ne!" diris la Maristo. "Ne tiel, sed tute alimaniere. Alportu min al mia naskiĝo-bordo kaj la blankaj-klifoj-de-Albiono, kaj tiam mi konsideros." Kaj li komencis danci pli ol iam.

"Vi prefere alportu lin hejmen," diris la Ruza Fiŝo al la Baleno. "Mi estus devinta averti vin ke li estas homo de senfina-eltrovemo-kaj-sagaceco."

Do la Baleno naĝis kaj naĝis kaj naĝis, per ambaŭ siaj naĝiloj kaj sia vosto, tiel rapide kiel ĝi povis, pro la singulto; kaj finfine ĝi vidis la naskiĝo-bordon de la Maristo kaj la blankajn-klifojn-de-Albiono, kaj ĝi rapide glitis duonvoje sur la strandon, kaj ĝi malfermis sian buŝon larĝe kaj larĝe kaj larĝe, kaj ĝi diris: "Ĉi tie ŝanĝi por Vinĉestro, Aŝveloto, Naŝuo, Keno, kaj stacioj je la Fiĉburga Vojo;" kaj precize kiam ĝi diris "Fiĉ", la Maristo promenis el ĝia buŝo eksteren. Sed dum la Baleno estis naĝanta, la Maristo, kiu vere estis persono de senfina-eltrovemo-kaj-sagaceco, estis preninta sian poŝ-tranĉilon kaj tranĉinta el la floso malgrandan kvadratan kradon kun tralioj laŭlarĝe kaj laŭlonge, kaj li estis liginta tiun firme per siaj ŝelkoj (*nun vi scias kial vi devis ne forgesi la ŝelkojn!*), kaj li trenis tiun kradon bone kaj firme en la gorĝon de la Baleno, kaj tie ĝi fiksiĝis! Tiam li recitis la sekvantan Slokaon, kiun mi, ĉar vi ankoraŭ ne aŭdis ĝin, nun deklamos al vi:

*Pere de tiu mia krado  
Venis halto al via manĝado.*

Ĉar la maristo estis ankaŭ Hi-ber-ni-ano. Kaj li ekpaŝis sur la kajobreton, kaj iris hejmen al sia Patrino, kiu estis permesinta al li tremi siajn piedfingrojn en la akvo; kaj li edziĝis kaj vivis feliĉe ĉiam plue. Tiel ankaŭ la Baleno. Sed ekde tiu tago, la krado en ĝia gorĝo, kiun ĝi sukcesis nek eltusi nek engluti, preventis ke ĝi manĝu ion krom tre, tre malgrandaj fiŝetoj; kaj pro tio balenoj nuntempe neniam manĝas virojn aŭ knabojn aŭ knabinetojn.



La eta Ruza Fiŝo foriris kaj kaŝis sin en la koto sub la Sojlo de la Ekvatoro. Ĝi timis ke la Baleno koleras al ĝi.

La Maristo kunprenis la poŝ-tranĉilon hejmen. Li surhavis la bluan drelikan kalsonon kiam li surpaŝis la kajobreton. La ŝelkojn li estis lasinta ĉar, ĉu ne, li utiligis ilin por ligi la kradon; kaj jen la fino de tiu rakonto.

Jen la bildo de la Baleno kiu glutas la Mariston kun ties senfina-eltrovemo-kaj-sagaceco, kaj la floson kaj la poŝ-tranĉilon kaj liajn ŝelkojn, kiujn vi devas ne forgesi. La butonecaj aferoj estas la ŝelkoj de la Maristo, kaj vi povas vidi la tranĉilon tuj apud ili. Li sidas sur la floso, sed ĝi turniĝis iom flanken, do vi ne vidas multon de ĝi. La blankeca afero ĉe la maldekstra mano de la Maristo estas peco de ligno per kiu li provis remi la floson kiam la Baleno alvenis. La peco de ligno nomiĝas gafo-beko. La Maristo lasis ĝin ekstere kiam li eniris. La Baleno nomiĝis Ridulo, kaj la Maristo nomiĝis S-ro Henriko Adalberto Bivenso, MJ. La eta Ruza Fiŝo kaŝiĝas sub la ventro de la Baleno, aliookaze mi estus desegninta ĝin. La kialo ke la maro aspektas tiel tuŝe-fuŝe estas ĉar la Baleno estas suĉanta ĝin tutan en sian buŝon por ensuĉi S-ron Henriko Adalberto Bivenso kaj la floson kaj la poŝ-tranĉilon kaj la ŝelkojn. Vi neniam forgesu la ŝelkojn.

Jen la Baleno serĉanta la etan Ruzan Fiŝon, kiu kaŝiĝas sub la Sojlo de la Ekvatoro. La eta Ruza Fiŝo nomiĝis Pinglo. Ĝi kaŝiĝas inter la radikoj de la granda algo kiu kreskas antaŭ la Pordoj de la Ekvatoro. Ili estas fermitaj. Ili estas ĉiam fermitaj, ĉar pordo ĉiam devus esti fermita. La ŝnureca afero transe estas la Ekvatoro mem; kaj la aferoj kiuj aspektas kiel rokoj estas la du gigantoj Moaro kaj Koaro, kiuj tenas la Ekvatoron en ordo. Ili desegnis la siluetojn sur la Pordoj de la Ekvatoro, kaj ili ĉizis ĉiujn tiujn interplektiĝantajn fiŝojn sub la Pordoj. La beko-fiŝoj nomiĝas beko-Delfenoj kaj la aliaj fiŝoj kun la strangaj kapoj nomiĝas Martelo-kapaj Ŝarkoj. La Baleno neniam trovis la etan Ruzan Fiŝon ĝis post kiam ĝi estis retrovinta sian bonhumoron, kaj tiam ili fariĝis denove bonaj amikoj.

## Kiel la kamelo ekhavis sian ĝibon

NUN venas la sekvanta rakonto, kaj ĝi rakontas pri kiel la Kamelo ekhavis sian grandan ĝibon.

En la komenco de la jaroj, kiam la mondo estis tiel-nova-kaj-freŝa, kaj la Bestoj ĵus komencis labori por la Homo, estis Kamelo, kaj ĝi vivis en la mezo de la Hurla Dezerto ĉar ĝi ne volis labori; kaj cetere, ĝi estis mem Hurlanto. Do ĝi manĝis branĉojn kaj dornojn kaj tamarikojn kaj lakto-kaj-silko-planton kaj pikilojn, plej 'strordinare nenionfarante; kaj kiam iu parolis al ĝi, ĝi diris "Ĝif!" Nur "Ĝif!" kaj ne pli.

Okazis ke la Ĉevalo venis al ĝi, iun lundon matene, kun selo sur sia dorso kaj bridstango en sia buŝo, kaj diris: "Kamelo, ho Kamelo, elvenu kaj trotu kiel ni ĉiuj aliaj."

"Ĝif!" diris la Kamelo; kaj la Ĉevalo foriris kaj rakontis al la Homo.

Okazis ke la Hundo venis al ĝi, kun bastono en sia buŝo, kaj diris: "Kamelo, ho Kamelo, venu kaj prenu kaj portu kiel ni ĉiuj aliaj."

"Ĝif!" diris la Kamelo; kaj la Hundo foriris kaj rakontis al la Homo.

Okazis ke la Bovo venis al ĝi, kun jugo sur sia nuko, kaj diris: "Kamelo, ho Kamelo, venu kaj plugu kiel ni ĉiuj aliaj."

"Ĝif!" diris la Kamelo; kaj la Bovo foriris kaj rakontis al la Homo.

Je la fino de la tago la Homo kunvokis la Ĉevalon kaj la Hundon kaj la Bovon, kaj diris: "Triopo, ho Triopo, mi tre bedaŭras por vi (*en mondo tiel nova-kaj-freŝa*); sed tiu Ĝif-afero en la Dezerto ne povas labori, aliokaze ĝi jam estus nun ĉi tie, do mi lasos ĝin tie, kaj vi devos labori duoblan tempon por kompensi."

Tio tre kolerigis la Triopon (*en mondo tiel nova-kaj-freŝa*), kaj ili faris palavron, kaj indaba-on kaj punĉajet-on, kaj paŭ-vaŭ-on je la rando de la Dezerto; kaj la Kamelo venis maĉante lakto-kaj-silko-

planton plej 'strordinare nenionfarante, kaj ridis pri ili. Tiam ĝi diris "Ĝif!" kaj foriris denove.

Okazis ke preterpasis la Ĝino respondeca pri Ĉiuj Dezertoj, ruliĝante en polvo-nubo (*Ĝinoj ĉiam vojaĝas tiumaniere ĉar tio estas magio*), kaj li haltis por palavri kaj paŭvaŭi kun la Triopo.

"Ĝino de Ĉiuj Dezertoj," diris la Ĉevalo, "ĉu estas ĝuste ke iu ajn estu nenionfaranta en mondo tiel nova-kaj-freŝa?"

"Certe ne," diris la Ĝino.

"Nu," diris la Ĉevalo, "estas afero tie en la mezo de la Hurla Dezerto (*kaj ĝi estas mem Hurlanto*) kun longa kolo kaj longaj kruroj, kaj ĝi ne faris ian ajn laboron de post lunde matene. Ĝi ne volas troti."

"Feŭ!" diris la Ĝino, fajfante, "tio estas mia Kamelo, je ĉiu oro en Arabujo! Kion ĝi diras pri tio?"

"Ĝi diras "Ĝif!" diris la Hundo; "kaj ĝi ne volas preni kaj porti."

"Ĉu ĝi diras ion alian?"

"Nur "Ĝif!"; kaj ĝi ne volas plugi," diris la Bovo.

"Tre bone," diris la Ĝino. "Mi ĝifos ĝin se vi bonvolos atendi minuton."

La Ĝino volvis sin en sian polvomantelon, kaj prenis biron trans la dezerto, kaj trovis la Kamelon, plej 'strordinare nenionfarantan, rigardantan sian propran bildon en flako da akvo.

"Mia longa kaj bobela amiko," diris la Ĝino, "kion do mi aŭdas pri vi faranta neniun laboron, en ĉi tiu mondo tiel nova-kaj-freŝa?"

"Ĝif!" diris la Kamelo.

La Ĝino eksidis, kun la mentono en sia mano, kaj komencis pensi Grandan Magion, dum la Kamelo rigardis sian propran rebrilon en la

akvoflako.

"Vi kaŭzis al la Triopo ekstran laboron depost lunde matene, nur pro via 'strordinara nenionfarado," diris la Ĝino; kaj li daŭrigis pensi Magiaĵojn, kun la mentono en sia mano.

"Ĝif!" diris la Kamelo.

"Mi ne denove dirus tion se mi estus vi," diris la Ĝino; "vi povus diri tion unufoje tro. Bobelo, mi volas ke vi laboru."

Kaj la Kamelo diris "Ĝif!" denove; sed apenaŭ ĝi estis dirinta tion kiam ĝi vidis ke la dorso, pri kiu ĝi tiel fieris, pufiĝas kaj pufiĝas kaj fariĝas granda ĝeleca ĝifo.

"Ĉu vi vidas tion?" diris la Ĝino. "Tio estas via tute propra ĝifo kiun vi kaŭzis al vi mem per ne-laborado. Hodiaŭ estas ĵaŭdo, kaj vi ne faris ajnan laboron depost lundo, kiam la laboro komenciĝis. Nun vi eklaboros."

"Kiel do mi povas?" diris la Kamelo, "kun ĉi tiu ĝifo sur mia dorso?"

"Estas tiel celite," diris la Ĝino, "ĝuste ĉar vi maltrafis tiujn tri tagojn. Vi nun kapablos labori tri tagojn sen manĝado, ĉar vi povas vivi de via ĝifo; kaj neniam diru ke mi nenion faris por vi. Venu el la Dezerto kaj iru al la Triopo, kaj konduku bone. Ĝifu vin!"

Kaj la Kamelo ĝifis sin, kune kun sia ĝifo, kaj foriris al la Triopo. Kaj ekde tiu tago ĝis la nuna, la Kamelo ĉiam portas ĝifon (*ni nun nomas ĝin "ĝibo", por ne dolorigi ĝiajn sentojn*); sed ĝi neniam sukcesis kompensi la tri tagojn kiujn ĝi maltrafis en la komenco de la mondo, kaj ĝi neniam ĝis nun lernis konduki bone.

Jen la bildo de la Ĝino faranta la komencojn de la Magio kiu alportis la Ĝifon al la Kamelo. Unue li desegnis linion en la aero per sia fingro, kaj tiu fariĝis firma; kaj tiam li faris nubon, kaj tiam li faris ovon — vi povas vidi ilin je la subo de la bildo — kaj krome estis

magia kukurbo kiu ŝanĝiĝis al granda blanka flamo. Tiam la Ĝino prenis sian magian ventumilon kaj ventumis tiun flamon ĝis la flamo ŝanĝiĝis al iu Magio tute per si mem. Estis bona Magio kaj fakte tre amikeca Magio, kvankam ĝi devis doni Ĝifon al la Kamelo ĉar la Kamelo estis mallaborema. La Ĝino respondeca pri Ĉiuj Dezertoj estis la plej amika de ĉiuj Ĝinoj, do li vere neniam farus ion malamikecan.

Jen la bildo de la Ĝino respondeca pri Ĉiuj Dezertoj kondukanta la Magion per sia magia ventumilo. La Kamelo manĝas branĉon de akacio, kaj ĝi ĵus finis diri "ĝif" unu fojon tro (*la Ĝino estis dirinta ke ĝi faros*), kaj tial la Ĝifo estas alvenanta. La longa sekigtukeca afero kreskanta el la cepo-simila afero estas la Magio, kaj vi povas vidi la Ĝifon sur ĝia ŝultro. La Ĝifo akordiĝas al la plata parto de la dorso de la Kamelo. La Kamelo estas tro okupita per rigardado al sia propra memo en la flako da akvo por rimarki tion kio estas okazonta al ĝi.

Sub la vera bildo estas bildo de la Mondo-tiel-nova-kaj-freŝa. Estas du fumantaj vulkanoj en ĝi, iuj aliaj montoj kaj iuj ŝtonoj kaj lago kaj nigra insulo kaj serpentumanta rivero kaj multe da aliaj aferoj, kaj ankaŭ la Arkeo de Noa. Mi ne povis desegni ĉiujn dezertojn pri kiuj la Ĝino respondecis, do mi desegnis nur unu, sed ĝi estas tre dezerta dezerto.

## **Kiel la rinocero ekhavis sian haŭton**

Origine, iam antaŭ longe, sur neloĝata insulo ĉe la bordo de la Ruĝa Maro, vivis Parsio de kies ĉapelo la sunradioj rebrilis en pli-ol-orienta pompo. Kaj la Parsio vivis ĉe la Ruĝa Maro kun nenio krom sia ĉapelo kaj sia tranĉilo kaj kuir-forno de la tipo kiun vi precipe neniam tuŝu. Kaj en iu tago li prenis farunon kaj akvon kaj rosinojn kaj prunojn kaj sukeron kaj aferojn, kaj faris por si unu kukon kiu mezuris du futojn transe kaj tri futojn dika. Ĝi ververe estis Supera Komestiblo (*tio estas Magio*), kaj li metis ĝin sur la fornon ĉar al li estis permesate kuiri sur tiu forno, kaj li bakis ĝin kaj bakis ĝin ĝis ĝi estis tute brune bakita kaj odoris plej sentimentale. Sed ĝuste

kiam li estis manĝonta ĝin, venis sur la strandon el la Komplete Neloĝata Interno unu Rinocero kun korno sur sia nazo, du porko-okuloj, kaj malbona konduto. En tiuj tagoj la haŭto de la Rinocero sufiĉe glate akordiĝis al ĝia korpo. Ĝi ekzakte aspektis kiel Rinocero el la Arkeo de Noa, sed kompreneble multe pli granda. Tamen, ĝi ne bone kondukis tiam, kaj ĝi ne bone kondukas nun, kaj ĝi neniam bone kondukos. Ĝi diris: "Haŭ!" kaj la Parsio lasis tiun kukon kaj grimpis al la supro de palmo-arbo kun nenio vestita krom sia ĉapelo, de kiu la sunradioj rebrilis en pli-ol-orienta pompo. Kaj la Rinocero renversis la oleo-fornon per sia nazo, kaj la kuko ruliĝis en la sablon, kaj ĝi pikis tiun kukon sur la kornon de sia nazo, kaj ĝi manĝis ĝin, kaj ĝi foriris, svingante sian voston, al la forlasita kaj Ekskluzive Neloĝata Interno kiu oftas sur la insuloj Mazanderano, Sokotro, kaj la Promontoroj de la Plilarĝa Ekvinokso. Tiam la Parsio deiris de sia palmo-arbo kaj metis la fornon sur ĝiajn piedojn kaj recitis la sekvantan Slokaon, kiun mi, ĉar vi ankoraŭ ne aŭdis ĝin, nun deklamos al vi: -

*Kiu la kukojn atakas  
Kiujn la Parsio-viro bakas  
Tiu la malfeliĉon elpakas.*

*Kaj estis multe pli da signifo en tio ol vi pensus.*

Ĉar, kvin semajnojn poste, okazis varmo-ondo ĉe la Ruĝa Maro, kaj ĉiuj malvestis ĉiujn vestaĵojn kiujn ili surhavis. La Parsio formetis sian ĉapelon; sed la Rinocero demetis sian haŭton kaj portis ĝin sur la ŝultro kiam ĝi venis al la strando por baniĝi. En tiu tempo la haŭto butoniĝis malsupre per tri butonoj kaj aspektis kiel pluvmantelo. La Rinocero diris tute nenion pri la kuko de la Parsio, ĉar ĝi estis manĝinta ĝin tute; kaj ĝi neniam bone kondukis, nek tiam, nek poste, nek estonte. Ĝi vadis rekte en la akvon kaj blovis bobelojn tra sia nazo, lasinte sian haŭton sur la strando.

Okazis ke la Parsio preteriris kaj trovis la haŭton, kaj li ridis unu ridon kiu dufoje ĉirkaŭis lian vizaĝon. Tiam li dancis trifoje ĉirkaŭ la haŭto kaj frotis siajn manojn. Tiam li iris al sia kampadejo kaj plenigis sian ĉapelon per kukeroj, ĉar la Parsio manĝis neniam ion

krom kukojn, kaj neniam balais sian kampadejon. Li prenis tiun haŭton, kaj li trenis tiun haŭton, kaj li trotis tiun haŭton, kaj li frotis tiun haŭton kaj plenigis ĝin per malnovaj, malfreŝaj, sekaj, tiklaj kukeroj kaj kelkaj bruligitaj rosinoj, tiom kiom ĝi entute povis enhavi. Tiam li grimpis al la supro de sia palmo-arbo kaj atendis ĝis la Rinocero venos el la akvo kaj surmetos ĝin.

Kaj la Rinocero surmetis sian haŭton. Ĝi butonis ĝin per la tri butonoj, kaj ĉio tiklis kiel kukeroj en lito. Tiam ĝi volis grati sin, sed tio nur malbonigis la aferon; kaj tiam ĝi ekkuŝis sur la sablojn kaj ruliĝis kaj ruliĝis kaj ruliĝis, kaj ĉiufoje kiam ĝi ruliĝis la kukeroj tiklis ĝin pli kaj pli kaj pli. Tiam ĝi kuris al la palmo-arbo kaj frotis kaj frotis kaj frotis sin kontraŭ tiu. Ĝi frotis sin tiel multe kaj tiel forte ke pro la frotado ekestis granda faldo en la haŭto super la ŝultroj, kaj alia faldo malsupre, kie la butonoj antaŭe estis (*sed la butonoj estis forfrotitaj*), kaj pro la frotado ekestis pliaj faldoj sur ĝiaj kruroj. Kaj tio fuŝis ĝian humoron, sed ne faris ajnan diferencon al la kukeroj. Ili estis interne de ĝia haŭto kaj ili tiklis. Do ĝi iris hejmen, vere tre kolera kaj terure gratema; kaj ekde tiu tago ĝis la nuna ĉiu rinocero havas grandajn faldojn en sia haŭto kaj tre malbonan humoron, ĉio pro la kukeroj interne.

Sed la Parsio deiris de sia palmo-arbo, surhavante sian ĉapelon, de kiu la sunradioj rebrilis en pli-ol-orienta pompo, prenis sian kuirfornon, kaj foriris en la direkto de Orotavo, Amigdalo, la Supraj Paŝtejoj de Anantarivo, kaj la Sonaputaj Marĉoj.

Jen la bildo de la Parsio kiu komencas manĝi sian kukon sur la Neloĝata Insulo en la Ruĝa Maro en vere varmega tago; kaj de la Rinocero kiu venas el la Komplete Neloĝata Interno, kiu, kiel vi laŭvere povas vidi, estas tute roka. La haŭto de la Rinocero estas tute glata, kaj la tri butonoj per kiu oni butonas ĝin estas malsupre, do vi ne povas vidi ilin. La kirlaĵoj sur la ĉapelo de la Parsio estas la sunradioj rebrilantaj en pli-ol-orienta pompo, ĉar se mi estus desegninta verajn radiojn ili estus plenigintaj la tutan bildon. En la kuko estas rosinoj; kaj la rado-afero kiu kuŝas sur la sablo en la antaŭo apartenis al unu el la batalĉaroj de la Faraono kiam tiu provis

transiri la Ruĝan Maron. La Parsio trovis ĝin, kaj konservis ĝin por ludi. La nomo de la Parsio estis Pestalĝi' Pugalĝi', kaj la Rinocero nomiĝis Strorkso, ĉar ĝi spiris tra sia buŝo anstataŭ tra sia nazo. Mi ne demandus ion pri la kuir-forno, se mi estus vi.

Jen la Parsio Pestalĝi' Pugalĝi' sidanta en sia palmo-arbo kaj rigardanta la Rinoceron Strorkso kiu baniĝas apud la strando de la Komplete Neloĝata Insulo post kiam Strorkso estis forpreninta sian haŭton. La Parsio jam frotis la kukerojn en la haŭton, kaj li ridas pensante pri kiel ili tiklos Strorkson kiam Strorkso denove surmetos ĝin. La haŭto estas tuj sub la rokoj sub la palmo-arbo en malplivarma loko; tial vi ne povas vidi ĝin. La Parsio surhavas novan pli-ol-oriente-pompan ĉapelon de la speco kiun Parsioj surhavas; kaj li havas tranĉilon en sia mano por tranĉi sian nomon en palmo-arbojn. La nigraj aferoj sur la insuloj en la maro estas pecoj de ŝipoj kiuj pereis ŝipante laŭ la Ruĝa Maro; sed ĉiuj pasaĝeroj estis savitaj kaj iris hejmen.

La nigra afero en la akvo proksime de la bordo tute ne estas pereinta ŝipo. Tio estas Strorkso la Rinocero baniĝanta sen sia haŭto. Strorkso estis sub sia haŭto same nigra kiel ekstere. Mi ne demandus ion pri la kuir-forno, se mi estus vi.

## **Kiel la unua letero estis skribata**

Oni ne scias antaŭ kiom longe — en tre frua tempo estis Neolitika viro. Li ne estis Juto aŭ Anglo, aŭ eĉ Dravido, kio li bone estus povinta esti, Plej Amata, sed ne zorgu kial. Li estis Primitivulo, kaj li loĝis kavece en Kavoj, kaj li surhavis tre malmulte da vestaĵoj, kaj li ne povis legi kaj li ne povis skribi kaj li eĉ ne volis ion tian, kaj escepte kiam li estis malsata li estis sufiĉe feliĉa. Lia nomo estis Tegumaj Bopsulaj, kaj tio signifas: "Viro-kiu-ne-metas-sian-piedon-antaŭen-tro-rapide"; sed ni, ho Plej Amata, nomos lin Tegumo, mallonge do. Kaj la nomo de lia edzino estis Teŝumaj Tevindraŭ, kaj tio signifas: "Sinjorino-kiu-demandas-tre-multajn-demandojn"; sed ni, ho Plej Amata, nomos ŝin Teŝuma, mallonge do. Kaj la nomo de lia malgranda knabino-filino estis Tafimaj Metalumaj, kaj tio signifas:



"Malgranda-persono-sen-bonaj-manieroj-kiu-devus-esti-frapata"; sed mi nomos ŝin Tafinjo. Kaj ŝi estis la Plej Amata de Tegumaj Bopsulaj kaj la Plej Amata de sia propra Panjo, kaj ŝi ne estis frapata eĉ duonon da fojoj kiom estus bone por ŝi; kaj ili ĉiuj tri estis tre feliĉaj. Kiam nur Tafinjo povis kuri ĉirkaŭe, ŝi iris ĉien kun sia Paĉjo Tegumo, kaj foje ili ne venis hejmen al la Kavoj ĝis ili estis tre malsataj, kaj tiam Teŝumaj Tevindraŭ kutime diris: "Kie en la mondo vi du estis, ke vi fariĝis tiel ŝoke malpuraj? Vere, Tegumo mia, vi ne estas pli bona ol mia Tafinjo."

Nun atentu kaj aŭskultu!

En iu tago Tegumaj Bopsulaj foriris tra la kastoro-marĉo al la rivero Vagajo por sage kapti karpofiŝojn por vespermanĝo, kaj ankaŭ Tafinjo iris kun li. La sago de Tegumo estis farita el ligno kun ŝarko-dento je la fino, kaj antaŭ ol li kaptis iujn ajn fiŝojn, li rompintis ĝin tute, frapante ĝin tro forte al la fundo de la rivero. Ili estis multajn mejlojn fore de la hejmo (*komprenoble ili kunhavis lunĉon en malgranda sako*), kaj Tegumo estis forgesinta kunpreni rezervajn sagojn.

"Jen tre fiŝodora afero!" diris Tegumo. "Mi bezonos duonon de la tago por ripari ĝin."

"Estas hejme via granda nigra sago," diris Tafinjo. "Mi rekuru al la Kavoj kaj petu Panjon por doni ĝin al mi."

"Estas tro malproksime por viaj malgrandaj grasaj kruretoj," diris Tegumo. "Cetere, vi puvus fali en la kastoro-marĉon kaj droni. Ni devos fari plej bonan el malbono." Li eksidis kaj elprenis malgrandan ledan riparo-saketon, plenan de rangifero-tendenoj kaj strioj da ledo, kaj buletoj da abelo-vakso kaj rezino, kaj komencis ripari la sagon. Tafinjo eksidis ankaŭ, kun siaj piedfingroj en la akvo kaj sia mentono en la mano, kaj pensadis tre forte. Tiam ŝi diris: -

"Mi diru, Paĉjo, estas terura ĝeno ke vi kaj mi ne scias skribi, ĉu ne? Se ni kapablas ni povus sendi mesaĝon por ekhavi la novan sagon."

"Tafinjo," diris Tegumo, "kiom ofte mi diris al vi ne uzi slangon? "Terure" ne estas plaĉa vorto, — sed ja estus tre utile, nun kiam vi diras, se ni povus skribi hejmen."

Ĝuste tiam iu Fremdulo-viro venis laŭlonge de la rivero, sed li apartenis al malproksima tribo, la Tevaroj, kaj li ne komprenis eĉ vorton de la lingvo de Tegumo. Li staris sur la bordo kaj ridetis al Tafinjo, ĉar li havis sian propran knabino-filino hejme. Tegumo eliris fasketon da rangifero-tendenoj el sia riparo-saketo kaj komencis ripari sian sagon.

"Venu ĉi tien," diris Tafinjo. "Ĉu vi scias kie mia Panjo loĝas?" Kaj la Fremdulo-viro diris "Um!" — estante, kiel vi scias, Tevaro.

"Stulte!" diris Tafinjo, kaj ŝi stamfis per sia piedo, ĉar ŝi vidis aron da tre grandaj karpoj suprennaĝantaj la riveron ĝuste nun kiam ŝia Paĉjo ne povis uzi sian sagon.

"Ne ĝenu al plenkreskuloj," diris Tegumo, tiel okupata de sia sago-riparado ke li eĉ ne turnis sin.

"Mi nek ĝenas," diris Tafinjo. "Mi nur volas ke li faru kion mi volas ke li faru, kaj li ne komprenas."

"Do ne ĝenu min," diris Tegumo, kaj li daŭrigis tiradon kaj streĉadon de rangifero-tendenoj kun sia buŝo plena de pecetoj. La Fremdulo-viro — vera Tevaro li estis — eksidis sur la herbo, kaj Tafinjo montris al li kion faras ŝia Paĉjo. La Fremdulo-viro pensis: "Ĉi tio estas mirakla infano. Ŝi stamfas per sia piedo antaŭ mi kaj ŝi faras grimacojn. Ŝi devas esti la filino de tiu nobla Tribestro kiu estas tiel eminenta ke li ne volas rimarki min." Do li ridetis ankoraŭ pli ĝentile.

"Nu," diris Tafinjo, "mi volas ke vi iru al mia Panjo, ĉar viaj kruroj estas pli longaj ol miaj, kaj vi ne falos en la kastoro-marĉon, kaj demandu pri la alia sago de Paĉjo — tiu kun la nigra tenilo kiu pendas super nia fajrejo."

La Fremdulo-viro (*kaj li estis ja Tevaro*) pensis: "Ĉi tio estas tre, tre mirakla infano. Ŝi svingas siajn brakojn kaj ŝi krias al mi, sed mi komprenas neniun vorton de tio kion ŝi diras. Sed se mi ne faros kion ŝi volas, mi forte timas ke tiu memfiera Tribestro, Viro-kiu-turnas-sian-dorson-al-vizitantoj, estos kolera." Li ekstaris kaj deŝiris grandan platan pecon da ŝelo de betulo-arbo kaj donis ĝin al Tافinjo. Li faris tion, Plej Amata, por montri ke lia koro estas tiel blanka kiel betula ŝelo kaj ke li intencas nenion malbonan; sed Tافinjo ne tute komprenis.

"Ho!" ŝi diris. "Mi komprenas! Vi volas la loĝ-adreson de mia Panjo? Kompreneble mi ne povas skribi, sed mi povos desegni bildojn se mi havos ion akran por grati. Bonvolu prunti al mi la ŝarkodenton de via kolĉeno."

La Fremdulo-viro (*kaj li estis ja Tevaro*) ne diris ion ajn, do Tافinjo levis sian maneton kaj tiris je la belega bido-kaj-semo-kaj-ŝarkodenta kolĉeno ĉirkaŭ lia kolo.

La Fremdulo-viro (*kaj li estis ja Tevaro*) pensis: "Ĉi tio estas tre, tre, tre mirakla infano. La ŝarkodento sur mia kolĉeno estas magia ŝarkodento, kaj oni ĉiam diris ke se iu tuŝas ĝin sen mia permeso tiu senprokraste ŝvelos kaj eksplodos. Sed ĉi tiu infano ne ŝvelas kaj eksplodas, kaj tiu eminenta Tribestro, Viro-kiu-atentas-ekskluzive-siajn-proprajn-aferojn, kiu tute ne atentis min ĝis nun, ŝajne ne timas ke ŝi ŝvelos aŭ eksplodos. Mi prefere estu pli ĝentila."

Do li donis al Tافinjo la ŝarkodenton, kaj ŝi ekkuŝis plate sur la ventro kun la kruroj en la aero, kiel iuj homoj kuŝas sur la planko en la loĝoĉambro kiam ili volas desegni bildojn, kaj ŝi diris: "Nun mi desegnos kelkajn belegajn bildojn por vi! Vi povas rigardi trans mia ŝultro, sed ne puŝu kontraŭ mi. Unue mi desegnos mian Paĉjon fiŝanta. Ne tre similas al li; sed Panjo scios, ĉar mi desegnis lian sagon rompita. Nu, nun mi desegnos la alian sagon kiun li volas havi, la sagon kun nigra tenilo. Aspektas kvazaŭ ĝi pikas en la dorson de Paĉjo, sed tio estas ĉar la ŝarkodento glitis kaj ĉi tiu peco da ŝelo ne estas sufiĉe granda. Tio estas la sago kiun mi volas ke vi alportu; do mi desegnos bildon de mi mem 'splikanta tion al vi. Miaj

haroj ne tiel elstaras kiel mi desegnis ilin, sed estas pli facile desegni tiel. Nun mi desegnos vin. Mi pensas ke vi estas tre plaĉa, vere, sed mi ne povas desegni vin plaĉa en la bildo, do ne estu 'fendita. Ĉu vi estas 'fendita?"

La Fremdulo-viro (*kaj li estis ja Tevaro*) ridetis. Li pensis: "Ŝajnas ke granda batalo estas okazonta iuloke, kaj ĉi tiu eksterordinara infano, kiu prenas mian magian ŝarkodenton sed ne ŝvelas aŭ eksplodas, diras al mi ke mi alportu la tutan tribon de la eminenta Tribestro. Li estas eminenta Tribestro, aliokaze li estus rimarkinta min."

"Vidu," diris Tafinjo, desegnante tre forte kaj sufiĉe skrape, "nun mi desegnis vin, kaj mi metis la sagon kiun Paĉjo volas havi en vian manon, nur por memori ke vi alportu ĝin. Nun mi montros al vi kiel atingi la loĝ-adreson de Panjo. Vi iru ĝis vi alvenos ĉe du arboj (*jen la arboj*), kaj tiam vi transiros monteton (*jen monteto*), kaj tiam vi venos al kastoro-marĉo plena de kastoroj. Mi ne enmetis la tutajn kastorojn, ĉar mi ne povas desegni kastorojn, sed mi desegnis iliajn kapojn, kaj pli de ili vi ne vidos kiam vi trairos la marĉon. Atentu ke vi ne enfalos! Kaj tiam nia Kavvo estas tuj malantaŭ la kastoro-marĉo. Ĝi ne estas tiel alta kiel la montetoj, fakte, sed mi ne povas desegni aferojn tre malgrande. Tio estas mia Panjo ekster la Kavvo. Ŝi estas belega. Ŝi estas la plej plejbelega Panjo kiu iam ajn estis, sed ŝi ne estos 'fendita kiam ŝi vidos ke mi desegnis ŝin tiel krude. Ŝi estos kontenta de mi ĉar mi scias desegni. Nu, por la kazo ke vi forgesus, mi desegnis la sagon kiun Paĉjo volas ekster nia Kavvo. Ĝi fakte estas interne, sed vi montru la bildon al mia Panjo kaj ŝi donos ĝin al vi. Mi desegnis ŝin kun levitaj brakoj, ĉar mi scias ke ŝi estos tre kontenta vidi vin. Ĉu ne belega bildo? Kaj ĉu vi bone komprenas, aŭ ĉu mi 'spliku denove?"

La Fremdulo-viro (*kaj li estis ja Tevaro*) rigardis al la bildo kaj tre forte kapjesis. Li diris al si mem: "Se mi ne alportos la tribon de ĉi tiu eminenta Tribestro por helpi lin, li estos mortigita de siaj malamikoj kiuj venas de ĉiuj flankoj kun sagoj. Nun mi komprenas kial la eminenta Tribestro ŝajngis ne rimarki min! Li timis ke liaj

malamikoj kaŝiĝas en la arbustoj kaj vidus ke li donas mesaĝon al mi. Tial li turnis sian dorson al mi, kaj lasis la saĝan kaj miraklan infanon desegni la teruran bildon montrantan liajn malfacilaĵojn. Mi iros kaj alportos helpon de lia tribo." Li eĉ ne demandis Tافinjon pri la vojo, sed forrapidis en la arbustojn kiel la vento, kun la betuloŝelo en sia mano, kaj Tافinjo eksidis plej kontenta.

Kaj jen la bildo kiun Tافinjo desegnis por li!

"Kion vi estis faranta, Tافinjo?" diris Tegumo. Li estis riparinta sian sagon kaj singarde svingis ĝin tien kaj reen.

"Estas iu priaranĝo de mia flanko, kara Paĉjo," diris Tافinjo. "Se vi ne faros demandojn al mi, vi ekscios pri ĝi post mallonga tempo, kaj vi surpriziĝos. Vi ne scias kiel multe vi surpriziĝos, Paĉjo! Promesu ke vi surpriziĝos."

"Tre bone," diris Tegumo, kaj daŭrigis fiŝkaptadon.

La Fremdulo-viro — ĉu vi sciis ke li estis Tevaro? — forrapidis kun la bildo kaj kuris kelkajn mejlojn, ĝis tute hazarde li trovis Teŝumaj Tevindraŭ sidantan ĉe la pordo de sia Kavoj, parolantan al kelkaj aliaj Neolitikaj sinjorinoj kiuj estis alvenintaj por Primitiva lunĉo. Tافinjo tre similis al Teŝuma, precipe pri la supra parto de la vizaĝo kaj la okuloj, do la Fremdulo-viro — daŭre pura Tevaro — ridetis ĝentile kaj transdonis al Teŝuma la betuloŝelon. Li estis kurinta rapide, kaj tial li anhelis, kaj liaj kruroj estis gratitaj pro rubusoj, sed li tamen provis esti ĝentila.

Tuj kiam Teŝuma vidis la bildon ŝi ekkriĉis kiel io kaj saltis kontraŭ la Fremdulo-viron. La aliaj Neolitikaj sinjorinoj subite frapis lin sur teron kaj eksidis sur lin en longa vico sesope, dum Teŝuma tiris liajn harojn. "La konkludo elstaras kiel la nazo sur la vizaĝo de ĉi tiu Fremdulo-viro," ŝi diris. "Li plenpikis mian Tegumon per sagoj, kaj timigis povran Tافinjon tiel ke ŝiaj haroj ekstaris; kaj ne kontenta pri nur tio, li alportas al mi korŝiran bildon pri tio kiel estis farite. Vidu!" Ŝi montris la bildon al ĉiuj tiuj Neolitikaj sinjorinoj kiuj trankvile sidis sur la Fremdulo-viro. "Jen mia Tegumo kun rompita brako; jen sago

pikas lian dorson; jen viro kun sago preta por ĵeti; jen alia viro ĵetanta sagon el Kavono, kaj jen tuta aro da homoj" (*tio estis la kastoroj kiujn desegnis Tafinjo, fakte, sed ili pli similis al homoj*) "venantaj malantaŭ Tegumo. Ĉu ne ŝoke!"

"Treege ŝoke!" diris la Neolitikaj sinjorinoj, kaj ili plenigis la harojn de la Fremdulo-viro per koto (*kio surprizis lin*), kaj ili batis la Reeĥajn Tribajn Tamburojn, kaj kunvokis ĉiujn Estrojn de la Tribo de Tegumo, kun iliaj Hetmanoj kaj Dolmanoj, ĉiujn Negusojn, Vunojn kaj Aĥundojn de la organizaĵo, aldone al la Varlokoj, Angekokoĵoj, Jujuviroj, Bonzoj, kaj la resto, kiuj decidis ke antaŭ ol ili forhakos la kapon de la Fremdulo-viro, li senprokraste konduku ilin al la rivero kaj montru kie li kaŝis la povran Tafinjon.

Iom post iom la Fremdulo-viro (*kvankam li estis Tevaro*) fariĝis vere ĝenita. Ili estis plenigintaj liajn harojn sufiĉe dense per koto; ili estis rulintaj lin supren kaj malsupren sur akraj ŝtonetoj; ili estis sidintaj sur li en longa vico sesope; ili estis frape tuŝintaj kaj bate puŝintaj lin ĝis li apenaŭ povis spiri; kaj kvankam li ne komprenis ilian lingvon, li estis preskaŭ certa ke la nomoj kiujn la Neolitikaj sinjorinoj donis al li ne estis tre sinjorinecaj. Tamen, li nenion diris ĝis la tuta Tribo de Tegumo estis kolektiĝinta, kaj tiam li kondukis ilin al la bordo de rivero Vagajo, kaj tie ili trovis Tafinjon kiu faris lekanteto-ĉenojn, kaj Tegumon kiu zorge sagis malgrandajn karpojn per sia riparita sago.

"Nu, vi ja estis rapida!" diris Tafinjo. "Sed kial vi kunportis tiom multe da homoj? Kara Paĉjo, jen mia surprizo. Ĉu vi surpriziĝis, Paĉjo?"

"Tre," diris Tegumo; "sed tio fuŝis mian fiŝadon por la tuta tago. Kial la tuta kara, afabla, plaĉa, pura, trankvila Tribo estas ĉi tie, Tafinjo?"

Kaj ili ja estis. Unuaj promenis Teŝumaj Tevindraŭ kaj la Neolitikaj sinjorinoj, firme tenantaj la Fremdulo-viron, kies haroj estis plenaj de koto (*kvankam li estis Tevaro*). Post ili venis la Ĉefa Estro, la Vica Estro, la Deputitaj kaj Asistaj Estroj (*ĉiuj armitaj ĝis la supraj dentoj*),

la Hetmanoj kaj Centestroj, Rotestroj kun siaj Rotoj, kaj Dolmanoj kun siaj Taĉmentoj; Vunoj, Negusoj, kaj Aĥundoj iom pli malantaŭe (*ankaŭ ili armitaj ĝis la dentoj*). Post ili la Tribo en hierarĥia ordo, ekde posedantoj de kvar kavoj (*po unu por ĉiu sezono*), privata rangifero-stalo, kaj du salmo-saltejoj, ĝis feŭdaj kaj prognataj Komunuloj, semi-rajtantaj je duona ursofelo por vintraj noktoj, sep jardojn for de la fajro, kaj asignitaj servutuloj, rajtantaj je transproprietigo de skrapita medol-osto subherede (*Ĉu ĉio tio ne estas belegaj vortoj, Plej Amata?*). Ili ĉiuj estis tie, saltantaj kaj vokantaj, kaj ili timigis ĉiujn fiŝojn je dudekmejla distanco, kaj Tegumo dankis ilin per flua Neolitika oratoraĵo.

Tiam Teŝumaj Tevindraŭ alkuris kaj kisis kaj ĉirkaŭbrakis Tafinjon vere tre multe; sed la Ĉefa Estro de la Tribo de Tegumo ekkaptis Tegumon ĉe la verto-volvaĵaj plumoj kaj skuis lin severe.

"Ekspliku! Ekspliku! Ekspliku!" kriis la tuta Tribo de Tegumo.

"Je la bona ĉielo!" diris Tegumo. "Lasu mian verto-volvaĵon! Ĉu iu ne povas rompi sian karmo-sagon sen ke la tuta kamparanaro ĵetas sin al li? Vi estas tre enmiksigema popolo."

"Mi ne kredas ke vi fakte alportis la nigratenilan sagon de mia Paĉjo," diris Tafinjo. "Kaj kion vi faras al mia kara Fremdulo-viro?"

Ili estis batpuŝantaj lin duope kaj trioje kaj dekoje ĝis liaj okuloj turniĝis kaj turniĝis. Li povis nur spasme spiri kaj montri al Tafinjo.

"Kie estas la malbonaj homoj kiuj pikis vin per sagoj, mia kara?" diris Teŝumaj Tevindraŭ.

"Ne estis ajn," diris Tegumo. "Mia sola vizitanto ĉi-matene estis la povra homo kiun vi klopodas sufokigi. Ĉu vi ĉiuj malbone sentas, aŭ ĉu vi estas malsanaj, ho Tribo de Tegumo?"

"Li alvenis kun terura bildo," diris la Ĉefa Estro, — "bildo kiu montris ke vi estas plena de sagoj."

"E... um... — Eble mi p'fere 'spliku ke mi donis al li tiun bildon," diris Tafinjo, sed ŝi ne sentis sin tre komforte.

"Vi!" diris la Tribo de Tegumo ĉiuj kune. "Malgranda-persono-sen-bonaj-manieroj-kiu-devus-esti-frapata! Ĉu vi?"

"Tafinjo kara, mi timas ke ekestos iom da problemoj," diris ŝia Paĉjo, kaj li metis sian brakon ĉirkaŭ ŝin, por ke ŝi ne zorgu.

"Ekspliku! Ekspliku! Ekspliku!" diris la Ĉefa Estro de la Tribo de Tegumo, kaj li saltetis sur unu piedo.

"Mi volis ke la Fremdulo-viro alportu la sagon de Paĉjo, do mi dezegnis ĝin," diris Tafinjo. "Ne estis aro da sagoj. Estis nur unu sago. Mi dezegnis ĝin trifoje por esti certa. Mi ne povas helpi ke aspektis kvazaŭ ĝi trafis la kapon de Paĉjo — ne estis sufiĉe da loko sur la betulo-ŝelo; kaj tiuj aferoj kiujn Panjo nomas malbonaj homoj mi celis kastoroj. Mi dezegnis ilin por montri al li la vojon tra la marĉo; kaj mi dezegnis Panjon ĉe la buŝo de la Kavoj kun ĝoja aspekto ĉar li estas kara Fremdulo-viro, kaj mi pensas ke vi ĉiuj estas la plej plejstulta popolo en la mondo," diris Tafinjo. "Li estas tre plaĉa viro. Kial vi plenigis liajn harojn per koto? Lavu lin!"

Neniu diris ion ajn dum longa tempo, ĝis la Ĉefa Estro ekridis; tiam la Fremdulo-viro (*kiu almenaŭ estis Tevaro*) ekridis; tiam Tegumo ekridis ĝis li falis dorse sternite sur la bordon; tiam la tuta Tribo ekridis pli multe kaj pli fuŝe kaj pli laŭte. La solaj homoj kiuj ne ridis estis Teŝumaj Tevindraŭ kaj ĉiuj Neolitikaj sinjorinoj. Ili estis tre ĝentilaj al ĉiuj siaj edzoj, kaj diris "idioto!" sufiĉe ofte.

Tiam la Ĉefa Estro de la Tribo de Tegumo kriis kaj diris kaj kantis: "Ho, Malgranda-persono-sen-bonaj-manieroj-kiu-devus-esti-frapata, vi trafis grandiozan inventon!"

"Mi ne planis; mi nur volis la sagon kun nigra tenilo de Paĉjo," diris Tafinjo.



"Sed tamen. Ĝi estas grandioza invento, kaj iam estonte la homoj nomos ĝin skribado. Nun temas ankoraŭ nur pri bildoj, kaj, kiel ni vidis hodiaŭ, bildoj ne estas ĉiam ĝuste komprenataj. Sed venos tempo, ho Bebo de Tegumo, kiam ni faros literojn — ĉiujn dudek ses aŭ dudek ok aŭ kiom do — kaj tiam ni kapablos kaj legi kaj skribi, kaj tiam ni ĉiam diros precize kion ni celas sen ajnaj eraroj. Nun la Neolitikaj sinjorinoj ellavu la koton el la haroj de la fremdulo!"

"Mi ĝojos pri tio," diris Tafinjo, "ĉar, finfine, kvankam vi alportis ĉiun unuopan alian sagon de la Tribo de Tegumo, vi forgesis la nigratenilan de mia Paĉjo."

Tiam la Ĉefa Estro kriis kaj diris kaj kantis: "Tafinjo kara, sekvontfoje kiam vi skribos bildo-leteron, vi prefere sendu kun ĝi homon kiu povas paroli nian lingvon, por klarigi pri kio temas. Al mi mem ne gravas, ĉar mi estas Ĉefa Estro, sed estas tre malbone por la resto de la Tribo de Tegumo, kaj, kiel vi vidas, estas surprizo por la fremdulo."

Tiam ili adoptis la Fremdulo-viron (*vera Tevaro el Tevarujo*) kiel membron de la Tribo de Tegumo, ĉar li estis ĝentilhomo kaj ne faris problemojn pri la koto kiun la Neolitikaj sinjorinoj estis metintaj en liajn harojn. Sed de tiu tago ĝis la nuna (*kaj mi supozas ke pri tio kulpas Tafinjo*), tre malmulte da malgrandaj knabinoj iam ŝatis lerni legadon kaj skribadon. Plej multaj preferas desegni bildojn kaj ludi kun siaj Paĉjoj — precize kiel Tafinjo.

Tio ĉi estas la historio de Tafimaj Metalumaj ĉizita sur malnova dentego antaŭ tre longa tempo fare de la Antikvaj Popoloj. Se vi legas mian rakonton, aŭ laŭtleligas ĝin, vi povas vidi kiel ĉio estas rakontata sur la dentego. La dentego estis parto de malnova triba trumpeto kiu apartenis al la Tribo de Tegumo. La bildojn oni gratis en ĝi per najlo aŭ io alia, kaj tiam la gratojn oni plenigis per nigra vakso, sed ĉiujn dividajn liniojn kaj la kvin malgrandajn rondetojn malsupre oni plenigis per ruĝa vakso. Kiam ĝi estis nova, estis iuspeca retaĵo de bidoj kaj konkoj kaj valoraj ŝtonoj je la fino; sed tio rompiĝis kaj perdiĝis — ĉio krom la malgranda iometo kiun vi vidas. La literoj ĉirkaŭ la dentego estas magio — Runa magio, — kaj se vi

povas legi ilin vi eltrovos ion iom novan. La dentego estas ebura — tre flava kaj defrotiĝinta. Ĝi mezuras du futojn laŭlonge kaj du futojn ĉirkaŭe, kaj pezas dek unu funtojn kaj naŭ uncojn.

# LA BRANDOBARELETO

Guy de Maŭpassant

*Al Adolphe Tavernier*

Mastro Ĉicot, la gastejestro de Epreville, haltigis sian duradan veturilon antaŭ la farmobieno de patrino Magloire. Li estis alta, kvardekjara fortikulo, ruĝa kaj dikventra, kaj konata kiel maliculo.

Li alligis sian ĉevalon al la fosto de l' barilo kaj eniris en la korton. Li posedis bienon tuj apud la teroj de l' maljunulino, kaj tiujn li deziregis jam de longa tempo. Dudekfoje li ja provis ilin aĉeti sed patrino Magloire rifuzis kun obstino.

– Kie mi naskiĝis, tie mi mortos, ŝi diris.

Li trovis ŝin antaŭ ŝia pordo, senŝeligantan la terpomojn. Aĝa je sepdek du jaroj, ŝi estis seka, sulketita kaj kurbigita sed tiel senlaca kiel junulino. Ĉicot frapetis ŝian dorson kaj eksidis apud ŝi sur portebla ŝtupetaro.

– Nu, patrino, kaj tiu sano, ĉu ĝi estas daŭre bona?

– Ne tro malbona, kaj la via, mastro Prosper?

– Kun kelkaj doloroj, alie estus laŭdezire.

– Nu, ĝojige!

Kaj ŝi plu diris nenion. Ĉicot rigardis ŝin plenumi sian laboron. Ŝiaj hokformaj nodaj fingroj same malmolaj kiel krabaj piedoj kaptis kvazaŭ pinĉiloj la grizetajn tuberojn en korbego kaj ŝi rapide turnis ilin, forprenante longajn ŝelpecojn sub la klingo de malnova tranĉilo, kiun ŝi tenis per la alia mano. Kaj kiam la terpomo montriĝis fine tute flava, ŝi faligis ĝin en sitelon kun akvo. Tri aŭdacaj kokinoj venis unu

post la alia ĝis en ŝiaj juĵoj por forpreni la ŝelojn kaj ili forkuris rapidege, portante per la beko sian akiraĵon.

Ĉicot aspektis ĝenita, hezitanta, zorgoplena, kun io sur la lango, kio ne volis eliri. Finfine li decidiĝis:

– Diru nun, patrino Magloire...

– Kion vi volas?

– Tiun bienon, ĉu vi do vere ne volas ĝin vendi al mi?

– Ho, certe ne! Ne kalkulu je tio. Estas dirite, estas dirite; ne plu parolu pri tio.

– Sed mi trovis aranĝon, kiu estus por ni ambaŭ avantaĝa.

– Kio estas?

– Jen, kio estas. Vi ĝin vendas al mi kaj vi ĝin tamen konservas. Vi eble ne komprenas sed aŭskultu; jen mia ideo.

La maljunulino ĉesis senŝeligi siajn legomojn kaj fiksitis sur la gastejestro siajn okulojn vivoplenajn kaj brilantajn inter sulketitaj palpebroj.

Li daŭrigis:

– Mi klarigu. Mi donos al vi ĉiumonate cent kvindek frankojn. Ĉu vi bone aŭdas? Ĉiumonate mi alportos al vi ĉi tien per mia durada veturilo tridek ormonerojn de kvin frankojn. Kaj nenio alia estos ŝanĝita, nenio, nenio; vi restos en via bieno, vi ne okupiĝos pri mi, vi ŝuldos al mi nenion. Vi nur bezonos preni mian monon. Ĉu estas al vi konvene?

Li rigardis ŝin kun ĝoja mieno, kun mieno bonhumora.

La maljunulino lin observis malfide, serĉante la kaptilon. Ŝi demandis:

– Tio estas por mi; sed vi, tiun ĉi bienon, vi ĝin tiel ne akiras?

Li kompletigis:

– Ne faru al vi zorgojn pri tio. Vi restos surtere tiel longe kiel la bona Dio vin lasos vivi. Vi restos hejme. Sed vi faru por mi skribaĵeton ĉe la notario, por ke post via morto la bieno fariĝu mia. Vi ne havas infanojn, nur nevojn, kiujn vi apenaŭ ŝatas. Ĉu estas al vi konvene? Vi konservos vian bienon dum la tuta daŭro de via vivo kaj mi donos al vi tridek ormonerojn de kvin frankoj ĉiumonate. La tuto estos pura gajno por vi.

La maljunulino restis surprizita, maltrankvila sed allogita. Ŝi respondis:

– Mi ne diras ne. Sed mi volas fari al mi racian opinion pri tio. Revenu por diskuti pri la afero kiam ajn en la venonta semajno. Mi faros al vi respondon laŭ mia ideo.

Kaj mastro Ĉicot foriris tiel kontenta kiel reĝo, kiu ĵus konkeris imperion.

Patrino Magloire restis enpena. Ŝi ne dormis en la posta nokto. Dum kvar tagoj ŝi havis febron pro hezitado. Ŝi ja flaris ion malbonan por si en tio, sed la penso pri la tridek ĉiumonataj ormoneroj, pri tiu bela mono sonanta, kiu alfluus en ŝian antaŭtukon, kiu falus tiel al ŝi sen ia ajn laborkompenso, konsumis ŝin pro dezirego.

Tiam ŝi iris al la notario kaj rakontis al li sian aferon. Li konsilis, ke ŝi akceptu la proponon de Ĉicot. Sed ŝi petu kvindek ormonerojn anstataŭ tridek, ĉar la bieno valoras almenaŭ sesdek mil frankojn.

– Se vi vivos ankoraŭ dek kvin jarojn, li ja pagos tiamaniere nur kvardek kvin mil frankojn.

La maljunulino ekstremegis je tiu perspektivo pri kvindek centsoldaj ormoneroj ĉiumonate; sed ŝi ankoraŭ malfidis, timante milon da neantaŭviditaj aferoj, kaŝitaj ruzajoj, kaj ŝi restis ĝis la vespero,

farante demandojn, povante nek decidi nek foriri. Fine ŝi ordonis, ke oni preparu la akton kaj ŝi reiris hejmen, senkonscieta, kvazaŭ trinkinte kvar potojn da nova cidro.

Kiam Ĉicot venis por ekscii la respondon, ŝi lasis lin longe petadi, deklarante ke ŝi ne volas, tamen rodata de l' timo ke li ne konsentos doni la kvindek centsoldajn ormonerojn. Sed fine ĉe lia insistado ŝi eldiris siajn pretendojn.

Li faris eksalton de elreviĝo kaj rifuzis.

Tiam, por konvinki lin, ŝi komencis rezoni pri la probabla daŭro de sia vivo.

– Mi certe ne povas esperi je pli ol kvin aŭ ses jaroj. Jen, mi havas nun sepdek tri kaj krom tio ne estas vigla. Iun vesperon antaŭ nelonge mi kredis ke mi estas ĉe la fino. Ŝajnis al mi ke oni malplenigas mian korpon. Oni eĉ devis porti min al la lito.

Sed Ĉicot ne lasis sin trompi.

– Ho ne vi, ruzulino, vi estas same fortika kiel la preĝeja sonorilturo. Vi certe vivos almenaŭ cent dek jarojn. Nepre estos vi, kiu min enterigos.

La tuta tago ankoraŭ perdiĝis per diskutoj. Sed ĉar la maljunulino ne cedis, la gastejestro finfine konsentis pagi la kvindek ormonerojn.

Ili subskribis la akton en la posta tago. Kaj patrino Magloire postulis kvindek frankojn kiel ekstran porkon-traktan monon.

Tri jaroj forpasis. La grizulino same bonfartis kiel karpeno. Ŝi aspektis eĉ ne unu tagon pli maljuna kaj Ĉicot malesperadis. Ŝajnis al li, ke li pagas tiun monon jam de duona jarcento, ke li estas trompita, priŝtelita, ruinigita. Li iris de tempo al tempo por viziti la bienulinon, same kiel oni iras en julio al la kampoj por vidi ĉu la grenoj estas sufiĉe maturaj por la falĉilo. Ŝi akceptis lin kun malica

rigardo. Oni povus kredi, ke ŝi gratulas sin pro la bona ŝerco, kiun ŝi faris al li; kaj li resupreniris rapide en sian veturilon murmurante:

– Ĉu vi do ne krevos, skeletaĉo!

Li ne sciis kion fari. Li volus strangoli ŝin, kiam li ŝin vidis. Li malamis ŝin je sovaĝa, hipokritula malamo de priŝtelita kamparano. Tiam li serĉis rimedojn.

Iun tagon fine li revenis por vidi ŝin, frotante siajn manojn kiel li faris la unuan fojon, kiam li proponis al ŝi la aferon.

Kaj parolinte kelkajn minutojn:

– Diru do, patrino, kial vi ne venas al mi por manĝi, kiam vi pasas tra Epreville? Oni klaĉadas pri tio; nun oni diras, ke ni ne plu estas amikoj kaj tio funebre ĉagrenas min. Kaj vi scias, ĉe mi vi neniom devos pagi. Mi ne estos avara je unu plia manĝo. Tiom da fojoj, kiom via koro deziros, venu senretene, tio plezurigos min.

Patrino Magloire ne atendis ripeton de la propono kaj la postmorgaŭan tagon, veturinte al la foiro per sia kabrioleteto kondukita de ŝia servisto Célestin, ŝi metis senĝene sian ĉevalon en la stalon de mastro Ĉicot kaj petis la promesitan manĝon.

La radianta gastejestro traktis ŝin kiel sinjorinon, servis al ŝi kokidaĵon, kolbason, tripaĵon, femuraĵon kaj lardon kun brasiko. Sed ŝi manĝis preskaŭ nenion, sopra jam de l' infanaĝo, ĉiam kontentiĝinta per iom da supo kaj krustaĵo buterpana.

Ĉicot insistis, montrante bedaŭron. Ŝi ankaŭ ne trinkis. Ŝi rifuzis kafon.

Li demandis:

– Vi tamen akceptos glaseton da brando.

– Ha, tion jes! Mi ne diras ne. Kaj li kriis plenpulme tra la gastejo:

– Rozalio, alportu la dolĉan, la bongustegan, la super-superegan!

Kaj la servistino aperis, tenante longan botelon ornamitan de papera vinberfolio.

Li plenigis du malgrandajn glasojn.

– Gustumu ĝin, patrino, bonega ĝi estas.

Kaj la kamparanino eltrinkis tre malrapide, per malgrandaj glutoj, por ke daŭru la plezuro.

Post kiam ŝi malplenigis sian glason ĝis la lasta guto, ŝi deklaris:

– Ha jes, tio estas vere bongustega.

Si ne estis finparolinta, kiam Ĉicot verŝis al ŝi duan glason. Si volis rifuzi sed estis tro malfrue, kaj ŝi longe ĝin gustumis same kiel la unuan.

Li tiam volis ke ŝi akceptu trian verŝon, sed ŝi kontraŭstaris. Li insistis:

– Tio estas ja lakto, vidu: mi trinkas dek, dek du glasojn, sen embaraso. Ĝi fluas same kiel sukero. Ĝenas nek la ventron, nek la kapon; ŝajnas ke ĝi vaporiĝas sur la lango. Ekzistas nenio pli bona por la sano.

Ĉar ŝi vere ĝin deziris, ŝi cedis sed trinkis nur la duonon de la glaso.

Tiam Ĉicot ekkriis en ardo subita kaj bonkoreca:

– Nu, ĝi plaĉas al vi, ĉu ne? Mi nun donos al vi malgrandan barelon, nur celante montri al vi ke ni daŭre estas amika paro.

La kamparanino ne diris ne kaj ŝi foriris iomete kapturnita.



En la posta tago, la gastejestro eniris en la korton de patrino Magloire kaj tiris el la fundo de sia veturilo malgrandan barelon ĉirkaŭitan de fera ringo. Kaj tuj, por pruvi ke estas ja la sama superbrando li insiste petis ŝin gustumi la enhavon; kaj post kiam ili ambaŭ ankoraŭ trinkis po tri glasoj, li deklaris forirante:

– Kaj vi scias, kiam restos neniom, restos ja ankoraŭ iomego; ne ĝenu vin. Mi ne estas avara je tio. Ju pli frue ĝi estos finita, des pli feliĉa mi estos.

Kaj li resupreniris en sian veturilon.

Li revenis kvar tagojn poste. La maljunulino sidis antaŭ sia pordo, okupata per pantranĉado por pretigi la supon.

Li alproksimiĝis, diris al ŝi bonan tagon, parolis sub ŝia nazo por flari ŝian spiron. Li perceptis alkoholan bloveton. Tiam lia vizaĝo ekradiis.

– Vi ja bonvolos regali min per glaso da superbrando? li diris.

Kaj ili kunfrapetis la glasojn du- aŭ trifoje.

Sed baldaŭ disvastiĝis en la regiono la novaĵo, ke patrino Magloire ebriiĝas sola. Oni relevis ŝin, jen en ŝia kuirejo, jen en ŝia korto, jen sur la vojetoj de la ĉirkaŭaĵo, kaj oni devis reporti ŝin hejmen, senmovan, kiel kadavron.

Ĉicot ne plu vizitis ŝin, kaj kiam oni parolis al li pri la kampanino, li murmuris kun malgaja vizaĝo:

– Ĉu ne estas terure, je ŝia aĝo, ke ŝi ekhavis tiun kutimon? Vidu, kiam oni maljuniĝas, perdiĝas la prudento. Tio finfine kaŭzos al ŝi malbonaĵon!

Tio efektive kaŭzis al ŝi malbonaĵon. Ŝi mortis en la posta vintro ĉe Kristnasko, falinte pro ebrio en la neĝon. Kaj mastro Ĉicot heredis la bienon deklarante:

– Kompatindulino, se ŝi ne estus komencinta drinkadi, ŝi certe povus vivi ankoraŭ dek jarojn.

Barono du Treilles diris al mi:

– Ĉu vi volas veni por ke ni kune malfermu ĉasadon en mia farmobieno de Marinville? Vi min ravus, mia kara! Cetere mi estas tute sola. Tiu ĉasejo estas tiel maloportune atingebla, kaj la domo, kie mi tranoktas, tiel primitiva, ke mi vere povas kunvenigi tien nur plej intimajn amikojn.

Mi akceptis.

Ni do foriris en la sabato per la trajno direkte al Normandio. Ĉe la stacidomo de Almivare ni envagoniĝis. Barono René tuj montris al mi kampan, benkohavan veturilon jungitan al timema ĉevalo retenata de alta kamparano kun blankaj haroj, kaj li diris:

– Jen nia transportilo, mia kara.

La viro etendis la manon al sia mastro kaj la barono premis ĝin varme, demandante:

– Nu, mastro Lebrument, kiel vi fartas?

– Ĉiam same, s'joro barono.

Mi supreniris en tiun por-kokidan kaĝon almetitan sur du ekstermezurajn radojn, kaj la juna ĉevalo post subita ekpaŝo malantaŭen foriris galopante, nin skuante kaj ĵetante en la aeron kiel pilkojn; ĉiu reveno sur la lignan benkon faris al mi teruran doloron.

La kamparano ripetis per sia trankvila kaj monotona voĉo:

– Nu, nu, bele, Moutard, bele.

Sed Moutard apenaŭ obeis; ĝi kuretis kiel kaprido.

Niaj du hundoj malantaŭ ni en la malplena parto de la kaŝo estis stariĝintaj kaj ili flaris la ebenaĵan aeron, tra kiu pasis ĉasaĵaj odoroj.

La barono rigardis de malproksime per malgajaj okuloj la grandan normandan kamparon, ondan kaj melankolian, similan al vastega angla parko, ekstermezura parko, kie la kortoj de la farmobienoj ĉirkaŭitaj de du aŭ kvar arbo-vicoj kaj plenaj de fortikaj pomarboj, kiuj faras la domojn nevideblaj, montras ĝis la horizonto la perspektivojn de plenkreskaj arboj, boskoj kaj densaj vegetaĵoj, kiajn serĉas la artistaj ĝardenistoj, kiam ili skizas princajn bienojn. Kaj René du Treilles subite murmuris:

– Mi amas tiun ĉi teron; mi havas ĉi tie mian pradevenon.

Li estis normando pursanga, alta kaj larĝa, iomete dikventra, ido de l' malnova aventurista raso, kiu forveturis ŝipe por fondi reĝolandojn sur la bordoj de ĉiuj oceanoj. Li havis proksimume kvindek jarojn, eble dek jarojn malpli ol la farmisto, kiu nin kondukis. Tiu estis malgrasulo, kamparano farita nur el ostoj kovritaj de senkarna haŭto, tia viro, kiu vivas unu jarcenton.

Post duhora veturado sur ŝtonplenaj vojoj tra tiu ebenaĵo verda kaj ĉiam egala, la veturilaĉo eniris en unu el la pomarbaj kortoj, kaj ĝi haltis antaŭ malnova kaj malplena konstruaĵo, kie maljuna servistino atendis apud juna kampara knabo kaptonta la ĉevalon.

Oni eniris en la farmobienon. La fumkolora kuirejo estis alta kaj vasta. La kupraĵoj kaj fajencaĵoj brilis, lumigataj de la rebriloj el la fajrejo. Kato dormis sur seĝo; hundo dormis sub la tablo. Oni flaris tie la lakton, la pomon, la fumon, kaj tiun nenomeblan odoron de l' malnovaj kamparomanoj, odoron de l' tero, de la muroj, de la mebloj, odoron de la renversitaj supoj, de l' malnova lavado kaj malnova loĝantaro, odoron de l' bestoj kaj homoj miksitaj, de la aĵoj kaj estuloj, odoron de l' tempo, de l' tempo pasinta.

Mi reiris eksteren por rigardi la korton. Ĝi estis tiel granda, plena de antikvaj pomarboj, tordaj kaj fortikaj, kaj ŝarĝitaj de fruktoj, kiuj falis en la herbon ĉirkaŭ ili. En tiu korto la normanda parfumo de la

pomoj estis same forta kiel tiu de la florantaj oranĝarboj ĉe la sudaj marbordoj.

Kvar fagovicoj ĉirkaŭis tiun enfermitan bienon. Ili estas tiel altaj, ke ili ŝajnis atingi la nubojn ĉe tiu horo de la noktiĝo, kaj iliaj kapoj, kie pasis la vespera vento, movetiĝis kaj kantis senfinan kaj malgajan plendon.

Mi reiris en la domon. La barono varmigiĝis al si la piedojn kaj aŭskultis sian farmiston, kiu parolis pri la aferoj de la regiono. Li rakontis unue pri la geedziĝoj, la naskiĝoj, la mortoj, kaj nun pri la prezmalaltiĝo de la grenoj kaj la novaĵoj rilate la brutaron. Veularde (*bovino aĉetita en Veules*) naskis sian idon antaŭ la mezo de junio. La cidro ne estis tre bongusta en la pasinta jaro. Pli kaj pli la «abrikotaj» pomoj maloftiĝas en la regiono..

Kaj oni vespermanĝis. Bonan kamparan manĝon, simplan kaj abundan, longan kaj trankvilan. Kaj dum la tuta tempo mi rimarkis la specialan amikan familiarecon, kiu tuj frapis min ĉe la renkontiĝo de la barono kun la kamparano.

Ekstere la fagoj daŭrigis sian ĝemadon sub la ekpuŝoj de la nokta vento, kaj niaj du hundoj, enfermitaj en la stalo, ploris kaj hurlis laŭ malbonsigna maniero. La fajro estingiĝis en la granda kameno. La servistino estis foririnta por kuŝiĝi. Mastro Lebrument diris siavice:

– Se vi permesas, s'joro barono, mi nun enlitiĝos. Mi ne kutimas longe maldormi vespere.

La barono etendis al li la manon dirante: «Iru, amiko mia», kun tiel kora tono, ke mi demandis tuj post kiam la viro malaperis:

– Ŝajne tre sindona estas al vi tiu farmisto, ĉu?

– Pli ol tio, mia kara; estas dramo, malnova dramo tute simpla kaj tre malĝojiga, kiu min ligas al li. Jen cetere la historio...

Vi ja scias ke mia patro estis kavaleria kolonelo. Li havis antaŭe kiel ordonaton ĉi tiun viron, nun maljunulon, filon de farmisto. Kaj poste, kiam mia patro mem ekŝiĝis de l' servado, li reprenis kiel serviston tiun ĉi soldaton, kiu estis proksimume kvardekjara. Mi, mi havis ĉirkaŭ tridek jarojn. Mi loĝis tiam en nia kastelo ĉe Valrenne apud Caudebec-en-Caux.

En tiu tempo la ĉambristino de mia patrino estis unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni iam vidis, blonda, vigla, sprita, svelta kaj ruzeta, vere servistina tipo nuntempe malaperinta.

Nu, okazis ke la servisto de paĉjo, la iama soldato, la maljuna farmisto, kiun vi ĵus vidis, ekamis tiun knabinon; li ekamis ŝin freneze, terure, ĝis nesupozebla grado. Unue oni rimarkis ke li ĉion forgesas, ke li plu pensas pri nenio.

Mia patro ripetis al li senĉese:

– Nu, Johano, kia vi fariĝis? Ĉu vi estas malsanu?

Li respondis:

– Ne, ne, s'joro barono. Mi havas nenion.

Li malgrasiĝis; kaj li rompis glasojn dum li servis ĉetable kaj li lasis fali telerojn. Oni kredis lin trafita de nervmalsano kaj oni venigis la kuraciston, kiu erare diagnozis la simptomojn de spinmedola afekcio. Tiam mia patro, ege zorgema pri sia servisto, decidis sendi lin en resanigejon. La viro aŭdinte pri tio konfesis.

Li elektis iun matenon, dum lia mastro sin razis, kaj kun hezita voĉo ekparolis:

– S'joro barono...

– Knabo mia.

– Kion mi bezonus ja ne estas drogoj...

– Ha! Kion do?

– Estas la geedziĝo.

Mia patro surprizite turniĝis:

– Kion vi diras? Kion vi diras?

– Estas la geedziĝo.

– Ĉu la geedziĝo? Ĉu vi do estas, ĉu vi do estas... enamiĝinta... ŝercemulo?

– Tiel estas, s'joro barono.

Kaj mia patro ekridis kun tiom da malmodero ke mia patrino krie demandis tra la muro:

– Kion vi do havas, Gontran?

Li respondis:

– Venu ĉi tien, Katarino.

Kaj post kiam ŝi eniris, li rakontis al ŝi kun okuloj plenaj de larmoj de gajeco, ke lia stulta servisto estas tutsimple amomalsana.

Anstataŭ ridi panjo montris kortuŝiĝon.

– Kaj kiun vi do amas, knabo mia?

Li deklaris senhezite:

– Luizon, baronina Moŝto.

Kaj panjo aldonis grave:

– Ni klopodos aranĝi plej bone la aferon.

Luizo estis do vokata kaj pridemandata de mia patrino; kaj ŝi respondis ke ŝi tre bone scias pri la kora flamo de Johano, ke Johano plurfoje malfermis sin al ŝi, sed ke ŝi lin ne volas havi. Ŝi rifuzis diri la kialon.

Kaj du monatoj pasis, dum kiuj paĉjo kaj panjo ne ĉesis instigi la knabinon edziniĝi al Johano. Ĉar ŝi ĵuris, ke ŝi amas neniun alian, ne povis ekzisti serioza motivo por rifuzi. Paĉjo finfine venkis ŝian reziston per bela mondonaco; kaj oni instalas ilin kiel farmistojn sur la tero, kie ni troviĝas hodiaŭ. Ili forlasis la kastelon kaj mi ne plu vidis ilin dum tri jaroj.

Post tiu tempo mi aŭdis ke Luizo mortis pro pulmomalsano. Sed miaj patro kaj patrino ankaŭ mortis unu post la alia, kaj pasis ankoraŭ du jaroj antaŭ ol mi revidis Johanon.

Fine, en iu aŭtuno ĉirkaŭ la fino de oktobro, venis al mi la ideo iri por ĉasi al tiu bieno gardata kun zorgemo, bieno – laŭ la aserto de mia farmisto – tre riĉa je ĉasaĵoj.

Mi do alvenis en iu vespero al tiu domo, en vespero pluva. Mi tre surpriziĝis revidante la iaman soldaton de mia patro kun haroj tute blankaj, kvankam li ne havis pli ol kvardek kvin aŭ kvardek ses jarojn.

Mi sidigis lin kontraŭ mi por vespermanĝi, ĝuste ĉe tiu ĉi tablo. Pluvis torente. Oni aŭdis la akvon, kiu batis la tegmenton, la murojn kaj la vitrojn, diluve fluegantan tra la korto, kaj mia hundo hurlis en la stalo, kiel faras ia niaj hodiaŭ vespere.

Subite, post kiam la servistino iris al la lito, la viro murmuris:

- S'joro barono...
- Kio estas, mastro Johano?
- Mi volas rakonti ion al vi.

- Diru, mastro Johano.
- Sed tio... tio min ĝenas.
- Nu, vi tamen diru.
- Vi bone memoras pri Luizo, mia edzino, ĉu ne?
- Kompreneble mi memoras.
- Nu, ŝi petis min diri ion al vi.
- Kion?
- Nu, nu... oni nomu tion konfeso...
- Ha, kio do estas?

– Estas... estas... mi ja pli volonte ne dirus al vi tion... sed mi devas... nu jen: ne pro malsano de la pulmoj ŝi mortis... sed... sed pro ĉagreno. Kaj jen la afero kun la detaloj, por klarigi ĉion.

Tuj post ŝia veno ĉi tien ŝi tiel malgrasiĝis kaj aliĝis, ke post ses monatoj ŝi ne plu estis rekonebla; ne plu rekonebla, s'joro barono. Estis precize same kiel mi antaŭ ol mi edziĝis al ŝi, sed nun fariĝis inversa kazo, ĝuste la inversa.

Mi venigis la kuraciston. Li diris ke ŝi havas hepatan malsanon... iun... iun... apation (*La leganto komprenu ke temis ne pri apatio sed pri hepatito, vorto pli fremda al la neklera farmisto*). Tiam mi aĉetis drogojn, drogojn kaj drogojn por pli ol cent frankoj; ŝi diris:

– Ne estas necese, kara Johano. Ne estas malsano. Mi, mi ja bone vidis ke estas malbono interne. Kaj jen, foje mi trovis ŝin plorantan; mi ne plu sciis kion fari; ne, mi ne plu sciis. Mi aĉetis kufojn, robojn, pomadojn por la haroj, oretringojn. Nenio helpis. Kaj mi komprenis ke ŝi baldaŭ mortos.



Nu, en iu vespero fine de novembro, en neĝa vespero, ne ellitiĝinte dum la tuta tago, ŝi petis min iri al la pastro por venigi lin. Mi iris.

Tuj post lia alveno:

– Johano, ŝi diris al mi, jen mia konfeso. Mi devas fari ĝin al vi. Aŭskultu, Johano. Mi neniam trompis vin, neniam. Nek antaŭ, nek post la geedziĝo, neniam. S'joro pastro estas tie ĉi por certigi tion; li, kiu konas mian animon. Nu, aŭskultu Johano, se mi mortos, estas ĉar mi ne povis konsoliĝi je tio, ke mi ne plu estas en la kastelo; mi havis tro grandan... tro grandan amikecon al s'joro barono René... tro grandan amikecon, vi aŭdas, nenion alian ol amikecon. Tio mortigas min. Kiam mi ĉesis lin vidi, mi sentis ke mi mortos pro tio. Se mi vidus lin, mi plu vivus; se mi nur vidus lin, nenion pli. Mi volas ke vi diru tion al li, iam estontece, kiam mi ne plu estos ĉi tie. Vi diru tion al li. Ĵuru tion... ĵuru tion... Johano, antaŭ s'joro pastro. Mi konsoliĝos pensante pri tio, ke li iam scios la kaŭzon de mia morto... jen... ĵuru tion...

Nu, mi promesis, s'joro barono. Kaj mi faras laŭ mia promeso, kiel honesta viro.

Kaj li eksilentis kun okuloj fiksitaj al la miaj.

\* \* \*

Diable, mia kara, vi ne havas imagon pri la emocio, kiu min kaptis, dum mi aŭdis la kompatindulon, kies edzinon mi mortigis senkonscie, kaj kiu rakontis tion al mi tiel, en tiu pluva nokto, en ĉi tiu kuirejo.

Mi balbutis:

– Mia kara Johano, mia kara Johano.

Li murmuris:

– Jen la afero, s'joro barono. Ni ne povas ŝanĝi ion; nek mi... nek vi... tiel okazis...

Mi kaptis liajn manojn kontraŭ mi sur la tablo, kaj mi ekploris.

Li demandis:

– Ĉu vi volas veni al la tombo?

Mi jesis per la kapo, ĉar mi ne plu povis paroli.

Li sin levis, eklumigis lanternon kaj jen ni iris tra la pluvo, kies oblikvaj gutoj same rapidaj kiel sagoj ekbrilis antaŭ niaj ŝirmitaj kandeloj.

Li malfermis pordon kaj mi ekvidis nigrajn lignokrucojn.

En unu momento li diris antaŭ marmora tabulo: «Estas ĉi tie», kaj metis sur ĝin sian lanternon, por ke mi povu legi la ĉizitajn skribaĵojn:

*AL LUIZO-HORTENSIO MARINET*

*Edzino de Johano-Francisko Lebrument*

*Terkulturisto*

*Ŝi estis fidelulino. Dio akceptu ŝian animon*

*Ni restis sur la genuoj en la koto. Inter li kaj mi staris la lanterno; mi rigardis la pluvon, kiu frapis la blankan marmoron, resaltis kvazaŭ akva polvo, kaj forfluadis al la kvar randoj de la malvarma kaj nepenetrebla ŝtono por fine torenti al la tero. Kaj mi pensis pri la koro de tiu, kiu estis mortinta... Kompatinda koro!.. Kompatinda koro!..*

*De tiam mi revenas ĉi tien ĉiujare. Kaj mi vere sentas kulpecan konfuziĝon nedifineblan, kiam mi staras kontraŭ tiu viro, kiu ĉiam ŝajnas pardoni min.*

# LA MALJUNULO

**Guy de Maŭpassant**

Varmetaj aŭtunaj sunradioj verŝiĝis en la korton de la bieno, malantaŭ la grandaj fagoj starantaj laŭilonge de l' fosaĵoj. Sur la herbejo tondita de l' bovinoj, la tero penetrila de ĵusa pluvo estis tute mola kaj forŝoviĝis de sub la piedoj kun plaŭda bruoj; kaj la pomarboj ŝarĝitaj de pomoj semis siajn palverdajn fruktojn en la malhelan verdon de la vegetaĵa tapiŝo.

Kvar junaj bovidinoj paŝtiĝis, ligitaj en unu vico, kaj muĝis de tempo al tempo direkte al la domo; la kortobirdoj faris kolorplenan scenon sur la sterkomaso antaŭ la stalo; ili gratis, moviĝis kaj bleketis, dum la du kokoj senĉese kikerikis, serĉis vermojn por siaj kokinoj, kiujn ili vokis per vigla klukado.

La ligna barilo malfermiĝis; eniris viro, aĝa kvardek jarojn eble, sed kiu ŝajnis esti sesdek, sulketita, tordita, marŝanta per grandaj paŝoj malrapidigitaj de la pezaj lignoŝuoj plenaj de pajlo. Liaj tro longaj brakoj pendis ĉe la flankoj de lia korpo. Kiam li proksimiĝis al la bieno, flava hundeto, ligita al la piedo de grandega pirarbo apud barelo uzata kiel hundodometo, movis la voston kaj ekbojetis por montri sian ĝojon. La viro kriis:

– Kuŝu, Finot!

La hundo eksilentis.

Kampanarino eliris el la domo. Ŝia osta korpo, larĝa kaj plata, siluetis sub lana kamizolo, kiu premis ŝian talion. Jupoj griza, tro mallonga, pendis ĝis la mezo de la kruroj kaŝitaj en bluaj ŝtrumpoj, kaj ŝi ankaŭ portis pajloplenajn lignoŝuojn. Blanka kufo nun flaviĝinta kovris kelkajn harojn gluitajn al la kranio, kaj ŝia kapo bruna,

malgrasa, malbela, sendenta, montris tian sovaĝan kaj brutan fizionomion, kian ofte havas la kamparaj vizaĝoj.

La viro demandis:

– Kiel fartas li?

La virino respondis:

– S'joro pastro diras ke estas la fino; ke li certe ne trapasos la nokton.

Kaj ili ambaŭ eniris en la domon.

Trairinte la kuirejon ili penetris en la ĉambron, nigran, malaltan, apenaŭ lumigatan tra vitreto, antaŭ kiu pendis tukaĉo el normanda indieno. La dikaj traboj de la plafono, brunigitaj de l' tempo, nigraj kaj fumomalpuraj, trairis la ĉambron de flanko al flanko, portante la maldikan plankon de l' grenejo, kie kuris tage kaj nokte amasoj da ratoj.

La tera grundo, onda, malseka, ŝajnis grasa, kaj en la fundo de la loĝejo la lito faris makulon difuze blankan. Raŭka, regula bruo de spirado sibla, maldolĉa, stertora, kun tia akva plaŭdetado, kian produktas rompita pumpilo, eliris el la malhela kuŝejo, kie agoniis maljunegulo, la patro de la kamparanino.

La viro kaj la virino alproksimiĝis kaj rigardis la mortanton per kvietaj kaj rezignaj okuloj.

– Nun estas kvazaŭ finite; li ne trapasos eĉ la nokton.

La bienulino aldonis:

– Jam de la tagmezo li tiel glutetaĉas.

Kaj ili eksilentis. La patro tenis la okulojn fermitaj, kaj lia vizaĝo kun tera koloro estis tiel seka ke ĝi ŝajnis esti ligna. Lia malfermita

buŝo tralasis plaŭdetantan kaj maldolĉan spiron; kaj la griztola littuko levetiĝis sur lia brusto je ĉiu enspiro.

La bofilo post longa silento prononcis:

– Li nur finiĝu sola. Ni ja estas senpovaj. Tamen estas malkonvene pro la kolzo, kiun oni devos transplanti morgaŭ dum la vetero ankoraŭ estos bona.

Je tiu penso lia edzino ŝajnis maltrankvila. Ŝi pripensis dum kelka tempo kaj deklaris:

– Ĉar li baldaŭ forpasos, oni ne enterigos lin antaŭ sabato; vi do morgaŭ povos prizorgi la kolzon.

La kamparano meditis; li diris:

– Jes, sed morgaŭ mi devos inviti por la enteriĝo; mi ja bezonos kvin aŭ ses horojn por iri de Tourville al Manetot, al ĉiuj niaj homoj.

La edzino post du- aŭ triminuta pripenso daŭrigis:

– Ankoraŭ ne estas la tria; vi povas komenci tuj vian rondiron kaj direkti vin al Tourville. Vi ja povas diri ke li forpasis, ĉar li ne ĝisvivos la posttagmezon.

La viro restis momenton enpense, mezurante la sekvojn kaj la avantaĝojn de la ideo. Fine li deklaris:

– Nu, mi iros.

Li estis elironta; tamen li repaŝis malantaŭen kaj post hezito rekomendis jene:

– Ĉar vi havas neniun laboron, deŝiru kuirpomojn kaj faru kvar dekduojn da pomkukoj por tiuj, kiuj venos al la enterigo, pro tio ke estos necese resatiĝi. Vi faru fajron en la forno per la fasko, kiu estas en la pom-premilejo. Ĝi estas seka.

Kaj li eliris el la ĉambro, revenis en la kuirejon, malfermis ties ŝrankon, prenis sesfuntan panon, faris kun zorgo tranĉaĵon, kolektis en la kavon de unu mano la erojn falintajn sur la tabuleton kaj ĵetis ilin en sian buŝon por nenion perdi. Post tio li prenis per la pinto de sia tranĉilo iomete da sala butero el la fundo de brunargila poto kaj ŝmiris ĝin sur la pano, kiun li komencis manĝi malrapide, laŭ sia kutima ritmo.

Kaj li trairis denove la korton, kvietigis la hundon, kiu ree bojis, eliris sur la vojon paralelan al la fosaĵo kaj malproksimiĝis direkte al Tourville.

Restinte sola, la virino komencis la laboron. Ŝi malkovris la farunuĵon kaj preparis la paston por la pomkukoj. Ŝi knedis ĝin dum longa tempo, turnante kaj returnante, premante kaj platigante. Kaj ŝi faris el ĝi dikan bulon flaveblankan, kiun ŝi lasis sur angulo de la tablo.

Tiam ŝi iris por kolekti la pomojn kaj por ke la arbo ne estu vundata de la stango, ŝi grimpis al ĝi per ŝtupetaro. Ŝi elektis la fruktojn kun zorgo por preni nur la plej maturajn kaj metis ilin en sian antaŭtukon.

Iu voĉo vokis ŝin de sur la vojo:

– He! Sinjorino Ĉicot!

Ŝi turniĝis. Estis najbaro, mastro Osime Favet, la komunumestro, kiu iris al siaj teroj por ilin grasigi, sidante kun pendantaj kruroj sur la sterkveturigilo. Ŝi respondis al li:

– Je via servo. Kion vi volas, mastro Osime?

– Kaj la patro, kiel li fartas?

Ŝi kriis:

– Li estas kiel forpasinto. La enterigo okazos venontsabate je la sepa, ĉar la kolzo devigas nin rapidi.

La najbaro respondis:

– Komprenite. Bonŝancon! Fartu bone!

Ŝi reciprokis lian ĝentilaĵon:

– Dankon, same al vi.

Kaj ŝi rekomencis la pomdeŝiradon.

Tuj post kiam ŝi revenis en la domon, ŝi iris al la patro, konjektante ke ŝi trovos lin mortinta. Sed jam ĉe la pordo ŝi distingis lian bruan kaj monotonan stertoron kaj opiniante nenecese alproksimiĝi al la lito, por perdi neniun momenton ŝi komencis prepari la pomkukojn.

Ŝi envolvis la fruktojn unu post la alia en maldikan pastfolion, kaj envicigis ilin sur la rando de la tablo. Post kiam ŝi faris kvardek ok bulojn, ordigitajn laŭ dekduoj unu antaŭ la alia, ŝi pensis ke ŝi nun devas pretigi la vespermanĝon kaj ŝi alkroĉis super la fajro sian kaldroneton por kuiri la terpomojn, ĉar ŝi fine opiniis ke ne estas necese jam en tiu tago hejti la fornon pro tio ke restos ankoraŭ la tuta morgaŭa tago por fini la preparojn.

Ŝia edzo revenis ĉirkaŭ la kvina horo. Tuj post kiam li transiris la sojlon, li demandis:

– Ĉu estas finite?

Ŝi respondis:

– Ankoraŭ ne; la glutaĉado daŭras plu.

Ili iris por vidi. La maljunulo estis absolute en la sama stato. Lia raŭka spirado, same regula kiel horloĝa movo, estis nek pli nek

malpli rapida. Ĝi revenis de sekundo al sekundo, montrante iomete varian tonon laŭ tio, ĉu la aero eniris en lian bruston aŭ eliris el ĝi.

Lia bofilo rigardis lin kaj diris:

– Li finiĝos en momento, kiam ni ne pensos pri li, same kiel kandelo.

Ili revenis en la kuirejon kaj ne parolante komencis la vespermanĝon. Post kiam ili englutis la supon, ili ankoraŭ manĝis buterpanon kaj, lavinte la telerojn, ili tuj reiris en la ĉambron de la agonianto.

La virino tenante malgrandan lampon kun fumanta meĉo balancetis ĝin antaŭ la vizaĝo de sia patro. Se li ne spirus, oni absolute kredus lin mortinta.

La lito de la du kamparanoj estis kaŝita ĉe la alia ekstremo de la ĉambro, en iuspeca alkovo. Ili enlitiĝis ne dirante unu vorton, faris mallumon, fermis la okulojn; kaj baldaŭ du malegalaj ronkadoj, unu pli profunda, la alia pli akra, akompanis la seninterrompan stertoron de la mortanto.

La edzo vekiĝis jam ĉe la unua helo de la taglumo. Lia bopatro ankoraŭ vivis. Li skuis sian edzinon, maltrankvila pro tiu rezisto de la maljunulo.

– Diru do, Femio, li ne volas finiĝi. Kion ni faru, laŭ vi?

Li sciis ke ŝi estas bonkonsila. Ŝi respondis:

– Li certe ne trapasos la tagon; absolute ne. Ni ne bezonas timi. Kompreneble la komunumestro ne kontraŭstaros al la enterigo, kiu tamen okazos morgaŭ, ĝuste kiel oni aranĝis por mastro Renard, la patro, kiu forpasis precize ĉe la tempo de la semado.

La evidento de ŝia rezonado konvinkis lin kaj li ekiris al la kampoj.



Lia edzino bakis la pomkukojn kaj plenumis ĉiajn bienulajn laborojn.

Tagmeze la maljunulo ankoraŭ ne estis mortinta. La taglaboristoj dungitaj por la replantado de l' kolzo venis are por rigardi la maljunulon, kiu ŝajnis malfruigi sian finon. Ĉiu diris sian opinion kaj reiris al la teroj.

Je la sesa horo, kiam oni revenis, la patro ankoraŭ spiris. La bofilo finfine ektimegis.

– Kion vi farus ĉihore, Femio?

Ankaŭ ŝi ne plu sciis kiel aranĝi la aferon. Oni iris al la komunumestro. Li promesis ke li «fermos la okulojn» kaj permesos por la morgaŭa tago la enterigon. La ĉefo de l' Higien servo, kiun oni vizitis, ankaŭ promesis antaŭdati la primortan ateston por helpi mastron Ĉicot. La viro kaj la virino revenis trankvilaj.

Ili enlitiĝis kaj ekdormis kiel la antaŭan vesperon, miksante siajn sonorajn spirojn kun la spiro pli malforta de la maljunulo.

Kiam ili vekiĝis, li ne estis mortinta.

Tiam ili teruriĝis. Ili restis starantaj ĉe la kapkuseno de la patro, lin rigardante kun malfido, kvazaŭ li volus fari al ili malbonan ŝercon, trompi ilin por plezuro ilin ĉagreni, kaj ili estis al li koleraĵoj, precipe pro tio ke li kaŭzis al ili tempoperdon.

La bofilo demandis:

– Kion ni faru?

Ŝi tute ne sciis; ŝi respondis:

– Kia terura malagrablajo!

Oni nun jam ne povis averti la invititojn, kiuj estis tuj alvenontaj. Oni decidis ke oni atendos ilin kaj klarigos al ili la aferon.

La unuaj aperis ĉirkaŭ dek minutoj antaŭ la sepa. La virinoj nigre vestitaj, kun la kapo kovrita de granda vualo, venis kun malgaja mieno. La viroj ĝenataj en siaj drapvestoj antaŭeniĝis pli libere, duope, amike parolante pri siaj aferoj.

Mastro Ĉicot kaj lia edzino, freneze konsternitaj, akceptis ilin kun malĝojaj vortoj; kaj ambaŭ subite kaj samtempe komencis plori dum ili proksimiĝis al la unua grupo. Ili klarigis la aventuron, rakontis sian embarason, prezentis seĝojn, moviĝis, senkulpigis sin, volis pruvi ke ĉiu ajn estus aginta same kiel ili kaj parolis senfine. Ili subite fariĝis tiel babilemaj, ke ili lasis al neniu la eblon respondi.

Ili iris de unu al la alia.

– Ni ne povis supozi tion; estas vere nekredeble ke li povas tiel daŭradi!

La invititoj, konsternitaj, iom ĉagrenitaj kiel homoj, kiuj ne povas ĉeesti atenditan ceremonion, ne sciis kion fari, restis sidantaj aŭ starantaj. Kelkaj volis foriri. Mastro Ĉicot retenis ilin.

– Ni tamen rompu krustaĵon (*Rompi krustaĵon: «casser une croûte», signifas tutsimple manĝi*). Ni faris pomkukojn; ni tamen profitu la okazon.

Je tiu ideo la vizaĝoj ekradiis. Oni ekparolis per mallaŭta voĉo. La korto pleniĝis iom post iom kaj la unuaj vizitantoj diris la novaĵon al la lastaj alvenintoj. Oni murmuris; la ideo pri la pomkukoj gajigis ĉiujn.

La virinoj eniris por rigardi la mortanton. Ili faris la krucosignon apud la lito, balbutis preĝon kaj revenis eksteren. La viroj, malpli avidaj je tiu spektaklo, ĵetis nur unu supraĵan rigardon tra la fenestro, kiun oni estis malferminta.

Sinjorino Ĉicot klarigis pri la agonio:

– Fariĝis nun du tagoj, de kiam li tiel statas nek pli esperiga nek malpli. Ĉu li ne similas pumpilon, kies akvo tute elĉerpiĝis?

Post kiam ĉiuj vidis la agonianton, oni pensis pri la posttagmeza manĝeto. Sed ĉar ili estis tro multaj por sidi en la kuirejo, oni metis la tablon eksteren antaŭ la pordo. La kvar dekduoj da pomkukoj orkoloraj, apetitigaj, servataj sur grandaj pladoj, altiris la rigardojn. Ĉiu etendis la brakon por preni unu, timante ke la kvanto ne sufiĉas. Sed restis kvar.

Mastro Ĉicot kun plena buŝo prononcis:

– Se li nin vidus, la patro, kiel funebre li malĝojus. Li tiel ŝatis ilin en sia vivo!

Dika gajema kamparano deklaris:

– De nun li ne plu manĝos ilin. Ĉiu en sia vico.

Tiu parolo, anstataŭ malĝojigi la invititojn, ŝajnis ilin meti en bonan humoron. Nun estis ilia vico; al ili nun la ĝuo manĝi la bulojn!

SinJORINO Ĉicot, malĝojigita pro la elspezo, iris senĉese al la kelo por preni cidron. La kruĉegoj sekvis unu la alian kaj malpleniĝis tuj post ĉiu reveno. Nun oni ridis, oni parolis laŭte, oni komencis krei kiel oni kutimas ĉe la manĝoj.

Subite maljuna kamparanino restinta ĉe la mortanto, retenita de avida timo pri tiu afero, kiu estis baldaŭ al ŝi mem okazonta, aperis ĉe la fenestro kaj kriis kun akra voĉo:

– Li forpasis! Li forpasis!

Ĉiu eksilentis. La virinoj leviĝis rapide por iri kaj vidi.

Efektive li estis mortinta. Lia stertoro estis finita. La viroj rigardis unu la alian, mallevis la okulojn kun sento de embaraso. Oni ankoraŭ ne finmaĉis la bulojn! Li vere malbone elektas sian momenton,

la sentaŭgulo! La Ĉicot-anoj nun ne ploris plu. Estis finite. Ili nun estis trankvilaj. Ili ripetis:

– Ni ja sciis ke tio ne povos daŭri. Se li nur estus decidiĝinta la pasintan nokton, ni nun ne havus tiom da ĝeno.

Kiel ajn, estis finite. Oni lin enterigos lundon, simple tiel, kaj ree manĝos pomkukojn pro la okazo.

La invititoj foriris parolante pri la afero, tamen kontentaj ke ili tion vidis, kaj ankaŭ pro tio ke ili rompis krustaĵon.

Kaj kiam la viro kaj lia edzino retroviĝis tute solaj, vizaĝon kontraŭ vizaĝo, ŝi diris kun trajtoj kuntiritaj de la angoro:

– Iel ajn estos necese denove baki kvardek ok bulojn! Se li nur estus decidiĝinta pasintnokte!

Kaj la edzo, kvankam pli resignema, respondis:

– Tio ne povus okazi ĉiutage.

# LA DIABLO

## Guy de Maŭpassant

La kamparano restis staranta kontraŭ la kuracisto, antaŭ la lito de la mortantino. La maljuna virino, trankvila, rezignomontra, klarpensa, rigardis la du virojn kaj aŭskultis iliajn dirojn. Ŝi nun estingiĝis; ŝi ne ribelis; ŝia tempo estis forpasinta. Ŝi havis naŭdek du jarojn.

Tra la fenestro kaj la pordo malfermitaj, la julia suno abunde penetrigis siajn radiojn, ĵetis sian flamon sur la grundon el tero bruna, onda kaj elbatita per la lignoŝuoj de kvar krudulaj generacioj. La odoroj de la kamparo ankaŭ envenis, puŝitaj de l' varmega venteto, odoroj de l' herboj, de l' grenoj, de l' folioj, bruligitaj sub la tagmeza varmo. La akridoj ĉirpis gorĝoŝire, plenigis la kamparon per klara kraketado simila al tiu de la lignaj bruigiloj, kiujn oni vendas al la infanoj en la foiroj.

La kuracisto laŭtigante la voĉon prononcis:

– Honoré, vi ne povas lasi vian patrinon tute sola en tia stato. Tuj aŭ post mallonge ŝi finiĝos.

Kaj la kamparano ĉagrenite, ripetis:

– Mi tamen devas enporti mian grenon; jam de tro longa tempo ĝi kuŝas surtere. La vetero ĝuste nun estas favora. Kion vi pensas pri tio, panjo mia?

Kaj la maljuna mortantino, ankoraŭ turmentata de l' normanda avaremo, jesis per la okuloj kaj la frunto, komprenigis al sia filo keli enportu sian grenon kaj lasu ŝin morti tute sola.

Sed la kuracisto ekkoleris kaj, piedfrapante, admonis:

– Vi estas nur bruto, ĉu vi aŭdas? Kaj mi ne permesas ke vi tion faru, ĉu vi aŭdas? Kaj se vi estas devigata enporti vian grenon hodiaŭ mem, vi tutsimple iru al la gladistino Rapet, kaj venigu ŝin por gardi vian patrinon. Tion mi volas, ĉu vi aŭdas? Se vi min ne obeas, mi lasos vin krevi kiel hundo, kiam vi estos malsana; ĉu vi aŭdas?

La kamparano, maldikulo alta kun malrapidaj gestoj, turmentata de maldecidemo pro timo al la kuracisto kaj pro sovaĝa amo al la ŝparado, hezitis, kalkulis, balbutis:

– Kiom da mono ŝi postulas, la Rapet, por gardado?

La kuracisto kriis:

– Ĉu mi scias, mi? Tio dependas de l' tempo, kiun vi bezonos de ŝi. Vi interkonsentu kun ŝi, diable! Sed mi volas ke ŝi estu ĉi tie post unu horo; ĉu vi aŭdas?

La viro fine sin decidigis:

– Mi iras, mi iras, ne koleru, sinjoro doktoro.

Kaj la doktoro foriris, aldonante:

– Kaj vi scias, atentu, atentu, ĉar mi ne ŝercas kiam mi koleras, mi!

Tuj kiam li estis sola, la kamparano sin turnis al sia patrino kaj diris kun rezigna voĉo:

– Mi iras serĉi la Rapet; estas lia volo. Ne maltrankviliĝu; mi baldaŭ revenos.

Kaj siavice li eliris.

La Rapet, maljuna gladistino, gardis mortintojn kaj mortantojn de la komunumo kaj ĉirkaŭaĵo. Kaj tuj post kiam ŝi kudris siajn klientojn en la tuko el kiu ili ne plu estis elirontaj, ŝi revenis hejmen por kapti la gladilon, per kiu ŝi frotis la subvestaĵojn de la vivantoj.

Sulketita kiel pomo de l' antaŭa jaro, malbonkora, ĵaluza, monavidega je fenomenaj avaremoj, ekstreme kurba kvazaŭ ŝi estus rompita ĉe la renoj pro la eterna movado de l' fero glitigata sur la tolaĵoj, oni povus diri ke ŝi havas por la agonio ian monstran kaj cinikan amon. Ŝi neniam parolis pri io alia ol pri la homoj, kiujn ŝi vidis morti, aŭ pri ĉiuj diversaj mortoj, kiujn ŝi ĉeestis, kaj ŝi rakontis pri ili kun granda precizeco en la detaloj ĉiam egalaj, same kiel ĉasisto rakontas pri siaj fusilpafoj.

Kiam Honoré Bontemps eniris en ŝian hejmon, li trovis ŝin pretigantan bluan akvon por la kolumetoj de la vilaĝaninoj.

Li diris:

– Nu, bonan vesperon, ĉu vi fartas laŭdezire, patrino Rapet?

Ŝi turnis al li la kapon:

– Nu jes. Kaj kiel estas viaflanke?

– Ho, miaflanke estas ankaŭ laŭdezire, sed estas mia patrino, kiu ne bonfartas.

– Ĉu via patrino?

– Jes, mia patrino.

– Kion ŝi do havas, via patrino?

– Ŝi havas... ke ŝi baldaŭ turnos la okulojn! (*«Turni la okulojn» kaj «rompi sian pipon» estas popularaj esprimoj, kiuj signifas «morti»*)

La kamparanino tiris siajn manojn el la akvo, kies gutoj bluetaj kaj travideblaj deglitis ĝis la ekstremo de ŝiaj fingroj, por refali en la kuvon.

Ŝi demandis kun subita simpatio:

– Ĉu estas tiel grave?

- La kuracisto diris ke ŝi ne ĝisvivos la posttagmezon.
- Tiam efektive, estas vere grave.

Honoré hezitis. Li bezonis kelkan enkondukon por la propono, kiun li preparis. Sed, ĉar li trovis nenion, li decidiĝis subite:

– Kiom da mono vi postulos de mi por ŝin gardi ĝis la fino? Vi scias ke mi ne estas riĉa. Mi eĉ ne povis havigi al ni servistinojn, kio cetere estas la kaŭzo, pro kiu mia patrino tiel eluziĝis; troa maltrankvilo, troa laciĝado! Ŝi laboris kiel dek homoj, malgraŭ siaj naŭdek du jaroj. Nun oni ne plu produktas tian grenon.

La Rapet deklaris grave:

– Estas du tarifoj: po kvardek soldoj tage kaj tri frankoj nokte por la riĉuloj. Po dudek soldoj tage kaj kvardek nokte por la aliaj. Vi donos al mi po dudek kaj kvardek.

Sed la kamparano pripensadis. Li bone konis sian patrinon. Li sciis kiel fortika, vigla, rezista ŝi estas. Povus daŭri ok tagojn, malgraŭ la diro de la kuracisto.

Li diris kun decida tono:

– Ne. Al mi plaĉas ke vi fiksu prezon; estu fiksa sumo por la tuta restanta tempo. Ni riskas la ŝancon ambaŭflanke. La kuracisto diras ke ŝi finiĝos hodiaŭ. Se tiel okazos, estos bone por vi, malbone por mi. Sed se ŝi eltenos ĝis morgaŭ aŭ pli longe, estos bone por mi, malbone por vi! La gardistino, surprizite, rigardis la viron. Ŝi neniam estis farinta mortnegocon laŭ probabla gardotempo. Si hezitis, tentate de la ideo pri ebla bonŝanco. Kaj ŝi suspektis, ke oni volas trompi ŝin.

– Mi povas nenion diri antaŭ ol mi vidos vian patrinon, ŝi respondis.

– Nu, venu kaj vidu.



Ŝi sekigis siajn manojn kaj tuj sekvis lin.

Survoje ili tute ne parolis. Ŝi iris per rapidigitaj piedoj, dum li antaŭenigis siajn longajn kruojn kvazaŭ li devus je ĉiu paŝo transiri kanaleton.

La bovinoj, kuŝantaj sur la kampoj, premataj de la varmo, levis peze la kapon kaj eligis malfortan muĝadon al tiuj du pasantaj homoj por peti de ili freŝan herbon.

Proksimiĝante al sia domo, Honoré murmuris:

– Se jam estus finite, tamen.

Kaj la senkonscia deziro, kiun li havis je tio, montriĝis per la sono de lia voĉo.

Sed la maljunulino ne estis mortinta. Ŝi restis sur la dorso en sia litaĉo kun la manoj sur la kovrilo el indieno violkolora, manoj terure malgrasaj, ondaj, similaj al kraboj, al strangaj bestoj, kaj fermitaj de la reŭmatismo, la lacoj, la laborado preskaŭ jarcenta, kiun ili estis plenumintaj.

La Rapet proksimiĝis al la lito kaj atente rigardis la mortantinon. Ŝi esploris ŝian pulson, palpis ŝian bruston, aŭskultis ŝian spiradon, faris al ŝi demandon por aŭdi ŝian parolon; kaj post kiam ŝi ankoraŭ longe ŝin observis, ŝi eliris sekvate de Honoré. Ŝi nun havis firman opinion. La maljunulino ne atingos la nokton. Li demandis:

– Nu?

La gardistino respondis:

– Nu, daŭros du tagojn, eble tri. Vi donos al mi ses frankojn, ĉio enkalkulita.

Li ekkriis:

– Ses frankojn! Ses frankojn! Ĉu vi perdis la prudenton? Mi, mi diras al vi ke restas al ŝi kvin aŭ ses horoj, ne pli!

Kaj ili diskutis longan tempon pro sia ambaŭflanka obstinego. Sed ĉar la gardistino volis retiriĝi, ĉar la tempo pasis, ĉar lia greno ne mem enportiĝis, li fine jesis:

– Nu, interkonsentite, ses frankoj.

Kaj li foriris per longaj paŝoj al sia greno kuŝanta sur la grundo, sub la peza sunvarmo, kiu maturigas la rikoltojn.

La gardistino eniris en la domon.

Ŝi estis kunportinta laboraĵon; ĉar apud la mortantoj kaj mortintoj, ŝi senhalte laboris, jen por si mem, jen por la familio, kiu ŝin okupigis por tiu duobla laboro kontraŭ ekstra salajro.

Pasiginte ĉe la maljunulino jam unu nokton, la gladistino subite demandis al ŝi:

– Ĉu oni almenaŭ sanktoleis vin, patrino Bontemps? La kamparanino faris «ne» per la kapo, kaj la Rapet, kiu estis bigotino, leviĝis vigelece.

– Sinjoro Dio, kiel estas eble! Mi iras serĉi la pastron.

Kaj ŝi ekkuregis al la paroĥejo tiel rapide ke la kamparanidoj, vidante ŝin trotadi tiamaniere, kredis ke okazis malfeliĉo.

La pastro tuj venis en sia surpriso malantaŭ la akolito, kiu tintigis sonorileton por anonci la preterpason de Dio en la brulanta kaj trankvila kamparo. Viroj, kiuj laboris en la malproksimo, demetis siajn grandajn ĉapelojn kaj restis senmovaj, atendente ĝis la blanka vesto malaperos malantaŭ farmdomo; la virinoj, kiuj kolektis de l' tero la garbojn, rektigis sin por fari krucosignon; nigraj kokinoj forkuris timegante kaj balanciĝante sur la piedoj, laŭlonge de fosaĵo ĝis la truo kiun ili bone konis, kaj en kiun ili subite malaperis; ĉevalido,

ligita en herbejo ektimis vidante la surplison kaj hufbatante ekkuris en rondo ĉe l' ekstremo de sia ŝnuro.

La akolito en ruĝa jupo iris rapide; kaj la pastro, kun la kapo klinita sur unu ŝultro kaj surhavanta la kvadratan kufon, sekvis lin murmurante preĝojn; kaj la Rapet venis malantaŭe tute klinite, faldite kvazaŭ por surgenuiĝi dum la marŝado kaj kun interplektitaj manoj, kiel en la preĝejo.

Honoré, de malproksime, vidis ilin pasi. Li demandis:

– Kien li do iras, nia pastro?

Lia servisto, pli subtila, respondis:

– Li portas la bonan Dion al via patrino kompreneble!

La kamparano ne ekmiris.

– Efektive, povas esti!

Kaj li daŭrigis sian laboron.

Patrino Bontemps konfesis, estis absolvata kaj komuniigis; kaj la pastro foriris, lasante solaj la du virinojn en la sufoka pajlodomo.

Tiam la Rapet komencis observi la mortantinon, demandante al si mem, ĉu tiel ankoraŭ longe daŭros.

Fariĝis krepusko; la aero pli freŝa eniris en pli fortaj blovoj, igis saltetadi sur la muro epinalan bildon, fiksitan per du pingloj; la malgrandaj kurtenoj de l' fenestro, iam blankaj sed nun flaviĝintaj kaj kovritaj de muŝaj makuloj, ŝajnis ekflugi, ekribeli kaj voli forkuri same kiel la animo de l' maljunulino.

Ŝi, senmova, kun la okuloj malfermitaj, ŝajnis atendi kun indiferento la tiel proksiman sed malfruiĝantan morton. Ŝia spiro mallonga iomete siblis en ŝia premata gorĝo. Ĝi estis baldaŭ

haltonta, kaj surtere post mallonga tempo estis forpasonta virino, kiun neniu kompatos.

Ĉe la noktiĝo, Honoré revenis. Alproksimiĝinte al la lito, li vidis sian patrinon ankoraŭ vivantan kaj li demandis:

– Ĉu pli bone nun? same kiel li iam kutimis fari kiam ŝi estis malsaneta.

Kaj li elirigis la Rapet rekomdante al ŝi:

– Morgaŭ matene, nepre je la kvina.

Ŝi respondis:

– Morgaŭ je la kvina.

Ŝi alvenis efektive ĉe la tagiĝo.

Antaŭ ol iri al la kampoj, Honoré manĝis la supon, kiun li mem estis pretiginta. La gardistino demandis:

– Nu, ĉu la patrino forpasis?

Li respondis kun malica sulketo ĉe l' okulanguloj:

– Ŝajnas male ke ŝia farto iom pliboniĝis.

Kaj li eliris.

La Rapet, kaptita de maltrankvilo, proksimiĝis al la agoniantino, kiu restis en la sama stato, anhelanta kaj senmova, kun malfermaj okuloj kaj krispaj manoj sur sia kovrilo.

Kaj la gardistino ekkomprenis ke tiel ankoraŭ povos daŭri du tagojn, kvar tagojn, ok tagojn eble, kaj terurego ekpemis ŝian avarulinan koron dum furioza kolero komencis eksciti ŝin kontraŭ tiu ruzulo, kiu ŝin trompaĉis, kaj kontraŭ tiu virino, kiu ne mortis.

Ŝi tamen komencis labori kaj atendis kun la rigardo fiksita sur la sulketita vizaĝo de la patrino Bontemps.

Honoré revenis por tagmanĝi; li ŝajnis kontenta, preskaŭ rikana, kaj li reiris. Li fakte enportis sian grenon en bonegaj cirkonstancoj.

La Rapet furiozegis; ĉiu pasinta minuto ŝajnis nun al ŝi tempo ŝtelita, mono ŝtelita. Ŝi deziregis, ŝi freneze deziregis kapti la kolon de tiu maljuna azenino, tiu malcedema grizulino, tiu aĉa obstinulino kaj haltigi per nura premeto tiun rapidetan spiron, kiu ŝtelis ŝiajn tempon kaj monon.

Sed ŝi pensis pri la danĝero; nun aliaj ideoj trairis ŝian kapon; ŝi alproksimiĝis al la lito.

Kaj ŝi demandis:

– Ĉu vi jam vidis la Diablon?

Patrino Bontemps murmuris:

– Ne.

Tiam la gardistino ekparolis, rakontis al ŝi historiojn por teruri la senfortan animon de la mortantino.

Kelkajn minutojn antaŭ ol oni mortas, la Diablo, ŝi diris, aperas al ĉiuj agoniantoj. Li portas balailon ĉe la mano, kaldroneton sur la kapo kaj eligas grandajn kriojn. Post kiam oni vidis lin, estas finite, restas nur tre mallonga momento. Kaj ŝi citis ĉiujn personojn, antaŭ kiuj la Diablo aperis dum ŝia ĉeesto tiun jaron. Joséphine Loisel, Eulalie Ratier, Sophie Padagnaŭ, Séraphine Gros pied.

Patrino Bontemps fine emociita gestadis, movis la manojn, klopodis turni la kapon por rigardi al la fundo de la ĉambro.

Subite, la Rapet forŝoviĝis de la litpiedo. El la ŝranko ŝi prenis littukon kaj per ĝi sin envolvis; ŝi surkapigis la kaldroneton, kies tri mallongaj kaj kurbaj piedoj elstaris kvazaŭ kornoj; ŝi kaptis balailon

per la dekstra mano kaj per la maldekstra sitelon el lado, kiun ŝi rapidmove suprenĵetis por ke ĝi refalu kun bruego.

Frapante la grundon, ĝi faris teruran frakason; tiam, grimpinte sur seĝon, la gardistino levis la kurtenon, kiu pendis ĉe l' ekstremo de la lito kaj ŝi aperis gestadante, eligante akutajn ŝirsonojn en la fundo de l' ferpoto, kiu kaŝis ŝian vizaĝon, kaj minacante per sia balailo, kvazaŭ marioneta diablo, la maljunan finiĝantan kamparaninon.

Skuegita, kun frenezaj okuloj, la mortantino faris superhoman klopodon por leviĝi kaj forkuri; ŝi eĉ eligis el sia kuŝejo siajn ŝultrojn kaj sian bruston; sed tiam ŝi refalis kun longa ĝemo. Estis finite.

Trankvile, la Rapet reordigis ĉiujn objektojn, remetis la balailon en angulon apud la ŝranko, la littukon en ĝin, la kaldroneton super la fajrejon, la sitelon sur la tabulon kaj la seĝon kontraŭ la muron. Post tio, ŝi fermis kun metia lerto la ekstermezurajn okulojn de la mortintino, sur la liton metis teleron, verŝis en ĝin la akvon el la sanktakvujo por trempi la buksan branĉeton najlitan sur la komodo, kaj surgenuiĝinte, komencis fervore eldiri la preĝojn por mortintoj, parkere sekve de sia profesio.

Kiam Honoré revenis post la vesperiĝo, li trovis ŝin preĝantan kaj li tuj kalkulis ke ŝi tamen gajnas dudek troajn soldojn de li, ĉar ŝi pasigis nur tri tagojn kaj unu nokton, kio farus entute kvin frankojn anstataŭ ses, kiujn li nun ŝuldis al ŝi.

# LA SUKERUJO

## Selma Lagerlöf

Antaŭ kvin jaroj, kiam Karl-Artur Ekenstedt unuafoje venis al Korskyrka (*Korskyrka – paroĥo Krucpreĝejo*) li estis terure severa pietisto. Li rigardis Ĉarlotte Löwenskold kiel perditan filinon de ĉi tiu mondo kaj apenaŭ volis interŝanĝi kun ŝi vortojn.

Tio kompreneble incitis ŝin. En sia koro ŝi decidis, ke tre baldaŭ li devos peti pardonon pro tiu malestimo.

Baldaŭ rimarkinte kiel nesperta li estas pri ĉiuj praktikaj aferoj, kiujn devas koni pastro, ŝi komencis helpi al li ordigi aferojn. Komence li estas ĝenata kaj rifuza, sed post kelka tempo li iĝis pli dankema kaj uzis sian helpon pli ofte, ol ŝi efektive deziris.

Li kutimis fari longajn promenadojn por viziti mizerajn maljunajn virojn kaj virinojn, kiuj loĝis en malgrandaj kabanoj tre malproksime en la arbaroj, kaj ĉiam li petis ŝin, ke ŝi akompanu lin dum tiaj ekskursoj. Li asertis, ke ŝi multe pli bone ol li scias interrilati kun tiuj maljunaj homoj, vigligi kaj konsoli ilin en iliaj etaj zorgoj.

Dum tiuj promenoj duope do okazis ke Ĉarlotte enamiĝis al Karl-Artur. Antaŭe ŝi ĉiam revis, ke ŝi edziniĝos al impona kaj brava oficiro, sed nun ŝi estis senespere kaptita de la milda kaj diskreta juna pastro, kiu eĉ ne volas mortbati muŝon kaj neniam eligas tra inter la lipoj blasfemon.

Nu ja, dum kelka tempo ili povis senĝene daŭrigi siajn promenadojn kaj interparolojn, sed en la komenco de julio okazis, ke Jaquette Ekenstedt, la fratino de Karl-Artur, venis por vizito. Nenio rimarkinda estis, ke ŝi tion faris. La edzino de la preposto Forsius en Korskyrka estis malnova amikino de la kolonel-edzino Ekenstedt,

kaj ŝajnis ja tute nature, ke ŝi invitis por kelkaj semajnoj la fratino de Karl-Artur al la preposta bieno.

Jaquette Ekenstedt dividis ĉambron kun Ĉarlotte, kaj la du knabinoj treege bone amikiĝis. Precipe Jaquette tiom amis Ĉarlotte, ke oni povus kredi, ke ŝi venis al Korskyrka plivole pro ŝi ol pro la frato.

Kaj kiam Jaquette jen estis hejmen irinta, venis letero de la kolonel-edzino al sinjorino Forsius en Korskyrka, kiun Ĉarlotte havis permeson legi. Ĝi entenis inviton al Ĉarlotte, ke ŝi venu al Karlstad por viziti Jaquette. Sinjorino Ekenstedt skribis, ke Jaquette sole nur parolis pri la juna, ĉarma knabino, kiun ŝi renkontis en la preposta bieno. Ŝi fakte sopiris ŝin kaj priskribis ŝin tiel entuziasme, ke ŝi faris ankaŭ sian karan patrino scivola ŝin ekvidi.

Sinjorino Ekenstedt skribis, ke siaparte ŝi precipe havas intereson por Ĉarlotte, ĉar ŝi estas Löwensköld-ano. La junulino ja apartenas al la juna branĉo de la familio, kiu neniam estis baronigita, sed origine ŝi tamen devenas de la maljuna generalo en Hedeby, ke do ekzistas inter ili malgranda ligilo de parenceco.

Leginte la leteron Ĉarlotte tuj deklaris, ke ŝi ne volas iri. Ŝi ne estis tiel stulta, ke ŝi ne komprenis, ke unue sinjorino Forsius kaj nunposte Jaquette raportis al la kolonel-edzino pri ŝi kaj Karl-Artur, kaj ke ŝi nun estu sendata al Karlstad, por ke la kolonel-edzino mem havu okazon vidi kaj juĝi, ĉu ŝi povos esti deca bofilino.

Sed sinjorino Forsius kaj precipe Karl-Artur persvadis ŝin iri. En tiu tempo Karl-Artur kaj ŝi jam estis neoficiale gefianĉoj, kaj li diris, ke li restos al ŝi eterne dankema, se ŝi plenumos la deziron de la patrino. Li ja fariĝis pastro spite la volon de la gepatroj, kaj kvankam ne povas esti demando pri tio, ke li rompos la fianciĝon al ŝi, kion ajn ili opinios, li tamen plivole evitas kaŭzi al ili novan malĝojon. Kaj ke ili estos ravitaj de ŝi, kiam ili nur ekvidos ŝin, tion li sciis. Neniam li vidis junulinon, kiu tiel bone kiel Ĉarlotte scias interrilati kun maljunaj homoj. Ĝuste pro tio, ke li rimarkis kiel bona ŝi estas al la maljunaj



prepostaj geedzoj kaj al ĉiuj aliaj maljunaj homoj, li unue komencis korigiĝi al ŝi. Ne, se ili nur volas iri al Karlstad, ĉio fariĝos bona.

Kiel li nun parolis kaj petadis, fine li ricevis sian promeson akcepti la inviton.

Estis plentaga vojaĝo al Karlstad, kaj ĉar ne decidis, ke Ĉarlotte iros sola, sinjorino Forsius aranĝis, ke ŝi havu lokon en la kaleŝo kun la uzinestraj gesinjoroj Moberger, kiuj iros en la urbon al geedziĝa festo. Kun sennombraj saĝaj konsiloj kaj admonoj ŝi poste forsendis ŝin kaj Ĉarlotte ja promesis esti prudenta.

Sed tio – dum tuta tago sidadi en la kovrita veturilo sur la mallarĝa dorsdirektita benko kaj rigardadi al gesinjoroj Moberger, kiuj dormis ĉiu en sia angulo – eble ne estis la plej bona prepara por la restado en Karlstad.

Sinjorino Moberger trovis, ke estas trablovo, kaj sub nenia kondiĉo ŝi volis, ke fenestro estu malfermita ĉe pli ol unu flanko de la kaleŝo, kaj kelkfoje eĉ ne tiom. Kaj ju pli varma kaj sufoka la aero estis en la kaleŝo, des pli bone ŝi dormis. Komence Ĉarlotte provis komenci interparolon kun la kunvojaĝantoj, sed gesinjoroj Moberger, havinte ja multe por aranĝi antaŭ la ekiro de hejme, nun volis ripozi.

La piedetoj de Ĉarlotte martelis kaj tamburis sur la veturila planko, eĉ sen ŝia scio. Sed tute subite sinjorino Moberger vekiĝis kaj demandis, ĉu ŝi ne bonvolus teni sin kvieta.

Ĉe la gastejo gesinjoroj Moberger elprenis sian manĝoprovizon, mem manĝis kaj tute ne forĝesis doni al Ĉarlotte. Ili estis al ŝi tre afablaj dum la tuta vojaĝo, sed tamen certe estis miraklo, ke ili alvenis kun ŝi al Karlstad.

Ju pli longe ŝi sidis kaj timsuferis en la varmo, des pli ŝi malkontentiĝis pri la tuta vojaĝo. Ŝi ja entreprenis ĝin pro Karl-Artur, sed subite ŝajnis al ŝi, ke la amo estas for, kaj ŝi tute ne povis kompreni, kial ŝi iru al Karlstad por sin elmontri. Multfoje ŝi intencis

malfermi la veturilan pordeton, elsalti kaj rekuri hejmen. Ŝi nur restis side, ĉar ŝi estis tiel laca kaj tedita, ke ŝi ne fortis sin movi.

Kiam ŝi alvenis al la Ekenstedt-a domo, ŝi ĝuste ne humoris konduti prudente kaj dece. Ŝi volus kii aŭ danci aŭ ion frakasi. Tio resanigus al ŝi farton kaj bonhumoron. Jaquette Ekenstedt afabla kaj ĝoja venis al ŝi renkonte, sed ekvidante ŝin, Ĉarlotte tuj ekhavis la senton, ke ŝi mem estas terure malbonvestita, simple kaj malmoderne, kaj antaŭ ĉio, ke ŝiaj ŝuoj iel estas en malordo. Ili estis novaj por la vojaĝo kaj la paroĥa ŝuisto faris sian plejblon, sed ili klakis, kiam ŝi iris, kaj ili odoris je ledο. Jaquette kondukis ŝin tra pluraj, belaj ĉambroj al sinjorino Ekenstedt, kaj kiam Ĉarlotte iris tra la apartamento kaj ekvidis la pargetojn, la grandajn spegulojn kaj la belajn panelojn super la pordoj, ŝi opiniis ĉion perdita. En ĉi tiu domo oni neniam povos akcepti sin kiel bofilino, tion ili komprenis. Estis la plej granda stultaĵo, ke ili iris tien ĉi. Kiam Ĉarlotte envenis al la sinjorino, ja neniel cedis ŝia impresο, ke ŝi faris falsan paŝon. Sinjorino Ekenstedt sidis apud la fenestro en arkforma apogseĝo legante francan libron. Ekvidante Ĉarlotte, ŝi diris kelkajn vortojn france. Ŝi estis tiel enprofundiĝinta en la legado, ke ŝi mem eĉ ne rimarkis tion. Kaj Ĉarlotte komprenis, kion ŝi diris, sed tio incitis ŝin, ke la moŝta sinjorino kvazaŭ provis eltrovi ŝiajn lingvosciojn, kaj ŝi respondis en la plej vulgara vermlanda idiomο. Ŝi ne parolis tian dialekton, kiu estas kutima inter altklasaj personoj, kaj ja estas tre facile kompreneble, ke ŝi parolis la lingvon de la servistoj kaj de la vilaĝanoj, kiu estas io tute alia.

La moŝta sinjorino iom levis la brovojn kaj ŝajnis tre amuzita, kaj Ĉarlotte daŭrigis kaj montris sian mirigan vermlandan lingvoscion. Ĉar ŝi ne povis kii aŭ danci aŭ ion frakasi, estis konsolo paroli vermlandlingve. Ĉi tiu ludo ja tamen estis perdita, sed almenaŭ ŝi montros al ĉi tiuj moŝtaj homoj, ke ŝi ne volas ŝajnigi sin pli bona ol ŝi estas, por flatakiri favoron ĉe ili.

Nun Ĉarlotte venis tiel malfrue, ke la aliaj jam vespermanĝis, kaj post mallonga tempo la sinjorino diris al Jaquette, ke ŝi konduku sian amikinon en la mangoĉambron, ke ŝi povu iom vespermanĝi.

Kaj per tio estis fino de tiu tago.

La posta tago estis dimanĉo, kaj tuj kiam la matenmanĝo estis finita, oni devis iri en la preĝejon kaj aŭskulti la predikon de la ĉefpreposto Sjöborg. La diservo daŭris du horojn kaj duonan, kaj kiam ĝi estis finita, la kolonelo kaj lia edzino, Jaquette kaj Ĉarlotte sufiĉe longan tempon promenadis sur la placo de Karlstad. Ili renkontis multajn konatojn de gesinjoroj Ekenstedt, kaj kelkaj sinjoroj aliris kaj faris akompanon kun ili. Sed ili iris apud la sinjorino kaj interparolis nur kun ŝi, por Jaquette kaj Ĉarlotte ili havis nek vortojn nek rigardon.

Post la promenado Ĉarlotte iris kun la aliaj returne al la Ekenstedt-a hejmo por familia tagmanĝo en akompano kun la familioj de l' ĉefpreposto kaj de la urba konsilano, kun la fratoj Stake kaj Eva Ekenstedt kun sia leŭtenanto.

Dum la tagmanĝo sinjorino Ekenstedt faris delikatan kaj intelektan konversacion kun la ĉefpreposto kaj la urba konsilano. Eva kaj Jaquette diris neniun vorton, kaj ankaŭ Ĉarlotte silentis, ĉar ŝi povis kompreni, ke estas kutimo en ĉi tiu domo, ke la junaj homoj devas silenti. Sed dum la tuta tagmanĝo ŝi nur deziregis esti for de tie. Ŝi embuske atendis okazon – oni povus diri – por montri alia gepatroj de Karl-Artur, ke ŝi konscias, ke ili tute ne konvenas fariĝi ilia bofilino. Ŝi komprenis, ke ne sufiĉas la vermlanda lingvaĉo, ŝi devas apliki ion pli efikan kaj decidigan.

Post tia vojaĝo kaj tia prediko kaj tia promenado kaj tia tagmanĝo ja estas necese, ke ŝi komprenigu, ke nun ŝi ne volas plu partopreni.

Unu el la bonegaj, bonedukitaj lakeinoj, kiuj servis ĉe la tablo, ĉirkaŭportis pladon kun framboj, kaj Ĉarlotte surtelerigis al ŝi, ŝi kiel ĉiuj aliaj. Poste ŝi etendis la manon por sukero, kiu staris proksime, kaj komencis sukeradi la berojn.

Ĉarlotte havis nenian suspekton, ke ŝi prenis pli da sukero ol kiom povus esti necese. Tiam Jaquette rapide flustris al ŝi en la orelon: "Ne prenu tiel multe da sukero. Tio ne plaĉas al patrino." Ĉarlotte

ja sciis, ke multaj maljunaj homoj opinias, ke estas peka lukso sukeradi la manĝaĵon. Hejme en Korskyrka ŝi apenaŭ povis tuŝi sukerŝutilon ne ricevante admonon de la preposto, tial ŝi tute ne estis surprizita. Sed samtempe ŝi vidis rimedon lasi libera tiun ribeleman malicon, kiu bolis en ŝia interno de kiam ŝi forlasis la hejmon. Ŝi fosis profunde en la sukerujon per la ŝutilo kaj sukeradis tiom, ke ŝia telero aspektis kiel neĝamaso.

Ĉirkaŭ la tablo ekregis mirinda silento. Ĉiuj ja komprenis, ke tio ne povos bone finiĝi. Ankaŭ ne daŭris longe, ke la sinjorino faris admoneton.

"Ili devas havi tre acidajn frambojn en Korskyrka. Jen ĉe ni ili ne estas tiel danĝeraj. Mi apenaŭ kredas, ke estas necese pli da sukero."

Sed Ĉarlotte daŭrigis la sukeradon. Samtempe ŝi diris al si mem: "Se mi daŭrigas la sukeradon, mi ne ricevos Karl-Artur, kaj fariĝos por eterne malfeliĉa, sed tamen mi devas sukeradi."

La sinjorino iom levis la ŝultrojn kaj turnis ŝin al la ĉefpreposto por daŭrigi la interparolon. Estis evidente, ke ŝi ne volis uzi pli severajn rimedojn.

Sed nun la kolonelo provis helpi al sia edzino.

"Vi tute malbonigas la guston de la beroj, kara fraŭlino Ĉarlotte."

Apenaŭ li elparolis la vortojn, kiam Ĉarlotte formetis la ŝutilon. Anstataŭe ŝi kaptis la sukerujon per ambaŭ manoj kaj ŝutis ĝian tutan enhavon sur la teleron.

Post tio ŝi remetis la sukerujon sur la tablon kaj enmetis la ŝutilon. Poste ŝi ordigis al si sur la seĝo kaj fikse rigardis rekte al la kunmanĝantoj, preta elporti la ventegon.

"Jaquette", la kolonelo diris, "eble vi volas kunpreni vian amikinson en vian ĉambron!"

Sed lia edzino evitige levis la manon.

"Ne, tute ne," ŝi diris, "ne tiamaniere".

Ŝi sidis silente kelkajn momentojn kvazaŭ por pripensi kion diri. Tiam ŝi ekhavis gajan brileton en siaj dolĉaj okuloj kaj komencis paroli. Sed ŝi turnis sin ne al Ĉarlotte sed al la ĉefpreposto.

"Ĉu vi aŭdis, kuzo, kiel okazis, kiam mia onklino Clementine edziniĝis al grafo Cronfeldt? La patroj de ambaŭ flankoj renkontiĝis en la parlamento en Stockholm kaj interkonsentis pri la geedziĝo, sed kiam ĉio estis finita kaj glatigita inter ili, la juna grafo kompreniĝis, ke li volas almenaŭ vidi sian estontan edzinon, antaŭ kiam li konsentos la aferon. Sed onklino Clementine sidis hejme en Hedeby, kaj ĉar tio kaŭzus sensacion, se oni subite venigus ŝin al Stockholm, oni do decidis, ke la grafo iru al la paraĥo Bro por rigardi ŝin en la preĝejo. Nu, kara kuzo, mia onklino Clementine neniel kontraŭstaris edziniĝon al juna, bela grafo, sed ŝi sciigis, ke li venos en la preĝejon por rigardi ŝin, kaj ne plaĉis al ŝi esti ekspozita en tia maniero. Plej volonte ŝi volus tute ne iri al la preĝejo tiun dimanĉon, sed en tiu tempo tute ne povis okazi, ke infanoj ribelas kontraŭ tio, kion decidis la gepatroj. Ŝi devis fari sin tiel bela, kiel ŝi nur povis, kaj sidigi sin en la Löwensköld'a benko, por ke grafo Cronfeldt kaj unu amiko lia povu ekzameni ŝin. Sed kuzo, ĉu vi scias, kion ŝi faris? Jes, kiam la kantoro ekkantis la himnon, ŝi komencis kanti per laŭta voĉo sed tute false. Kaj tion ŝi daŭrigis dum himno post himno, ĝis la diservo estis finita. Kiam ŝi poste elvenis ekster la preĝejon, tie staris grafo Cronfeldt kaj riverencis al ŝi. 'Mi devas peti vian moŝtan pardonon', li diris, 'mi nun komprenas, ke iu fraŭlino Löwensköld ne povas lasi rigardi sin kiel ĉevalo en foiro. Kun tio li foriris por tiu fojo, kuzo, sed li revenis kaj konatiĝis kun la juna fraŭlino en ŝia hejmo en Hedeby, kaj ili edziĝis, kaj certe ili ankaŭ fariĝis feliĉaj. Jes, kuzo, vi eble aŭdis tiun rakonton antaŭe."

"Ho jes, sed ne tiel bone rakontitan," diris la ĉefpreposto kaj komprenis nenion.

Sed kiu komprenis, tiu estis Ĉarlotte. Ŝi sidis tie plena de grandaj esperoj kaj nur glutis per la okuloj la rakontinton. La sinjorino rigradis al ŝi, ridetis iom, kaj denove ŝi turnis sin al la ĉefpreposto.

"Kiel vi vidas, kuzo, hodiaŭ juna fraŭlino sidas kun ni ĉe la tablo. Kaj ŝi venis, por ke mi kaj mia edzo ekzamenu ŝin kaj vidu, ĉu ŝi taŭgas kiel edzino al Karl-Artur. Sed la juna fraŭlino, kuzo, ŝi estas Löwensköld'ano el la ĝusta speco, kaj al ŝi ne plaĉas, esti ekspozita. Kaj mi asertas al vi, kuzo, ke de kiam ŝi alvenis tien ĉi hieraŭ vespere, ŝi penadis false kanti tute kiel onklino Clementine. Kaj nun mi faras kiel grafo Cronfeldt, kuzo, mi petas ŝian moŝtan pardonon kaj diras, ke mi komprenas, ke iu fraŭlino Löwensköld ne volas lasi rigardi sin kiel ĉevalo en foiro."

En la sama momento ŝi ekstaris kaj etendis la brakojn, kaj Ĉarlotte sin ĵetis al ŝi sur la kolon kaj kisis ŝin kaj ploris pro feliĉo kaj admiro kaj dankemo.

# LA PROMESO

## S. Gorodeckij

Boriso Pestumskij festis tagon de sia naskiĝo, – jam la dudek-sepan datrevenon. Verdire, li ankoraŭ ne havis dudek sep jarojn, ĉar li estis naskiĝinta je kelke da minutoj antaŭ la dekdua, kaj nun estis nur la naŭa. Ankoraŭ matene kuŝante en la lito, li resumis sian tutan vivon kaj restis de tiu resumo preskaŭ kontenta. Edzino kun sufiĉe riĉa doto, du infanoj kaj sufiĉe granda reputacio de talenta verkisto, – tia estis la resumo, kaj la estonteco promesis konstantan prosperadon.

Precipe Pestumskij ĝojis pro tiu flua regula brulado, kiu antaŭ ne longe anstataŭis en li la malregulan kaj flagrecan flamon de l' juneco.

La gastoj, invititaj por teo, sidis longe kaj estis ĵus disveturintaj al siaj hejmoj. Ili konsistigis tiun tedan, sed akceptendan grupon de parencoj, kun kiu oni malofte interrilatas, kaj kun kiu oni havas preskaŭ nenion komunan, sed tamen samtempe daŭrigas ekstereparencajn kaj anime-malvarmajn interrilatojn pro iaj hereditaj impresoj, neniam estingiĝantaj en homa sango.

Post ilia foriro restis malordo en la gastoĉambro, neĝustaloke metitaj mebloj, ne tute malplenigitaj skatoloj kun bombonoj kaj sufiĉe multe da tute nebezonataj objektoj, donacetoj de la vizitintoj, – precipe manlaboraĵoj de kuzinoj kaj onkloroj.

Pestumskij estis per maldiligentaj manoj transmetanta la donacojn, kiam eniris lia edzino, jam vestinta sin per simpla porhejma vesto.

La patrinaj devoj kaj mastrumado laŭ ŝia opinio estis nuraj taskoj de l' virino, sed en tio, kiel ŝi en la vivo agis laŭ siaj opinioj, estis

multe da virga sincereco kaj ĉarmo. Ŝi ne estis amanta la parencojn, nek la novelojn kaj literaturajn konatojn de sia edzo, sed ŝi prenis de li nur lian simplan animon, kiom ĝi restis, sendifekta post la konstantaj insidaj kaj kruelaj atencoj de la vivo.

Antaŭ la edziĝo kun ŝi Pestumskij estis multon disipinta (*disipi = per malorda, sendisciplina vivado malŝparege {efis} trokonsumi la vivrimedojn*), sed ŝi sukcesis iel kunkolekti la restaĵojn kaj nun adoris kaj gardis ilin kun la pasio de insisto.

Ŝirminte per si la donacojn, ŝi forkondukis lin de apud la tablo, kaj sin karese premante unu al la alia, ili per facilaj pasoj de amika paro venis al la kanapeto kaj, sidante sur ĝi, per koncizaj malmultvortaj frazoj komencis interparolon de de longe amikiĝintaj homoj, duonvorte komprenantaj unu la alian, kaj havantaj jam sian ĉarman intiman ĵargonon.

Iom lacaj kaj karesemaj, ili estis jam tuŝantaj en si sekretajn kordojn, per delikataj fingroj ekvivigante misterajn kaj dormantajn en profundo sonojn, kaj per sentema orelo atentante al kreskanta konata muziko, kiam subita, akrasona kaj malcedema, kiel la sorto mem, sonoriltintado pike rompis la melodian kalmecon de iliaj ĉambroj.

– Kiu ĝi estas? – demandis la edzino, kurante el la salono tra antaŭĉambro en sian buduaron.

– Jes, do kiu ĝi estas, – kiel eĥo, pli mallaŭte kaj malrapide, ripetis Pestumskij, irante mem por malfermi la pordon antaŭ la malfrua gasto, kaj konsciante, ke li mem ektimis, li aldonis:

– Neniu povas ankoraŭ veni. Tamen iu estis veninta, ĉar la sonorilo diris tion ankoraŭ pli sonore kaj nedubeble.

Grizkolora vestita, pala kaj grizokula fraŭlino, kvazaŭ revenante en sian hejmon, eniris kaj dummomente haltetante por diri: – Mi venis pro vi, – ŝi invitis Pestumskij-n en la salonon.



Ŝia bela vizaĝo esprimis decidemon, kaj la kaŝita penso severigis siajn karesajn trajtojn.

Pestumskij, restante ial remirigita, kondukis ŝin tra la salono en sian kabineton, kaj tie ili sidiĝis unu kontraŭe de la alia, disbaritaj per la tablo, kiel la rivero inter du bordoj.

– Boriso! – ŝi diris, kaj tiu ĉi nomo, prononcita per ŝia voĉo, simila al de malproksime blovanta varmo, impresis Pestumskij-n, kvazaŭ la suda vento per sia varmega ekblovo estus karesinta lian malvarman koron.

– Boriso, ĉu vi memoras...

– Nataŝa!...

Kaj en tutanima atako de reveninta juneco li salte leviĝis kaj etendis al ŝi siajn manojn, malfermante la animon per infanaj revoj, belkoloraj vesperoj kaj helaj fulmoj de l' unua amo.

– Nataŝa, karulino!

Kaj li ekhavis la deziron, ĉirkaŭkapti ŝin kaj fluge ŝin porti en kapturiga valso; kiel tiam sub firmamento, sur dancoplaco de somerloĝa vilaĝo, kie li konatiĝis kun ŝi kaj dancadis la tutan someron, – eble la plej belan someron de sia vivo.

Ŝi estis malvarme-trankvila, estante lumumita per ia nekonata de Pestumskij lumo. Ŝi neniel per sia persono rememorigis ion malagraban; ilia romano estis akutsenta, sed senkulpa, ŝajnis esti nenio ekster la akuta ĝojo de tiu ĉi vizito, sed Pestumskij subite eksentis malvarmon kaj timon, kiel antaŭ la vizaĝo de l' sorto, kiu estas tuj parolonta.

– Hodiaŭ, Boriso; finiĝas via dudek-sepa jaro, ĉu ne? – demandis ŝi, kontrolante ne sin mem, sed, pli kredeble, lin.

– Jes; ho ne! Ĝi ankoraŭ ne finiĝis; sed estas finiĝonta.

– Kiel?

Ŝiaj okuloj rigidiĝis, kaj la lipoj time ekstremis.

– Post du horoj.

– Ho, ĝi okazos baldaŭ.

Kaj ŝiaj vortoj ekblovis malvarmon en la ĉambron dum unu mallongega, sed premanta momento.

– Ĉu vi memoras la parkon, Boriso?

Kaj denove la sorĉa, malseka kaj varma vento ekblovis el sudo de l' vivo. Ŝi leviĝis, ĉirkaŭiris la tablon kaj, klininte sin super li, metis sur liajn ŝultrojn siajn grandajn kaj molajn manojn. La vizaĝon de Pestumskij tuŝis la freŝiga varmo de ŝia vizaĝo, kaj facilmovi ondetaro de l' ĝojo ekportis lin en malproksiman bluan maron.

Kaj ŝi restis en la sama pozo, spirante kaj rigardante rekte al la pupiloj, kun rapide spiranta kruta brusto, ŝirminte antaŭ li ĉion, kio estis nun ĉirkaŭ li, kaj rememorigante la pasiritecon:

La ondetaro kreskis, kaj pli alten leviĝadis la ondoj de l' neatendita feliĉo kaj, kiel delikata perla ŝaŭmo sur iliaj randoj, sonoris kaj ruligis ŝia apartsona voĉo.

– Ĉu vi memoras ĉion, kaj tiun nokton, post kiu mi dum la tuta tago sentis min malfeliĉa? Ni iris for de la unua aleo, ien pli malproksimen. Mi ekamis vin. Miaj vangoj brulegis pro dezirego. Vi devis min kisi. Vi ja amis min. Mi ja estis bela. Kaj vi tiam ne kisis min. Tiam vi ne estis kisinta. - Ŝi brogis lian vizaĝon per sia spiro. - Vi kisu min nun.

Pestumskij deteneme, ne sen plezuro, per malviglaj movoj proksimigis siajn lipojn, klare videblajn sub la kombitaj lipharoj, al ŝiaj ruĝaj kaj malmolaj lipoj.

Kaj poste ŝi tuj deiris kaj sidiĝis sur la antaŭa loko ĉe la kontraŭa flanko de la tablo. Ĉu nur tio ĉi estas ĉio? Ŝi estis sufiĉe ĉarma, por ke ŝia vizito amuzu Pestumskij-n. Sed li sciis, ke lin atendas la edzino, kaj alprenante duone ŝercan, duone seriozan mienon, li diris:

– Nu, kio estas krome? Ĉu vi venis nur pro la kiso?

– La pluo estas jena.

Kaj ŝi, kiel antaŭe, ne rimarkante lian ŝercan tonon, rigardis per severaj grizkoloraj okuloj, turninte al li sian severtrajtan vizaĝon. Kaj ŝajnis, ke ne okazis tiu ĉi mallongaj amkareso kaj varmo, kun kiuj ŝi estis veninta al li por repreni el la pasinteco la momenton, kiun ŝi posedis. Eĉ kvazaŭ ne estus okazinta, ke ŝi ĵus leviĝis de sur sia sidloko ĉe la alia flanko de la tablo. Pestumskij klare rimarkis tiun ĉi ŝanĝon, kaj al li fariĝis malvarme kaj iom time. Li rigardadis rekte al ŝia vizaĝo kaj iom post iom rememoris ĝin.

Ĝi estis samaspekta, kaj la sep jaroj, kiuj forpasis de post kiam ili renkontis unu la alian, preskaŭ neniom prenis de la freŝeco, nek de la beleco de ŝiaj malsekbrilaj okuloj, ŝia ruĝa buŝo kaj la dikaj, admirinde ĉarmaj vangoj.

Sed la tuta esprimo de l' vizaĝo estis alia ol tiam, kvankam io nedivenebla estis same en ŝia nuna vizaĝo severtrajta kaj decidema, kiel en la tiama moltrajta kaj promesanta. Kio estas? Kaj kial ŝi venis hodiaŭ? Kaj ia antaŭsento de l' rememoro ekstremis en Pestumskij, kiam la gastino, pene interrompante la silenton, rediris:

– La pluo estas jena!

Kaj ŝia voĉo tuj plifortiĝis kaj fariĝis sonora kaj senpasia, kiel tiu de la sorto.

Pestumskij malkviete leviĝis, levis la manojn por eksilentigi ŝin.

Kiel kaptito li subite eksentis sin esti kvazaŭ sub la glavo aŭ sub la fulmo, kiu neeviteble tuj trafos lin. Sed estis jam tro malfrue, kaj ŝi jam diris tion, pro kio ŝi estis veninta. La absurdajn vortojn ŝi eldiris simple, preskaŭ nature:

– Hodiaŭ vi mortos.

Pestumskij volis ekridi per senarta natura rido, kiun aŭdus la edzino kaj enirus tien ĉi, kaj la tuta inkubo malaperus, kaj la gastino fariĝus ĉarma, de longe konata; sed li ne povis eĉ ekrideti pri tiu ĉi stranga ŝerco.

Kaj la gastino plu legis la verdikton:

– Vi estis promesinta al mi, morti hodiaŭ... kun mi.

Kaj la pika, akuta ekrememoro trapenetri la cerbon de Pestumskij.

Li tutkorpe kuntiriĝis kaj profundiĝis en sian fotelon. Jes, jes, estis tia vespero, kiam subite, en la tumulto, meze de l' amaso da somerloĝantoj, al ili fariĝis klara la tuta malpleneco de la vivo, ĝia fatala senceco, anstataŭebla de nenio.

Kaj du junaj animoj, – lia kaj ŝia – kun la tuta sincereco kaj decidemo, simple kaj kuraĝe ekvolis ĉesigi tian vivon.

Ili ankaŭ tiam havus sufiĉe da volforto por sin mortigi, sed tiam la cirkonstancoj estis malfavoraj: ĉirkaŭ ili estis parencoj kaj konatoj, la muziko ludis, kaj baldaŭ dancoj estis komenenciĝontaj; kaj supozeble, krom tio, ie lumetis la kredo: eble poste estos pli bone.

Kaj jen ili estis decidintaj, atendi dum kvin jaroj, ĝis la tago de lia naskiĝo, – la dudeksepa datreveno. -

Pestumskij ĉion ekrememoris tre detale, kaj la koro ekpulsegis pli rapide kaj taktbate sub la malproksima lumo de tiamaj jaroj.

Sed la penetrema voĉo de l' horloĝo, sonoriganta en la manĝosalono la kvaronon, revenigis lin al la nuna vivo, kaj, rapide

sin levante, li diris:

– Estis serĉo. Vi tion certe komprenas. Mi trovis mian vivon, kaj mi povas nur rideti pri la infanaĵo.

Sed li ne povis ekrideti, kaj lia vizaĝo estis malserena pro emocio kaj timo.

La gastino tion komprenis kaj de nove aliris al li. Per delikata gesto de patrino, trankviliganta sian timigitan infanon, ŝi metis sur lian frunton kaj la harojn sian varman manon. Kun serena okulmieno ŝi ekrigardis al liaj okuloj, kaj li ekvidis malgrandajn roserojn brilantajn sur la finoj de ŝiaj longaj okulharoj. Ŝi stariĝis ĉe li tuŝproksime, kaj se ŝi havus flugilon, ŝi tute kovrus lin per ĝia varma lanuga subo.

Ŝi diris, mildigante per voĉtono la maldolĉecon de la vortoj:

– Karulo! Vi ja ne estas trovinta vian idealon en la vivo. Ĉio ĉi estas nur ŝajno. Kaj ĉio restas kiel antaŭe. Ĉu ne?

Sub ŝia varmo kaj kareso lia animo fandiĝis kiel malrapidmovaj, dolĉkaresaj ondoj. Ĉu li povas mensogi? Sed ĉirkaŭe troviĝis molkusenaj hejmecaj mebloj, libroj, kanapo, kaj tie, post la muro, ĉu estis pli hejmece? Kiel li povas rezigni pri ĉio ĉi? Kaj la lipoj kunpremiĝis por ne responpi "jes!" kontraŭvole. - Sed ŝi ne observis liajn lipojn, kaj malgraŭ ĉio sciis, kiel respondos lia animo.

Nun ŝi fariĝis trankvila kaj malĝoja, kiel post serioza kaj malfacila laboro. Ŝi senbrue aliris la tablon kaj ĉe la lumo de l' lampo ion eltiris el sur la brusto. Pestumskij preskaŭ en febra tremado vane penis havigi al sia vizaĝo maskon de l' kvieto por aliri al la gastino kaj ĉesigi la turmentadon. Sed ŝi mem sin deturnis kaj diris same milde kaj zorgeme:

– Al vi estas malfacile, morti kun mi! Ĉu ĝi ne konvenas? Ĝi estas tute indiferenta. Mi foriros kaj mortos sola, sed por vi mi lasos la morton.

Kaj ŝi zorge metis ion malgrandan kaj blankan sur la tablon, kaj la alian, tute samaspektan, ŝi metis en sian mufon. Simplaj kaj certaj estis ŝiaj gestoj, bela kaj severe-malvarma estis ŝia vizaĝo kun harmoniaj trajtoj, kaj kiam ŝi realiris al Pestumskij, ŝiaj paŝoj ekbruis kiel la horloĝo, kiu fakte kaj senredone forprenas la tempon.

– Adiaŭ, - ŝi diris, ne levante la manon por manpremo. Kaj subite ŝi per fleksa, serpenta ekmoviĝo sin alŝovis al li, por kisi per momente flamiĝintaj lipoj lian malvarman frunton.

Li nenion respondis al ŝi, kaj nur post kiam klakbrue fermiĝis la pordo al la ŝtuparo, li komprenis, ke ŝi jam malestas, ke ĉio povas pludaŭri kiel antaŭe.

Li penis ekrememori la krepuskon kaj kareson, el kiuj estis elŝirinta lin la sonorigo de l' gastino, – la okulojn kaj lastajn vortojn de lia edzino, sed ĉion ĉi kaŝis kruda kaj malvarma nebulo. Io alia ekposedis lin nun, kaj li sidiĝis tie, kie li restis staranta: en la angulo de sia kabineto, en malnova fotelo, sur kiu neniam iu sidadis, kaj kiu estis metita tien nur por okupi la lokon. Li neniam vidis sian ĉambron de tie ĉi.

Ĉio ĉi en ĝi ŝanĝiĝis pro la ŝanĝo de l' observopunkto. Por kio estas bezonata tiu ĉi granda, per figuroj ornamita ŝranko kaj la libroj en ĝi, kiuj neniam estis kaj estos legataj de li? Por kio estas necesaj tiuj ĉi masivaj kolonoj de la skribotablo, sur kiu kuŝas du risoj da papero, – sur unu estas komencita romano, kaj ĉu estas io sur la alia? Kaj por kio estas komencita tiu ĉi romano? Ĉu li ne estas dirinta jam ĉion, kion li povis diri?

Por kio estas en lia vivo Voltaire, tiom aroge ridanta, Homer kaj nudpieda Leo Tolstoj, pendantaj sur la muroj en larĝaj kadroj sur videblaj lokoj? Pestumskij mallevis la palpebrojn, ŝirmis la okulojn per la manoj, per la maniko, sed la ruĝa mallumo de l' fermitaj okuloj estis eĉ pli peza, kaj li denove komencis rigardi pro tio, ke li estis preminta la okulojn, la nebulo nun kaŝadis la tutan ĉambron, kaj nur la verda kampo de l' skribotablo sub staranta lampo konturiĝis kiel hela rubando.

Pestumskij senpense, preskaŭ senkonscie, vage rigardadis ĝin, turnante la okulojn de l' surtabla portreto al inkujo, de unu objekto al alia, kaj subite ekvidis en la mezo malgrandan, blankan objekton, certan pri sia rajto kuŝi tie, kie ĝi troviĝis kaj kiu atendadis la momenton, kiam ĝi povos esti uzata.

– Vi hodiaŭ mortos.

– Kia absurdo! – penis sin konvinkigi Pestumskij, ekrememorinte ŝiajn vortojn.

Sed tiu ĉi penso estis mizera, kompatinda simieto kompare al tiu mistera kaj granda besto, kiu nun baraktis en lia animo kiel monstro en kaĝo.

Malgranda blanka objekto, atentante nenion, daŭris kuŝi firme kaj obstine.

Pestumskij povis rigardadi nur ĝin. Ĝi estis, kredeble, malgranda skatoleto, tre zorge farita kaj gluumita per kara brila papero. Pro tio ĝi tiel brilis: La simplajn aĵojn oni ne metas en tiajn skatoletojn. - Oni devas elĵeti ĝin, – pensis Pestumskij, sed li ne kuraĝis leviĝi; kvazaŭ fera multepeza mano ekpemis lian ŝultron antaŭ ol li sukcesis leviĝi. Tiam humile kaj obeeme li denove profundigis en siajn pensojn, kaj kiel grizaj, fajraj nuboj preternaĝis antaŭ li lia vivo. Ĉiuj eksteraj bonaĵoj, kiujn li hodiaŭ matene resumis, tute malbriliĝis kiel la oro sen lumo. la monto ŝirmis la sunon, kaj sub ĝia ombro ekmoviĝis la malvero.

Ĉiuj liaj aferoj en lastaj jaroj, grandaj kaj malgrandaj, ĉiuj noveloj, rakontoj, libroj, ĉiuj konatoj, la edziĝo, infanoj – ĉio ĉi estis nur malvero. Ĉio ĉi okazis nur tial, ke li forgesis pri la plej ĉefa. Aŭ ĉio devas esti tute alia, aŭ nenio devas esti. La akuta ekkompato alfluis al lia gorĝo, kiam li rememoris sin esti en komenco de la vivo kun klaraj pretendoj kaj kuraĝaj agoj. Kial li ne mortis tiam? Subite Pestumskij-n ekkaptis, tia sincera abomeno al ĉio ĉirkaŭanta, ke li tutforte dispuŝis la apogilojn de l' fotelo kaj salte leviĝis el ĝi. Kun daŭresona ekkrako rompiĝis unu apogilo; la figuraj ornamaĵoj

ekŝutiĝis, kaj la rompopecoj senbrue falis sur la molan plankon. Speco de l' ornamfiguraĵo, restinta sur la fino de l' rompita apogilo, dum kelkaj sekundoj kuŝis elstarante antaŭen kaj falis malsupren sur la aliajn.

Pestumskij rapide, per pezaj paŝoj, iradis tra la ĉambro.

– Ŝi estas prava, – li diris al si mem: – mi devas hodiaŭ morti. Tiu ĉi mia mizera belhejma vivado estas sensenca, kaj oni devas ĝin ĉesigi, tuj, kiam oni konvinkiĝis pri tio. Li oblikve ekrigardis al la blanka skatoleto. Ĝi silentis kaj atendis sian tempon. Voltaire ridis sur la tablo.

La horloĝo denove eksonoris. Kaj la objektoj, kun peno akiritaj, denove tentis Pestumskij-n, daŭrigi la komfortan vivon kun la homoj, al kiuj li kutimis, en ĉambroj, kiujn li mem ornamis, kun la pensoj, kiujn li de longe konis.

Iom post iom la tento ekvenkis lin; jen unu, jen alia aĵo renkontiĝas kun lia rigardo; jen unu, jen alia penso revenas en lian kapon, kaj subite Voltaire eĉ pli rimarkeble ekridis sur la muro, inspirante al Pestumskij lastan decidigan konjekton: ŝi, lia vizitintino, ankaŭ ne mortos ja. Pro kio li, juna kaj forta, devas sin mortigi! Ĉu la infana malprudentaĵo povas venki insistan voĉon de l' ruĝa, vivanta sango? Ŝi simple ŝercis, ŝi volis nur iel plej strangmaniere rememorigi pri si. Estus banale, sendi gratulleteron, kaj ŝi elpensis tiun ĉi manieron. Kaj en la skatoleto povas esti nenio.

Pestumskij malkuraĝe proksimiĝis al la tablo, leviĝis piedpinte post la seĝo kaj ekrigardis. Tuŝi ĝin li timis. Sed li jam povis rigardi. La malgranda blankaĵo trankvile brilis sub la lampo sur verda fono. Ĉe unu flanko estis disŝirita ruĝa sigelo. Ekvidinte ĝin, Pestumskij rapide foriris de apud la tablo.

Kaj subite li ektimegis resti sola en la ĉambro kun la morto sur la tablo, kun la rememoraĵoj pri la stranga gastino, kun si mem, perdinta ekvilibron kaj kvieton, kaj perdante la kapablon, sin regi plu, li ekkriis per momento-daŭra laŭta ekkrio, kvazaŭ nevidebla sago



mortige estus vundinta lin. Sed neniu venis pro la krio: dikaj kurtenoj kaj fermitaj pordoj malaŭdigis ĝin. Tiam timo pro sia soleco ekkaptis lin eĉ pli forte, kaj streĉante la restintajn fortojn, li paŝis al la sonorigilo kaj funkciigis ĝin longe kaj interrompe. Responde al la sonorigado post iom da tempo eniris la edzino ial pala kaj malkvieta, kun tremantaj manoj. Kaj kiel fremduloj ili staris unu kontraŭe de la alia, ne sciante, kion diri, kion fari, ne povante plu preni manon unu de l' alia.

– Ĉu vi deziras teon? – ŝi demandis lin per raŭka, tremanta voĉo.

– Jes.

– Mi aŭdis, kiel ŝi foriris. Mi kredis, ke vi estas laboranta...

– Jes, jes, mi laboris. Ne bezonatan malfacilan laboron. Forkonduku min de tie ĉi, prenu min por akompano.

Kaj li proksimiĝis al ŝi. Sed kiel mallertaj, kompare al mutaj karesoj de l' foririnta gastino, estis la karesoj de l' edzino! Kiom ŝi estis konfuzita kaj fremda! Pestumskij flankeniĝis. Ŝi hezitis kaj, videble, volis ion sciigi al li. Li ekrigardis ŝin kaj demandis:

– Sed kio fariĝis al vi?

– Nenio... Nur tie, sur nia ŝtuparo okazis...

– Kio!?

Kaj kurbiĝinte, kun subite enkaviĝintaj okuloj, Pestumskij atendis la respondon, kiel la verdikton pri sia vivo.

– Neniu vidis, kiam ŝi venis?! – kun timo ripetis la edzino.

– Neniu.

– Ŝi falis sur la ŝtuparo...

– Nu?

– Kaj mortis!...

Pestumskij rektiĝis kaj paliĝis. La trajtoj de lia malgrasiĝinta vizaĝo malsulkiĝis kaj fariĝis severaj kiel neniam antaŭe. La edzino plu diris:

– Oni opiniis, ke ŝi estis veninta en supran etaĝon... al studentoj... Ho, Dio, vi ne malkvietiĝu...

Pestumskij, ne aŭskultante ŝin, per rapida fremda ekrigardo ĉirkaŭrigardis sian edzinon, kun kulpa mieno starantan antaŭ li, en simpla vesto, sen deca hararanĝo, kaj diris:

– Ĉu vi preparos teon? Mi tuj foriros.

– Vi venos, – ŝi korektis lin... – Trankviliĝu! Trankviliĝu, karulo! – kaj ŝi mem eliris, subite fariĝinte kvieta, malapide, certa pri ilia feliĉa kaj longa kunvivo tiel same nedubbla kiel pri la venonta nokto. Estis aŭdate, kiel ŝiaj paŝoj preternaĝis en la silento, kaj poste ie ektintis la glasoj.

Per rapidaj, senbrujaj movoj Pestumskij kiel kato ŝtele proksimiĝis al la tablo kaj krampe ekkaptis la skatoleton per longaj fingroj. Li sidiĝis en la fotelo kaj malfermis la skatoleton. Sur la fundo kuŝis brilanta alloga globeto.

Plora grimaco kiel tiu de infano, kies ludilon oni forprenas, sulkiĝis lian vizaĝon, kiam liaj akrakonturaj lipoj kaŝis post si la brilantan globeton.

Li plenumis la promeson.

Malrapide kaj solene eksonoris super li la horloĝo, finigante la dudek-sepan kaj lastan jaron de lia vivo.

# RIKKI-TIKKI-TAVI

Rudyard Kipling

elangligis Don Harlow

*(el La Ĝangala Libro)*

Jen la historio pri la granda milito, kiun Rikki-Tikki-Tavi tute sola entreprenis, tra la banejoj de la granda bangalo en kazerno Segoli. Darzi, la tajlorbirdo, helpis lin, kaj Ĉuĉundra, la miogalo, kiu neniam aperas meze de la planko sed ĉiam rampas apud la muro, konsilis lin, sed la veran bataladon faris Rikki-Tikki.

Li estis mungo, iom simila pro felo kaj vosto al kateto, sed kape kaj kutime musteleca. Rozkoloraj estis liaj okuloj kaj la pinto de lia maltrankvila nazo; li povis skrapo al si ie ajn, laŭplaĉe, per iu ajn kruro, aŭ antaŭa aŭ malantaŭa, kiun li elektis uzi; li povis hirtigi la voston ĝis ĝi similis al kalistemo, kaj lia militokrio, dum li trakuris la longan herbaron, estis: "Rikk-tikk-tikki-tikki-tĉk!"

Iun tagon, profunda somera inundo elflosigis lin el la truo, en kiu li loĝis kun la gepatroj, kaj portis lin, piedflirtantan kaj klukantan, al apudvoja sulko. Tie li trovis flosantan herbareton, kaj tenis tion ĝis li perdis konscion. Kiam li rekonsciigis, li estis kuŝanta meze de ĝardeno promenejo, tre taŭzite, kaj iu knabeto estis diranta: "Jen mortinta mungo. Ni funebru ĝin."

"Ne," diris lia patrino; "ni enportu kaj sekigu ĝin. Eble ĝi ankoraŭ ne mortis."

Ili portis lin en la domon, kaj iu grandulo levis lin inter fingro kaj dikfingro kaj diris, ke li ne estas mortinta, nur duone strangolita; do ili

volvis lin en kotono, kaj varmigis lin, kaj li malfermis la okulojn kaj ekternis.

"Nu," diris la grandulo (*li estis anglo, ĵus translokiĝinta en tiun bangalon*); "ne timigu ĝin, kaj ni vidos, kion ĝi faros."

Estas ege malfacile timigi mungon, ĉar tiu estas plenŝtopita inter nazo kaj vosto per scivolemo. La blazono de la tuta munga familio estas, "Alkuru kaj eksciu"; kaj Rikki-tikki ja estis mungo. Li rigardis la kotonon, decidis, ke ĝi ne konvenas kiel manĝaĵo, ĉirkaŭkuris sur la tablo, eksidis kaj ordigis la felon, skrapis sin, kaj saltis sur la ŝultron de la knabeto.

"Ne timu, Teĉjo," diris la patro. "Tiel ĝi amikiĝas."

"Ve! Ĝi tiklas sub mia mentono," diris Teĉjo.

Rikki-tikki rigardis inter la kolumo kaj kolo de la knabo, snufis je la orelo, kaj degrimpis al la planko, kie li sidis kaj frotis al si la nazon.

"Pro Dio," diris la patrino de Teĉjo, "kaj tiu estas sovaĝa bestio! Mi supozas, ke ĝi kondutas tiel malsovaĝe, ĉar ni bone traktis ĝin."

"Tiaj estas ĉiaj mungoj," diris la edzo. "Se Teĉjo ne provos pluki ĝian voston, kaj ne metos ĝin en kaĝon, ĝi en- kaj el-kuros la domon la tutan tagon. Ni donu al ĝi ion por manĝi."

Ili donis al li iomete da nekuirita viando. Tio ege plaĉis al Rikki-tikki, kaj, fininte ĝin, li eliris sur la verandon kaj sidis en la sunlumo kaj hirtigis la felon por ĝisradike sekigi ĝin. Tiam li sentis pli bone.

"Estas multaj aliaj aferoj por eltrovi pri ĉi tiu domo," li diris al si, "ol mia tuta familio povus malkovri dum la tutaj vivoj. Mi certe restos por ekscii."

Li pasigis la tutan tagon vagante tra la domo. Li preskaŭ dronis sin en la bankuvoj, metis sian nazon en la enkon sur skribtablo, kaj brulvezikigis ĝin ĉe la cigaro de la grandulo, ĉar li grimpis sur

la krurojn de la grandulo por lerni pri la skribarto. Je noktiĝo li kuris en la infanejon de Teĉjo kontroli, kiel oni fajrigas la kerosenajn lanternojn, kaj kiam Teĉjo enlitiĝis, ankaŭ Rikki-tikki algrimpis; sed li estis neripozema kunulo, ĉar li devis ekstari kaj atenti ĉiun brueton tra la tuta nokto, kaj ekscii, kio produktis ĝin. Fine envenis la gepatroj de Teĉjo, por rigardi sian filon, kaj Rikki-tikki maldormis sur la kapkuseno. "Tio ne plaĉas al mi," diris la patrino de Teĉjo; "ĝi eble mordos la knabon." "Nenion tian ĝi faros," diris la patro. "Teĉjo estas pli sekura kun tiu besteto ol se li havus snufhundon por gardi lin. Se serpento nun envenus la infanejon --"

Sed la patrino de Teĉjo rifuzis pripensi ion ajn tiel teruran.

Frumatene Rikki-tikki venis al frua matenmanĝo sur la verando, rajdante sur la ŝultro de Teĉjo, kaj ili donis al li bananaĵon kaj iom da boligita ovo; kaj li sidis sur iliaj kruroj, unu post alia, ĉar ĉiu bone edukita mungo ĉiam esperas iam fariĝi domomungo, kaj posedi ĉambrojn en kiuj kuradi, kaj la patrino de Rikki-tikki (*ŝi iam loĝis en la domo de la Generalo ĉe Segoli*) zorge instruis al Rikki, kion fari se li iam renkontus blankulojn.

Tiam Rikki-tikki eliris en la ĝardenon por vidi tion, kio estis videbla. Ĝi estis granda ĝardeno, nur duone kultivata, kun arbustoj somerdome grandaj: rozoj "Marŝalo Niel", limonaj kaj oranĝaj arboj, bambuaroj, kaj veprejoj de alta herbaro. Rikki-tikki lekis al si la lipojn. "Jen belega ĉasejo," li diris, kaj lia vosto kalisteme hirtiĝis je tiu penso, kaj li trakuradis la ĝardenon, dise snufante ĝis li aŭdis tre malgajajn voĉojn en dorno-arbusto.

Estis Darzi, la tajlorbirdo, kaj lia edzino. Ili estis konstruintaj belegan neston per kuntirado de du grandaj folioj kaj kudrado ĉe la randoj per fibroj, kaj estis plenigintaj la kavaĵon per kotono kaj plumetaro. La nesto balanciĝis flanke-flanken dum ili sidis sur la supro kaj ploregis.

"Kio pasas?" demandis Rikki-tikki.

"Ni ege mizeras," diris Darzi. "Unu el niaj etuloj hieraŭ elfalis el la nesto, kaj Nag manĝis lin."

"Hm!" diris Rikki-tikki, "tio ja estas malgajiga -- sed mi estas noveveninto. Kiu estas Nag?"

Darzi kaj lia edzino nur kaŭris en la nesto, ne respondante, ĉar el la densa herbaro malsupre de la arbusto aŭdiĝis mallaŭta siblado -- terura, frostiga sono, kiu igis al Rikki-tikki resalti preskaŭ unu plenan metron. Poste, centimetron post centimetro, el la herbaro leviĝis la kapo kaj disvastigita kapuĉo de Nag, la granda nigra kobro, kaj li estis longa preskaŭ du metrojn de lango ĝis ventro. Levinte sian trionon de la tero, li staris balanciĝante flanke-flanken, same kiel la leontoda tufo balanciĝas en la vento, kaj li rigardis al Rikki-tikki per tiuj fiaj serpentaj okuloj, kiuj neniam ŝanĝas sian rigardon, kion ajn pripensu la serpento.

"Kiu estas Nag?" li diris. "Mi estas Nag. La granda dio Bram metis sian signon sur ĉiuj el nia popolo, kiam la unua kobro disetendis la kapuĉon por ŝirmi Bramon kontraŭ la suno dum li dormis. Rigardu vi, kaj timu!"

Li pli ol antaŭe disetendis sian kapuĉon, kaj Rikki-tikki vidis sur la malantaŭo la okulvitran insignon, kiu tute similas al la okula parto de hokokula ligilo. Dum minuto li timis; sed estas neeble, ke mungo longe timu, kaj kvankam Rikki-tikki neniam antaŭe renkontis vivantan kobron, lia patrino tamen nutris lin per mortintaj, kaj li sciis, ke la metio de plenkreska mungo estas, batali kaj manĝi serpentojn. Ankaŭ Nag sciis tion, kaj funde de sia frida koro li timis.

"Nu," diris Rikki-tikki, kaj lia vosto rekomencis hirtiĝi, "kun aŭ sen signoj, ĉu vi opinias, ke estas juste, ke vi manĝu etulojn el nesto?"

Nag pensadis en si, kaj rigardis la plej etan moviĝon de la herbaro malantaŭ Rikki-tikki. Li sciis, ke mungoj en la ĝardeno pli-malpli frue signifos morton por li kaj por lia familio, sed li volis iomete trankviligi je Rikki-tikki. Do li iomete faligis la kapon, kaj flanken klinis ĝin.

"Ni diskutu," li diris. "Vi manĝas ovojn. Kial mi ne manĝu birdojn?"

"Malantaŭe! Gardu malantaŭe!" kantis Darzi.

Rikki-tikki sciis pli bone ol malŝpari la tempon por kontroli. Li saltis en la aeron kiel eble plej alte, kaj ĝuste sub li ĵetiĝis la kapo de Nagaina, la fia edzino de Nag. Ŝi estis rampanta malantaŭ lin dum li parolis, por fini lin, kaj li aŭdis ŝian sovaĝan eksiblon kiam la bato maltrafis. Li refalis preskaŭ sur ŝian dorson, kaj se li estus maljuna mungo li sciis, ke jen la tempo por rompi al ŝi la dorson per unu mordoj; sed li timis la teruran retrofrapon de la kobro. Li ja mordis, sed ne sufiĉe longe, kaj li saltis for de la flirtiĝanta vosto, lasante ŝiritan kaj koleran Nagainan.

"Aĉa, fia Darzi!" diris Nag, celante kiel eble plej alte al la nesto en la dornarbusto; sed Darzi konstruis ĝin preter la atingo de serpentoj, kaj ĝi nur balanciĝis.

Rikki-tikki sentis ruĝiĝon kaj varmiĝon de la okuloj (*kiam la okuloj de mungo ruĝiĝas, tiu estas kolera*), kaj li residis sur la vosto kaj postaj kruroj kiel kangurueto, kaj ĉirkaŭrigardis kaj babiladis pro kolerego. Sed Nag kaj Nagaina jam malaperis en la herbaron. Kiam serpento misfrapas, ĝi neniam diras ion ajn, aŭ iel ajn indikas, kion ĝi intencas poste fari. Rikki-tikki ne volis sekvi ilin, ĉar li ne certis, ke li povas samtempe trakti du serpentojn. Do li fortrotis al la grua promenejo apud la domo, kaj eksidis por pensadi. Jen serioza afero por li.

Se vi legos la antikvajn librojn pri la natura scienco, vi trovos en ili, ke mungo mordita dum batalo kontraŭ serpento forkuras kaj manĝas ian plantaĵon kiu resanigas ĝin. Tio ne estas vera. La venko estas nur afero de okula kaj pieda lertecoj -- frapo de serpento kontraŭ salto de mungo -- kaj, ĉar neniu okulo povas sekvi la movon de la serpenta kapo dum la frapo, la afero estas des pli mirinda ol ia ajn magia plantaĵo. Rikki-tikki sciis, ke li estas juna mungo, kaj pro tio li estis des pli feliĉa, ke li sukcesis eskapi de malantaŭa frapo. Tio donis al li memfidon, kaj kiam Tecjo venis kurante laŭ la promenejo, Rikki-tikki estis preta por kareso.

Sed ĝuste kiam Teddy klinis sin, io movetigix en la polvo, kaj voĉeto diris: "Gardu vin. Mi estas morto!" Tiu estis Karait la bungaro, la polve bruna serpenteto kiu preferas kuŝi sur la polva grundo; kaj lia mordo estas same danĝera kiel tiu de kobro. Sed li estas tiel eta, ke neniu atentis lin, kaj tial li des pli damaĝas la homojn.

Denove ruĝiĝis la okuloj de Rikki-tikki, kaj li dancis al Karait per tiu stranga balanca movado, kiun li heredis de sia familio. Ĝi estas tre amuza movado, sed estas tiel perfekte ekvilibra paŝmaniero, ke oni povas desalti de ĝi en iu ajn direkto; kaj, traktante serpentojn, tio estas avantaĝa. Rikki-tikki ne sciis tion, ke li kondukas pli danĝeriĝe ol batali kontraŭ Nag, ĉar Karait estas tiel eta, kaj povas turni sin tiel rapide, ke se Rikki ne mordus lin apud la malantaŭo de la kapo, li povus redoni frapon je la okulo aŭ lipo. Sed tion Rikki ne sciis: liaj okuloj estis tute ruĝaj, kaj li balanciĝadis, sercante bonan tenlokon. Karait ekfrapis. Rikki saltis flanken kaj provis alkuri, sed la fia, polve griza kapeto refrapis ĝis tute apud la ŝultro, kaj li devis transsalti la korpon, kaj la kapo proksime sekvis liaj kalkanojn.

Teĉjo kriis al la domo: "Ho, rigardu! Nia mungo mortigas serpenton"; kaj Rikki-tikki aŭdis ekkrion de la patrino de Teĉjo. La patro elkuris kun bastono, sed kiam li atingis la lokon, Karait estis jam frapinta unu fojon tro ambicie, kaj Rikki-tikki estis saltinta sur la dorson de la serpento, faliginta la kapon inter la antaŭkruroj, mordinta kiel eble plej alte ĉe la dorso, kaj forruliĝinta. Tiu mordo paralizis Karaiton, kaj Rikki-tikki estis tuj manĝonta lin de la vosto, laŭ la vespermanĝa kutimo de lia familio, kiam li rememoris, ke plena manĝo malrapidigas mungon, kaj se li volos teni pretaj siajn fortecon kaj rapidecon, li devos resti maldika.

Li foriris por polvbani sin sub la ricinacoj, dum la patro de Teĉjo batadis la jam mortintan Karait. "Kiel tio utilas?" pensis Rikki-tikki. "Mi jam metis punkton al la afero"; kaj tiam la patrino de Teĉjo levis lin de la polvo kaj karesis lin, kriante, ke li savis Teĉjon de la morto, kaj la patro de Teĉjo diris, ke li estas didonaco, kaj Teĉjo rigardis la tuton el larĝaj, timantaj okuloj. Al Rikki-tikki iom amuzis la bruon,



kiun li kompreneble ne komprenis. La patrino de Teĉjo egale juste povus karesi Teĉjon pro ludi en la polvo. Rikki entute ĝuis ĉion.

Tiun vesperon, ĉe la vespermanĝo, promenante inter la vinglasoj sur la taglo, li povus trioble ŝtopi sin per bonaĵoj; sed li rememoris Nagon kaj Nagainan, kaj kvankam estis tre kontentigi esti karesata kaj dorlotata de la patrino de Teĉjo, kaj sidi sur la ŝultro de Teĉjo, tamen liaj okuloj fojfoje ruĝiĝis kaj li sonigis sian longan batalkrion "Rikk-tikk-tikki-tikki-tĉk!"

Teĉjo forportis lin al la lito, kaj insistis, ke Rikki-tikki dormu sub lia mentono. Rikki-tikki estis tro ĝentila por mordi aŭ skrapi, sed tuj post kiam Teĉjo ekdormis, li forkuris al sia ĉiunokta promeno ĉirkaŭ la domon, kaj en la mallumo li renkontis Ĉuĉundran, la miogalon, kiu rampis apud la muro. Ĉuĉundra estas bedaŭrema besteto. Li krietas kaj ĉirpas la tutan nokton, provante decidi kuri al la ĉambromezo, sed tion li neniam atingas.

"Ne mortigu min," diris la preskaŭ ploranta Ĉuĉundra. "Rikki-tikki, ne mortigu min."

"Ĉu vi supozas, ke serpentomortigisto mortigas la miogalojn?" malestime diris Rikki-tikki.

"Kiu mortigas serpentojn, tiujn mortigas serpentojn," diris Ĉuĉundra, pli bedaŭreme ol iam ajn. "Kaj kiel mi povas certi, ke Nag neniam en iu senluma nokto missupozos min vi?"

"Tute ne estas danĝero," diris Rikki-tikki; "sed Nag estas en la ĝardeno, kaj mi scias, ke vi ne iras tien."

"Mia kuzo Ĉua, la rato, diris al mi --" diris Ĉuĉundra, kaj tuj ĉesis.

"Diris kion?"

"Ts! Nag estas ĉie, Rikki-tikki. Vi devis interparoli kun Ĉua en la ĝardeno."

"Tion mi ne faris -- do vi diru al mi. Tuj, Ĉuĉundra, alie mi mordos vin!"

Ĉuĉundra eksidis kaj ploris ĝis la larmoj forruliĝis de la lipharoj. "Mi estas povrulo," li ploregis. "Neniam mi kuraĝis alkuri la ĉambromezon. Ts! Mi diru nenion al vi. Ĉu vi ne povas aŭdi, Rikki-tikki?"

Ekaŭskultis Rikki-tikki. La domo estas kiel eble plej silenta, sed li pensis povi rimarketi plej mallaŭtan skrap-skrapadon de la tuta mondo -- bruon ne pli laŭtan ol tiun de vespo promenanta sur fenestro -- la sekan skrapadon de serpentaj skvamoj sur brikaro.

"Jen Nag aŭ Nagaina," li diris al si; "kaj tiu rampas en la kloakon de la banejo. Vi pravas, Ĉuĉundra; mi ja devis inerparoli kun Ĉua."

Li ŝteliris al la banejo de Teĉjo, sed nenio troviĝis tie, kaj poste al la banejo de la patrino de Teĉjo. Funde de la glata stikita muro videblis briko eltirita por fari kloakon por la banakvo, kaj kiam Rikki-tikki enŝteliĝis apud la masonaĵa ŝirmaĵo kie estas la kuvo, li aŭdis Nagon kaj Nagainon kunfluŝtantajn ekstere sub la luno.

"Kiam la domo estas senhoma," diris Nagaina al la edzo, "li devos foriri, kaj tiam la ĝardeno denove estos nia. Silente eniru, kaj ne forgesu, ke la unua mordas la granda homo, kiu mortigis Karaiton. Poste elvenu kaj informi min, kaj ni kune serĉos por Rikki-tikki."

"Sed ĉu vi certas, ke ni povas gajni ion per mortigado de la homoj?" diris Nag.

"Ĉion. Kiam ne estis homoj en la bangalo, ĉu troviĝis mungo en la ĝardeno? Dum la bangalo malplenas, ni estas gereĝoj de la ĝardeno; kaj memoru, ke kiam niaj ovoj en la melonejo naskos (*eble eĉ morgaŭ*), niaj gefiloj bezonos spacon kaj trankvilecon."

"Tion mi ne pripensis," diris Nag. "Mi iros, sed ne necesas, ke ni poste ĉasu je Rikki-tikki. Mi mortigos la grandan homon kaj ties

edzinon, kaj ankaŭ la infanon se eble, kaj silente forvenos. Tiam la banngalo malplenos, kaj Rikki-tikki foriros."

Rikki-tikki tuj jukis pro kolerego kaj malamo pri tio, kaj tiam la kapo de Nag aperis tra la kloako, kaj sekvis du metrojn da malvarma korpo. Kvankam kolerega, Rikki-tikki tamen timegis, vidante la grandecon de la kobrego. Nag volvis sin, levis la kapon, kaj trarigardis la banejon en la mallumo, kaj Rikki povis vidi la glimadon de liaj okuloj.

"Nu, se mi mortigos lin ĉi tie, Nagaina scios; kaj se mi batalos kontraŭ li sur la vasta planko, li estos la favorato. Kion mi faru?" diris Rikki-tikki-tavi.

Nag ondumis tien-reen, kaj tiam Rikki-tikki aŭdis lin trinki el la plej granda akvujo, kiun oni uzis por plenigi la kuvon. "Tio estas bona," diris la serpento. "Nu, kiam oni mortigas Karaiton, la granda homo havis bastonon. Eble li ankoraŭ havas tiun bastonon, sed kiam li venos por matene bani sin, li ne havos bastonon. Mi atendos ĉi tie ĝis li venos. Nagaina -- ĉu vi aŭdas min? -- mi atendos ĉi tie en la malvarmeco ĝis la tago."

Nenia respondo venis de ekstere; do Rikki-tikki sciis, ke Nagaina jam foriris. Nag revolvis sin, volvaĵon post volvaĵo, ĉirkaŭ la ŝvelaĵo funde de la akvujo, kaj Rikki-tikki restis morte senmova. Post unu horo li komencis moveti sin, muskolon post muskolo, al la ujo. Nag dormis, kaj Rikki-tikki rigardis ties grandan dorson, scivolante, kie li plej bone povos ekkapti. "Se mi ne rompos lian dorson je la unua salto," diris Rikki, "li ankoraŭ povos lukti; kaj se li luktos -- ho Rikki!" Li rigardis la dikecon de la nuko sub la kapuĉo, sed tio estis tro; kaj mordo apud la vosto nur kolerigus Nagon.

"Ĝi estu la kapo," li finfine diris; "la kapo super la kapuĉo; kaj, fininte tie, mi tute ne delasu."

Tuj li eksaltis. La kapo kuŝis iomete for de la akvujo, sub ĝia kurbiĝo; kaj, kiam liaj dentoj kuntiriĝis, Rikki metis sian dorson kontraŭ la ŝvelaĵo de la ruĝa poto por teni la kapon malsupre. Tio

donis al li nur unu sekondon da teno, kaj li kiel eble plej bone uzis ĝin. Poste li estis batata tien-reen kvazaŭ raton skuas hundo -- tien-reen sur la planko, supren-malsupren, kaj rondiren laŭ larĝaj cirkoj; sed liaj okuloj estis ruĝaj, kaj li forte tenis dum la korpo vipiĝis laŭ la planko, renversante la stanan ĉerpilon kaj la sapujon kaj la haŭtgrosilon, kaj frapiĝis kontraŭ la stana kuvo. Tenante, li pli kaj pli forte fermis sian makzelojn, ĉar li certis, ke li estos ĝismorte batita, kaj honore al sia familio li preferis troviĝi kun la dentoj kunigitaj. Li sentis vertiĝon, dolorojn, kaj ĝismortan skuiĝon kiam io ektondris malantaŭ li; varma vento sensentigis lin kaj ruĝa fajro bruligis lian felon. La grandan homon vekis la bruo, kaj tiu pafis ambaŭ tubojn de ŝprucpapilo kontraŭ Nag ĝuste malantaŭ la kapuĉo.

Rikki-tikki tenis kun fermitaj okuloj, ĉar li nun certis, ke li estas mortinta; sed la kapo ne moviĝis, kaj la granda homo levis lin kaj diris: "Jen la mungo denove, Alice; la etulo ĵus savis al ni la vivojn." Tiam envenis la patrino de Teĉjo kun tre pala vizaĝo, kaj vidis la restaĵon de Nag, kaj Rikki-tikki trenis sin al la dormoĉambro de Teĉjo kaj pasigis duonon de la cetera nokto, tenere skuante sin por ekscii, ĉu li vere estas kvardekoble dispecigita, kion li supozis.

Kiam venis la mateno, li sentis sin tute rigida, sed kontenta pro la faroj. "Nun mi devos trakti Nagainan, kaj ŝi estos pli danĝera ol kvin Nagoj, kaj mi tute ne scias, kiam naskos la ovoj, kiujn ŝi menciis. Nu, bone! Mi devos iri por vidi Darzion," li diris.

Ne atendinte la matenmanĝon, Rikki-tikki alkuris la dornarbuson, kie Darzi triumfe kantis per laŭta voĉo. Tra la tuta ĝardeno disflugis la informo pri la morto de Nag, ĉar la balaisto jam ĵetis la kadavron sur la rubamason.

"Ha, stulta plumtufo!" kolere diris Rikki-tikki. "Ĉu jam estas tempo por kanti?"

"Nag mortis, mortis, mortis!" kantis Darzi. "La brava Rikki-tikki kapkaptis lin kaj forte tenis. La granda homo alportis la pumbastonon kaj Nag falis en du pecoj! Neniam plu li manĝos miajn bebojn."

"Tute vere; sed kie estas Nagaina?" diris Rikki-tikki, zorge ĉirkaŭrigardante.

"Nagaina venis al la baneja kloako kaj alvokis Nagon," Darzi daŭrigis; "kaj Nag elvenis sur la pinto de bastoneto -- la balaisto levis lin sur pinto de bastoneto kaj ĵetis lin sur la rubamason. Ni kantu pri la granda, la ruĝokula Rikki-tikki!" kaj Darzi plenigis al si la gorĝon kaj ekkantis.

"Se mi povus atingi vian neston, mi elrulus ĉiujn viajn bebojn!" diris Rikki-tikki. "Vi ne scias, kiam kondukti ĝuste je la ĝusta tempo. Vi ja estas sufiĉe sekura tie en via nesto, sed ĉi tie, por mi estas milito. Darzi, ĉesu kanti dum minuto."

"Pro la granda, la bela Rikki-tikki mi ĉesos," diris Darzi. "Kio estas, ho Mortiginto de la terura Nag?"

"La trian fojon, kie estas Nagaina?"

"Sur la rubamaso apud la ĉevalejo, funebrante Nagon. Granda estas Rikki-tikki kun la blankaj dentoj."

"Al diablo miaj blankaj dentoj! Ĉu vi informiĝis, kie ŝi deponis siajn ovojn?"

"En la melonejo, ĉe la flanko apud la muro, kie la suno trafas preskaŭ la tutan tagon. Ŝi lasis ilin tie antaŭ tri semajnoj."

"Kaj vi neniam pensis, ke valoras informi min? La flanko apud la muro, vi diris, ĉu?"

"Rikki-tikki, ĉu vi manĝos ŝiajn ovojn?"

"Ne precize manĝi; ne. Darzi, se vi ne havas eĉ grajnon da saĝeco, vi forflugos al la ĉevalejo kaj pretekstos, ke via flugilo estas rompita, kaj permesos al Nagaina persekuti vin ĝis ĉi tiu arbusto! Mi devos atingi la melonejon, kaj se mi irus tien nun, ŝi vidus min."

Darzi estis klapkapa etulo, kiu neniam povis teni en la kapo pli ol unu ideon; kaj, ĉar li sciis, ke la idoj de Nagaina naskiĝis el ovojn same kiel la liaj, li komence ne opiniis, ke estas juste mortigi ilin. Sed lia edzino estis saĝa birdino, kaj ŝi sciis, ke la ovojn de kobroj signifas postajn kobridojn; tial ŝi forflugis de la nesto, kaj lasis al Darzi varmigi la bebojn, kaj daŭrigi sian kanton pri la morto de Nag. Darzi kelkmaniere tre similis al viro.

Ŝi flirtiĝis antaŭ Nagaina apud la rubamaso, kaj elkriis, "Ha, mia flugilo estas frakasita! La knabo en la domo ĵetis al mi ŝtonon kaj frakasis ĝin." Kaj tiam ŝi pli senespere ol iam flirtiĝis.

Nagaina levis la kapon kaj elsiblis, "Vi avertis al Rikki-tikki kiam mi intencis mortigi lin. Vi ja elektis malbonan lokon por lamiĝi." Kaj ŝi rampis al la edzino de Darzi, glitante tra la polvon.

"La knabo frakasis ĝin per ŝtono!" kriĉis la edzino de Darzi.

"Nu! Konsolu vin mortintan tio, ke mi venĝos vin ĉe la knabo. Mia edzo ĉimatene kuŝas sur la rubamaso, sed la knabo en la domo antaŭnokte kuŝos tre senmove. Kiel utilas fuĝi? Mi certe kaptos vin. Stultulineto, rigardu min!"

La edzino de Darzi sufiĉe saĝis por ne fari tion, ĉar birdo rigardante la okulojn de serpento tiom ektimas, ke ŝi ne povas moviĝi. La edzino de Darzi plufirtiĝis, ploreme pepante, kaj neniam delasante la teron, kaj Nagaina plirapidigis sin.

Rikki-tikki aŭdis ilin iri laŭ la vojo de la ĉevalejo, kaj li rapidegis al la flanko de la melonejo apud la muro. Tie, en la varma rubaĵo ĉirkaŭ la melonoj, tre ruze kaŝitajn, li trovis dudek-kvin ovojn, same grandajn kiel tiujn de koketo, sed kun blankeca haŭto anstataŭ integumento.

"Ja ne unu tagon tro frue mi venas," li diris; ĉar li povis vidi, volvigintajn interne, la kobridojn, kaj li sciis, ke naskiĝinte ili tuj povos mortigi homon aŭ mungon. Li kiel eble plej rapide formordis la suprojn de la ovojn, zorgante kaĉigi la kobridojn, kaj fojfoje fosis

en la rubaĵo por kontroli, ĉu li maltrafis iun. Finfine restis nur tri ovoj, kaj Rikki-tikki komencis ridi al si, kiam li aŭdis la kriegadon de la edzino de Darzi:

"Rikki-tikki, mi antaŭis Nagainan al la domo, kaj ŝi eniris la verandon, kaj -- ho, venu rapide -- ŝi intencas mortigi!"

Rikki-tikki frakasis du ovojn, kaj falis malantaŭen laŭ la melonejo kun la tria ovo ankoraŭ en la buŝo, kaj rampkuris al la verando, tiel rapide, kiel li povis meti piedon sur la teron. Teĉjo kaj liaj gepatroj sidis tie ĉe frua matenmanĝo; sed Rikki-tikki vidis, ke ili manĝas tute nenion. Ili sidis ŝtonigitaj, kaj iliaj vizaĝoj estis palaj. Nagaina estis volvita sur la mato apud la seĝo de Teĉjo, frapoproksima al la nuda kruro de Teĉjo, kaj ŝi balancis tien-reen kaj triumfe kantis.

"Filo de la granda homo kiu mortigis Nagon," ŝi siblis, "ne movu vin. Mi ankoraŭ ne estas preta. Atendu momenton. Restu senmova, ĉiuj tri. Se vi moviĝos, mi frapos, kaj se vi ne moviĝos, mi frapos. Ho, stultaj homoj, kiuj mortigis mian Nagon!"

La okuloj de Teĉjo estis fiksitaj al la patro, kaj la patro povis nur flustri, "Sidu senmove, Teĉjo. Vi ne movu vin. Teĉjo, ne moviĝu."

Tiam Rikki-tikki venis kaj kriis: "Turnu vin, Nagaina; turnu vin kaj batalu!"

"Kiam taŭgos," ŝi diris, ne movante la okulojn. "Mi baldaŭ finos la konton ĉe vi. Rigardu viajn geamikojn, Rikki-tikki. Ili estas palaj kaj senmovaj; ili timas. Ili ne kuraĝas movi sin, kaj se vi venos unu paŝon pli proksimen, mi frapos."

"Kontrolu viajn ovojn," diris Rikki-tikki, "en la melonejo apud la muro. Iru kaj kontrolu, Nagaina."

La granda serpento duone turnis sin, kaj ekvidis la ovon sur la verando. "Ha! Donu ĝin al mi," ŝi diris.

Rikki-tikki lokigis siajn piedojn po unu ĉe ĉiu flanko de la ovo, kaj liaj okuloj estis sangoruĝaj. "Kiom valoras serpentovo? Kobrido? Juna kobroreĝo? La fina -- la tute fina el la kovularo? La formikoj manĝas la ceterajn ĉe la melonejo."

Nagaina rapide ekturnis sin, forgesante ĉion alian pro tiu unusola ovo; kaj Rikki-tikki vidis la patron de Teĉjo elĵeti grandan manon, ekkapti Teĉjon ĉe la ŝultro, kaj treni lin trans la tableton kun la tetasoj, sekuran kaj neatingeblan de Nagaina.

"Trompita! Trompita! Trompita! Rikk-tck-tck!" klukridis Rikki-tikki. "La knabo estas ekster danĝero, kaj estis mi -- mi -- mi kiu kaptis Nagon ĉe la kapuĉo, hieraŭ nokte, en la banejo." Tiam li komencis saltadi, kun la kvar piedoj kune kaj la kapo apud la planko. "Li ĵetis min tien- reen, sed li ne povis forskui min. Li jam mortis antaŭ ol la granda homo dispafis lin. Mi faris tion. Rikki-tikki-tck-tck! Do venu, Nagaina. Venu kaj batalu kontraŭ mi. Nelonge vi estos vidvino."

Nagaina vidis, ke jam forpasis la okazo mortigi Teĉjon, kaj la ovo kuŝis inter la piedoj de Rikki-tikki. "Donu al mi la ovon, Rikki-tikki. Donu al mi la restantan el miaj ovojn, kaj mi foriros, kaj neniam revenos," ŝi diris, faldante la kapuĉon.

"Jes, vi foriros, kaj vi neniam revenos; ĉar vi iros sur la rubamason kun Nag. Batalu, vidvino! La granda homo jam iris por sia pafilo! Batalu!"

Rikki-tikki saltadis ĉie ĉirkaŭ Nagaina, restante ĝuste ekster la frapdistanco, kaj liaj okuletoj estis kiel ardaĵ braĝoj. Nagaina kuntiris sin, kaj ĵetis sin kontraŭ lin. Rikki-tikki saltis supren kaj malantaŭen. Ree kaj ree kaj ree ŝi frapis, kaj ĉiun fojon ŝia kapo frapbatis la maton de la verando kaj ŝi kuntiriĝis kiel horloĝo- risorto. Tiam Rikki-tikki ronde dancis por iri malantaŭ ŝin, kaj Nagaina rotaciis por teni sian kapon al lia kapo, kaj la susurado de ŝia vosto sur la mato havis la sonon de sekaj folioj bloviĝantaj en vento.

Li forgesis la ovon. Ĝi ankoraŭ kuŝis sur la verando, kaj Nagaina pli kaj pli proksimiĝis al ĝi, ĝis finfine, dum Rikki-tikki enspiris,



ŝi ekkaptis ĝin en la buŝo, turnis sin al la veranda ŝtuparo, kaj sage fuĝis laŭ la vojeto, dum Rikki-tikki persekutis. Kiam la kobrino fuĝas por savi al si la vivon, ŝi iras kiel vipo sur la nuko de ĉevalo.

Rikki-tikki sciis, ke li devos kapti ŝin, alie la malfacilaĵoj poste rekomenciĝos. Ŝi rekte celis la longan herbaron apud la dornarbusto, kaj Rikki-tikki kurante povis aŭdi Darzion, kiu ankoraŭ kantis sian stultan triumfokanteton. Sed pli saĝa estis la edzino de Darzi. Ŝi forflugis de la nesto kiam Nagaina alproksimiĝis, kaj flirtis la flugilojn ĉirkaŭ la kapo de Nagaina. Se Darzi estus helpinta, ili eble estus turnintaj ŝin; sed Nagaina nur malaltigis la kapuĉon kaj pluiris. La momenta prokrasto tamen lasis al Rikki-tikki atingi ŝin, kaj kiam ŝi plongis en la ratotruon, kie ŝi kaj Nag loĝis, liaj blankaj dentetoj estis jam kuntiritaj en ŝia vosto, kaj li eniris kun ŝi -- kaj malmultaj mungoj, kiel eble plej maljunaj kaj saĝaj, volas sekvi kobron en ĝian truon. Estis senlume en la truon; kaj Rikki-tikki neniam sciis, kiam ĝi plilarĝiĝos kaj donos al Nagaina la spacon por turni sin kaj frapi lin. Li sovaĝi plutenis, kaj etendis la piedojn por bremsi sur la senluma deklivo de la varma, humida grundo.

Tiam ĉesis ondi la herbaro apud la faŭko de la truon, kaj Darzi diris: "Jen finiĝis Rikki-tikki! Ni devos kanti lian mortokanton. Brava Rikki-tikki mortis! Ĉar Nagaina certe mortigos lin sub la tero."

Li do kantis tre funebrecan kanton, kiun li mem tiumomente kreis, kaj ĝuste kiam li atingis la plej kortuŝan strofon la herbaro ree ondis, kaj Rikki-tikki, kovrita de malpuraĵo, trenis sin el la truon, kruron post kruro, lekante al si la lipharojn. Darzi kriete ekĉesis kanti. Rikki-tikki deskuis iom el la polvo de sia felo kaj ternis. "Entute finiĝis," li diris. "La vidvino neniam plu elvenos." Kaj aŭdis lin la ruĝaj formikoj vivantaj inter la herbotigoj, kaj ili komencis vice marŝi malsupren por ekscii, ĉu li diris la veron.

Rikki-tikki ekkuŝis sur la herbaro kaj ekdormis tie -- dormadis ĝis la malfrua posttagmezo, ĉar li jam faris malfacilan taglaboron.

"Nun," li diris, vekiĝinte, "mi reiros al la domo. Diru al la kupristo, Darzi, kaj li pludiros al la ĝardeno, ke Nagaina mortis."

La kupristo estas birdeto, kiu faras bruon tute similan al la batado de marteletoj sur kupra poto; kaj tion li faras precize pro tio, ke li estas la urbo-kriisto por ĉiu bharata ĝardeno, kaj disinformas ĉiun, kiu atentigas. Dum Rikki-tikki laŭiris la vojetojn, li aŭdis ties "atentigajn" notojn kiel etan vespermanĝon sonorilon; kaj tiam la daŭra "Bim-bam-tok! Nag mortis! -- bam! Nagaina mortis! Bim-bam-tok!" Tio kantigis ĉiujn birdojn en la ĝardeno, kaj kvakigis ĉiujn ranojn; ĉar Nag kaj Naina kutimis manĝi ranojn same kiel birdetojn.

Kiam Rikki atingis la domon, Teĉjo kaj la patrino de Teĉjo (*ŝi ankoraŭ ŝajnis tre pala, ĉar ŝi svenis*) kaj la patro de Teĉjo elvenis kaj preskaŭ ploris super li; kaj tiun nokton li manĝis ĉion, kion oni donis al li ĝis li ne plu povis manĝi, kaj enlitiĝis sur la ŝultro de Teĉjo, kie la patrino de Teĉjo vidis lin kiam ŝi malfrunokte venis por kontroli.

"Li savis al ni la vivojn kaj al Teĉjo la vivon," ŝi diris al la edzo. "Nur pensu, li savis al ni ĉiuj la vivojn."

Rikki-tikki eksalte vekigis, ĉar ĉiuj mungoj malprofunde dormas.

"Ha, jen vi," li diris. "Kio ĝenas vin? La kobroj estas ĉiuj mortintaj; kaj, se ne, jen mi."

Rikki-tikki rajtis fieri pri si; sed li ne tro fieris, kaj li prizorgis tiun ĝardenon kiel tion faras mungo, per dento kaj salto kaj mordo, gis neniu kobro kuraĝis montri la kapon inter la muroj.